

# La Duakanonaj Libroj

volume 3





# La Duakanonaj Libroj

Volumo 3

Eldonis:

**VoKo**

Gerrit Berveling

Kalverstraat 8-B

8011 LH Zwolle

Nederlando

telefono: +31 (0)38-4237003

fakso: +31 (0)38-4237004

Produktis:

KAVA-PECH (Ĉeĥio)

<http://www.kava-pech.cz>

La kovrila bildo estas de Gustave Doré – Ezra kiu legas la leĝon al la popolo

© Gerrit Berveling, 2008

La  
**DUAKANONAJ LIBROJ**

**Volumo 3**

Libroj de la Ortodoksiaj Eklezioj

\*\*\*

el la helena kaj la latina tradukis

*Gerrit Berveling*

2008



Voĉoj Kristanaj 26

**Ni kore dankas pro la financa subteno  
de la  
Vera Gottschalk-Frank Stichting  
de la  
Remonstranta Eklezio  
Utrecht, Nederlando**

## Antaŭparolo

En 1988 s-ro Gersi Alfredo Bays petis min, ĉu mi povas verki por lia eldonejo *Fonto* novan tradukon de la kompleta *Nova Testamento*. Tute hezite mi konsentis, almenaŭ ekprovi tion per *Laŭ Marko*. Kaj de l' unua paŝo sekvis la dua, la tria ...

Tiutempe nek amiko Bays nek mi estus kapabla antaŭvidi, al kio tio ĉi kondukos. En 1992 unuope aperis la kvar evangelioj en kajeretoj: *La Bona Mesaĝo de Jesuo : Laŭ Marko ...* ktp, kaj en 2004 sekvis *Leteroj de Paŭlo kaj lia skolo*. Pri la cetero de NT estas laborate.

Je certa momento, mi ekkonsciis, ke en Esperantujo ni ja fieras pri « nia » Esperanto-biblio, sed ke por multe da kristanoj ĝi ne estas vere kompleta. Logika rezulto de tiu ekpenso estis nova, paralela tradukprojekto : *La Duakanonaj Libro*j. Per la nuna volumo finiĝas almenaŭ tiu ĉi mia dua « tasko » : jen la libroj, kiujn la okcidentaj eklezioj ne konas, sed kiuj ja enestas en la Biblio de la Greka kaj la Rusa Ortodoksio, krom kelkaj verkaĵoj kiuj apartenas al la manuskripta tradicio de *Septuaginto* aŭ *Vulgato*.

La sola verko, kiu en difinita eklezio estas konsiderata *kanona* kaj kiu ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto, estas la *Etiopia*

*Henob*<sup>1</sup>. Sed pri tiu lingvo mi tute ne estas kompetenta. Do tion foje aldonu alia klera samideano, eble el Etiopio.

La unuaj du volumoj de l' *Duakanonaj Libro*j aperis pli malpli samtempe en 2001 ĉe *Fonto*. Kune ili disponiĝis al nia legantaro ĉion, kio por romkatolikoj ĝis tiam mankis en la Sankta Skribo. Persone, al mi estas iom ironie, ke ĝuste studoperiodo de *remonstranta* pastoro (do pagata de lia eklezio) ebligis al niaj romkatolikaj gefratoj en la ekumeno legi la por ili kompletan Bibliion...

Fakulo de la Nederlanda Biblio-Societo, profesoro pri biblio-tradukado ĉe la protestanta Libera Universitato en Amsterdam, la sekvan jaron sufiĉe detale kontrolis la tradukon, kaj donis sian konsenton por ke ĝi aperu kune kun la cetero de *La Sankta Biblio* en 2003 ĉe *British and Foreign Bible Society*. Sekvis en 2006 nove aranĝita, pli bele editorita eldono de la *Biblio* ĉe *Kava-Pech*, kiel komuna eldono de IKUE kaj KELI.

Kaj nun, pli malpli 20 jarojn post la unua invito de amiko Bays, pretas la *Duakanonaj Libro*j kaj preskaŭ pretas la nova traduko de l' tuta *Nova Testamento*.

Gerrit Berveling

---

<sup>1</sup> La tradicia Esperanto-Biblio nomas lin *Hanoĥ*, sed tiun formon mi tre bedaŭras. En la Hebrea originalo li ja tiel nomiĝas, sed internacie li estas multe pli konata kiel *Henob*, kaj ankaŭ en la origina traduko de Zamenhof li nomiĝas *Henoĥ* – vidu en *de moseo al andersen* je paĝo 10. Do ankaŭ mi lin tiel nomas – interalie laŭ inspiro de Edwin de Kock, kiu jam antaŭ jaroj en sia poezio ekuzis ree la internacie konatan formon.



## Enkonduko

Kiel sciante, la *Biblio* iom post iom kreskis tra la jarcentoj. La unuaj spuroj, kiujn ni konas pri *kanonigo* troviĝas en 2 Reĝoj 22<sup>2</sup>, kie okaze de restaŭro-laboro en la Jerusalema templo oni trovas libron, kies vortoj asertas deveni de JHVH Dio. La tiama reĝo, Joŝija, ne scias kion decidi kaj oni konsultas la profetinon Ĥulda. Ŝia eldiro fakte unuafoje faras el la trovita libro *Sankta Skribo* nome de Dio. Mondhistorie grave decidiga ago de virino.

Teologiaj fakuloj interalie provis establi vicordon kaj pli detalajn datojn por la verkado de la diversaj bibliaj libroj.

Da ili aperis ĉiam pli. Pli malpli en la kvina jarcento a.Kr. fiksiĝis (kanoniĝis) la teksto de la *Torao*. Tio estas la libroj *Genezo ĝis inkluzive Readmono*.

Je certa momento, precipe ekster la origine Juda regiono, ĉiam pli montriĝis problemece bone kompreni la Hebreajn tekstojn, kiuj por multaj piuloj fariĝis ĉiam pli sanktaj. La Hebrea lingvo ja ne plu estis ĉiutage uzata; anstataŭis ĝin ĉu la Aramea ĉu la helenisma Greka. En la nova metropolo Aleksandrio, fondita

---

<sup>2</sup> La teksto de *1 Ezra* komenciĝas ĝuste per la tiujara Paskofesto.

de Aleksandro la Granda, estis fondita la granda *Biblioteko*. Por ĝi kaj por intern-juda uzado oni iom post iom verkis la unuan grandan tradukon de ĉiuj bibliecaj tekstoj : tiun oni nomas la *Septuaginto*. Al la manuskripta tradicio de tiu Septuaginto poste algluiĝis ĉiam pli da tekstoj, foje origine verkitaj en la Hebrea, poste tradukitaj al la Greka, foje ankaŭ rekte verkitaj Greke.

Post kiam komencis disvastiĝi nova « sekto » de l' Juda religio ĉirkaŭ certa Jesuo el Nazaret, ankaŭ iliaj – ĉefe Greke verkitaj – libroj ekapartenis al tiu sama kolektaĵo. Por Judaj rabenoj en Palestino, tamen, tio ne estis akceptebla : fine de la 1a jarcento p.Kr. ili fiksas la *kanonon* de l' *Hebrea Biblio*.

La nova movado, nun konata kiel *kristanismo*, plu uzadis la Septuaginton, dum Judismo estonte sin limigis je la *Hebrea TeNaĤ<sup>3</sup>*, kiel oni nomas ilian Bibliion.

En 1054 okazis la granda skismo inter Ortodoksio (la orientaj eklezioj) kaj la Okcidenta Eklezio, gvidata de Romo. En la 16a jarcento ĉi-lastata denove displitiĝis pro la Reformacio. La Koncilio de Trento (*La Tridentinum*, Latine) interalie, en reago al Kalvino, refoje fiksas la *kanonon* de la Biblio por la Romkatolika eklezio. En ĝi estas pluraj t.n. *Duakanonaj Libro*j kiujn Kalvino ne rekonis kiel aŭtentajn : nia eldono de 2001.

Multaj protestantaj Biblio-societoj aperigis (aŭ aperigas ankoraŭ) Bibliojn laŭ tiu Kalvina kanono. Ekde la 20a jarcento, foje ili aperigas ankaŭ Bibliojn kun bloka enŝovo de l' romkatolikaj duakanonaj libroj. Ofte en ekumena kunlaboro kun romkatolika bibliosocieto.

---

<sup>3</sup> Torao + Profetoj + Ceteraj Skriboj.

## *Libroj de ortodoksiaj eklezioj*

Kion la plimulto eĉ de la pli kleraj teologoj en okcidento apenaŭ (aŭ tute ne) rimarkis, estas, ke la Ortodoksiaj Eklezioj havas en la Biblio ankoraŭ kelkajn kromajn librojn. Ankaŭ tiuj ja apartenas al la sama fluo tradicia.

Ĉefe temas pri du ekstraj *Ezra*-libroj kaj du ekstraj *Makabeoj*-libroj. Krom tio en la manuskriptoj de l' Septuaginto ankoraŭ troviĝas la libroj *Odoj* kaj *Psalmoj de Salomono*.

La konataj libroj *Ezra* kaj *Nehemja* de la Hebrea Biblio formas en Septuaginto unu libron: 2 *Ezra*. Kiel 1 *Ezra* oni tie trovas verkon, kiun la okcidenta eklezio ne transprenis. Ĉe bona legado baldaŭ konstateblas, ke temas pri iom loza prilaborado de tekstoj jam konataj – kun unu sufiĉe longa, nova sceno pri la demando : kio estas la plej forta sur la tero ?

La alia ekstra *Ezra*-libro havas pli komplikan historion : estas iom problemece, kiel indiki ĝin. En la Hebrea Biblio, oni konas la librojn *Ezra* kaj *Nehemja*. Tiujn ankaŭ en la Esperanto-Biblio oni nomas same. En la *Septuaginto* (aŭ LXX, la malnova Greka traduko), kiel dirite, oni kunigis ilin kaj nomas ilin kune *Esdras β*, t.e. 2 *Ezra*. En la *Vulgato* (la Latina traduko) ili estas konataj kiel 1 *Esdras* kaj 2 *Esdras*, alidire: 1 *Ezra* kaj 2 *Ezra*. Ambaŭ ĉi tiuj libroj origine estis verkitaĵoj en la Hebrea lingvo, kvankam en la Hebrea *Ezra* enestas fragmentoj en la Aramea lingvo.

Apud tiuj ĉi libroj, kiuj estas kanonaj en la Juda Biblio, same kiel en la Biblio de ĉiuj kristanaj eklezioj, ekzistas ankoraŭ kelkaj aliaj libroj *Ezra* : en la *Septuaginto* ekzistas krome la libro *Esdras α* aŭ 1 *Ezra*. En la *Vulgato*, ĉu eble por simpligi, ĉi sama verko nomiĝas 3 *Ezra*. Por ankoraŭ pli komplikigi la aferon,

ekzistas krom tio en la *Vulgato* la libro 4 *Ezra*. Ĝin la Rusa biblio nomas 3 *Ezra*.

Pri ambaŭ ĉi tiuj verkoj ni atentu la jenon : 1 (3) *Ezra* origine estis verkita supozeble en la Greka, kvankam pluraj fakuloj insistas pri tio, ke ĝi devas esti traduko el ne plu ekzistanta originalo ĉu Hebrea ĉu Aramea. Aliflanke, 4 (3) *Ezra* origine estis verkita verŝajne en la Hebrea ; supozeble tra Greka traduko ĝi estis tradukita en la Latinan ; el la frua kristanismo restas al ni krom la Latina, ankaŭ tradukoj en pluraj aliaj lingvoj. Kelkfoje, citante el *The Cambridge Bible Commentary* aŭ el *The New Oxford Annotated Bible with the Apocrypha*, aŭ el *The Old Testament Pseudepigrapha*, en piednoto pri tio ni atentigas.

Kvankam ambaŭ ĉi tiuj *Ezra*-libroj ja enestas en la manuskripta tradicio de l' *Vulgato*, en la okcidenta eklezio 1 (3) + 4 (3) *Ezra* ne estas konsiderataj kiel kanonaj ; sed 1 (3) *Ezra*, sub la indiko 1 *Esdras*, ja estas kanona en la Greka Ortodoksio, dum 4 (3) *Ezra* estas kanona en la Rusa Ortodoksio.

La verko 4 (3) *Ezra*, efektive, konsistas en si mem el tri malsamaj libretoj. Fakuloj foje uzas la indikon 4 *Ezra* por ĉapitroj 3-14; 5 *Ezra* por ĉapitroj 1-2; kaj 6 *Ezra* por ĉapitroj 15-16.

En la nuna eldono ni uzos la indikon 1 *Ezra* por la unue menciita libro, kaj 4 *Ezra* por la alia.

Iom skemece jen:

Hebrea Biblio:      Ezra  
                            Nehemja

Septuaginto:      1 Ezra  
                            2 Ezra [= Ezra + Nehemja]

Vulgato: 1 Ezra [= Ezra]  
2 Ezra [= Neĥemja]  
3 Ezra [= Greka 1 Ezra]  
4 Ezra [= Rusa 3 Ezra]

Greka Ortodoksio: 1 Ezra  
2 Ezra [= Hebrea Ezra]  
Neĥemja

Rusa Ortodoksio: 1 Ezra [= Hebrea Ezra]  
Neĥemja  
2 Ezra [= Greka 1 Ezra]  
3 Ezra [= 4 Ezra]

La unua ekstra libro *Makabeoj*, 3 Mak, efektive ne temas pri la Makabeoj mem, sed pri la Ptolemeoj en Egiptujo. La alia, 4 Mak, ja donas multajn – laŭ iuj eĉ tro multajn – detalojn de l' martiriĝo de pluraj Makabeoj, sed prezentas tion al la legantoj sub la formo de tiel nomata « filozofia » traktaĵo pri la temo, ĉu la racio regas la emociojn aŭ inverse.

La konata Hebrea libro *Psalmoj* en Septuaginto enhavas unu psalmon pli ol la Hebrea teksto. Do tiu ekstra psalmo enestas en ĉi tiu libro.

La Septuaginta libro *Odoj* enhavas la jenajn kantojn:

1. Eliro 15:1-19
2. Readmono 32:1-43
3. 1 Reĝoj 2:1-10
4. Ĥabakuk 3:2-19
5. Jesaja 26:9-20
6. Jona 2:3-10
7. Daniel 3:26-45

8. Daniel 3:52-88
9. Luko 1:46-55.68-79
10. Jesaja 5:1-9
11. Jesaja 38:10-20
12. *Preĝo de Manase*
13. Luko 2:29-32
14. *Matena himno*

Kiel videblas, krom du tekstoj temas pri iaspeca krestomatio el Bibliaj kantoj. Kompreneble, se atenti detalojn, estas pluraj variaĵoj, sed ne tiel gravaj ke nova traduko necesas. La *Preĝo de Manase* kaj la *Matena himno* enestas en ĉi tiu libro.

\* \* \*

Apendice sekvas du verkaĵoj, kiuj kunvojaĝis en la manuskriptaj tradicioj de Septuaginto aŭ Vulgato : la libro *Psalmoj de Salomono* tiom influis fruan kristanismon, ke ĝi prave meritas sian lokon. Kaj por ke ankaŭ la manuskripta tradicio de l' *Vulgato* estu kontentigita, enestas laste la nenie kanona *Letero al la Laodiceanoj*.

Per tio ĉi, do, en Esperanto ni nun havas je nia dispono la kompletan Biblian tekstaron, krom la Etiopia *Henoh*.

# 1 Ezra

## Enkonduko al 1 Ezra

La historia periodo, kiun priskribas ĉi tiu libro etendiĝas de la 7a ĝis la 5a aŭ frua 4a jc a.Kr., ekde la regado de Joŝija, reĝo de Judujo, ĝis la tempo de Ezra.

La granda plimulto de la teksto de *1 Ezra* ege similas je 2 Kro 35-36, Ezr kaj tiu parto de Neh, kiu traktas la agadon de Ezra (Neh 7:73b-8:13). Sed jen kelkaj problemetoj: la materialo de Ezr 4:7-24 ĉi tie staras en malsama kunteksto en ĉapitro 2 ol en la Hebrea libro Ezr; la ĉapitroj 3 kaj 4 de *1 Ezra* ne havas paralelon en la menciitaj libroj; kaj la libro ŝajne finiĝas meze de frazo ĉe 9:55.

Kelkaj fakuloj konsideras ĉi tiun *1 Ezra* kiel eble pli fidindan tradicion pri la efektive historiaj okazaĵoj apud la kutima Ezr; la kontraŭa starpunkto estas pli skeptika pri *1 Ezra*, asertante ke ĉi tiu ŝajne pli kredinda prezentado de la historio ja eble ĝuste devenas de intenca adaptado – do estus malpli fidinda ol la originaj tekstoj.

La fakto, ke Nehemja tute mankas en *1 Ezra*, povas atribuiĝi al frua tradicio, laŭ kiu ties agado estis tute distingita de tiu de Ezra. Sed aliflanke en 2 Mak 1:18-2:13 kaj Sir 49:13 ne Ezra, sed nur Nehemja estas menciata...

En la lastaj jarcentoj a.Kr. pri la graveco de Ezra okazis polemiko en Judismo ; eble ĉi tiu verko celis emfazi ĝuste tial lian gravecon : li staras en serio de forte influaj figuroj : Joŝija, Zerubabel, Ezra.

La libro supozeble estis verkita en la Greka, kvankam ne mankas fakuloj, kiuj sugestis Hebrean aŭ Aramean originalon. Koncerne la daton de verkiĝo, kutime oni pensas pri la lastaj jarcentoj a.Kr. – sufiĉe ne klare. Preskaŭ certas, ke la Juda historiisto Flavio Jozefo (fine de la 1a jc p.Kr.) konis la verkon.

*La enhavon de 1 Ezra oni povas jene dividi :*

- |          |                             |
|----------|-----------------------------|
| 1:1-2:26 | Ekzilo kaj reiro            |
| 3:1-4:63 | Diskuto ĉe la Persa kortego |
| 5:1-7:15 | La templo rekonstruita      |
| 8:1-9:55 | Ezra en Jerusalemo          |



# 1 Ezra<sup>4</sup>

## Ekzilo kaj reiro: 1:1-2:26

*Joŝija*

1:1\*<sup>5</sup> Joŝija faris en Jerusalema la Paskon por sia Sinjoro, kaj li oferis la Paskon en la dekkvara tago de la unua monato. 2 Li starigis la pastrojn, en ties belaj roboj, en la sanktejo de la Sinjoro, laŭ iliaj subdividoj por la taga servado. 3 Kaj li diris al la Levidoj, la temploservantoj de Izrael, ke ili sin purigu antaŭ la Sinjoro, por meti la sanktan keston de la Sinjoro en la domon, kiun konstruis Salomono, filo de David, reĝo de Izrael. <Li diris:> Vi ne bezonos porti ĝin sur la ŝultroj. 4 Adoru nun la Sinjoron, vian Dion, kaj servu al Lia popolo Izrael. Kaj aranĝu vin laŭ viaj patrodomoj, laŭ viaj grupoj, laŭ la preskribo de David, reĝo de Izrael, kaj laŭ la grandeco de lia filo Salomono. 5 Kaj prenu viajn lokojn en la sanktejo laŭ la ordoj de la prapatraj domoj de viaj Levidoj, kiuj servas antaŭ viaj fratoj, la Izraelidoj.

---

<sup>4</sup> La nombrado de la versikloj iom varias laŭ diversaj eldonoj; ni sekvas tiun de la eldono de LXX de Alfred Rahlfs.

<sup>5</sup> Asterisko (\*) montras, ke post la traduko troviĝas Noto.

6 Kaj oferu la Paskon, kaj preparu la oferojn por viaj fratoj, kaj faru la Paskon laŭ la ordonoj de la Sinjoro, kiujn Li donis per Moseo.

7 Kaj al la ĉeestanta popolo Joŝija donis donace tridek mil ŝafojn kaj ŝafidojn, kaj tri mil bovidojn; ĉion tion li donis el la havaĵo de la reĝo, kiel li promesis al la popolo kaj al la pastroj kaj la Levidoj. 8 Kaj Hilkija, Zeharja, kaj Jehiel, la estroj en la sanktejo, <donis> al la pastroj por la Pasko du mil sescent ŝafidojn kaj tricent bovidojn. 9 Kaj Konanja, Ŝemaja, kaj lia frato Netanel, kaj Haŝabja, Jeiel, kaj Jozabad, milestroj <de la Levidoj>, donis al la Levidoj por la Pasko kvin mil ŝafidojn kaj sepcent bovidojn.

10 Tiamaniere la servado estis aranĝita: laŭorde stariĝis antaŭ la popolo la pastroj kaj la Levidoj, 11 portante la macojn, laŭ siaj grupoj 12 kaj laŭ siaj prapatraj domoj, por oferi al la Sinjoro laŭ la preskriboj en la libro de Moseo\*. Tio okazis matene. 13 Kaj ili rostis la Paskon super la fajro, kiel estas inde, kaj ili kuiris la oferojn en kaldronoj kaj en potoj, kaj tio bone odoris, kaj ili disportis porciojn por ĉiuj en la popolo. 14 Kaj poste ili ankaŭ pretigis por si mem kaj por siaj fratoj, la pastroj, la Aaronidoj; ĉar la pastroj plu oferadis la sebon ĝis noktiĝo, kaj la Levidoj do pretigadis por si mem kaj por siaj fratoj, la pastroj, la Aaronidoj. 15 La templokantistoj, la idoj de Asaf, estis sur siaj postenoj laŭ la preskribo de David: Asaf, Heman<sup>6</sup>, kaj Jedutun de la reĝa kortego; kaj la pordegistoj estis ĉe ĉiu pordego; ili ne bezonis forlasi sian servadon, ĉar iliaj fratoj, la Levidoj, preparis por ili.

16 Tiamaniere estis aranĝita en tiu tago la servado al la Sinjoro, per farado de la Pasko kaj alportado de oferoj sur la altaro de la Sinjoro, laŭ la ordono de la reĝo Joŝija. 17 Kaj la

---

<sup>6</sup> La Greka teksto ĉi tie – erare – parolas pri Zaharja; komparu kun versiklo 8.

Izraelidoj, kiuj tie troviĝis, faris la Paskon en tiu tempo kaj la feston de macoj dum sep tagoj. 18 Tia Pasko ne estis farita en Izrael de post la tempo de la profeto Samuel; 19 kaj el ĉiuj reĝoj de Izrael neniu faris tian Paskon, kian faris Joŝija, la pastroj, la Levidoj, ĉiuj Judoj kaj tuta Izraelo, kiuj tie troviĝis loĝante en Jerusalema. 20 Tiu ĉi Pasko estis farita en la dek-oka jaro de la reĝado de Joŝija.

21 Kaj Joŝija faris ĉion bone antaŭ sia Sinjoro, en plenkora pieco. 22 Kaj la okazaĵoj de lia reĝado estis priskribitaj en malnova tempo, <historio de> pekado kaj malpieco kontraŭ la Sinjoro, pli ol ĉe iu ajn alia popolo aŭ regno, kaj kiel ili ĉagrenis Lin, tiel ke la vortoj de la Sinjoro trafis Izraelon.

23 Post ĉio, kion Joŝija plenumis, okazis ke Faraono, reĝo de Egiptujo, eliris milite kontraŭ Karkemiŝon ĉe Eŭfrato. Kaj eliris kontraŭ lin Joŝija. 24 Kaj la reĝo de Egiptujo sendis al li senditojn, por diri: Kio estas inter mi kaj vi, ho reĝo de Judujo? 25 Ne kontraŭ vin mi nun iras, sendita de la Sinjoro Dio, ĉar militon mi havas kontraŭ Eŭfraton. Nun la Sinjoro estas kun mi, la Sinjoro ja estas kun mi, instigante min. Retiriĝu, kaj ne kontraŭstaru la Sinjoron.

26 Sed Joŝija ne reiris al sia ĉaro, sed li provis batali kontraŭ li, ne atentante la parolojn de la profeto Jeremia el la buŝo de la Sinjoro. 27 Li batalis kun li en la valo de Megido. Kaj la komandantoj venis malsupren al la reĝo Joŝija. 28 Kaj la reĝo diris al siaj servantoj: Forkonduku min el la batalo, ĉar mi estas tre malforta. Kaj tuj liaj servantoj forkondukis lin de la batalkampo, 29 kaj li suriĝis sur sia dua ĉaro. Kaj reveturigite al Jerusalema, li mortis, kaj oni enterigis lin en la tombo de liaj patroj.

30 Kaj la tuta Judujo funebris pri Joŝija. Ankaŭ Jeremia plorkantis pri Joŝija; kaj la pligravuloj kun siaj edzinoj faris plorkantojn pri li ĝis la nuna tago; kaj fariĝis tradicie ke tio okazu daŭre en la tuta popolo de Izrael. 31 Tio ĉi estas priskribita en la libro de la historioj pri la reĝoj de Judujo; kaj ĉiuj unuopaj agoj

de Joŝija, kaj lia gloro, kaj lia kompreno pri la leĝo de la Sinjoro, kaj kion antaŭe li faris kaj la nunaj aferoj estas rakontataj en la libro de la reĝoj de Izrael kaj Judujo.

### *Jerusalem falas*

32\* La popolo de la lando prenis Jehoahazon, filon de Joŝija, kaj faris lin reĝo anstataŭ lia patro en Jerusalem. Li havis la aĝon de dudek tri jaroj. 33 Tri monatojn li reĝis en Judujo kaj Jerusalem. La reĝo de Egiptujo detronigis lin en Jerusalem, 34 kaj punis la landon per punpagigo de cent talantoj da arĝento kaj unu talanto da oro. 35 Kaj la reĝo de Egiptujo ekreĝigis super Judujo kaj Jerusalem lian fraton Jehojakim. 36 Kaj Jehojakim enprizonigis la nobelojn, kaptis sian fraton Zario kaj rekondukis lin el Egiptujo.

37 Jehojakim havis la aĝon de dudek kvin jaroj, kiam li ekreĝis en Judujo kaj Jerusalem. Kaj li agadis malbone antaŭ la Sinjoro. 38 Kontraŭ lin iris Nebukadnecar, reĝo de Babel, kaj ligis lin per bronzaĵoj, por forkonduki lin en Babelon. 39 Kaj parton el la sanktaj vazoj de la Sinjoro, Nebukadnecar transportis en Babelon, kaj metis ilin en sian templon en Babel. 40 La cetera historio de Jehojakim, kaj liaj malpuraĵoj, kaj lia malpieco, estas priskribitaj en la libro de la analoj de la reĝoj.

41 Kaj anstataŭ li ekreĝis lia filo Jehoahin. Kiam li fariĝis reĝo, li havis la aĝon de dek ok jaroj, 42 kaj tri monatojn kaj dek tagojn li reĝis en Jerusalem. Kaj li agadis malbone antaŭ la Sinjoro.

43 Kiam la jaro finiĝis, la reĝo Nebukadnecar transirigis lin en Babelon, kune kun la sanktaj vazoj de la Sinjoro, 44 kaj li faris lian fraton Cidkija reĝo super Judujo kaj Jerusalem. La aĝon de dudek unu jaroj havis Cidkija, kaj dek unu jarojn li reĝis. 45 Kaj li agadis malbone antaŭ la Sinjoro. Li ne humiliĝis antaŭ la vortoj, kiujn la profeto Jeremia diris nome de la Sinjoro. 46 Kvankam la reĝo Nebukadnecar igis lin ĵuri je la nomo de

la Sinjoro, tamen falsjure li ribelis kontraŭ li; li malmoligis sian nukon kaj obstinigis sian koron, kaj transpaŝis la leĝojn de la Sinjoro, la Dio de Izrael. 47 Ankaŭ la estroj de la popolo kaj de la pastroj agadis malpie kaj kontraŭleĝe, pli ol la malpuraĵoj de ĉiuj nacioj, kaj ili malpurigis la domon de la Sinjoro, kiun Li sanktigis en Jerusalemon. 48 La Dio de iliaj patroj avertadis ilin per Siaj senditoj, ĉar Li domaĝis ilin kaj Sian loĝejon. 49 Sed ili mokis Liajn senditojn, kaj je la tago kiam parolis la Sinjoro, ili ridis pri Liaj profetoj, ĝis koleriĝinte kontraŭ Sia popolo pro iliaj malpiaĵoj, Li ordonis irigi kontraŭ ili la reĝojn de la Ĥaldeoj. 50 Tiu mortigis iliajn junulojn per glavo ĉirkaŭ ilia sanktejo, kaj indulgis nek junulon nek virgulinon, nek maljunulon nek infanon, ĉar ĉiujn Li transdonis en iliajn manojn. 51 Kaj ĉiujn sanktajn vazojn de la Sinjoro, la grandajn kaj la malgrandajn, kaj la trezorkestojn de la Sinjoro, kaj la reĝajn ŝrankojn ili transportis al Babel. 52 Kaj ili bruligis la domon de la Sinjoro, detruis la muregojn de Jerusalemon, kaj bruligis iliajn turojn per fajro 53 kaj komplete neniigis ĉiujn ĝiajn gloraĵojn. La postvivantojn li\* kondukis per devigo per la glavo al Babel. 54 kaj ili laboris kiel liaj sklavoj, kaj ankaŭ por liaj filoj, ĝis ekregis la Persoj, kiel plenumo de la vorto de la Sinjoro per la buŝo de Jeremia: 55 Ĝis kiam la lando ĝojos pri siaj sabatoj, ĝi sabato la tutan tempon de sia forlasiteco, ĝis plenumiĝos sepdek jaroj.

### *Restaŭro dum Ciro*

2:1\* Dum Ciro la unuan jaron reĝis pri la Persoj, por ke plenumiĝu la vorto de la Sinjoro per la buŝo de Jeremia, la Sinjoro instigis la spiriton de Ciro, reĝo de la Persoj, kaj ĉi tiu proklamigis en sia tuta regno voĉe kaj skribe jenon: 2 Tiele diras Ciro, reĝo de la Persoj: Min indikis kiel reĝon de la loĝata tero la Sinjoro de Izrael, la plej alta Sinjoro, kaj Li komisiis al mi konstrui al Li domon en Jerusalemon, kiu estas en Judujo. 3 Se do iu inter vi estas el Lia popolo, kun tiu estu lia Sinjoro; kaj li

iru en Jerusalemon, kiu estas en Judujo, kaj konstruu la domon de la Sinjoro de Izrael. Tio estas la Sinjoro kiu ektendumis en Jerusalemon. 4 Kaj ĉiu el vi, en kiu ajn loko li loĝas, estu helpata de la loĝantoj de sia loko per oro kaj arĝento, per donacoj, ĉevaloj kaj brutoj, apud vot-oferaĵoj por la domo de la Sinjoro, kiu estas en Jerusalemon.

5 Kaj levigis la ĉefoj de la patrodomoj de Jehuda kaj de Benjamen, kaj la pastroj kaj la Levidoj, kaj ĉiu, en kiu la Sinjoro vekis la spiriton por iri konstrui la domon de la Sinjoro en Jerusalemon. 6 Kaj ĉiuj iliaj ĉirkaŭantoj helpis al ili en ĉio, per arĝento kaj oro, per ĉevaloj kaj brutoj, kaj per amaso da vot-oferaĵoj de ĉiuj, kies menso estis vekita. 7 Kaj la reĝo Ciro elportigis la sanktajn vazojn de la Sinjoro, kiujn Nebukadnecar estis elportinta el Jerusalemon kaj metinta en la domon de liaj idoloj. 8 Ciro, reĝo de la Persoj, elportigis kaj transdonigis ilin al sia trezoristo Mitredat, kaj tiu transdonis ilin al Ŝeŝbazar, princo de Judujo. 9 Kaj jen estas ilia nombro: da oraj pelvoj mil, da arĝentaj pelvoj mil, da arĝentaj incensiloj dudek naŭ, 10 da oraj kalikoj tridek, da arĝentaj duoblaj kalikoj kvarcent dek, da aliaj vazoj mil. 11 Ĉiuj ĉi tiuj vazoj estis transdonitaj, oraj kaj arĝentaj, kvin mil kvarcent sesdek naŭ. Ĉion ĉi tion kunportis Ŝeŝbazar, samtempe kun la reirado de la forkaptitoj, el Babel en Jerusalemon.

### *Problemoj*

12\* En la tempo de Artahŝaŝt, reĝo de la Persoj, Biŝlam, Mitredat, Tabeel, Rehum, Beltem kaj Ŝimŝaj, la skribisto, kaj la ceteraj el iliaj kunuloj, kiuj loĝis en Samario kaj en la aliaj lokoj, skribis al li kontraŭ la loĝantoj de Judujo kaj Jerusalemon la sube kopiitan leteron:

13 Al la reĝo Artahŝaŝt, la sinjoro, viaj sklavoj Reĥum la raportisto<sup>7</sup>, Ŝimŝaj, la skribisto, kaj la ceteraj juĝistoj de ilia konsilio en Celesirio kaj Fenicio: 14 Estu sciante al la sinjoro, la reĝo, ke la Judoj, kiuj foriris de vi kaj venis al ni en Jerusalemon, rekonstruas nun tiun ribeleman kaj malbonan urbon, riparas ĝiajn vendoplacojn kaj muregojn kaj starigas jam la fundamentojn de templo. 15 Se nun do tiu urbo estos konstruita kaj la muregoj estos finitaj, tiam ili ne nur rifuzos doni tributon, impostojn kaj jarpagon, sed ankaŭ rezistos al la reĝoj. 16 Kaj ĉar nun la laboro pri la templo progresas, ni opinias bona ne neglekti ĉi tion, sed averti nian sinjoron, la reĝon, por ke, se ŝajnas bone al vi, oni rigardu en la libroj de viaj patroj, 17 kaj vi trovos en la kronikoj, kio estas skribita pri ili, kaj vi konvinkigĝos, ke tiu urbo estis urbo ribelema kaj ĝenoporta por la reĝoj kaj la urboj, kaj ke la Judoj estis ribelemaj kaj starigis blokadojn en ĝi de la plej malproksimaj tempoj, kio estas la kaŭzo, pro kiu tiu urbo estis detruita. 18 Ni do sciigas al la sinjoro reĝo, ke se tiu urbo estos rekonstruita kaj ĝiaj muregoj estos finitaj, tiam ne plu estos transiro por vi al Celesirio kaj Fenicio.

19 La reĝo responde skribis al Reĥum, kiu skribis la raporton, al Beltem, al Ŝimŝaj la skribisto, kaj al la ceteraj el iliaj kunuloj, kiuj loĝis en Samario, en Sirio kaj en Fenicio:

20 Mi legis la leteron, kiun vi sendis al mi. 21 Mi do donis ordonon, ke oni rigardu; kaj oni trovis, ke tiu urbo de malproksima tempo ribeladis kontraŭ la reĝoj, kaj ke la homoj en ĝi faradis ribelojn kaj militojn 22 kaj ke en Jerusalemon estis fortaj kaj potencaj reĝoj, kiuj regis super Celesirio kaj Fenicio kaj ricevis tributojn de tie. 23 Nun mi do ordonas malhelpi tiujn homojn en ilia konstruado pri la urbo, 24 kaj esti singardaj, ke

---

<sup>7</sup> Traduko ne tute certa.

nenio alia estu farata kaj ke tiuj fraĵoj ne plimultiĝu je malprofito por la reĝo.

25 Post tralego de tiu letero de la reĝo Artaĥŝaŝt, Reĥum kaj Ŝimŝaj, la skribisto, kaj iliaj kunuloj, tuj iris en Jerusalemon kun rajdistaro kaj kun amaso da soldatoj por haltigi la konstruantojn. 26\* Kaj tiam ĉesiĝis la konstrulaboro ĉe la sanktejo en Jerusalemo ĝis la dua jaro de la reĝado de Dario, reĝo de la Persoj.

## **Diskuto ĉe la Persa kortego: 3:1-4:63**

### *Bankedo de Dario*

3:1\* La reĝo Dario organizis grandan bankedon por ĉiuj, kiuj estis sub li, por ĉiuj kiuj naskiĝis en lia domo, por ĉiuj nobeloj de Medujo kaj Persujo, 2 por ĉiuj satrapoj, generaloj kaj guberniestroj, kiuj estis sub li, en la cent dudek sep satrapejoj ekde Hindujo ĝis Etiopio. 3 Ili manĝis kaj trinkis, kaj kiam ili estis satigitaj, ili foriris, kaj la reĝo Dario iris al sia dormoĉambro, enlitiĝis kaj denove vekigis.

4 La tri junuloj, kiuj kiel korpogardistoj prigardis la sekurecon de la reĝo, diris inter si: 5 Ĉiu el ni diru unu aferon, kiu estas la plej forta; kaj kies opinio ŝajnas la plej saĝa, al tiu reĝo Dario donu grandajn donacojn, kaj grandajn venko-premiojn. 6 Li portu purpuran vestaĵon, trinku el oraj pokaloj, dormu en ora lito, kaj li havu ĉaron kun oraj bridoj, turbanon el delikata tolo, kaj kolĉenon ĉirkaŭ la kolo. 7 Kaj pro sia saĝeco li sidu apud Dario, kaj havu la titolon Parenco de Dario.

8 Kaj ĉiu skribis sian opinion, sigelis ĝin, kaj metis ĝin sub la kusenon de la reĝo Dario, kaj ili diris: 9 Kiam vekigos la reĝo, oni donos la skribaĵon al li, kaj pri kiu juĝos la reĝo kaj la tri nobeloj de Persujo, ke ties vortoj estas la plej saĝaj, al tiu apartenos la venko, laŭ kio skribiĝis. 10 La unua skribis: Plej



forta estas la vino. 11 La dua skribis: Plej forta estas la reĝo. 12 La tria skribis: Plej fortaj estas la virinoj, sed ĉion venkas la vero.

13 Kiam vekigis la reĝo, oni prenis la skribaĵon kaj donis al li, kaj li legis. 14 Kaj li invitis ĉiujn nobelojn de Persujo kaj de Medujo, kaj la satrapojn, la generalojn, la guberniestrojn, kaj la prefektojn, kaj li eksidis en sia konsilia salono, kaj li legis la skribaĵon antaŭ ili. 15 Li diris: Alvoku la junulojn, kaj ili klarigu siajn vortojn. Ili estis alvokitaj, kaj envenis. 16 Li diris al ili: Klarigu al ni, kion vi skribis.

### *La vino estas la pli forta*

17 La unua, kiu menciis la forton de la vino, komencis kaj diris: 18 Sinjoroj, kial la plej forta estas la vino? Ĉar ĝi erarigas la menson de ĉiuj homoj, kiuj ĝin trinkis. 19 Ĝi egaligas la menson de la reĝo al tiu de orfo, tiun de sklavo al tiu de liberulo, tiun de malriĉulo al tiu de riĉulo. 20 Kaj ĉiujn pensojn ĝi turnas al festado kaj gajeco, kaj forgesigas pri ĉiuj zorgoj kaj ŝuldoj. 21 Kaj ĉiujn korojn ĝi faras riĉaj, ne memoras pri reĝo aŭ satrapo, kaj igas ĉiujn paroli laŭ talantoj\*. 22 Kiam oni drinkas, oni forgesas amike rilati al siaj amikoj kaj fratoj, kaj baldaŭ oni elingigas la glavojn. 23 Kaj rekonsciigante for de la vino, oni ne plu memoras, kion oni faris. 24 Sinjoroj, ĉu ne la plej forta estas la vino, ĉar ĝi devigas la homojn agi tiel? Li eksilentis post ĉi tiuj vortoj.

### *La reĝo estas la pli forta*

4:1 Tiam ekparolis la dua, kiu menciis la forton de la reĝo: 2 Sinjoroj, ĉu ne la plej fortaj estas la homoj, kiuj regas la teron kaj la maron, kaj ĉion en ili? 3 Sed la reĝo estas pli forta kaj regas kaj mastras super ili, kaj kion ajn li ordonas al ili, pri tio ili obeas. 4 Se li ordonas al ili fari militon unu kontraŭ la alia,

ili tion faras; kaj kiam li elsendas ilin kontraŭ la malamikojn, ili iras, kaj konkeras montojn, murojn kaj turojn. 5 Ili mortigas kaj mortigâs, sed la vorton de la reĝo ili ne malobeas; se ili venkas, ili alportas ĉion al la reĝo – kiun ajn predon ili akiras, kaj ĉion ceteran. 6 Kaj kiuj ne militservas nek batalas, sed kultivas la teron, – se ili semas kaj rikoltas, ili alportas el ĝi al la reĝo; kaj reciproke ili devigas unu la alian pagi tributojn al la reĝo. 7 Sed tamen li estas nur unusola ! Se li ordonas mortigi, ili mortigas; se <li ordonas> liberigi, ili liberigas. 8 Li ordonas ataki, ili atakas; li ordonas ruinigi, ili ruinigas; li ordonas konstrui, ili konstruas; 9 li ordonas terenbati, ili terenbatas; li ordonas planti, ili plantas. 10 Tuta lia popolo kaj liaj armeoj obeas lin. 11 Krom tio, li ekripozas, li manĝas, trinkas kaj ekdormas, sed ili gardostaras ĉirkaŭ li, kaj neniu el ili povas foriri por prizorgi siajn proprajn aferojn, nek malobei al li. 12 Sinjoroj, kial ne estas la plej forta la reĝo, ĉar li estas obeenda en tiu maniero ? Kaj li eksilentis.

### *La virino estas la pli forta*

13 La tria, kiu menciis la virinojn kaj la veron (tiu estis Zerubabel), komencis paroli: 14 Sinjoroj, ĉu ne granda estas la reĝo, ĉu ne multaj la viroj, ĉu la vino ne estas forta ? Kaj kiu regas super ili, kiu havas estradon super ili ? Ĉu ne la virinoj ? 15 La virinoj naskas la reĝon kaj ĉiun popolon, kiu regas super maro kaj tero. 16 El virinoj ili naskiĝis; kaj virinoj edukis la virojn, kiuj plantas la vitejojn, el kiuj estiĝas la vino. 17 La virinoj faras la vestaĵojn de la viroj; la virinoj faras la gloron de la viroj; la viroj ne povas ekzisti sen la virinoj. 18 Se viroj kolektas oron, arĝenton aŭ iujn ajn aliajn valoraĵojn, kaj ekvidas unu virinon, mirindan laŭ aspekto kaj belo, 19 ĉion ĉi tion ili delasas, kaj nur ŝin ili algapas kaj buŝmalferme ili alrigardas ŝin, kaj ĉiuj preferas ŝin super oro, arĝento aŭ ĉiu alia belaĵo. 20 La viro postlasas sian propran patron, kiu edukis lin, kaj sian propran regionon, kaj aliĝas al sia edzino. 21 Kaj kun sia edzino li finas siajn tagojn,

ne plu memorante la patron nek la patriron, nek sian regionon.  
22 Tial vi do konsciu, ke la virinoj regas super vi.

Ĉu vi ne klopodas kaj laboras, por porti ĉion donace al la virinoj ? 23 La viro prenas sian glavon, li ekiras vojaĝi, kaj rabi kaj ŝteli, kaj navigi maron kaj riverojn; 24 li alfrontas la leonon, piediras tra la mallumo, kaj kiam li ŝtelas, rabas aŭ forkaptas ion, li reportas ĝin al sia amatino. 25 La viro amas sian edzinon pli ol siajn gepatrojn. 26 Multaj viroj mensperdiĝis pro virinoj, kaj fariĝis sklavoj pro ili. 27 Multaj pereis, ekstumblis aŭ pekis pro virinoj. 28 Ĉu vi ankoraŭ ne kredas min ?

Ĉu la reĝo ne estas granda en sia potenco ? Ĉu ne ĉiuj regionoj timas ektuŝi lin ? 29 Sed mi vidis lin kun Apame\*, la konkubino de la reĝo, la filino de lia moŝto Bartako: ŝi sidis dekstre de la reĝo 30 kaj deprenis la diademon de la kapo de la reĝo, kaj metis ĝin al si sur la kapon, kaj ŝi frapis la reĝon per sia dekstra mano. 31 Kaj ĉe tio la reĝo nur buŝmalferme alrigardis ŝin. Kiam ŝi alridas lin, li ridas; sed kiam ŝi ekkoleras kontraŭ li, li flatas ŝin, por ke ŝi repaciĝu kun li. 32 Sinjoroj, kial ne estas fortaj la virinoj, ĉar tiel ili agas ?

33 La reĝo kaj la nobeloj rigardis unu al la aliaj.

### *Laŭdo pri la vero*

34\* Tiam li ekparolis pri la vero: Sinjoroj, ĉu ne fortaj estas la virinoj ? Granda estas la tero, kaj alta la ĉielo, kaj rapide iras la suno, ĉar la cirklo de la ĉielo ĝi rondiras kaj revenas al sia deirpunkto en unu tago. 35 Ĉu ne granda estas kiu tion faras ? Sed la vero estas granda, kaj pli forta ol ĉio. 36 La tuta mondo vokas pri la vero, kaj la ĉielo ĝin laŭdas. Kaj ĉiuj faroj <de Dio> skuigas kaj tremas, kaj ĉe ĝi estas nenio maljusta. 37 Maljusta estas la vino, maljusta la reĝo, maljustaj la virinoj, maljustaj estas ĉiuj homidoj, kaj maljustaj ĉiuj iliaj agoj, kaj ĉio simila. En ili ne estas vero, kaj en sia maljusto ili pereos. 38 Sed la vero restas firma ĝis eterneco, kaj vivas kaj fortas por eterne

kaj ĉiam. 39 Ĉe ĝi ne estas partio nek preferoj, sed ĝi faras justecon anstataŭ ĉiu maljusto kaj fieco. Ĉiuj laŭdas ĝiajn farojn, kaj en ĝia juĝo estas nenio maljusta. 40 Kaj al ĝi apartenas la forto, kaj la regno, kaj la gloro, kaj la majesto de ĉiuj eternecoj. Laŭdata <estu> la Dio de la vero !

41 Li ĉesis paroli, kaj la tuta popolo ekkriis, kaj diris: Granda estas la vero, kaj la plej forta !

### *La rekompenco*

42 Tiam la reĝo diris al li: Petu, kion vi deziras, pli ol estis skribite, kaj ni donacos ĝin al vi, ĉar vi montriĝas la plej saĝa. Kaj vi sidos apud mi, kaj nomiĝos mia Parenco. 43\* Tiam li diris al la reĝo: Memoru ke en la tago, kiam vi transprenis la reĝecon, vi faris la voton konstrui Jerusalemon, 44 kaj resendi ĉiujn vazojn rabitajn el Jerusalemo, kiujn Ciro apartigis, kiam li faris la voton, neniigi Babelon kaj resendi ilin tien returne. 45 Vi faris la voton konstrui la templon, kiun bruligis la Idumeanoj, kiam Judujo estis dezertigita de la Ĥaldeoj. 46 Jen do tio estas, kion mi petas de vi, sinjoro reĝo, mia deziro, konforme al via grandeco: mi petas do, ke vi plenumu vian voton, kiun per via buŝo vi faris al la Reĝo de la ĉielo.

47 La reĝo Dario ekstaris, kisis lin, kaj skribis por li leterojn al ĉiuj trezoriistoj, guberniestroj, generaloj kaj satrapoj, ke ili donu sekuran vojaĝon al li kaj al ĉiuj, kiuj kun li iros por konstrui Jerusalemon. 48 Kaj al ĉiuj guberniestroj en Celesirio kaj Fenicio, kaj al tiuj en Lebanon, li skribis leterojn, ke ili venigu cedrolignon de Lebanon al Jerusalemo, kaj ke ili helpu lin konstrui la urbon. 49 Kaj li skribis profite al ĉiuj Judoj, kiuj ekiris el lia reĝlando al Judujo, pro ilia libereco, ke neniu potenculo, satrapo, guberniestro aŭ trezoristo perforte eniru en iliajn pordojn; 50 ke la tuta regiono, kiun ili okupos, estu ilia, sen tributo-pago; ke la Idumeanoj delasu de la vilaĝoj de la Judoj, kiujn ili konkeris; 51 ke por la konstruado de la templo

ĉiujare dudek talantoj estu donataj, ĝis ĝi estos preta; 52 kaj aliaj dek talantoj ĉiujare por la ĉiutagaj bruloferoj sur la altaro, laŭ la ordono plenumi dek sep oferojn; 53 kaj ke ĉiuj, kiuj revenas el Babel por konstrui la urbon, ricevu liberecon: por ili mem kaj iliaj infanoj kaj por ĉiuj pastroj, kiuj revenis. 54 Li ankaŭ skribis pri iliaj elspezoj kaj la pastraj vestaĵoj, en kiuj ili plenumu sian oficon. 55 Kaj li skribis ke al la Levidoj oni pagu la elspezojn ĝis la tago, kiam la templo estos preta kaj Jerusalemon konstruita. 56 Kaj pri ĉiuj gardistoj de la urbo li skribis, ke oni donu al ili terpecojn kaj porvivaĵojn. 57 Kaj li resendis ĉiujn vazojn el Babel, kiujn Ciro apartigis; kaj ĉion, kion Ciro ordonis fari, ankaŭ li ordonis fari kaj resendi al Jerusalemon.

58 Kiam la junulo iris eksteren, li levis sian vizaĝon al la ĉielo direkte al Jerusalemon, kaj laŭdis la Reĝon de la ĉielo, dirante: 59 De Vi <venas> la venko, de Vi la saĝo, Via estas la gloro kaj mi estas Via servanto. 60 Laŭdata estas Vi, kiu donis al mi saĝon; kaj mi dankas Vin, Sinjoro de niaj patroj.

61 Kaj li prenis la leterojn, kaj iris al Babel, kaj li rakontis ĉion al siaj fratoj. 62 Kaj ili laŭdis la Dion de siaj patroj, ĉar Li donis al ili liberigon kaj la permeson 63 reiri kaj rekonstrui Jerusalemon kaj la sanktejon, super kiu alvokiĝis Lia nomo; kaj ili festadis, kun muziko kaj ĝojo, dum sep tagoj.

## **La templo rekonstruita: 5:1-7:15**

### *Reiro al Jerusalemon*

5:1 Post tio estis elektitaj por reiri la estroj de la patrodomoj, laŭ iliaj triboj, kaj iliaj edzinoj, filoj kaj filinoj, kaj iliaj sklavo- kaj sklavinoj, kaj iliaj bestoj. 2 Kaj Dario sendis kun ili mil rajdistojn por konduki ilin al Jerusalemon en paco, kun muziko de tamburoj kaj flutoj. 3 Kaj ĉiuj iliaj fratoj ĝojegis, kaj li irigis ilin kun tiuj.

4\* Jen la nomoj de la viroj, kiuj reiris, laŭ iliaj patrodomoj en la triboj, laŭ iliaj grupoj: 5 la pastroj, la idoj de Pineĥas, filo de Aaron: Jeŝua, filo de Jozadak, filo de Serajah, kaj Joakim, filo de Zerubabel, filo de Ŝealtiel, el la domo de David, el la parencaro de Fares, el la tribo de Jehuda, 6 kiu parolis saĝe antaŭ Dario, reĝo de la Persoj, en la dua jaro de lia regado, en la monato *nizĥan*, la unua monato.

7 Jen estas la Judujanoj, kiuj reiris el la ekzilo, kiujn forkondukis en Babelon Nebukadnecar, reĝo de Babel, 8 kaj kiuj revenis al Jerusalemo kaj la cetera Judujo, ĉiu al sia urbo. Ili iris kun siaj gvidantoj Zerubabel kaj Jeŝua, Neĥemja, Seraja, Resaja, Enenio, Mordeĥaj, Beelsar, Asfarasa, Borolia, Reĥum kaj Baana.

9 La nombro de la viroj de la popolo kaj iliaj gvidantoj estis: 10 la idoj de Paroŝ, du mil cent sepdek du; 10 la idoj de Ŝefatja, kvarcent sepdek du; la idoj de Araĥ, sepcent sepdek ses; 11 la idoj de Paĥat-Moab, el la idoj de Jeŝua kaj Joab, du mil okcent dek du; 12 la idoj de Elam, mil ducent kvindek kvar; la idoj de Zatu, naŭcent kvardek kvin; la idoj de Ĥorbe, sepcent kvin; la idoj de Bani, sescent kvardek ok; 13 la idoj de Beĥaj, sescent dudek tri; la idoj de Azgad, mil tricent dudek du; 14 la idoj de Adonikam, sescent sesdek sep; la idoj de Bigvaj, du mil sesdek ses; la idoj de Adin, kvarcent kvindek kvar; 15 la idoj de Ater, el la domo de Ĥizkija, naŭdek du; la idoj de Kilan kaj Azeta, sesdek sep; la idoj de Azura, kvarcent du; 16 la idoj de Anija, cent unu; la idoj de Arom, la idoj de Beĥaj, tricent dudek tri; la idoj de Arifa, cent dek du; 17 la idoj de Betera, tri mil kvin; la idoj el Bet-Lomon, cent dudek tri; 18 la loĝantoj de Netofa, kvindek kvin; la loĝantoj de Anatot, cent kvindek ok; la loĝantoj de Betesma, kvardek du; 19 la loĝantoj de Kirjat-Arim, dudek kvin, tiuj el Keĥira kaj Beerot, sepcent kvardek tri; 20 la Ĥadiasoj kaj Amidioj, kvarcent dudek du; la loĝantoj de Kirama kaj Geba, sescent dudek unu; 21 la loĝantoj de Makalon, cent dudek du; la loĝantoj de Bet-Eljo, kvindek du; la idoj de Nifis,

cent kvindek ses; 22 la idoj de la alia Elam kaj Ono, sepcent dudek kvin; la idoj de Jeriĥo, tricent kvardek kvin; 23 la idoj de Senaa, tri mil tricent tridek.

24 La pastroj: la idoj de Jedaja, el la domo de Jeŝua, kun la idoj de Anasib, okcent sepdek du; la idoj de Imer, mil kvindek du; 25 la idoj de Paŝĥur, mil ducent kvardek sep; la idoj de Ĥarim, mil dek sep.

26 La Levidoj: la idoj de Jeŝua kaj Kadmiel, el la filoj de Bani kaj Sudi, sepdek kvar. 27 La templo-kantistoj: la idoj de Asaf, cent dudek ok. 28 La pordegistoj: la idoj de Ŝalum, la idoj de Ater, la idoj de Talmon, la idoj de Akub, la idoj de Ĥatita, la idoj de Ŝobaj, ĉiuj kune cent tridek naŭ.

29 La templo-servistoj: la idoj de Esav, la idoj de Ĥasufa, la idoj de Tabaot, la idoj de Keros, la idoj de Suha, la idoj de Padon, la idoj de Lebana, la idoj de Ĥagaba, 30 la idoj de Akub, la idoj de Utaj, la idoj de Ketab, la idoj de Hagaba, la idoj de Subaj, la idoj de Hanan, la idoj de Katua, la idoj de Gedur, 31 la idoj de Jairo, la idoj de Dajsan, la idoj de Noeba, la idoj de Ĥaseba, la idoj de Gazara, la idoj de Ozia, la idoj de Finoe, la idoj de Asara, la idoj de Bastaj, la idoj de Asana, la idoj de Maani, la idoj de Nafisi, la idoj de Akuf, la idoj de Aĥiba, la idoj de Asur, la idoj de Farakim, la idoj de Basalot, 32 la idoj de Meeda, la idoj de Kuta, la idoj de Ĥarea, la idoj de Barkos, la idoj de Sisra, la idoj de Tomoj, la idoj de Nasi, la idoj de Ĥatifa.

33 La idoj de la servantoj de Salomono: la idoj de Asafiot, la idoj de Peruda, la idoj de Jaala, la idoj de Lozon, la idoj de Isdael, la idoj de Ŝefatja, 34 la idoj de Agia, la idoj de Poĥeret-Cebaim, la idoj de Sarotie, la idoj de Masiah, la idoj de Gas, la idoj de Adus, la idoj de Subas, la idoj de Afera, la idoj de Barodis, la idoj de Ŝafat, la idoj de Amon.

35 La nombro de ĉiuj templo-servistoj kaj de la idoj de la servantoj de Salomono estis tricent sepdek du.

36 Kaj jen estas la elirintoj el Tel-Melaĥ kaj Tel-Ĥarĥa, kaj gvidis ilin Kerub, Adan, kaj Imer; 37 ili ne povis montri sian patrodomon kaj devenon, ĉu ili devenas de Izrael: la idoj de Delaja, filo de Tobija, la idoj de Nekoda, sescent kvindek du. 38 Kaj el la pastroj, ĉi tiuj faris paŝtran servadon sed ne estis trovitaj <en registroj>: la idoj de Ĥabaja, la idoj de Hakoc, la idoj de Jodus, kiu prenis Agian al si kiel edzinon el la filinoj de Barzilaj, kaj estis nomata per ties nomo. 39 Ili serĉis en la dokumentoj geneologiaj, sed ĉi tiuj ne troviĝis; tial ili estis elitaj el la pastra servado. 40 Kaj diris al ili Nehemja kaj Atarias, ke ili ne manĝu el la plejsanktaĵo, ĝis aperos ĉefpastro kun la signoj de manifesto kaj vero\*. 41 Ĉiuj ĉi tiuj de Izrael, ekde la dekdu-jaraĝaj, krom la sklavoj kaj sklavinoj, nombris kvardek du mil tricent sesdek homojn; da sklavoj kaj sklavinoj estis sep mil tricent tridek sep; da kantistoj kaj kantistinoj estis ducent kvardek kvin. 42 Da kameloj estis kvarcent tridek kvin; da ĉevaloj sep mil tridek ses; da muloj ducent kvardek kvin; da azenoj kvin mil kvincent dudek kvin.

43 Kelkaj el la ĉefoj de la patrodomoj, veninte al la domo de la Eternulo en Jerusalema, promesis laŭ sia povo restarigi la domon <de Dio> sur ĝia loko, 44 kaj ke ili kontribuos al la sankteja trezorejo de la laboroj mil minojn da oro, kvin mil minojn da arĝento kaj cent vestaĵojn por pastroj.

45 Kaj ekloĝis la pastroj kaj la Levidoj kaj la popolanoj en Jerusalema kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj la templo-kantistoj kaj la pordegistoj kaj tuta Izrael en siaj vilaĝoj.

### *Restaŭro de la liturgio*

46 Kiam venis la sepa monato kaj la Izraelidoj estis jam en siaj hejmoj, ili kolektiĝis unuanime sur la placo antaŭ la unua pordego al oriento. 47 Kaj leviĝis Jeŝua, filo de Jodak, kaj liaj fratoj, la pastroj, kaj Zerubabel, filo de Ŝaltiel, kaj liaj fratoj, kaj ili konstruis la altaron de Dio de Izrael, 48 por alportadi sur



ĝi brul-oferojn, laŭ la ordonoj en la libro de Moseo, la homo de Dio. 49 Kaj kuniĝis al ili kelkaj el la ceteraj popoloj de la lando. Kaj ili aranĝis la altaron sur ĝia loko, ĉar la popoloj de la lando estis malamikaj al ili kaj pli fortaj ol ili; kaj ili komencis alportadi sur ĝi brul-oferojn al la Sinjoro, matene kaj vespere. 50 Kaj ili solenis la feston de laŭboj, kiel estas preskribite en la Torao, kaj faris la ĉiutagajn brul-oferojn, laŭdeve, 51 kaj post tio la ĉiutagajn brul-oferojn, kaj por la sabatoj kaj por la monatkomencoj kaj por ĉiuj sanktigataj festoj. 52 Kaj ĉiu, kiu preĝis al Dio, ekde la monatkomenco de la sepa monato, komencis alporti oferojn al Dio, sed la templo de Dio ankoraŭ ne estis starigita. 53 Kaj ili donis monon al la ŝtonhakistoj kaj ĉarpentistoj, kaj mangajaĵon, trinkaĵon, kaj *hara*<sup>8</sup> al la Cidonanoj kaj Tiranoj, por ke ili venigu cedro-lignon de Lebanon per flosoj al la haveno de Jafo, konforme al la skriba dekreto, kiun donis al ili Ciro, reĝo de la Persoj.

54 En la dua jaro, veninte al la domo de Dio en Jerusalemon, en la dua monato, Zerubabel, filo de Ŝealtiel, kaj Jeŝua, filo de Jocadak, kaj iliaj fratoj kaj la pastroj, kaj la Levidoj, kaj ĉiuj, kiuj venis el la kaptiteco en Jerusalemon, 55 faris la komencon pri la templo de Dio, en la monatkomenco de la dua monato de la dua jaro post kiam ili venis al Judujo kaj Jerusalemon. 56 Kaj ili starigis la Levidojn, havantajn la aĝon de dudek jaroj kaj pli, por inspekti la laborojn de la Sinjoro. Kaj starigis Jeŝua kun siaj filoj kaj fratoj, kaj lia frato Kadmiel, kaj la filoj de Jeŝua Emadabun, kaj la filoj de Jehuda, filo de Iliadun, kun siaj filoj kaj fratoj, ĉiuj Levidoj, unuanime, por daŭrigi la laborojn en la domo de Dio. 57 Kaj la konstruistoj konstruis la templon de la Sinjoro, kaj la pastroj starigis en siaj vestoj kun muziko kaj trumpetoj, kaj la Levidoj, idoj de Asaf, gloris la Sinjoron per siaj cimbaloj, por laŭdi Lin per la kantoj de David, reĝo de

---

<sup>8</sup> Greka vorto kies signifo ne estas konata. Oni foje sugestis : ĉaretojn.

Izrael. 58 Kaj ili ekkantis himnojn por laŭdi la Sinjoron, ke Lia boneco kaj Lia gloro estas eterna en tuta Izrael. 59 Kaj la tuta popolo trumpetis kaj ĝojkriis laŭte, glorante la Sinjoron pro la fondo de la domo de la Sinjoro. 60 Kaj multaj el la pastroj kaj el la Levidoj kaj el la ĉefoj de patrodomoj, maljunuloj, kiuj vidis la unuan templon, reagis al la fondado de ĉi tiu <templo> per laŭtaj krioj kaj plorado; 61 sed multaj laŭte trumpetis kaj ĝojkriis, 62 tiel ke la popolo ne povis aŭdi la trumpetadojn pro la plorado de la popolo; ĉar la amaso trumpetadis tiel laŭte, ke tio estis aŭdata ĝis tre malproksime.

### *Rezisto*

63 Kiam la malamikoj de la triboj Jehuda kaj Benjamen aŭdis tion, ili venis sciigi, kion signifas tiu trumpetado. 64 Ili aŭdis, ke la revenintoj el la kaptiteco konstruas templon al la Sinjoro, Dio de Izrael. 65 Tiam ili iris al Zerubabel kaj al Jeŝua kaj al la ĉefoj de la patrodomoj, kaj diris al ili: Ni kun-konstruu kun vi! 66 Ĉar same kiel vi, ankaŭ ni obeas vian Dion, kaj al Li ni alportas oferojn de post la tempo de Esar-Ĥadon, reĝo de Asirio, kiu venigis nin ĉi tien. 67 Sed Zerubabel kaj Jeŝua kaj la la ĉefoj de patrodomoj de Izrael diris al ili: Ne <estas bone>, ke vi kune kun ni konstruu domon por nia Dio; 68 ĉar ni solaj konstruos por la Sinjoro de Izrael, kiel ordonis al ni Ciro, reĝo de la Persoj. 69 Tiam la popolo de la lando forte pezis sur tiujn de Judujo, kaj ĝenis al ili en la konstruado. 70 Kaj ili insidatis, kaj ĝene organizante protestojn, ili malhelpis ilin fini la konstruadon, dum la tuta tempo de la vivo de la reĝo Ciro. 71 Kaj du jarojn ili neniel povis plu konstrui, ĝis la regado de la reĝo Dario.

## *Ĉu eblas rekonstrui la templon ?*

**6:1** En la dua jaro de la regado de la reĝo Dario, la profetoj Ĥagaj kaj Zeĥarja, filo de Ido, profetis pri la Judoj, kiuj estis en Judujo kaj Jerusalema, en la nomo de la Sinjoro de Izrael. 2 Tiam leviĝis Zerubabel, filo de Ŝealtiel, kaj Jeŝua, filo de Jocardak, kaj komencis konstrui la domon de la Sinjoro en Jerusalema, dum la profetoj de la Sinjoro subtenis ilin.

3 En tiu tempo venis al ili Tatnaj, la guberniestro de Sirio kaj Fenicio, kaj Ŝetar-Boznaj, kaj iliaj kunuloj, kaj tiele diris al ili: 4 Kiu permesis al vi konstrui ĉi tiun domon kaj tegmenton kaj ĉion ceteran? Kaj kiuj estas la konstruistoj kiuj plenumas tion? 5 Sed la plejaĝuloj de la Judoj estis indulge traktataj, ĉar la okulo de Dio estis super la kaptitoj; 6 kaj ili ne estis malhelpataj ĉe la konstruado, ĝis oni raportis pri tio al Dario kaj ĝis revenis lia decido.

7 Jen estas kopio de la letero, kiun skribis al Dario kaj sendis Tatnaj, la guberniestro de Sirio kaj Fenicio, kaj Ŝetar-Boznaj, kun siaj kunuloj, la lokaj regantoj de Sirio kaj Fenicio.

8 Al la reĝo Dario saluton. Estu plene sciate al nia sinjoro la reĝo: kiam ni iris en la Judan landon, al la urbo Jerusalema, tie el la Judoj, kiuj estis en ekzilo, ni trafis la plejaĝulojn de la Judoj konstruantaj la domon por la Sinjoro en Jerusalema, grandan kaj novan, el poluritaj kaj valoraj ŝtonoj, kun multekostaj laboroj en la muroj, 9 kaj la laboro estas farata vigle kaj sukcesas en iliaj manoj, kaj plenumiĝas en ĉia gloro kaj zorgemo. 10 Tiam ni demandis tiujn plenaĝulojn, kaj diris al ili: Kiu donis al vi la permeson konstrui ĉi tiun domon? 11 Kaj krom tio ni demandis ilin, por raporti al vi kaj por skribi al vi la nomojn de iliaj gvidantoj; kaj ni petis listigon de iliaj gvidantoj. 12 Kaj ili respondis al ni, kaj diris: Ni estas sklavoj de la Sinjoro, kiu kreis ĉielon kaj teron. 13 Tiu ĉi domo estis konstruita antaŭ multe da jaroj fare de granda kaj forta reĝo de Izrael\*, kaj li

finis ĝin. 14 Sed kiam niaj patroj pekis kontraŭ la Sinjoro de Izrael, Dio de la ĉielo, kolerigante Lin, Li transdonis ilin en la manon de Nebukadnecar, reĝo de Babel kaj reĝo de la Ĥaldeoj. 15 Kaj tiun domon ili detruis kaj forbruligis, kaj la popolon ili forkondukis en Babelon. 16 Sed en la unua jaro, kiam la reĝo Ciro regis super la regionoj de Babel, la reĝo Ciro skribis, ke oni rekonstruu ĉi tiun domon <de Dio>. 17 Eĉ la sanktajn vazojn, la orajn kaj arĝentajn, kiujn Nebukadnecar elportis el la templo de Jerusalemo kaj forportis en sian propran templon, tiujn la reĝo Ciro elportis el la templo de Babel; kaj oni transdonis ilin al Zerubabel kaj al Ŝeŝbacar, la regionestro. 18 Kaj li ordonis al li preni ĉiujn tiujn vazojn, kaj starigi ilin en la templon de Jerusalemo, kaj konstrui ĉi tiun domon de la Sinjoro sur ĝia loko. 19 Tiam venis tiu Ŝeŝbacar kaj metis la fundamenton por la domo de la Sinjoro en Jerusalemo; kaj de tiu tempo ĝis nun ĝi ankoraŭ ne estas finita. 20 Tial do, se plaĉas al la reĝo, oni serĉu en la reĝaj arkivoj de nia sinjoro la reĝo en Babel, 21 kaj se montriĝos, ke efektive la konstruado de la domo de la Sinjoro en Jerusalemo, okazas kun permeso de la reĝo Ciro, kaj se nia sinjoro la reĝo aprobas tion, tiam li donu al ni ordonojn pri tio.

### *Reĝa permeso*

22 Tiam la reĝo Dario ordonis, ke oni serĉu en la reĝaj arkivoj en Babel. Kaj oni trovis en Ekbatana, la kastelo en la Media lando, unu skribrulaĵon, en kiu estis registrite: 23 En la unua jaro de la reĝo Ciro, la reĝo Ciro donis ordonon rekonstrui la domon de la Sinjoro en Jerusalemo, kie oni oferu tra daŭra fajro. 24 La alto <de la domo> estu sesdek ulnoj, ĝia larĝo estu sesdek ulnoj, kun tri vicoj da prilaboritaj ŝtonoj kaj unu vico da nova loka ligno, kaj la elspezoj estu pagataj el la domo de la reĝo Ciro. 25 Ankaŭ la sanktajn vazojn de la domo de la Sinjoro, la orajn kaj la arĝentajn, kiujn Nebukadnecar elportis el la templo

de Jerusaleŝ kaj forportis en Babelon, oni redonu al la templo de Jerusaleŝ, kaj metu ilin, kie antaŭe ili estis lokitaj.

26 <Dario> tiam ordonis, ke oni faru, ke Tatnaj, la guberniestro de Sirio kaj Fenicio, kaj Ŝetar-Boznaj, kaj iliaj kunuloj, kaj la lokaj regantoj de Sirio kaj Fenicio, foriĝu de tiu loko, kaj ke ili permesu al Zerubabel, la sklavo de la Sinjoro, regionestro de Judujo, kaj al la plejaĝuloj de la Judoj, konstrui la domon de la Sinjoro sur tiu loko. 27 Kaj mi donis ordonojn, <li daŭrigis>, ke oni konstruu ĝin komplete, kaj ke oni atentu, ke ili bone kunlaboru kun la revenintoj el la kaptiteco de Judujo ĝis la templo de la Sinjoro estos preta. 28 El la tributo de Celesirio kaj Fenicio, por la oferado al la Sinjoro oni senmanke donu kontribuon al tiuj homoj, t.e. al Zerubabel, la regionestro, por virbovoj, ŝafoj kaj ŝafidoj; 29 same da tritiko, salo, vino kaj oleo, ĉiujare, sen marĉandado, tiom kiom bezonos la pastroj en Jerusaleŝ por ĉiutaga uzado, 30 por ke estu alportataj verŝoferoj al la plej alta Dio por la reĝo kaj liaj infanoj, kaj ke estu preĝate por ilia vivo.

31 Li ordonis, ke se iu homo malobeos aŭ ŝanĝos ĉi tiujn decidojn, oni elprenu trabon el lia domo, kaj li estu pendigita al ĝi, kaj liaj proprietaĵoj apartenu al la reĝo.

32 Kaj tial la Sinjoro, kies nomo ĉi tie estas alvokata, neniigu ĉiun reĝon kaj popolon, kiu etendus sian manon por malhelpi aŭ malutili al tiu domo de la Sinjoro en Jerusaleŝ.

33 Mi, la reĝo Dario, donis la ordonon, ke ĉio ĉi senmanke plenumiĝu.

### *Rekonstruo de la templo*

7:1 Tiam do Tatnaj, la guberniestro de Celesirio kaj Fenicio, kaj Ŝetar-Boznaj, kaj iliaj kunuloj, sekvante la ordonojn de la reĝo Dario, 2 superrigardis la sanktajn laborojn, kunlaborante kun la plejaĝuloj de la Judoj kaj la temploficistoj. 3 Kaj prosperis la sankta laboro, dum profetadis la profetoj Ĥagaj kaj Zeharja,

4 kaj ili elfinis tion laŭ la ordono de la Sinjoro, Dio de Izrael ;  
5 kaj laŭ la volo de Ciro, de Dario, kaj de Artahŝast, reĝoj de la Persoj, estis kompletigita la sankta domo en la dudek-tria tago de la monato *adar*, en la sesa jaro de la reĝo Dario. 6 Kaj la Izraelidoj, la pastroj, la Levidoj, kaj la aliaj revenintoj el la kaptiteco, kiuj sin ligis al ili, faris laŭ la <preskriboj> en la libro de Moseo. 7 Kaj por la sanktigo de la templo de la Sinjoro ili alportis cent virbovojn, ducent ŝafojn, kvarcent ŝafidojn, 8 kaj dek du pekoferajn kaprojn pro la tuta Izrael, laŭ la nombro de la dek du estroj de la triboj de Izrael. 9 Kaj la pastroj kaj la Levidoj staris vestitaj laŭ iliaj vicoj, por la servado al la Sinjoro, Dio de Izrael, laŭ la libro de Moseo. Kaj la pordistoj estis ĉe ĉiu pordego.

10 Kaj la Izraelidoj, kiuj revenis el la kaptiteco, faris Paskon en la dek-kvara tago de la unua monato, ĉar la pastroj kaj la Levidoj purigis sin ĉiuj kune; 11 sed ne ĉiuj <Izraelidoj>, kiuj revenis el la kaptiteco, purigis sin <kun la pastroj>, sed ja ĉiuj Levidoj sin purigis. 12 Kaj ili buĉis Paskajn ŝafidojn por ĉiuj revenintoj el la kaptiteco, por siaj fratoj, la pastroj, kaj por si. 13 Kaj manĝis la Izraelidoj, kiuj revenis el la kaptiteco, ĉiuj, kiuj apartigis sin de la malpureco de la nacioj de la lando, serĉante la Sinjoron. 14 Kaj en ĝojo antaŭ la Sinjoro ili solenis la feston de la macoj dum sep tagoj, 15 ĉar Li turnis al ili la koron de la reĝo de Asirio\*, por ke li fortigu iliajn manojn ĉe la laborado por la Sinjoro, la Dio de Izrael.

## **Ezra en Jerusalemo: 8:1-9:55**

### *Ezra iras al Jerusalemo*

8:1\* Kiam, post ĉi tiuj okazaĵoj, regis Artahŝast, reĝo de la Persoj, <el Babel> venis Ezra, filo de Seraja, filo de Azarja, filo de Hilkija, filo de Ŝalum, 2 filo de Cadok, filo de Ahitub, filo de Amarja, filo de Uzi, filo de Buki, filo de Abiŝua, filo de

Pinehas, filo de Eleazar, filo de Aaron, la ĉefpastro. 3 Tiu Ezra venis el Babel kiel lerta scienculo koncerne la leĝon de Moseo, kiun donis la Dio de Izrael. 4 Kaj la reĝo donis al li honoron, ĉar li trovis gracon antaŭ <la reĝo> en ĉiuj siaj deziroj. 5 Kun li venis kelkaj el la Izraelidoj, el la pastroj, el la Levidoj, el la templo-kantistoj, el la pordegistoj, kaj el la templo-servistoj al Jerusalem, en la sepa jaro de la reĝo Artahâsast, en la kvina monato (estis la sepa jaro por la reĝo). 6 Ĉar ili forlasis Babelon en la unua tago de la unua monato, kaj en la unua tago de la kvina monato ili venis en Jerusalemon, laŭ la prospera vojaĝo, kiun Dio donis al ili. 7 Ĉar Ezra posedis grandan scion, tiel ke nenion li neglektis el la leĝo de la Sinjoro aŭ el Liaj ordonoj, sed li instruis la tutan Izraelon pri ĉiuj justecoj kaj juĝoj.

### *Reĝa mandato*

8 Jen estas kopio de la skribaj ordonoj, kiujn la reĝo Artahâsast sendis al Ezra, la pastro, la leganto de la leĝo de la Sinjoro:

9 La reĝo Artahâsast al Ezra, pastro kaj leganto de la leĝo de la Sinjoro: saluton.

10 Gracoplene mi decidis, kaj nun ordonas, ke tiuj el la popolo de la Judoj kaj ĝiaj pastroj kaj Levidoj, kaj aliaj en nia regno, kiuj tion libervole deziras, iru kun vi al Jerusalem. 11 Ĉiuj, kiuj tiel aspiras, ekvojaĝu kun vi, kiel decidis mi kaj miaj sep Kunuloj\*. 12 Ili atentu pri la aferoj en Judujo kaj Jerusalem, laŭ tio, kion vi havas en la leĝo de la Sinjoro. 13 Kaj ili alportu al Jerusalem la donacojn por la Sinjoro de Izrael, kiujn votis mi kaj miaj amikoj, kaj <ili kolektu> la tutan oron kaj arĝenton, kiu povos esti trovita en la regiono de Babel [por la Sinjoro en Jerusalem<sup>9</sup>], kune kun la memvolaj donacoj de la popolo

---

<sup>9</sup> Ripetite el la tuj supraj vortoj.

por la sanktejo de ilia Sinjoro en Jerusalemo. 14 Ili aĉetu por tiu oro kaj arĝento virbovojn, virŝafojn kaj ŝafidojn, kaj kio al tio apartenas, 15 por alporti oferojn sur la altaro de ilia Sinjoro en Jerusalemo. 16 Kaj kion vi kaj viaj fratoj trovos bona fari el la cetera oro kaj arĝento, tion vi faru laŭ la volo de via Dio. 17 Kaj <vi uzu> la sanktajn vazojn de la Sinjoro, kiuj estas donitaj al vi por la servado en la sanktejo de via Dio en Jerusalemo; 18 kaj ĉion ceteran, kio estas necesa por la sanktejo de via Dio, vi donu el la reĝa trezorejo.

19 Kaj mi, la reĝo Artahŝast, ordonas al ĉiuj trezorgardistoj de Sirio kaj Fenicio, ke ĉio, kion postulos Ezra, la pastro, la leganto de la leĝo de la plej alta Dio, estu tuj plenumata, ĝis cent talantoj da arĝento, 20 same ĝis cent kor'oj da tritiko, ĝis cent metroj da vino, kaj da salo en kvanto senlima. 21 Ĉio, kio estas ordonita en la leĝo de Dio, devas esti farata tuj por la plej alta Dio, por ke Lia kolero ne trafu la regnon de la reĝo kaj de liaj filoj. 22 Kaj al vi estas sciigite, ke sur neniun el la pastroj, Levidoj, templo-kantistoj, pordegistoj, templo-servistoj aŭ aliaj servantoj ĉe ĉi tiu templo vi devas meti tributon, aŭ alian imposton. Neniu havas la aŭtoritaton, meti ion tian sur ilin.

23 Kaj vi, Ezra, laŭ la saĝo, kiun via Dio donis al vi, starigu arbitraciantojn kaj juĝistojn, por juĝadi en tuta Sirio kaj Fenicio ĉiujn, kiuj scias la leĝon de via Dio; kaj kiuj ne scias, tiujn vi instruos. 24 Kaj ĉiuj, kiuj ne plenumos la leĝon de via Dio aŭ la leĝojn de la reĝo, tuj estos juĝataj, ĉu al morto, ĉu al alia puno, al monpuno, aŭ al meto en malliberejon.

25 [Tiam diris Ezra la skribisto :<sup>10</sup>] Benata estu sole nur la Sinjoro, kiu metis en la koron de la reĝo la ideon beligi Lian domon en Jerusalemo, 26 kaj kiu sur min turnis la favoron de la reĝo kaj de liaj konsilistoj kaj de ĉiuj liaj amikoj kaj potenculoj. 27 Kaj mi fariĝis kuraĝa, pro la helpo de la Sinjoro, mia Dio; kaj mi kolektis virojn el Izrael, por ke ili iru kun mi.

---

<sup>10</sup> Mankas en pluraj manuskriptoj.



## *La gvidantoj de la komunumo*

28 Kaj jen estas la ĉefoj, laŭ patrodomoj kaj iliaj grupoj, kiuj venis kun mi el Babel, dum la regado de la reĝo Artahâsast: 29 el la idoj de Pinehas: Geršom; el la idoj de Itamar: Gamael; el la idoj de David: Ĥatuŝ, filo de Ŝeĥanja: 30 el la idoj de Paroŝ: Zeĥarja, kaj kun li cent kvindek viroj, laŭ la listo; 31 el la idoj de Paĥat-Moab: Eljehoenaj, filo de Zeraja, kaj kun li ducent viroj; 32 el la idoj de Zatoe: Ŝeĥanja, filo de Jaĥaziel, kaj kun li tricent viroj; el la idoj de Adin: Ebed, filo de Jonatan, kaj kun li ducent kvindek viroj; 33 el la idoj de Elam: Jeŝaja, filo de Gotolja, kaj kun li sepdek viroj; 34 el la idoj de Ŝefatja: Zaraja, filo de Miĥael, kaj kun li sepdek viroj; 35 el la idoj de Joab: Obadja, filo de Jehiel, kaj kun li ducent dek du viroj; 36 el la idoj de Bani: Ŝelomit, filo de Josifja, kaj kun li cent sesdek viroj; 37 el la idoj de Beĥaj: Zeĥarja, filo de Beĥaj, kaj kun li dudek ok viroj; 38 el la idoj de Azgad: Johanan, filo de Hakatan, kaj kun li cent dek viroj; 39 el la idoj de Adonikam, la lastaj, jen la nomoj: Elifelet, Jeuel, kaj Ŝemaja, kaj kun ili sepdek viroj; 40 el la idoj de Bigvaj: Utaj, filo de Istalkuru, kaj kun li sepdek viroj.

41 Kaj mi kolektis ilin ĉe la rivero, kiu nomiĝas Tera\*, kaj ni tendumis tie tri tagojn; kaj mi inspektis ilin. 42 Kiam el la idoj de la pastroj kaj el la Levidoj tie mi trovis neniun, 43 mi sendis <mesaĝon> al Eliezer, Iduel, Maasma, Elnatan, Ŝemaja, Jarib, Natan, Enatan, Zeĥarja, kaj Meŝulam, la ĉefoj, homoj de kompreno; 44 kaj mi diris al ili, ke ili iru al Ido, la ĉefo en la loko de la trezorejo, 45 kaj mi donis al ili instrukcion sciigi al Ido kaj al liaj fratoj, kaj al la trezorgardistoj en tiu loko, ke ili sendu al ni virojn por servi kiel pastroj en la domo de nia Sinjoro. 46 Kaj, ĉar super ni estis la potenco mano de la Sinjoro, ili sendis al ni saĝajn homojn el la idoj de Maĥli, filo de Levi, filo de Izrael: nome Ŝerebjan, kun liaj filoj kaj fratoj, dek ok <virojn>, 47 kaj Ĥaŝabjan, kaj Anunun, kaj lian fraton Jeŝaja, el la idoj de

Ĥanunaja, kun liaj filoj, dudek <virojn>; 48 kaj el la templo-servistoj, kiujn David kaj la gvidantoj starigis por servi al la Levidoj: ducent dudek templo-servistojn; ĉiuj ili estis registritaj laŭ siaj nomoj.

### *Solena procesio*

49 Kaj mi proklamis tie faston por la junuloj antaŭ nia Sinjoro, 50 por peti de Li bonan vojaĝon por ni, por niaj infanoj, kiuj akompanis nin, kaj por niaj ŝarĝo-bestoj. 51 Ĉar mi hontis peti de la reĝo militistojn kaj rajdistojn por eskorte defendi nin kontraŭ malamikoj sur la vojo; 52 ĉar ni ja diris al la reĝo: La forto de la Sinjoro estos kun ĉiuj, kiuj sin turnas al Li, kaj subtenos ilin. 53 Ni denove do petis nian Sinjoron pri tio, kaj Li montriĝis gracoplena al ni.

54 Kaj mi apartigis el la ĉefaj pastroj dek du, Ŝerebjan kaj Ĥaŝabjan, kaj dek el iliaj fratoj. 55 Kaj mi pese transdonis al ili la arĝenton kaj la oron kaj la sanktajn vazojn de la domo de nia Sinjoro, kiujn donacis la reĝo mem kaj liaj konsilistoj kaj liaj princoj kaj la tuta Izrael. 56 Kaj mi pese transdonis al ili: da arĝento sescent kvindek talantojn, da arĝentaj vazoj cent talantojn, da oro cent talantojn, da oraj <objektoj> dudek; kaj <mi donis> dek du bronzaĵajn vazojn el la plej multekosta bronzo, kiuj brilis kiel oro. 57 Kaj mi diris al ili: Vi estas sanktaj al la Sinjoro, kaj la vazoj estas sanktaj, kaj ankaŭ la arĝento kaj la oro estas dediĉitaj al la Sinjoro, la Sinjoro de viaj patroj. 58 Maldormu, kaj gardu ilin, ĝis vi transdonos ilin al la ĉefaj pastroj, Levidoj, kaj la ĉefoj de patrodomoj de Izrael en Jerusalemo, en la pastraj ĉambroj de la domo de nia Sinjoro. 59 Kaj la pastroj kaj la Levidoj akceptis la arĝenton, la oron, kaj la vazojn, kaj forportis ilin al Jerusalemo en la domon de la Sinjoro.

60 Kaj ni ekvojaĝis de la rivero Tera en la dek-dua tago de la unua monato, por iri al Jerusalemo, sub la fortega mano de nia Sinjoro super ni. Kaj Li savis nin dumvojaĝe kontraŭ

ĉiu malamiko, kaj ni venis en Jerusalemon. 61 Kiam tie fariĝis la tria tago, la arĝento kaj la oro estis pese transdonitaj, en la domo de nia Sinjoro, al la pastro Meremot, filo de Urija, 62 kaj kun li estis Eleazar, filo de Pinehas; kaj kun ili estis Jozabad, filo de Jeŝua, kaj Moet, filo de Binuj, la Levidoj. Ĉio estis nombrita kaj pesita, kaj ĉio pesita estis tuj tiutempe enskribita. 63 La forkaptitoj, kiuj revenis el la kaptiteco, alportis brul-oferojn al la Dio de Izrael: dek du virbovojn, pro la tuta Izrael, naŭdek ses virŝafojn, sepdek du ŝafidojn, dek du pekoferajn kaprojn; ĉion kiel bruloferon al la Sinjoro. 64 Kaj oni transdonis la ordonojn de la reĝo al la reĝaj trezoristoj, kaj al la regionestroj de Celesirio kaj Fenicio; kaj ĉi tiuj honoris la popolon kaj la sanktejon de la Sinjoro.

### *Preĝo de Ezra*

65 Kiam ĉio tio estis finita, alvenis al mi la estroj kaj diris: 66 La popolo de Izrael kaj la gvidantoj kaj la pastroj kaj la Levidoj ne apartigis sin de la popoloj de la lando kaj de iliaj malpuraĵoj, – de la Kanaanidoj, Ĥetidoj, Perizidoj, Jebusidoj, Moabidoj, Egiptoj, kaj Idumeoj –; 67 ĉar ili edziĝis kun iliaj filinoj, ili mem kaj iliaj filoj, kaj miksiĝis la sankta semo kun la popoloj de la lando; kaj la eminentuloj kaj la gravuloj partoprenis en ĉi tiu malbonago de la komenco\*.

68 Kiam mi aŭdis tion, mi disŝiris miajn vestojn kaj mian sanktan tunikon, mi elŝiris harojn de mia kapo kaj el mia barbo, kaj mi eksidis konsternite. 69 Kaj kolektiĝis al mi ĉiuj, kiuj ankoraŭ estis tuŝataj de la vorto de la Sinjoro de Izrael, dum mi lamentis pro la malbonago. Kaj mi sidis konsternite ĝis la vesper-ofero. 70 Tiam mi vekigis el mia fastado, kaj kun disŝiritaj vestoj kaj sankta tuniko, mi stariĝis surgenu, mi etendis miajn manojn al la Sinjoro, kaj diris:

71 Ho Sinjoro, mi hontas, tute konfuzite antaŭ Via vizaĝo.  
72 Ĉar niaj pekoj kreskis pli alten ol nia kapo, kaj niaj misfaroj

fariĝis grandaj ĝis la ĉielo 73 de post la tempo de niaj patroj. Ni estas en granda peko ĝis la nuna tago; 74 pro la pekoj de ni mem kaj de niaj patroj ni estis transdonitaj, ni kaj niaj fratoj, niaj reĝoj kaj niaj pastroj, en la manojn de la alilandaj reĝoj, sub glavon, en kaptitecon, al disrabo kaj malhonoro, ĝis la hodiaŭa tago. 75 Kaj nun, kiel granda estas la pardono, Sinjoro, kiu venis de Vi ! Ĉar Vi restiĝis al ni radikon kaj nomon sur la loko de Via sanktigo; 76 kaj Vi malkaŝis lumon al ni en la domo de nia Sinjoro, kaj donis al ni manĝi en la tempo de nia sklaveco. 77 Sed eĉ en nia sklaveco, ne forlasis nin nia Sinjoro. Sed Li donis al ni korfavorecon de la reĝoj de la Persoj, 78 tiel ke ili donis al ni manĝi, kaj honoris la templon de nia Sinjoro, kaj ke ili vekis la dezertigitan Cionon por doni al ni fortikeyon en Judujo kaj en Jerusalemon.

79 Kaj nun kion ni diros, ho Sinjoro, post tio ? Ĉar ni forlasis Viajn ordonojn, kiujn Vi ordonis per Viaj servantoj, la profetoj, dirante: 80\* La lando, en kiun vi venas por ekposedi ĝin, estas lando malpura pro la malpureco de la fremdaj popoloj de la lando, kaj per siaj malpuraĵoj ili plenigas ĝin. 81 Ne edzinigu do viajn filinojn al iliaj filoj, kaj iliajn filinojn ne prenu por viaj filoj; 82 ne daŭre serĉu havi pacon kun ili, por ke vi fortiĝu kaj por ke vi nutru vin per la bonaĵoj de la lando kaj por ke vi heredigu ĝin por eterne al viaj filoj. 83 Kaj ĉio, kio trafis nin, okazis pro niaj malbonaj faroj kaj pro niaj grandaj pekoj. 84 Ĉar Vi, Sinjoro, levis la ŝarĝon de niaj pekoj kaj donis al ni tian radikon: sed ni denove returniĝis al malobeo je Via leĝo, tiel ke ni miksiĝis kun la malpuraĵoj de la popoloj de la lando. 85 Ĉu Vi ne koleras kontraŭ ni ĝis plena ekstermo, tiel ke restos nek radiko, nek semo aŭ nomo al ni? 86 Ho Sinjoro de Izrael! Vi estas justa: ĉar ni restis, kvazaŭ radiko ĝis la nuna tago. 87 Jen ni estas antaŭ Vi en nia kulpo; ĉar ni ne plu povas resti staraj antaŭ Vi pro ĉi tio.

88 Kiam Ezra preĝis kaj faris konfesion, plorante kaj kuŝante antaŭ la sanktejo, kolektiĝis al li el Jerusalemon tre granda

amaso, viroj, virinoj, kaj junuloj; ĉar estis multa plorado en la amaso. 89 Kaj Ŝeĥanja, filo de Jehiel, unu el la Izraelidoj, ekparolis al Ezra: Ni pekis kontraŭ la Sinjoro, prenante edzinojn aligentajn el la popoloj de la lando. Tamen eĉ nun ekzistas espero por Izrael. 90 Nun ni ĵuru al la Sinjoro, ke ni forpelos ĉiujn niajn aligentajn edzinojn kun iliaj infanoj, laŭ via juĝo kaj <la juĝo> de ĉiuj, kiuj obeas la leĝon de la Sinjoro. 91 Leviĝu, kaj decidu. Ĉar estas via tasko, kaj ni estos kun vi por agadi forte. 92 Kaj Ezra leviĝis, kaj ĵurigis la ĉefajn pastrojn kaj la Levidojn de la tuta Izrael, ke ili agos tiel; kaj ili ĵuris.

### *Forpelo de fremdaj edzinoj*

9:1 Kaj Ezra leviĝis de la korto de la sanktejo, kaj iris al la ĉambro de Jehonanan, filo de Eljaŝib. 2 Tie li tranoktis. Panon li ne manĝis kaj akvon li ne trinkis, ĉar li funebris pri la grandaj malbonagoj de la amaso. 3 Kaj oni proklamis en tuta Judujo kaj Jerusalemo al ĉiuj, kiuj revenis el la kaptiteco, ke ili kolektiĝu en Jerusalemo; 4 kiuj ne estos venintaj tien post du aŭ tri tagoj, laŭ decido de la regantaj plejaĝuloj\* perdos al por-templo uzado ĉiun sian havon, kaj ili mem estos eksigitaj el la komunumo de la revenintoj.

5 Kaj kolektiĝis ĉiuj el la triboj de Jehuda kaj de Benjamen en tri tagoj en Jerusalemo. Tio estis en la naŭa monato, en la dudeka tago de la monato. 6 Kaj la tuta amaso sidis sur la placo antaŭ la sanktejo, tremante pro la vintra vetero.

7 Kaj leviĝis Ezra, kaj diris al ili: Vi faris malbonagon, prenante aligentajn edzinojn kaj pligravigante la pekojn de Izrael. 8 Tial nun vi faru konfesion, kaj glori la Sinjoron, la Dion de viaj patroj, 9 kaj plenumu Lian volon: apartigu vin de la popoloj de la lando kaj de la aligentaj edzinoj.

10 Kaj la tuta amaso respondis per laŭta voĉo: Jes, kiel vi diris, tiel ni faros. 11 Sed granda estas ĉi tiu amaso, kaj ni

ne povas resti ĉi tie, en la vintra vetero; [kaj ni ne trovas<sup>11</sup>]; cetere tio ne estas afero de unu tago aŭ de du, ĉar ni tro multe pekis en ĉi tiu afero. 12 Niaj estroj do restu <ĉi tie> pro la tuta amaso; kaj ĉiuj el niaj urbetoj, kiuj havas aligentajn edzinojn, 13 kunvenu en difinita tempo, kaj kun ili la plejaĝuloj de ĉiu loko kaj ĝiaj juĝistoj, ĝis ni forturnos de ni la flaman koleron de la Sinjoro pro ĉi tiu afero.

14 Jonatan, filo de Asahel, kaj Jahzeja, filo de Tikva, prenis ĉi tion sur sin, kaj Meŝulam, kaj Levi, kaj Ŝabtaj helpis ilin kiel juĝistoj. 15 Kaj la revenintoj el la kaptiteco agis laŭ ĉio ĉi tio.

16 Kaj la pastro Ezra elektis al si la gvidajn virojn el la patrodomoj, ĉiujn laŭnome; kaj ili ekkunsidis en la unua tago de la deka monato, por esplori la aferon. 17 Kaj elfiniĝis la afero de la viroj, kiuj prenis aligentajn edzinojn, ĝis la unua tago de la unua monato.

18 Kaj inter la pastroj, kiuj kunvenis, troviĝis kelkaj kun aligentaj edzinoj. 19 <Tiuj estis> el la filoj de Jeŝua, filo de Jocadak, kaj el liaj fratoj: Maaseja, Eliezer, Jarib, kaj Jodan. 20 Kaj ili donis sian manon, ke ili forigos siajn edzinojn, kaj ke ili oferos pro sia kulpo virŝafon kiel kulpoferon. 21 Kaj el la filoj de Imer: Ĥanani, Zebadja, Maaseja, Ŝemaja, Jehiel, kaj Azaria; 22 el la filoj de Paŝhur: Eljoenaj, Maaseja, Iŝmael, Netanel, Okidel, kaj Saltas.

23 Kaj el la Levidoj: Jozabad, Ŝimei, Kelaja (ankaŭ nomata Kelita), Petahja, Jehuda, kaj Jona. 24 El la templo-kantistoj: Eljaŝib, kaj Bakhur. 25 El la pordegistoj: Ŝalum, kaj Tolbanes.

26 El la Izraelidoj: el la filoj de Paroŝ: Ramja, Jizija, Malkija, Mijamin, Eleazar, Asibja, kaj Benaja; 27 el la filoj de Elam: Matanja, Zeharja, Jezriel, Abdi, Jeremot, kaj Elija; 28 el la filoj de Zamot: Eljada, Eljaŝib, Otonja, Jeremot, Zabad, kaj

---

<sup>11</sup> Ŝajne teksteraro.

Zerdaja; 29 el la filoj de Beĉaj: Jehoĥanan, Ĥananja, Zabĉaj, kaj Ematis; 30 el la filoj de Mani: Olam, Mamuĥ, Adaja, Jaŝub, Ŝeal, kaj Jeremot; 31 el la filoj de Adi: Naat, Moosia, Lakuno, Naid, Beskaspasmo, Sestel, Balnu, kaj Manase; 32 el la filoj de Anan: Elĵona, Asaja, Malkija, Ŝebaja, kaj Ŝimeon Ĥosomaj; 33 el la filoj de Ĥaŝum: Maltanaj, Matatja, Zabanaj, Elifelet, Manase, Ŝimej; 34 el la filoj de Bani: Jeremia, Momdis, Maer, Joel, Mandaj, kaj Bedeja, kaj Vanja, Karabasion, Eljaŝib, Mamnitanem, Eljasis, Bani, Elialis, Ŝimej, Ŝelemja, kaj Natanja; kaj el la filoj de Ezora: Ŝaŝaj, Azarel, Azael, Ŝamato, Zambris, kaj Jozef; 35 el la filoj de Nooma: Mazitija, Zabadja, Ido, Joel, kaj Benaja.

36 Ĉiuj ĉi tiuj prenis edzinojn aligentajn; kaj ili forsendis ilin kun iliaj infanoj.

### *La legado de la Torao*

37 La pastroj kaj la Levidoj kaj la Izraelidoj ekloĝis en Jerusalema kaj en tiu regiono. En la unua tago de la sepa monato – la Izraelidoj loĝis en siaj urbetoj –, 38 kolektiĝis la tuta amaso unuanime sur la placo antaŭ la orienta pordego de la sanktejo<sup>12</sup>, 39 kaj ili diris al Ezra, la ĉefpastro\* kaj skribisto, ke li alportu la leĝon de Moseo, kiun la Sinjoro donis al Izrael. 40 Kaj la pastro Ezra alportis la leĝon antaŭ la tutan amason de viroj kaj virinoj kune, kaj antaŭ la pastrojn, por aŭskulti ĝin, en la unua tago de la sepa monato. 41 Kaj li legis el ĝi sur la placo antaŭ la pordego de la sanktejo, de la tagiĝo ĝis la tagmezo, antaŭ la viroj kaj virinoj; kaj la tuta popolo aŭskultis atente.

---

<sup>12</sup> Alia traduko: 37 La pastroj kaj la Levidoj kaj la Izraelidoj ekloĝis en Jerusalema kaj en tiu regiono, en la unua tago de la sepa monato. La Izraelidoj loĝis en siaj urbetoj. 38 Kolektiĝis la tuta amaso unuanime sur la placo antaŭ la orienta pordego de la sanktejo; ktp.

42 Kaj Ezra, la pastro kaj skribisto, staris sur ligna podio, kiun oni faris tiucele, 43 kaj apud li staris Matatja, Ŝema, Ananja, Azarja, Urija, Ĥezekia, kaj Baalsam, dekstre de li; 44 kaj maldekstre de li: Pedaja, Miŝael, Malkija, Lotasubo, Nabarja, kaj Zeĥarja. 45 Kaj Ezra malfermis la libron, antaŭ la okuloj de la tuta popolo – ĉar li havis honoro-lokon antaŭ ĉiuj –, 46 kaj kiam li malfermis la leĝon, ĉiuj ekstaris. Kaj Ezra benis la Sinjoron, la plej altan Dion Ŝebaot, la ĉiopovan; 47 kaj la tuta popolo respondis: Amen. Ili supren levis siajn manojn, adorkliniĝis vizaĝaltere, kaj adoris la Sinjoron. 48 Kaj Jeŝua, Aniut, Ŝerebja, Jadin, Jakub, Ŝabtaj, Ĥodija, Majanas, Kelita, Azarja, Jozabad, Ĥanan, Pelaja, la Levidoj, klarigadis <al la popolo> la leĝon de la Sinjoro. [Al la amaso ili legis la leĝon de la Sinjoro, samtempe klarigante al ili la legaĵon.\*]

49 Kaj Atarates diris al Ezra, la ĉefpastro kaj skribisto, kaj al la Levidoj, kiuj instruadis la popolon: 50 Ĉi tiu tago estas sankta al la Sinjoro – kaj ĉiuj ploris, aŭdante la leĝon –; 51 do iru, manĝu grasaĵojn kaj trinku dolĉaĵojn, kaj sendu porciojn al tiuj, kiuj nenion havas, 52 ĉar ĉi tiu tago estas sankta al la Sinjoro. Kaj ne malĝoju, ĉar la Sinjoro glorigos vin. 53 Kaj la Levidoj ordonis al la tuta popolo, dirante: Ĉi tiu tago estas sankta, ne malĝoju. 54 Kaj ĉiuj iris, por manĝi, trinki kaj ĝoji, kaj por sendi porciojn al tiuj, kiuj nenion havis, kaj por fari grandan festenon, 55 ĉar ili estis instruitaj pri la vortoj, kiujn oni instruis al ili.

Kaj ili kolektiĝis\*.



## Notoj al 1 Ezra

- 1:1 La Paskofesto de Joŝija okazis en 622 a.Kr. En tiu ĉi rakonto pri la festo mankas la religia reformo, kiu en 2 Reĝ 23:21-23 estas tiel grava. La vorto *pasko* ĉi tie povas indiki la paskoŝafidon aŭ la feston mem.
- 1:9 Koncerne la sufiĉe multajn nomojn de ĉi verko, jen averto unufoje por ĉiam: La Greka teksto de LXX donas nom-formojn kiuj ne malofte ne tute kongruas kun tiuj de la kompareblaj rakontoj en la Hebrelingvaj bibliaj libroj. Ĉi tie, en ĉi versiklo, ni renkontas ekzemple la formojn Jehonjas, Samajas, Natanael, Asabias, Oĥielos kaj Joram. Ĉe pluraj el ili estas klare, ke temas pri malsama prononco de – baze – la sama nomo; alian fojon, kiel ekzemple ĉe Joram, tio ne estas tute certa. Tamen, por montri kiel eble plej klare la paralelecon kun la tekstoj, menciitaj enkonduke al 1 *Ezra*, ni kiom eble retenis la Hebreajn nom-formojn el la tradicia Esperanta Biblio. Se estas tute ne klare, ĉu temas pri kromformo de jam konata nomo, ekzemple en listigoj eĉ kun malsamaj nombroj da homoj – kio foje troveblas ĉi-libre – tiam la Grekajn nomojn ni prefere konservas. Kutime ni ĉe tio konsultis ankaŭ, kion faras moderna komentario kaj nacilingvaj tradukoj.
- 1:12 La libro de Moseo, la Torao (Gen ĝis inkluzive Rdm). En la tempo kiam 1 Ezr estis verkata, ĝi jam estis kanonizita.
- 1:32-55 La jaroj 609-587/6 a.Kr.
- 1:53 Nebukadnecar.
- 2:1 Tiu ĉi edikto de Ciro estis ĉ 539 a.Kr. Same kiel en 2 Kro oni silentante preteriras la periodon inter la neniigo de Jerusalemo kaj la reĝiĝo de Ciro.
- 2:12 Artahŝaŝt fariĝis reĝo en 465 a.Kr., sed eble la aŭtoro kredis, ke Artahŝaŝt regis post la morto de Ciro (530) antaŭ ol Dario la unua iĝis reĝo. Post Ciro efektive regis Kambizo ĝis 521, poste Dario la unua (521-485).
- 2:26 Kaj Ezr 4:24 (la origina fonto de ĉi tiu teksto) kaj ĉi versiklo montras sufiĉe

- vastigitan eraron inter la Judoj de tiu epoko : oni ne bone sciis kiu reĝo regis kiam en Persujo. (Ankaŭ en la libro Dan ŝajne regas simila konfuziĝo : Dan 5:30 ; 6:28). Devus temi ĉi tie pri Dario la unua, do longe antaŭ Artahŝaŝt la unua (465-424).
- 3:1-4:63** Ĉi tiuj du ĉapitroj ne havas paralelon aliloke en la Biblio. Tamen ĉe la Juda historiisto Flavio Jozefo oni trovas alian version en lia *Antikvevaĵoj xi.iii.2-9*.
- 3:1** Efektive, dum la regado de Dario (521-485) estis nur ĉirkaŭ dudek satrapejoj (provincoj); ĉi tiu nombro estis pliampleksigita dum la Seleŭkida periodo (post 312 a.Kr.) kaj la totalo de cent dudek sep satrapejoj fariĝis konvencia en literaturo pli posta (*Ester* 1:1).
- 3:21** Talanto – ĉe 26 kilogramoj. Kutima mezuro por arĝento.
- 4:29** Apame – nekonata.
- 4:34-41** Tiu ĉi laŭdo al la vero, supozeble, estas intermetita en la originan rakonton, kiu debatas pri la tri plej fortaj aferoj en la mondo. La lasta frazeto en ĉi sceno fariĝis proverba en Latina traduko: *magna estas veritas et praevalet*.
- 4:43** Historie ne tre versajna voto. Pli akurate oni vidas la historian fonon en *Ezra* 6:1-13; *1 Ezra* 6:23-34.
- 5:4** La listigo de la gvidantoj de la entrepreno estas sufiĉe konfuzita. Jeŝua klare estas la gvidanta pastro, kaj Zerubabel estas la heroo de l' historio, ne lia filo Joakim. En *Neĥ* 12:10,26 Joakim estas filo de Jeŝua; *1 Kron* 3:17-24 donas malsaman genealogion.
- 5:40** Ĉefpastro kun la signoj de manifesto kaj vero: temas pri la *urim* kaj *tumim* kiujn la pastroj uzis por ekhavi orakolaĵon de JHVH Dio – vidu Elr 28.30; Lev 8:8; Rdm 33:8.
- 6:13** Salomono.
- 7:15** La nomo Asirio estas defendebla, ĉar la imperio de la Persoj enhavis ankaŭ la malnovan Asirion.
- 8:1** En la lastaj jarcentoj a.Kr. Ezra fariĝis en la imago de la Juda popolo ĉiam pli “la patro de Judismo”: depost la restaŭroj post la Ekzilo, la *Torao* estis kanonizita, kaj

ĝi (la Leĝo) fariĝis ĉiam pli decidige grava en la religia vivo. Ezra en tio ĉi ekhavis la rolon de renoviganto: Moseo fondis Judismon, kaj do nun ĝi ricevis klaran strukturon. Vidu ankaŭ en *4 Ezra* 14, kie Ezra ree surpaperigas ĉiujn sanktajn librojn.

La rolo de Nehemja estas en ĉi tiu libro neglektata, same kiel tiu de Ezra ne estas menciata en *Sir* 49:13. Estas eble, ke Ezra venis al Judujo sub Artahŝast la 2a (404-358) anstataŭ sub Artahŝast la 1a (464-423), sed la sinsekvo Ezra (458-7), Nehemja (445-4) estas pli verŝajna. Tiu ĉi sinsekvo ankaŭ estas bazo de la libroj *Ezra* kaj *Nehemja*.

- 8:11 La sep Kunuloj – temas pri la sep Princoj de *Ester* 1:14, la sep Kamaradoj aŭ Amikoj de Herodoto – *Historio* iii:84.
- 8:41 Tiu ĉi rivero nomiĝas Ahava en *Ezra* 8:21. Probable flankrivero de Eŭfrato.
- 8:67 Antaŭaj reguloj avertis kontraŭ miksitaj geedzeco (Rdm 7:3) sed ne klare

malpermesis ilin. Akraj estis la avertoj kontraŭ transprenado de la religiaj praktikoj de l' ĉirkaŭaj popoloj (*Lev* 18:24-30). Dum la Ekzilo Izrael postvivis dank' al sufiĉe forta fermiteco de la popolo; tiel la strikta disigo, kiun ordonas Ezra, estas komprenebla; la limoj por ĉi ekzila periodo estis pli fortaj ol antaŭe. Tamen laŭ nuna etiko aspektas tro ekstremisma.

- 8:80 En la profetaj libroj tio ne troviĝas; la aŭtoro eble pensis pri *Lev* 18:19-30.
- 9:4 La regantaj plejaĝuloj – Ezra estis nur la religia, ne la politika gvidanto.
- 9:39 Ezra – ĉefpastro: ree provo altigi lian personon.
- 9:48 Iom necerte: ĉu legas nur Ezra dum la ceteraj klarigas? Aŭ ĉu ĉiuj legas kaj klarigas? – La klarigado eble temas pri – parta – tradukado en la Aramean, ĉar ne ĉiuj scipovis la Hebrean.
- 9:55 Supozeble la fino perdiĝis. Eble la festo de *Nehemja* 8:13-18 taŭgus kiel bela fino.

## 4 Ezra

### Enkonduko al 4 Ezra

4 *Ezra*, kiel dirite en la Ĝenerala Enkonduko, estas la komuna indiko por tri malsamaj verkaĵoj, kiuj iamaniere estis kunigitaj. Temas pri :

La ĉapitroj 1-2 : *La eklezio kiel nova Izrael*<sup>13</sup>;  
La ĉapitroj 3-14 : *La Apokalipso de Ezra* ;  
La ĉapitroj 15-16 : *Profetaĵoj pri damno*.

La *Apokalipso de Ezra* konsistas ĉefe el serio de sep revelacioj : 3:1-5:20 ; 5:21-6:34 ; 6:35-9:25 ; 9:38-10:59 ; 11:1-12:51 ; 13:1-58 kaj 14:1-48. En ili la viziulo Ezra estas instruata de la anĝelo Uriel pri grandaj misteroj de la morala mondo.

La aŭtoro de la *Apokalipso de Ezra* estis supozeble Palestina Judo, kiu verkis Hebreo aŭ Aramee ĉirkaŭ la fino de la unua jc p.Kr. Poste la libron oni tradukis en la Grekan. Ĉirkaŭ meze de la dua jc p.Kr. iu nekonata kristano aldonis en

---

<sup>13</sup> Ĉi titolojn mi donis, inspirite de pluraj tradukoj; en la originalo ne estas apartaj titoloj por la tri verkaĵoj.

la Greka la sekcion, kiun nun ni konas kiel 4 *Ezra* 1-2, kaj pli malpli jarcenton post tio iu nekonata kristano ankoraŭ aldonis la ĉapitrojn 15-16, ankaŭ en la Greka.

La semida originalo kaj preskaŭ ĉio el la Greka teksto malaperis ; postrestas nur 15:57-59 sur papirusa fragmento. Sed antaŭ ol la teksto de la centra Apokalipso pereis, oni jam faris plurajn tradukojn : ekzistas versioj en Siriaka, Kopta, Etiopia, Araba (eĉ du sendependaj versioj), Armenia kaj Kartvela. En okcidento la tuta 4 *Ezra* fariĝis konata en pluraj Latinaj versioj. Depost la Koncilio de Trento ĝi estas eldonata en Apendico al la Vulgato.

La aŭtoro de la origina *Apokalipso de Ezra* havis plurajn temojn. La revelacioj en ĉapitroj 11-13 temas pri la fieco de Romo (sub la imago de « Babelo »). Ĉapitro 14 enhavas gravan legendon pri la konservado de la Sanktaj Skriboj kaj pri la aŭtoreco de la « kaŝitaj » libroj de la Biblio – la Apokrifajoj kaj Pseŭdepigrafoj<sup>14</sup> de la Hebrea Skribo.

La ĉefa parto, ĉapitroj 3-10, montras la baraktadon de l' aŭtoro kun gravaj demandoj kiujn frontis la Judaj pensuloj en la 1a jc p.Kr. Temas speciale pri la justeco, saĝeco, potenco kaj boneco de Dio, se rigardi samtempe la multajn teruraĵojn kaj elprovaĵojn kiuj trafis la homojn ĝenerale kaj Izraelon speciale. Tiujn temojn li traktas en la formo de serio da demandoj direktitaj al la anĝelo Uriel, kaj pliklarigitaj de vizioj kiujn ricevas Ezra kaj de klarigoj pri la vizioj fare de la anĝelo.

La lamentoj de Ezra kaj liaj demandoj klare reflektas la zorgojn de l' aŭtoro ; multaj el la respondoj, tamen, estas pure nur konvenciaj. La veraj respondoj pli kaŝiĝas verŝajne en la demandoj mem.

---

<sup>14</sup> Ĉi dua kategorio enhavas la librojn, kiuj nenie fariĝis kanonaj.

La enhavon de 4 Ezra oni povas jene dividi :

#### **4 Ezra 1-2:**

Unua verkaĵo (aŭ 5 *Ezra*) : **La eklezio kiel nova Izrael**

1:1-11 : Ezra vokita kiel profeto

1:12-27 : Izrael malobeis kaj estos malakceptita

1:28-32 : La zorgojn de Dio pri Izrael

1:33-40 : La venonta popolo

2:1-9 : Juĝo de Dio pri Izrael

2:10-14 : La privilegioj de Izrael donitaj al la eklezio

2:5-32 : Konsiloj al la eklezio

2:33-41 : La premio de la regno

2:42-48 : Vizio de Ezra

#### **4 Ezra 3-14:**

Dua verkaĵo (aŭ 4 *Ezra*) : **La Apokalipso de Ezra**

3:1 – 9:25 : La mistero de l' homa destino

**La unua dialogo:** 3:1 – 5:19

Tezo de Uriel : la homo ne povas kompreni la vojojn de Dio

**La dua dialogo** 5:20 – 6:34

Kial la juĝo de Dio prokrastiĝas

**La tria dialogo** 6:35 – 9:25

La justeco de la agoj de Dio al la homoj

La Mesia regno kaj la juĝo

La kompatinda sorto de la homo

La homa sorto post la morto

La justuloj ne povas pledi por la maljustaj

**Vizioj pri la lastaj tagoj:** 9:26 – 13:58

La vizio pri la virino tristega 9:26-10:59

La vizio pri la aglo kaj la leono: 10:60 – 12:40a

La vizio pri iu kiel viro: 13:1-58

**La reskribado de la sanktaj Skriboj:** 14:1-47

Ezra devas prepariĝi por sia vivofino

Ezra havas zorgojn pro la malapero de la Skriboj

La lastaj paroloj de Ezra al sia popolo

La reskribado de la sanktaj Skriboj

**4 Ezra 15-16 :**

Tria verkaĵo (aŭ *6 Ezra*) : **Profetaĵoj pri damno**

15:1-27 : Venĝo de Dio

15:28-33 : Timtremiga vizio

15:34-45 : Juĝo pri Babel

15:46-63 : Juĝo pri Azio

16:1-16 : La juĝo neŝanĝebla

16:17-35 : La teruro de la lastaj tagoj

16:36-67 : Konsilo al la sklavo de Dio por la al-  
proksimiĝanta fino: peko ne restas kaŝita antaŭ Dio

16:68-78 : Kuraĝigo dum persekutado

## 4 Ezra<sup>15</sup>

### 4 Ezra 1-2:

La eklezio kiel nova Izrael

*Ezra vokita kiel profeto*

1:1 Libro de la profeto\* Ezra, filo de Seraja, filo de Azarja, filo de Hilkija, filo de Ŝalum, filo de Cadok, filo de Aĥitub, 2 filo de Aĥia, filo de Pineĥas, filo de Eli, filo de Amarja, filo de Azija, filo de Marimot, filo de Arna, filo de Uzi, filo de Borit, filo de Abiŝua, filo de Pineĥas, filo de Eleazar, 3 filo de Aaron, el la tribo de Levi, kiu estis kaptito en la lando de la Medoj, en la regno de Artahŝast, la reĝo de la Persoj.

4\* Venis la parolo de la Sinjoro al mi, dirante: 5 Iru, sciigu al Mia popolo iliajn malbonagojn kaj la maljustaĵojn de iliaj idoj, kiujn ili kulpas kontraŭ Mi, tiel ke ili sciigu al la infanoj de siaj infanoj, 6 ke la pekoj de iliaj patroj kreskis ĉe ili; *forĝesante pri Mi, ili ja donis oferojn al fremdaj Dioj*<sup>16</sup>. 7 Ĉu ne Mi elkondukis

---

<sup>15</sup> Estas iom problemece, kiel indiki la diversajn *Ezra*-librojn. Ni elektis 4 *Ezra* por tiu ĉi verkaĵo. Vidu la Enkondukon.

<sup>16</sup> Jer 2:32; 5:19.



ilin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco? Sed ili kolerigis Min kaj malŝatis Miajn konsilojn. 8 Sed vi, elŝiru harojn de via kapo, kaj elŝutu ĉiun malbonon super ilin, ĉar ili ne obeis Mian leĝon; estas ja popolo sendisciplina. 9 Kiel longe Mi ilin eltenos – ilin, al kiuj tiom da bono Mi faris? 10 Multajn reĝojn pro ili Mi renversis: Faraonon kun ties filoj kaj lian tutan armeon Mi batis; 11 ĉiujn naciojn Mi neniigis antaŭ ili, kaj en oriento Mi dispelis la popolon de du provincoj\*, Tiro kaj Cidon, kaj ĉiujn iliajn kontraŭulojn Mi mortigis.

### *Izrael malobeis kaj estos malakceptita*

12\* Sed vi, parolu al ili kaj diru: Jen diras la Sinjoro: 13 Nepre nur Mi trairegis vin tra la maron, kaj sekurajn ebenaĵojn Mi montris al vi en la dezerto; gvidanton Mi donis al vi: Moseon, kaj Aaronon, la pastron. 14 Lumon Mi donacis al vi per fajra kolumno, kaj grandajn mirindaĵojn Mi plenumis ĉe vi. Sed vi forgesis Min, diras la Sinjoro.

15 Jen *diras la Sinjoro Plejpotenca*<sup>17</sup>: La koturnoj estis signo por vi, tendumejojn Mi donis por ŝirmi vin, sed tie vi plendadis. 16 Vi ne triumfis je Mia nomo, neniigante viajn malamikojn, sed vi ĉiam ankoraŭ grumbladas. 17 Kie restis la bonfaroj, kiujn Mi montris al vi? Ĉu en la dezerto, malsatante kaj soifante, vi ne alvokis Min, 18 dirante: Kial Vi kondukis nin en ĉi tiun dezerton, por mortigi nin? Estus pli bone por ni, resti sklavoj en Egiptujo ol morti en ĉi tiu dezerto! 19 Sed Mi kompatis pri via ĝemado kaj donis manaon al vi por manĝi: panon de anĝeloj vi manĝis<sup>18</sup>. 20 Ĉu Mi ne fendis rokon, kiam vi soifis: kaj jen fluis akvo ĝis satigo! Pro la brula varmo Mi kovris vin per arbaraj folioj. 21 Mi disdonis inter vi riĉajn landojn: Kanaanidojn,

---

<sup>17</sup> 2 Kt 6:18. La esprimo ne renkontiĝas en Olda Testamento.

<sup>18</sup> Saĝ. 16:20.

Perizidojn, kaj Filiŝtojn Mi forpelis de antaŭ via vizaĝo. Kion Mi ankoraŭ do faru? diras la Sinjoro.

22 Jen diras la Sinjoro Plejpotenca: Kiam en la dezerto vi estis ĉe la amara rivero, kaj vi blasfemis Mian nomon, 23 Mi ne sendis al vi pro viaj blasfemoj la fajron, sed ĵetante lignon en la akvon, Mi faris ĝin dolĉa. 24 Kion Mi faru, ho Jakob? Vi ne volis aŭskulti Min, Jehuda. Mi transiros al aliaj popoloj kaj donos Mian nomon al ili, por ke ili gardu Miajn ordonojn. 25 Ĉar vi forlasis Min, ankaŭ Mi forlasos vin; kiam vi alvokos de Mi pardonon, Mi ne kompatos pri vi. 26 Kiam vi alvokos Min, Mi ne elaŭdos vin. Ĉar vi malpurigis viajn manojn per sango, kaj viaj piedoj estas senlacaj por plenumi murdojn. 27 Estas kvazaŭ vi forlasis ne Min, sed vin mem, diras la Sinjoro.

### *La zorgojn de Dio pri Izrael*

28 Jen diras la Sinjoro Plejpotenca: Ĉu Mi ne petegis vin, kiel patro siajn filojn, kiel patrino siajn filinojn, kaj kiel nutristino siajn infanetojn, 29 ke vi estu por Mi Mia popolo, vi Miaj infanoj – kaj Mi via patro? 30 Mi kunigis vin sub Miajnflugilojn, kiel kokino siajn idetojn<sup>19</sup>. Sed nun, kion Mi faru pri vi? Mi forpelos vin de antaŭ Mia vizaĝo. 31 Kiam oferojn vi alportos al Mi, Mian vizaĝon Mi forturnos de vi; ĉar viajn festojn, monatkomencojn kaj cirkumcidojn en la karno Mi repudias. 32 Miajn servantojn, la profetojn, Mi sendis al vi, sed vi kaptis kaj mortigis ilin, kaj iliajn korpojn vi disŝiris: Mi repostulos de vi ilian sangon, diras la Sinjoro.

### *La venonta popolo*

33 Jen diras la Sinjoro Plejpotenca: Via domo estas dezerta, kaj vin mem Mi disblovos, kiel la vento la pajlon. 34

---

<sup>19</sup> Komparu Mt 23:37; Lk 13:34.

Viaj filoj ne havos idaron, ĉar kune kun vi ili ne atentis Miajn ordonojn, kaj faris kio estas malbona antaŭ Mi. 35 Viajn loĝejojn Mi transdonos al popolo venonta; kiuj, ne aŭdante Min, kredos; al kiuj signojn Mi ne donis, sed tamen ili faros, kion Mi ordonis. 36 Profetojn ili ne vidis, sed ili rememoros kion instruis <la profetoj> en tempoj antikvaj. 37 Mi atestas pri la graco de tiu venonta popolo. Iliaj etuloj jubilos kun ĝojo; kvankam ili ne vidis Min per korpaj okuloj, tamen en la spirito ili kredos Miajn dirojn. 38 Kaj nun, patro<sup>20</sup>, rigardu fiere, kaj vidu la popolon venanta de oriento. 39\* Al ili Mi donos kiel gvidantojn Abrahamon, Izaakon, kaj Jakobon, kaj Hoŝean, Amoson, Miĥan, Joelon, Obadjan, Jonan, 40 Nahumon, Ĥabakukon, Cefanjan, Ĥagajon, Zeharjan, kaj Malaĥion, kiu ankaŭ nomiĝas sendito de la Sinjoro.

### *Juĝo de Dio pri Izrael*

2:1 Jen diras la Sinjoro: Ĉi tiun popolon Mi elkondukis el la sklaveco; ordonojn Mi donis al ili per Miaj servantoj, la profetoj, sed ili ne volis aŭskulti kaj vanigis miajn konsilojn. 2 La patrino, kiu naskis ilin, diras: Iru, miaj infanoj<sup>21</sup>, ĉar vidvino mi estas kaj forlasita. 3 Mi edukis vin kun ĝojo, sed mi perdis vin en funebro kaj tristeco<sup>22</sup>, ĉar vi pekis antaŭ la Sinjoro Dio, kaj vi faris malbonon antaŭ mi. 4 Sed nun, kion mi faru por vi? Ĉar vidvino mi estas kaj forlasita. Iru, infanoj, kaj petu pardonon de la Sinjoro. 5 Sed vin, patro, Mi alvokas por aldoni vian ateston al la ŝia pri ŝiaj infanoj, ke ili ne volis servi al Mia interligo, 6 tiel ke vi konfuzu ilin: prirabiĝu ilia patrino, kaj idaron ili ne havu. 7

---

<sup>20</sup> Tekstvariaĵo: frato. La alparolato devas esti Ezra. Dio kvazaŭ donas al li la titolon 'patro de la popolo'. Vidu ankaŭ en 2:5.

<sup>21</sup> Bar 4:19.

<sup>22</sup> Bar 4:11.

Ili dispeliĝu inter la nacioj, iliaj nomoj malaperu de la tero, ĉar Mian interligon ili malŝatis.

8 Ve al vi, Asirio<sup>23</sup>, ĉar la maljustulojn vi tenas kaŝitaj ĉe vi! Ho malbona popolo, memoru, kion Mi faris al Sodom kaj Gomora, 9 kies lando kuŝas en peĉo-gleboj kaj cindramasoj. Same Mi faros al tiuj, kiuj ne aŭskultos Min, diras la Sinjoro Plejpotenca.

### *La privilegioj de Izrael donitaj al la eklezio*

10 Jen diras la Sinjoro al Ezra: Heroldu al Mia popolo, ke Mi donos al ili la regnon de Jerusalema, kiun unue Mi prezentis al Izrael. 11 Mi eĉ reprenos al Mi Mian gloran ĉeeston, kaj al <la novaj> Mi donos la eternajn loĝejojn, kiujn <origine> Mi preparis por <Izrael><sup>24</sup>. 12 La arbo de la vivo donos al ili bonodoran unĝventon, kaj ili ne bezonos klopodi nek laciĝi. 13 Iru, kaj vi ricevos, tial preĝu, ke via mallonga tempo fariĝu ankoraŭ malpli longa: jam pretas por vi la regno: vigilu! 14 Ateste alvoku, alvoku ĉielon kaj teron: Mi forigis la malbonon kaj kreis la bonon, ĉar Mi estas la vivanta, diras la Sinjoro.

### *Konsiloj al la eklezio*

15 Patrino\*, brakumu viajn infanojn, eduku ilin en ĝoĝo kiel la kolombo, firmigu iliajn paŝojn, ĉar vin Mi elektis, diras la Sinjoro. 16 La mortintojn Mi starigos de iliaj lokoj, kaj el iliaj tomboj Mi elkondukos ilin, ĉar Mian nomon Mi rekonas en ili. 17 Ne timu, patrino de idaro, ĉar Mi elektis vin, diras la Sinjoro. 18 Mi sendos al vi por helpi Miajn servistojn Jesaja kaj Jeremia,

---

<sup>23</sup> Ĉu kaŝa indiko por Romo?

<sup>24</sup> La Latina teksto diras: por ili. Aliaj malnovaj versioj ĉi tie havas: por Izrael.

laŭ kies konsiloj Mi sanktigis kaj preparis por vi dek du arbojn, pezajn de diversaj fruktoj; 19 kaj same multajn fontojn, kiuj fluas je lakto kaj mielo, kaj sep grandegajn montojn, sur kiuj kreskas rozoj kaj lilioj, per kiuj viajn infanojn Mi plenigos je ĝojo.

20 Juste traktu la vidvinon, defendu la orfon, donu al la povrulo, vestu la nudan, 21 prizorgu la vunditan kaj malfortan, ne primoku la lamulon, ŝirmu la kriplan, kaj alvenigu la blindan por vidi Mian lum-brilon. 22 Protektu la oldulon kaj la junulon inter viaj muroj. 23 Kie mortintojn vi trovos, entombigu ilin kaj metu signon super ili, kaj Mi donos al vi unuaecon ĉe la resurekto. 24 Estu kvietaj kaj ripozu, Mia popolo, ĉar venos via ripozo. 25 Nutru viajn infanojn kiel bona nutristino, firmigu iliajn piedojn. 26 Neniu el la servantoj, kiujn Mi donis al vi, pereos, ĉar Mi repostulos ilin el via nombro. 27 Ne estu zorgoplenaj, ĉar kiam venos la tago de premateco kaj zorgoj, ploros aliaj kaj <ili> estos tristaj, sed vi estos gaja kaj ĝojos abundecon. 28 La nacioj ĵaluzos, sed povos nenion kontraŭ vi, diras la Sinjoro. 29 Miaj manoj vin ŝirmos, por ke viaj idoj ne vidu Gehenon. 30 Estu ĝoja, patrino, kune kun viaj infanoj, ĉar Mi vin savos, diras la Sinjoro. 31 Memoru viajn dormantajn infanojn<sup>25</sup>, ĉar tiujn Mi elkondukos el la kaŝitejoj de la tero, kaj Mi montros kompatemon al ili, ĉar kompatema Mi estas, diras la Sinjoro Plejpotenca. 32 Brakumu viajn infanetojn ĝis Mi venos, kaj sciigu kompaton al ili, ĉar tre akvoriĉaj estas Miaj fontoj, kaj Mia graco ne mankos.

### *La premio de la regno*

33 Mi, Ezra, ricevis ordonon de la Sinjoro sur la monto Horeb, ke mi iru al Izrael. Kiam mi venis al ili, ili malakceptis

---

<sup>25</sup> En la morto.

min, kaj malŝatis la ordonon de la Sinjoro. 34 Tial mi diras al vi, ho nacioj kiuj aŭdas kaj komprenas: Atendu vian paŝtiston: eternan ripozon li donos al vi, ĉar tiu, kiu venos je la fino de la epoko, estas proksima. 35 Estu preparitaj por la premio de la regno, ĉar eterna lumo lumos super vi por eterne. 36 Fuĝu la ombbron de ĉi tiu epoko, kaj ricevu la ĝojon de via gloro. Publike mi atestas pri mia Savanto<sup>26</sup>. 37 Akceptu lin, kiun indikis la Sinjoro, kaj estu ĝojaj, dankante al Li, kiu vin vokis al la ĉiela regno. 38 Leviĝu, ekstaru, kaj vidu kiom estas signitaj por la manĝo de la Sinjoro. 39 Kiuj foriris el la ombro de ĉi mondo, ricevis lum-brilajn tunikojn de la Sinjoro. 40 Akceptu, Cion, vian plenan nombbron, kaj fermu la liston de la blanke-vestitoj, kiuj fidele plenumis la leĝon de la Sinjoro. 41 Plena nun estas la nombro de viaj filoj, kiujn vi tiom sopiris. Preĝu pri la Regno de la Sinjoro, por ke sanktiĝu via popolo, kiu estis vokita dekomence.

### *Vizio de Ezra*<sup>27</sup>

42 Mi, Ezra, vidis sur monto Cion grandan amason, kiun mi ne povis nombri, kaj ĉiuj laŭdis la Sinjoron per himnoj. 43 Kaj meze de ili troviĝis junulo de impona alteco, pli alta ol ili ĉiuj, kaj sur ĉiujn iliajn kapojn li metis kronojn, unuope, sed li estis pli alta ol ĉiuj. Kaj mi estis mirigita. 44 Tiam mi pridemandis la anĝelon, kaj diris: Kiuj estas ili, sinjoro? 45 Kaj li respondis al mi: Tiuj estas, kiuj demetis sian morteman tunikon kaj sin vestis per la senmorta, kaj konfesis la nomon de Dio; nun ili estas kronataj, kaj ricevas palmbranĉojn. 46 Kaj mi diris al la anĝelo: Kiu estas tiu junulo, kiu surmetas al ili la kronojn, kaj kiu donas la palmbranĉojn en iliajn manojn? 47 Responde li diris

---

<sup>26</sup> Alia traduko: mi kiel ateston alvokas mian Savanton.

<sup>27</sup> Komparu kun *Apokalipso de Johano* 7:9-17.

al mi: Tiu estas la filo de Dio, kiun en ĉi mondo ili konfesis. Mi komencis laŭdegi ilin, kiuj rezistis tiel kuraĝe pro la nomo de la Sinjoro. 48 Kaj tiam la anĝelo diris al mi: Iru, kaj heroldu al mia popolo, kiajn miraklojn de Dio vi vidis, kaj kiom.

- - -

## 4 Ezra 3-14:

### La Apokalipso de Ezra

#### La mistero de l' homa destino: 3:1 – 9:25

*La unua dialogo: 3:1 – 5: 19*

*La unua preĝo de Ezra*

3:1\* En la trideka jaro post la pereco de la urbo <Jerusalem> mi, Salatiel, alinome Ezra, estis en Babel. Kuŝante en mia lito, mi perturbiĝis; kaj miaj pensoj leviĝis en mia koro, 2 ĉar mi vidis la dezertecon de Cion, kaj la abundan riĉon de la loĝantoj de Babel\*.

3 Forte moviĝis mia spirito, kaj mi ekparolis al la Plejaltulo pri miaj zorgoj, 4 kaj mi diris: Ho Sinjoro, ho Mastro, en la komenco estis Vi sola kiu parolis, kiam Vi plantis la teron, kaj Vi ordonis al la polvo 5 kaj provizis Adamon per korpo senviva. Sed ankaŭ ĝi estis muldaĵo de Viaj fingroj, kaj en ĝin Vi blovis la spiriton de la vivo, kaj li fariĝis vivanto antaŭ Vi. 6 Kaj Vi kondukis lin en la paradizon<sup>28</sup>, kiun plantis Via dekstra mano antaŭ ol aperis la tero. 7 Vi metis sur lin unu ordonon por obei, sed li transpaŝis ĝin, kaj tuj la morton Vi decidis por li kaj por liaj posteuloj.

---

<sup>28</sup> Alia traduko: ĝardenon.

Naskiĝis el li nacioj kaj triboj, popoloj kaj parencaroj, kiujn ne eblas kalkuli. 8 Kaj ĉiu nacio promenadis laŭ sia propra deziro, kaj ili agis malpie antaŭ Vi, kaj malŝatis Viajn ordonojn, sed Vi ne malhelpis ilin. 9 Sed denove, siatempe, Vi alkondukis la diluvon super la loĝantojn de la mondo, kaj neniigis ilin. 10 Kaj la sama sorto trafis ĉiujn: la morto por Adam, kaj por tiuj la diluvo.

11 Sed unu el ili Vi restigis: Noa kun lia domo, kaj ĉiuj liaj justaj posteuloj. 12 Kaj kiam komencis multiĝi, kiuj loĝis la teron, generante idojn, popolojn kaj multajn naciojn, ili denove komencis fari pli da malbono ol la antaŭaj <homoj>. 13 Kaj kiam ili faris maljustaĵojn antaŭ Vi, el ili Vi elektis unu por Vi: li nomiĝis Abraham. 14 Vi amis lin, kaj al li sola – tute sekrete, nokte – Vi montris, kiel finiĝos la tempoj. 15 Kaj Vi faris kun li eternan interligon, kaj promesis al li, ke neniam Vi forlasos lian idaron. Kaj Vi donis al li Izaakon, kaj al Izaak Vi donis Jakobon kaj Esavon. 16 Kaj Jakobon Vi apartigis por Vi mem, sed Esavon Vi malakceptis, kaj Jakob fariĝis granda homamaso.

17 Kaj kiam lian idaron Vi elkondukis el Egiptujo, Vi kondukis ilin al la monto Sinaj. 18 Kaj Vi kurbigis la ĉielojn, skuis la teron, movis la mondon, igis tremi la profundaĵojn, kaj perturbis la tempojn. 19 Via gloro pasis tra la kvar pordegojn de fajro, tertremo, vento kaj glacio, por doni la leĝon al la idoj de Jakob, kaj Viajn ordonojn al la Izraelidoj. 20 Sed Vi ne forprenis de ili ilian koron malbonan, tiel ke Via leĝo fruktigu en ili. 21 Ĉar la unua Adam, ŝarĝita je koro malbona, transpaŝis, kaj estis venkita <de la malbono>, same kiel ĉiuj, kiuj naskiĝis el li. 22 Kaj tiu malforto fariĝis daŭra: Via leĝo estis en la koro de la popolo samtempe kun la radikoj de la malbono; sed malaperis la bono, kaj la malbono restis.

23 Pasis la tempo, finiĝis multaj jaroj, kaj tiam Vi starigis por Vi bonan servanton, kiu nomiĝis David. 24 Vi ordonis al li konstrui la urbon, kiu portas Vian nomon, kaj alporti en ĝi oferojn el tio, kio jam estis Via. 25 Tio okazis dum multaj



jaroj. Sed malbonfaris la loĝantoj de la urbo, 26 agante en ĉio, kiel faris Adam kaj ĉiuj liaj posteuloj; ankaŭ ili ja havis koron malbonan. 27 Tial Vi transdonis Vian urbon en la manojn de Viaj malamikoj.

28 Tiam mi diris en mia koro: Ĉu pli bonaj estas la agoj de la loĝantoj de Babel, kaj ĉu pro tio ĝi regos super Jerusalemo? 29 Sed kiam mi venis ĉi tien, mi vidis sennombrajn malpiaĵojn, kaj multajn pekulojn vidis mia animo en ĉi tiuj tridek jaroj. Kaj mia koro ektimis, 30 ĉar mi vidis, kiel Vi toleras la pekulojn, kiel Vi indulgas la malpiulojn, sed Vian popolon Vi ja neniigis! kaj Viajn malamikojn Vi konservas! 31 Al neniu Vi iel ajn montris, kiel kompreni Viajn vojojn<sup>29</sup>. Ĉu pli bone agis Babel ol Cion? 32 Ĉu alia popolo konas Vin pli bone ol Izrael? Kiuj triboj tiom fidis je Viaj interligoj kiel ĉi tiuj triboj de Jakob? 33 Tamen ties rekompenco ne aperis, kaj ilia penado ne estis fekunda. Mi vojaĝadis ja inter la nacioj, kaj konstatis, kiel prosperaj ili estas, ne atentante pri Viaj ordonoj. 34 Nun Vi do pesu pesile niajn maljustaĵojn kaj tiujn de la loĝantoj de la mondo, kaj montriĝos kien kliniĝos la pesilo. 35 Kiatempe la loĝantoj de la tero *ne* pekis kontraŭ Vi? Aŭ kiu nacio obeis al Viaj ordonoj same <kiel Izrael>? 36 Unuopulojn Vi ja trovos, kiuj obeis al Viaj ordonoj, sed ne naciojn.

### *Respondo de Uriel*

#### *La homo ne povas kompreni la vojojn de Dio*

4:1 Respondis al mi anĝelo, sendita al mi; lia nomo estis Uriel\*. 2 Li diris: Koncerne ĉi mondon via koro komplete malsukcesis, kaj ĉu vi do pensas kompreni la vojojn de la Plejaltulo? 3 Kaj mi diris: Jes, mia sinjoro. Li respondis al mi

---

<sup>29</sup> Alia versio: kiel forlasi Viajn vojojn.

dirante: Mi estas sendita por montri al vi tri vojojn kaj por meti antaŭ vin tri similaĵojn. 4 Se unu el tiuj vi povos klarigi al mi, mi montros al vi la vojon, kiun vi deziras vidi, kaj tiam mi instruos, kial la koro estas malbona.

5 Mi diris: Parolu, mia sinjoro.

Kaj li diris: Iru, pesu por mi, kiom pezas la fajro, aŭ mezuru, kiel longa estas spiro de vento, aŭ revoku por mi unu tagon pasintan.

6 Kaj mi respondis: Kiu homo povus tion plenumi, ke vi petas tiaĵojn de mi?

7 Kaj li diris: Se mi estus demandinta: Kiom da loĝejoj troviĝas en la koro de la maro, aŭ kiom da vejnoj troviĝas en la bazo de l' profundo, aŭ kiom da vejnoj havas la firmamento super ni, aŭ kiuj estas la elirejoj <de Hadeso, kaj kiuj estas la enirejoj de><sup>30</sup> la paradizo, 8 verŝajne vi respondus al mi: En la profundon mi ankoraŭ ne descendis, nek en la inferon, kaj mi ankaŭ neniam jam ascendis ĉielen. 9 Nun mi nur demandis vin pri fajro kaj vento, kaj la tago kiun vi ĵus trapasis, sen kiuj vi ne povas vivi, – kaj nenion vi respondas pri tio! 10 Kaj li diris al mi: Vi eĉ ne komprenas la aĵojn, inter kiuj vi adoltiĝis; 11 kiel do via eta cerbo<sup>31</sup> povus kompreni la vojon de la Plejaltulo? [...] Kiu <estis lezita><sup>32</sup> de la koruptita mondo, <kiel li povus> kompreni la senkoruptan?

## *Parabolo*

Kiam ĉi tion mi aŭdis, mi falis vizaĝalteren 12 kaj diris al li: Prefere ni ne estu ĉi tie, ol veni ĉi tien kaj vivi en malpieco, kaj suferi kaj ne kompreni, kial.

---

<sup>30</sup> Aldonite laŭ alilingvaj malnovaj versioj.

<sup>31</sup> Laŭlitere: via vazo.

<sup>32</sup> La Latina teksto ĉi tie havas lakunon kaj ankaŭ krome la frazo ne klaras.

13 Kaj li respondis al mi: Mi foriris en arbaron de arboj sur ebenaĵo; kaj ili faris planon 14 kaj diris: Ek, ni iru batali kontraŭ la maron, por ke ĝi forcedu de antaŭ ni, tiel ke ni povu fari aliajn arbarojn. 15 Same ankaŭ la ondoj de la maro faris planon kaj diris: Ek, ni ascendu por venkobati tiun arbaron sur la ebenaĵo, tiel ke tie ni akiru novan teritorion. 16 Sed la plano de l' arbaro fiaskis, ĉar venis fajro kiu konsumis ĝin. 17 Same pri la plano de la maro, ĉar firme staris la sablo de la strando kaj ĝi malebligis ĉion. 18 Se vi devus juĝi ilin, kiun prefere vi nomus justa, aŭ kiun vi kondamnu?

19 Kaj mi respondis: Ambaŭ havas vanajn ideojn, ĉar la tero estas donita al la arbaro, kaj la maro havas lokon por porti la ondojn.

20 Kaj li respondis al mi: Vi juĝis bone – kial vi do ne tiel juĝis pri vi mem? 21 Ĉar same kiel la tero estas donita al la arbaro, kaj la maro al ĝiaj ondoj, same tiel la loĝantoj de la tero povas kompreni nur tion, kio estas sur la tero, kaj nur Kiu<sup>33</sup> loĝas super la ĉielo, <komprenas> tion, kio estas super la alto ĉiela.

### *La nova epoko klarigos ĉion*

22 Mi respondis: Mi petegas vin, sinjoro, ke mi ricevu la eblon kompreni. 23 Ĉar mi ne volis demandi pri vojoj tro altaj, sed pri tio, kio ĉiutage tuŝas nin: kial Izrael fariĝis mokaĵo por la nacioj, kial la popolo kiun Vi amis, transdoniĝis al la malpiaj nacioj, kaj kial la leĝo de niaj patroj neniigis, kaj kial la skribitaj interligoj ne plu ekzistas. 24 De la mondo ni forpasas kvazaŭ lokustoj, kaj nia vivo estas kvazaŭ nura vaporo, kaj ni ne meritigas ricevi kompaton. 25 Sed kion Li faros pro Sia nomo, kiu estas alvokita super ni? Pri tio mi demandis.

---

<sup>33</sup> Aŭ: kiuĵ.

26 Kaj li respondis al mi: Se vi vivos, vi vidos; kaj se longe vi vivos, vi ofte miros, ĉar la nuna epoko hastas por pasi. 27 Ne eblos alporti ĝustatempe la promesitaĵojn al la justuloj, ĉar ĉi epoko estas plena je tristo kaj malforto. 28 La malbono, pri kiu vi demandis min, ja estis semita, sed ĝia rikolto ankoraŭ ne venis. 29 Do, ĝis, kio semiĝis, ne estos rikoltita, kaj ĝis la loko, kie semiĝis la malbono, ne forpasos, ne venos la agro, kie semiĝis la bono. 30 Grajno de malbono estis semita en la koro de Adam, dekomence: kiom da malpieco ĝi jam produktis! kaj kiom ĝi ankoraŭ produktos antaŭ la tempo de l' draŝejo! 31 Konsideru do, kiom da malpiaj fruktoj produktis unu grajno de malbona semo. 32 Kiel ega estos do la rikolto, se semiĝos sennombraj bonaj semoj!

### *Kiam venos la nova epoko?*

33 Mi respondis: Sed kiel, kaj kiam do? Kial niaj vivoj estas tiel mallongaj kaj mizeraj?

34 Kaj li respondis al mi: Ne pli rapidu ol la Plejaltulo; ĉar vi rapidemas nur pro vi mem, sed la Altega pro multaj. 35 Ĉu ne tion demandadis same la animoj de l' justuloj en siaj provizejoj\*, dirante: Kiel longe mi atendu ĉi tie? kiam venos la rikolto, la tempo de nia rekompenco?

36 Kaj ĉefanĝelo Jeremiel\* respondis al tio: Tuj, kiam plenos la nombro de tiuj, kiuj similas al vi. Ĉar la Sinjoro pesis la mondon pesile 37 kaj Li mezuris kaj nombris la epokojn; nenion Li ŝanĝos nek movos, ĝis pleniĝos la indikita mezuro.

38 Sed, mia sinjoro, mia mastro, mi respondis: ni ĉiuj ja estas pekuloj, funde kaj plene. 39 Ĉu ne eble pro ni – pro la pekoj de l' loĝantoj de la mondo – malfruiĝos la rikolto de la justuloj?

40 Sed li respondis al mi: Ek, demandu gravedulinon, ĉu – kiam finiĝis la naŭ monatoj – sian idon ŝi povos gardi en la utero.

41 Kaj mi diris: Ne, tion ŝi ne povas, sinjoro.

Li daŭrigis: La provizejoj de animoj en la subterejo estas kiel la utero: 42 ĉar same kiel la naskantino urĝe volas liberiĝi de la doloroj de la naskado, tiel same urĝe ili volas redoni la animojn, kiuj estis konfeditaj al ili 43 dekomence. Tiam malkaŝiĝos al vi ĉio, kion vi deziras vidi.

44 Mi respondis: Se mi trovis gracon en viaj okuloj, kaj se estas eble, kaj se mi meritas tion, 45 montru al mi, ĉu ankoraŭ venos pli da tempo ol kiu jam pasis, aŭ ĉu la plimulto jam preterpasis? 46 Ĉar kio pasis, mi scias, sed kio ankoraŭ venos, mi ne scias.

47 Kaj li diris al mi: Stariĝu dekstre de mi, kaj mi montros al vi vizon, kaj mi interpretos ĝin.

48 Kaj mi stariĝis tie, kaj vidis: Jen brule varma forno preteriras min. Kaj kiam preteriris ĝia fajro, jen: restis ĝia fumo. 49 Kaj post ĝi preterpasis min nubo plena je akvo, kaj ĝi estigis impetan pluvadon, kaj kiam tio finiĝis, postrestis ankoraŭ gutoj en la nubo. 50 Kaj li diris al mi: Bone pripensu tion. Ĉar kiel la pluvo estas pli ampleksa ol la gutoj, kaj la fajro <pli granda> ol la fumo, tiel same ampleksas multe pli la kvanto, kiu pasis<sup>34</sup>; kio abunde postrestas, estas gutoj kaj fumo.

### *La signoj pri la fino*

51 Kaj mi preĝis kaj diris: Ĉu vi kredas, ke mi vivos ĝis tiuj tagoj? Aŭ kiu vivos tiutage?

52 Li respondis al mi: Koncerne la signojn, pri kiuj vi demandas, mi povas parte respondi al vi. Sed pri la longeco de via vivo, mi ne estis sendita diri ion ajn. Tion mi ne scias.

---

<sup>34</sup> Kelkaj tradukas: tiel same, la pasinteco kvante superas la estonton.

5:1 Sed pri la signoj: Jen venos la tagoj, kiam la loĝantoj de la tero estos kaptitaj de paniko. La vojo de la vero estos kaŝita, kaj la lando estos sena je fido. 2 Grande multiĝos maljusto, multe pli ol nun vi vidas aŭ iam ajn aŭdis. 3 La lando kiun vi nun vidas regi la mondon\*, fariĝos dezerto sen spuroj, kaj ĉiuj ĝin vidos dezerta. 4 Sed se la Plejaltulo donos al vi la viv-tempon, post la tria periodo vi vidos ĝin perturbita.

Subite lumos nokte la suno,  
kaj la luno dumtage;  
5 sango degutados de l' arboj,  
la ŝtonoj levos sian voĉon,  
popoloj konfuziĝos,  
kaj la padoj de l' steloj ŝanĝiĝos<sup>35</sup>.

6 Ekregos reĝo, kiun la loĝantoj de la tero ne esperis; eĉ la birdoj kune forflugos. 7 La maro de Sodom elĵetos fiŝon\*; kaj dumnokte sonos voĉo, kiun konas ne multaj, sed aŭdos ĝin ĉiuj. 8 Multloke estos ĥaoso, fajro ofte estiĝos, sovaĝaj bestoj vagados tra siajn regionojn, kaj virinoj naskos monstrojn, 9 freŝaj fontoj donos salan akvon. Ĉiuj amikoj konkeros unu la alian. La kompreno kaŝiĝos, kaj la saĝeco retiriĝos en sian sekretan ĉambron. 10 Multaj ĝin serĉos, sed ne trovos; kaj maljusto kaj senvirteco kreskos surtere. 11 Unu lando demandos la alian: Ĉu la justeco, aŭ iu kiu faras juston, pasis tra vin? Kaj ĝi diros: Ne. 12 Kaj en tiu tempo la homoj esperos, sed ne atingos; ili strebos, sed iliaj vojoj ne prosperos.

13 Jen la signoj, kiujn mi rajtas montri al vi. Sed se denove vi preĝos, se vi ploros kiel nun vi faris, kaj se sep tagojn vi fastos, vi aŭdos <signojn> pli grandajn ol ĉi tiuj.

---

<sup>35</sup> Traduko ne certa.

## *Fino de la unua dialogo*

14 Mi vekigis, mia korpo ege skuiĝis, kaj mi preskaŭ svenis. 15 Sed la anĝelo, kiu venis paroli kun mi, subtenis min, fortigis min kaj starigis min sur miajn piedojn.

16 La sekvan nokton venis al mi Faltiel, estro de la popolo, kaj demandis: Kie vi estis? Kaj kial vi rigardas tiel triste? 17 Ĉu vi forgesis, ke Izrael en sia ekzilo estis konfidita al vi? 18 Leviĝu do, manĝu iom da pano, kaj ne forlasu nin kiel paŝtisto, kiu lasas sian gregon al sovaĝaj lupoj! 19 Kaj mi diris al li: Lasu min; kaj dum sep tagoj ne proksimiĝu al mi, sed poste vi venu. Li obeis miajn vortojn, kaj lasis min.

## *Dua dialogo 5:20 – 6:34*

### *Dua preĝo de Ezra*

20 Kaj sep tagojn mi fastis, plorante kaj veante, laŭ la ordono de la anĝelo Uriel. 21 Fine de la sep tagoj mia animo denove forte perturbiĝis. 22 Sed mi reprenis mian pensokapablon kaj denove mi komencis paroli antaŭ la Plejaltulo 23\* kaj diris: Ho Sinjoro, ho Mastro, el ĉiuj arbaroj de la mondo, kaj el ĉiuj ĝiaj arboj Vi elektis unu viton, 24 kaj el ĉiuj landoj de la mondo Vi elektis unu terpecon, kaj el ĉiuj floroj de la mondo Vi elektis al Vi unu lilion, 25 kaj el ĉiuj profundoj de la maro Vi plenigis al Vi unu fluejon, kaj el ĉiuj urboj, kiuj konstruiĝis, Vi sanktigis por Vi mem nur Cionon, 26 kaj el ĉiuj birdoj, kiuj kreiĝis, Vi nomis por Vi mem nur unu kolombon, kaj el ĉiuj greg-bestoj, kiuj formiĝis, Vi havigis al Vi mem nur unu ŝafon, 27 kaj el ĉiuj popoloj, kiuj multiĝis, Vi akiris por Vi mem nur unu popolon, kaj al tiu popolo, kiun Vi amis, Vi donis la leĝon, kiun aprobas ĉiuj. 28 Kaj nun, Sinjoro: kial Vi transdonis la unu al la multaj?

kial Vi humiligis ĉi unu radikon pli ol la ceterajn? kial Vi dispelis Vian solan <popolon> inter la multajn? 29 Kiuj kontraŭis Viajn promesojn, tiuj tretis tiujn, kiuj fidis je Viaj interligoj. 30 Se vere Vi malamas Vian popolon, ĝi meritas punon de Viaj manoj.

### *La mistero de l' Diaj juĝoj*

31 Kaj kiam mi finis miajn parolojn, estis sendita al mi la anĝelo, kiu la antaŭan nokton jam venis. 32 Li diris al mi: Aŭskultu min, kaj mi instruos vin; atentu bone, kaj mi rakontos pli.

33 Mi diris: Parolu, mia sinjoro.

Kaj li diris al mi: Vi tre afliktiĝis pro Izrael. Ĉu vi amuz ĝin pli ol Tiu, kiu ĝin kreis?

34 Kaj mi diris: Ne, sinjoro, sed mi parolis pro ĉagreno; ĉar turmentas min miaj renoj, kaj ĉiuhore mi serĉadas kompreni la vojon de la Plejaltulo kaj travidi almenaŭ parton de Liaj juĝoj.

35 Li diris al mi: Tion vi ne povas.

Kaj mi diris: Kial ne, sinjoro? Kial mi do estis naskita? Kial la utero de mia patrino ne fariĝis mia tombo<sup>36</sup>, tiel ke mi ne vidu la mizeron de Jakob kaj la ellaciĝon de la idaro de Izrael?

36 Li diris al mi: Kalkulu por mi <la homojn>, kiuj ankoraŭ ne venis, kolektu la disverŝiĝintajn gutojn de la pluvo, reverdigu la sekiĝintajn florojn, 37 malfermu al mi la ŝlositajn tenejojn, kaj elkonduku el ili la enfermitajn ventojn, aŭ montru, kiel aspektas la voĉo, kaj tiam mi montros al vi la respondon pri la mizero <de Izrael>.

38 Kaj mi diris: Ho sinjoro, ho mastro, kiu ja povas scii tiajn aferojn, krom Tiu, kiu ne havas loĝejon kun la homoj? 39 Mi estas nur stultulo, kiel mi do povus respondi al viaj demandoj?

---

<sup>36</sup> Ijb 3:11 ; 10:18-19.



40 Kaj li respondis al mi: Kiel vi ne povas fari unu el la aferoj, kiujn mi metis antaŭ vin, tiel vi ankaŭ ne povos trovi Miajn juĝojn nek la finfinan amon, kiun Mi promesis al Mia popolo\*.

### *Kial la juĝo de Dio prokrastiĝas*

41 Kaj mi diris: Sed jen, sinjoro: Vi estras super tiuj, kiuj vivas ĉe la fino, sed kion faros tiuj, kiuj estas antaŭ mi, aŭ ni mem, aŭ tiuj, kiuj <vivos> post ni?\*

42 Kaj li diris al mi: Mian juĝon Mi komparos al cirklo: la lastaj ne estos tro malfruaj, kaj la plej fruaj ne <estos> tro fruaj<sup>37</sup>.\*

43 Mi respondis: Ĉu Vi do ne povis krei samtempe ĉiujn, kiuj estis, kaj kiuj estas, kaj kiuj estos, por ke Vian juĝon Vi montru pli frue?

44 Kaj li respondis al mi: La kreaĵo ne povas pli rapidi ol la Kreanto, kaj la mondo ne povas samtempe enhavi ĉiujn, kiuj kreiĝas.

45 Kaj mi diris: Kial Vi diris al Via servanto, ke Vi vivigante vivigos ĉiujn, kiujn Vi kreis, samtempe? Se ĉiuj kreitoj povos vivi samtempe, kaj se Via kreaĵo eltenos tion, la mondo ankaŭ nun povas porti ĉiujn samtempe.

46 Li diris al mi: Demandu la uteron de virino, diru al ĝi: Se vi povas naski dek infanojn, kial unu post la alia? Demandu ĝin do, ke ĝi nasku dek samtempe.

47 Kaj mi diris: Tion ĝi tute ne povas, sed nur unu post la alia.

48 Kaj li diris al mi: Tiel Mi donis la uteron de la tero iom post iom al tiuj, kiuj semiĝis en ĝi. 49 Ĉar same kiel infano ne naskas, kaj ne plu <naskas>, kiu fariĝis maljuna, tiel same Mi faris regulon por la mondo, kiun Mi kreis.

---

<sup>37</sup> Alia traduko: same kiel por la lastaj ne estas malfruo, tiel por la unuaj ne <estos> troa rapido.

## *Kiam kaj kiel venos la fino?*

50 Kaj mi demandis: Ĉar vi donis al mi la eblecon, mi plu parolu antaŭ vi: Nia patrino, pri kiu vi parolis, ĉu ŝi ankoraŭ estas juna, aŭ ĉu ŝi jam proksimiĝas al oldeco?

51 Li respondis: Demandu virinon, kiu naskas, kaj ŝi respondos al vi. 52 Vi ja diru al ŝi: Kial la laste naskitaj ne estas similaj je tiuj, kiujn vi naskis antaŭe, sed malpli grandaj? 53 Kaj ŝi mem diros al vi: Kelkaj estis naskitaj dum la forto de mia juneco, kaj kelkaj dum la tempo de mia oldeco, dum mia utero malfortiĝis. 54 Tial vi ankaŭ konsideru, ke vi kaj viaj samtempuloj estas malpli grandaj ol tiuj, kiuj estis antaŭ vi, 55 kaj kiuj venos post vi, <estos malpli grandaj> ol vi, ĉar la kreaĵo maljuniĝas kaj jam pasas la forton de l' juneco.

56 Mi diris: Mi petas Vin, Sinjoro, se mi trovis gracon en Viaj okuloj: montru al Via servanto, per kiu Vian kreaĵon Vi vizitos\*.

6:1 Li diris al mi: Ĉe la komenco de la mondo, antaŭ ol stariĝis la pordegoj de ĉi mondo, antaŭ ol ekblovis la kunvenoj de la ventoj, 2 antaŭ ol sonoris la voĉoj de l' tondro, antaŭ ol ekbrilis la fulmolumoj, antaŭ ol estis certigitaj la fundamentoj de la paradizo, 3 antaŭ ol videbliĝis la florara beleco, antaŭ ol fiksiĝis la fortoj de la stelo-moviĝoj, antaŭ ol estis kunigitaj la sennombraj armeoj de anĝeloj, 4 antaŭ ol estis levitaj la altecoj de la aero, antaŭ ol ricevis nomojn la sekcioj de l' firmamento, antaŭ ol Cion estis elektita kiel piedbenko de Dio, antaŭ ol estis kalkulitaj la nunaj jaroj, 5 antaŭ ol eksterleĝiĝis la entreprenoj de tiuj, kiuj nun pekas, antaŭ ol sigeliĝis tiuj, kiuj faris trezoron el sia fido, 6 – tiam Mi pensis Miajn pensojn, kaj ĉio ĉi estis kreita de Mi sola – kaj de neniu alia –, same kiel ankaŭ ĝia fino venos per Mi sola, kaj per neniu alia.

7 Kaj mi respondis: Kio estos la intervalo de la tempoj? Kiam finiĝos la unua erao, kaj komenciĝos la sekva?

8 Kaj Li diris al mi: <La intervalo estos ne pli granda ol> de Abraham ĝis Izaak<sup>38</sup>, ĉar de li naskiĝis Jakob kaj Esav, kaj la mano de Jakob tenis la kalkanon de Esav je la momento de sia naskiĝo<sup>39</sup>. 9 Esav reprezentas la finon de ĉi tiu erao, kaj Jakob la komencon de la sekva. 10 La komenco de viro estas lia mano, kaj lia fino estas lia kalkano. Inter la mano kaj la kalkano ne serĉu ion alian, Ezra.

### *Pli da signoj pri la fino*

11 Kaj mi respondis: Ho Mastro, ho Sinjoro, se gracon mi trovis antaŭ Viaj okuloj, 12 montru al via servanto la lastan el Viaj signoj, kiujn parte Vi jam montris al mi en nokto pasinta.

13 Kaj Li respondis al mi: Stariĝu sur viajn piedojn, kaj vi aŭdos plenan resonan voĉon. 14 Kaj se la ejo, kie vi staras, grave moviĝos, 15 dum ĝi parolos, vi ne timu, ĉar la parolo temos pri la fino. Kaj la fundamentoj de la tero komprenos, 16 ke la parolo temas pri ili. Kaj ili tremos kaj skuiĝos; ĉar ili scias, ke ilia fino devas transformiĝi.

17 Kiam tion mi aŭdis, mi stariĝis sur miajn piedojn, kaj aŭskultis. Jen ekparolis la voĉo, kaj ĝia sono similis la sonon de multaj akvoj<sup>40</sup>.

18 Ĝi diris: Jen venos la tagoj, kiam Mi alproksimiĝos por viziti la loĝantojn de la mondo, 19 <la tagoj>, kiam pri tiuj, kiuj agis maljuste, Mi komencos enketadi, kiuj nocis al aliaj, <la tagoj>, kiam la tempo de l' humiligo de Cion estos kompleta\*, 20 kaj kiam sigelo estos metita sur la eraon, kiu estas pasanta. Tiam ĉi signojn Mi faros: Libroj malfermiĝos<sup>41</sup> antaŭ la rigardo

---

<sup>38</sup> Alia versio: ĝis Abraham.

<sup>39</sup> Aŭ: de la komenco.

<sup>40</sup> Ap 1:15 ; 14:2 ; 19:6.

<sup>41</sup> Dan 7:10; 12:1 ; Mal 3:16 ; Ap 20:12.

de l' ĉielo, kaj ĉiuj samtempe tion vidos. 21 Unujaraĝaj infanoj parolos klare, kaj gravedulinoj naskos nematurajn infanojn de tri aŭ kvar monatoj – kaj tiuj vivos, kaj saltetados. 22 Prisemitaj terenoj subite montriĝos neemitaj, kaj tenejoj plenplenaj subite montriĝos malplenaj. 23 La trumpeto laŭte kantos<sup>42</sup>, kaj kiam ĉiuj ĝin aŭdos, ili subite ektimos. 24 Kaj en tiu tempo amikoj batalos kontraŭ amikojn, kvazaŭ malamikoj, kaj la tero kaj ĉiuj, kiuj ĝin loĝas, timegos. Kaj la akvofontoj stagnos, kaj dum tri horoj ne fluos akvo.

25 Kaj ĉiu, kiu ankoraŭ restos post ĉio, kion Mi anoncis al vi, saviĝos, kaj vidos la savon, kiun Mi donos, kaj la finon de ĉi tiu Mia mondo. 26 Ili vidos la homojn, kiuj estis supren levitaj ĉielen<sup>43</sup>, kiuj de sia naskiĝo ne gustumis la morton, kaj la koro de la ter-loĝantoj ŝanĝiĝos, kaj ilia menso konvertiĝos alidirekten. 27 Neniĝos la malbono, kaj la malico estingiĝos. 28 Sed floros fidelo, dum venkiĝos korupteco, kaj la vero, kiu tiel longe restis senfrukta, malkaŝiĝos.

### *Fino de la dua dialogo*

29 Dum li parolis al mi, jen iom post iom ekskuiĝis la loko, kie mi staris. 30 Kaj li diris al mi: Mi venis montri ĉi tion al vi ĉi-nokte. 31 Sed se denove vi petos, kaj se denove sep tagojn vi fastos, mi revenos por sciigi al vi ankoraŭ pli grandajn aferojn [dumtage], 32 ĉar via voĉo estis aŭdita de la Plejaltulo. La Potenculo vidis vian inklinon kaj vian ĉastecon, kiun vi konservis ekde via junaĝo. 33 Tial Li sendis min por montri ĉion ĉi al vi, kaj por diri al vi: Fidu, kaj ne timu. 34 Ne rapidu por pensi vanajn pensojn pri la pasinteco; tiam vi ne agos tro haste en la lasta tempo.

---

<sup>42</sup> 1 Kt 15:52 ; 1 Te 4:16.

<sup>43</sup> Kiel Henoh (Gen 5:24 ; Sir 44:16) aŭ Elija (2 Reĝ 2:11-12; vidu ankaŭ 14:9. Ankaŭ komparu kun Mal 4:6).

*La tria dialogo 6:35 – 9:25*

*La tria preĝo de Ezra*

35 Kaj post tio denove mi ploris, kaj same sep tagojn mi fastis, por kompletigi la tri semajnojn indikitajn al mi. 36 Kaj en la oka nokto denove perturbiĝis mia koro en mi, kaj mi komencis paroli antaŭ la Plejaltulo. 37 Ĉar mia spirito estis flame brula, kaj mia animo en zorgoj.

38 Mi diris: Ho Sinjoro, ĉe la komenco de la kreado je la unua tago Vi diris: Estiĝu ĉielo kaj tero, kaj Via vorto ĉion elfaris. 39 Kaj tiumomente la spirito flugis, kaj tenebro kaj silento ĉirkaŭis ĉion; homa voĉo ankoraŭ ne sonis. 40 Tiam Vi ordonis aperigi el Viaj trezorejoj iun lumradion, por ke Viaj verkoj estu videblaj.

41 Je la dua tago Vi kreis la anĝelon de la firmamento kaj ordonis al li, ke dividon li faru inter la akvoj, por ke parto retiriĝu supren, parto restu sube.

42 La trian tagon Vi ordonis la akvojn kuniĝi en seponon de la tero; la ceterajn ses onojn Vi faris seka tero, kaj konservis ĝin, tiel ke parte ĝi estu prisemata kaj kultivata por Via servo. 43 Eliris Via vorto, kaj ĉio tuj fariĝis. 44 Vasta amaso da fruktoj ja tuj aperis, kaj diversaj dezirataj gustoj, kaj floroj de neimiteblaj koloroj kaj misteraj odoroj. Tio estiĝis la trian tagon.

45 Sed je la kvara tago Vi ordonis, ke formiĝu la suna brilo, kaj la lunlumo, kaj la steloj je siaj fiksitaj lokoj; 46 kaj ilin Vi ordonis servi la homon, kiu baldaŭ kreiĝos.

47 Je la kvina tago Vi ordonis al la sepono, kien kuniĝis la akvo, ke ĝi kreu bestojn, birdojn kaj fiŝojn, kaj tiel okazis: 48 la senvoĉa kaj senviva akvo, pro Via ordono, kreis la bestojn, por ke surbaze de tio la popoloj laŭdadu Viajn mirindaĵojn. 49 Tiam

du vivantaĵojn Vi apartigis: la unuan Vi nomis Behemot<sup>44</sup>, kaj la duan Leviatan. 50 Kaj ilin Vi metis en malsamajn lokojn; ĉar la sepono, kien kuniĝis la akvo, ne povis enhavi ambaŭ samtempe. 51 Al Behemot Vi donis unu onon de la tero, kiu sekigiĝis la trian tagon, por loĝi tie, kie estas la mil montoj; 52 al Leviatan aliflanke Vi donis la malsekan seponon. Vi konservis ilin por esti manĝaĵo por tiuj, kiujn Vi volas, kaj kiam Vi volas.

53 Sed je la sesa tago Vi ordonis la teron krei antaŭ Vi brutojn, sovaĝajn bestojn kaj reptiliojn, 54 kaj super ĉiujn Vi metis Adamon, kiun Vi faris estro super ĉio, kion Vi kreis, kaj de li devenas ni ĉiuj, la popolo kiun Vi elektis.

55 Ĉion ĉi mi diris antaŭ Vi, Sinjoro, ĉar Vi diris, ke pro ni Vi kreis ĉi tiun [unuon] mondon. 56 Pri la ceteraj popoloj naskitaj el Adam Vi diris, ke ili estas nenio, ke ili similas al sputo, kaj malgraŭ ilia multnombreco Vi komparis ilin al guto defalanta de poto-rando. 57 Sed jen, Sinjoro: tiuj popoloj, kiuj konsideriĝas kiel nenio, dominas nin kaj voras nin. 58 Sed ni, Via popolo, kiun Vi nomis Via unua filo, Via solfilo, Via probatalanto<sup>45</sup>, Via plejkara, – ni estas transdonitaj en iliajn manojn. 59 Kaj se ĉi mondo estis kreita pro ni, kial ni do ne posedas nian mondon kiel heredaĵon? Kiel longe tio daŭros?

### *La Dia respondo*

7:1 Kiam mi finis ĉi tiujn vortojn, la sama anĝelo estis sendita al mi kiel en la unuaj noktoj, 2 kaj li diris: Stariĝu, Ezra, kaj aŭdu la parolojn, kiujn mi venas direkti al vi.

3 Kaj mi diris: Parolu, mia sinjoro.

Kaj li diris al mi: Supozu, ke en vasta spaco estas maro, ege profunda kaj larĝa. 4 Sed ĝia aliro troviĝas en mallarĝejo,

---

<sup>44</sup> Aliaj Latinaj manuskriptoj legas: Henoĥ.

<sup>45</sup> Senco ne tute klara.

preskaŭ simila al rivero. 5 Se nun iu deziras eniri tiun maron, por rigardi ĝin aŭ por navigi, – kiel li kapablos atingi la vastecon, se la mallarĝejon li ne trapasos? 6 Alia ekzemplo: certa urbo konstruiĝis sur ebenaĵo, kaj ĝi plenas je riĉaĵoj. 7 Sed la aliro al ĝi estas mallarĝa kaj troviĝas en krutejo. Dekstre estas fajro, maldekstre profundega akvo. 8 Nur unu sola pado kuŝas inter ili, t.e. inter fajro kaj akvo, kaj ĝi sufiĉas nur por unuopulo samtempe. 9 Se ĉi urbo kiel heredaĵo estis donacita al iu, – kiel la heredanto povos transpreni sian heredaĵon, se li ne venkos la prezentitan danĝeron?

10 Kaj mi diris: Vi pravas, sinjoro.

Kaj li diris al mi: Estas same pri Izrael. 11 Pro ili Mi kreis la mondon\*, sed kiam Adam transpaŝis Miajn ordonojn, estis juĝite pri kio okazis. 12 Kaj tial la aliroj al ĉi tiu mondo fariĝis mallarĝaj, ĉagrenaj kaj penplenaj; ili estas malmultaj, fiaj, plenaj je danĝeroj kaj je multa penado. 13 Sed la aliroj al la pli granda mondo<sup>46</sup> estas larĝaj, sekuraj, kaj kondukas al senmorteco. 14 Se la vivantoj do ne trairos ĉi tion mallarĝan kaj vanan ĉi tie, ili ne povos ricevi, kio estis destinita por ili. 15 Sed do, kial vi perturbigas, vidante ke vi estas mortideva? Kial vin skuas, ke vi devos morti? 16 Kial en via koro vi ne konsideris, kio estas venonta, sed nur kio estas nun?

### *La justeco de la agoj de Dio al la homoj*

17 Kaj responde mi diris: Ho Mastro, ho Sinjoro, en Via leĝo Vi ordonis, ke la justuloj heredos ĉi tion, sed pereos la maljustaj. 18 La justuloj do eltenos la mallarĝan vivon, esperante pri la pli larĝa vivo; sed kiuj agis malpie kaj spertis la mallarĝaĵojn, ne vidos la larĝajn spacojn\*. 19 Li diris al mi: Vi ne estas pli bona juĝisto ol la Sinjoro nek pli saĝa ol la Plejaltulo! 20 Estas

---

<sup>46</sup> Siriaka traduko diras: la estonta mondo.

pli bone, ke multaj nun vivantaj pereu, ol ke estu malrespektata la leĝo, kiun Dio metis antaŭ ilin. 21 Ĉar Dio donis klarajn ordonojn al la homoj, kiuj venas en la mondon, kion ili faru por vivi kaj kion ili obeu por ne esti punataj. 22 Sed la malpiaj ne konvinkiĝis, kaj rezistas al Li.

Ili formis al si vanajn pensojn,  
23 kaj planis trompadon kaj malbonon.  
Ili eĉ aldonis, ke la Plejaltulo ne ekzistas,  
kaj Liajn vojojn ili ignoris.  
24 Ili malŝatis Lian leĝon,  
kaj Liajn promesojn ili neis;  
ili ne estis fidelaj al Liaj dekretoj,  
kaj ne plenumis Liajn agojn.  
25 Tial do, Ezra, la malpleno estas por la malplenaj,  
kaj la pleno por la plenaj.

### *La Mesia regno kaj la juĝo*

26 Jen venos la tempo, kiam vidiĝos la signoj, kiujn Mi anoncis al vi, kaj aperos la urbo, la novedzino, kaj montriĝos la lando nun kaŝita. 27 Kaj ĉiu, kiu estos liberigita el la anoncitaj malbonoj, vidos Miajn mirindaĵojn. 28 Ĉar malkaŝiĝos Mia filo la Mesio<sup>47</sup> kun la siaj, kaj kvar cent jarojn ĝojos tiuj, kiuj postrestas. 29 Post tiuj jaroj mortos Mia filo la Mesio kaj ĉiuj, kiuj havas homan spiradon. 30 Tiam la mondo revenos al sia praa silento dum sep tagoj, kiel estis en la unua komenco, tiel ke neniu postrestos. 31 Kaj post tiuj sep tagoj la mondo, kiu ankoraŭ ne vekigis, estos vekita, kaj pereos ĉio perebla. 32 La tero redonos tiujn, kiuj dormas en ĝi, kaj la polvo <redonos tiujn>, kiuj loĝas tie en silento, kaj la ĉambroj redonos la animojn konfiditajn al ili. 33 Malkaŝiĝos la Plejaltulo sur la juĝista seĝo,

---

<sup>47</sup> La Latina traduko diras: Jesuo.



kaj forpasos kompatemo kaj retirigōs pacienco. 34 Nur juĝo restos, vero staros, fidindo fortiĝos. 35 Rekompenco sekvos, kaj merito manifestiĝos; justaj agoj vekigōs kaj maljustaj agoj ne dormos. [36]<sup>48</sup> Tiam aperos la lago de la turmento, kaj kontraŭ ĝi estos la ejo de l' ripozo, kaj la forno de geheno montriĝos kaj kontraŭ ĝi la paradizo de plezuro. [37] Tiam la Plejaltulo diros al la popoloj restarigitaj el la morto: Vidu nun, kaj komprenu, kiun vi neis, al kiu vi ne servis, kaj kies ordonojn vi malŝatis! [38] Rigardu ĉiflanke kaj tiuflanke, jen ĉi tie estas plezuro kaj ripozo, kaj tie fajro kaj turmentoj. Tiel Li parolos al ili en la tago de la juĝo, [39] – tiu tago sen suno, sen luno aŭ steloj, [40] sen nubo, tondro aŭ fulmo, sen vento, akvo aŭ aero, sen mallumo, vespero aŭ mateno, [41] sen somero aŭ printempo, varmo aŭ malvarmo, frosto aŭ hajlo, pluvo aŭ roso, [42] sen tagmezo aŭ nokto, sen aŭroro, lumiĝo, helo aŭ lumo – krom sole nur la brilo de la gloro de l' Plejaltulo, en kiu ĉiuj vidos, kio estos fiksita por ili. [43] Ĉar daŭros ĉirkaŭ semajnon da jaroj. [44] Tio estas mia juĝo kaj ĝia fiksita ordo; nur al vi Mi montris ĉi tion.

### *Resumo de la diritaĵo*

[45] Mi respondis: Ho Sinjoro, jam tiam mi diris kaj ree mi diras: Feliĉaj, kiuj vivas kaj observas viajn ordonojn. [46] Sed kio pri tiuj, por kiuj mi preĝis? Ĉar kiu el la vivantoj neniam pekis? Aŭ kiu el la naskitoj neniam transpaŝis vian interligon? [47] Nun mi vidas, ke la venonta mondo portos plezuron al nur malmultaj, sed turmenton al multaj. [48] Ĉar kreskis en ni

---

<sup>48</sup> Versikloj 36-105 mankas en la ĉefaj manuskriptoj de *Vulgato*; ili tamen ekzistas en du manuskriptoj de *Vulgato* kaj en pluraj malnovaj tradukoj: Siriaka, Etiopia, Araba kaj Armenia. Eble pro dogma kialo iu intence forigis ĝin el la prapatrina manuskripto de l' ĉefa Latina tekstotradicio, ĉar ĉi tie eksplicite oni neas la utilon de preĝado por la mortintoj, vs 105. Ankaŭ en la Rusa Ortodoksia Eklezio ĉi tiuj versikloj mankas.

koro malbona, kiu fremdigis nin de ĉi tio, kaj kondukis nin al malbono, montrante al ni vojojn de la morto, padojn de perdiĝo; tio nin longe forkondukis de la vivo. Kaj ne nur kelkajn el ni, sed preskaŭ ĉiujn, kiuj estis kreitaj.

[49] Li responde al mi diris: Aŭskultu min, kaj mi instruos vin, kaj mi konsilos vin pri la sekvo<sup>49</sup>. [50] Ĝuste tial la Plejaltulo ne faris unu mondon, sed du. [51] Vi ja diris, ke la justuloj ne estas multaj sed malmultaj; kaj ke la malpiuloj tamen multnombriĝas; aŭskultu do ĉi tion:

[52] Se nur tre malmultajn valorajn ŝtonojn vi havas, ĉu al ilia nombro vi aldonos plumbon kaj argilon, kiuj abundas?<sup>50</sup> [53] Mi diris: Sinjoro, kiel tio eblus? [54] Li diris al mi: Ne nur tio, sed prienketu la teron kaj ĝi diros al vi, flatu ĝin kaj ĝi informos vin. [55] Diru al ĝi: Vi produktas oron, arĝenton, bronzon kaj feron, ankaŭ plumbon kaj argilon. [56] Sed estas pli da arĝento ol da oro, kaj pli da bronzo ol arĝento, kaj pli da fero ol bronzo, pli da plumbo ol fero, pli da argilo ol plumbo. [57] Vi do juĝu, kio estas valora kaj dezirinda: kio estas abunda aŭ kio ekzistas nur rare?

[58] Kaj mi diris: Ho Mastro, ho Sinjoro, kio abundas estas malpli valora, ĉar multekosta estas, kio estas pli rara.

[59] Li responde diris al mi: Pripensu en vi mem, kion vi pensis, ĉar kiu havas, kio estas malfacile havebla, tiu ĝojas pli ol kiu havas, kio abundas. [60] Tiel ankaŭ la kreitaro laŭ mia promeso. Mi ĝojos pri la malmultaj, kiuj saviĝos, ĉar estas ja tiuj, kiuj faris, ke mia gloro nun regas, kaj dank' al kiuj nun menciĝas mia nomo. [61] Kaj mi ne tristiĝos pro la amaso de tiuj, kiuj pereis, ĉar estas ja ili mem, kiuj nun similas je vaporo, kaj egalas al flamo kaj fumo – ili ekbrulis, ardis kaj estingiĝis.

---

<sup>49</sup> Traduko iom necerta.

<sup>50</sup> Traduko nepre necerta. La Latina teksto ŝajne grave difektiĝis.

## *La kompatinda sorto de la homo*

[62] Kaj responde mi diris: Ho vi, tero, kion vi naskis, se la menso fariĝis el la polvo, same kiel ĉiuj ceteraj kreitaĵoj? [63] Estus pli bone, se la polvo mem ne estus naskita, tiel ke la menso ne estu farita el ĝi. [64] Sed nun la menso kreskas kun ni, kaj pro tio ni torturiĝas, ĉar ni pereas plenscie. [65] Lamentu la homa gento kaj ĝoju la bestoj de la agroj; lamentu ĉiuj, kiuj naskiĝis, sed ĝoju la kvarpeduloj kaj la brutaro. [66] Ĉar al ili estas pli bone ol al ni. Ili ja ne atendas la juĝon, kaj ili ne scias pri turmentoj aŭ saviĝo post la morto, promesitaj al ili. [67] Kiom utilos al ni, ke savite ni restos vivaj, sed grave turmentiĝos? [68] Ĉar ĉiuj, kiuj naskiĝis, implikiĝis en maljusteco kaj estas plenaj je pekoj, ŝarĝitaj je krimoj. [69] Kaj se post la morto ni ne venus en la juĝon, eble estus pli bone al ni.

[70] Li responde al mi diris: Kiam la Plejaltulo kreis la mondon kaj Adamon kaj ĉiujn, kiuj devenas de li, Li unue preparis la juĝon kaj kio apartenas al la juĝo. [71] Kaj nun komprenu el viaj propraj vortoj – vi ja diris, ke la menso kreskas kun ni. [72] Tial, kiuj troviĝas sur la tero, tiuj estos turmentitaj, ĉar menson havante ili faris maljustecon, kaj ricevinte la ordonojn, ili ne observis ilin, kaj havante la leĝon, ili trompe kondukis pri tio, kion ili ricevis. [73] Kion ili do havos por diri en la juĝo kaj kiel ili respondos en la lasta tempo? [74] Ĉar kiom da tempo jam pacienca estas la Plejaltulo pri tiuj, kiuj loĝas ĉi tiun mondon! – kaj ne pro ili mem, sed pro la tempo, kiun Li antaŭdestinis.

## *La homa sorto post la morto*

[75] Mi responde diris: Se gracon mi trovis antaŭ vi, Sinjoro, ankaŭ tion montru al via sklavo: post ĉies morto, tuj kiam ĉiu el ni eligas la lastan spiron, ĉu tiam ni restos konservataj en ripozo ĝis venos tiu tempo, en kiu Vi komencos renovigi la kreon, aŭ ĉu tuj ni estos torturataj?

[76] Li responde diris al mi: Ankaŭ tion mi montros al vi. Sed vi ne miksiĝu kun tiuj, kiuj montris malŝaton, nek kunkalkulu vin kun tiuj, kiuj estas torturataj. [77] Ĉar vi havas trezoron el agoj amasigitan ĉe la Plejaltulo, sed ĝi ne montriĝos al vi krom en la lasta tempo.

[78] Koncerne la morton estas la instruo jena: Kiam la verdikto eliras de la Plejaltulo, ke mortu iu homo, la spirito forlasas la korpon por reiri al Tiu, kiu ĝin donis, unue por adori la gloron de la Plejaltulo. [79] Sed se estas unu el tiuj, kiuj montris malŝaton kaj ne gardis la vojon de la Plejaltulo, kaj unu el tiuj, kiuj malestimis Lian leĝon, kaj el tiuj, kiuj malamas tiujn, kiuj timas antaŭ Dio, [80] – tiuj spiritoj ne eniros loĝejojn, sed ili tuj fariĝos vaguloj en torturiĝo, ĉiam ĉagrenaj kaj tristaj, laŭ sep vojoj. [81] La unua vojo, ĉar ili malŝatis la leĝon de la Plejaltulo. [82] La dua vojo, ĉar ili ne plu povas konvertiĝi, por ke ili vivu. [83] La tria vojo: ili vidos kuŝi la rekompencan por tiuj, kiuj fidis je la interligoj de la Plejaltulo. [84] La kvara vojo: ili prikonsideros la torturojn, kiuj pretas por ili en la lasta tempo. [85] La kvina vojo: ili vidos, kiel la loĝejoj de l' aliaj estas gardataj de anĝeloj, en granda silento. [86] La sesa vojo: ili vidos, kiel la torturo [transiros de ili<sup>51</sup>]. [87] La sepa vojo, kiu estas pli grava ol ĉiuj ĝis nun menciitaj, ĉar ili komplete neniĝos en konfuzo kaj forkonsumiĝos en malhonoro kaj velkos en timo, vidante la gloron de la Plejaltulo, en kies apudeco dum sia vivo ili pekadis kaj en kies apudeco ili estos juĝataj en la lasta tempo.

[88] Kaj ĉi tio estas la ordo de tiuj, kiuj gardis la vojon de la Plejaltulo, kiam ili komencas disiĝi de sia mortideva korpo<sup>52</sup>.

---

<sup>51</sup> Frazo tute ne certa. Aliaj tradukas: Ili vidos, kiel kelkaj el ili transiros al turmentiĝo.

<sup>52</sup> Laŭlitere: de sia pereema vazo.

[89] En la tempo, kiam ili vivis en ĝi<sup>53</sup>, ili penplene servadis al la Plejaltulo, kaj ĉiun horon ili rezistis al la danĝero, por perfekte observi la leĝon de la Leĝodonisto. [90] Tial jen do la instruo pri ili: [91] Unue kun granda ĝojo ili vidos la gloron de Tiu, kiu akceptos ilin, ĉar ili ripozos laŭ sep ordoj. [92] La unua ordo, ĉar kun multa penado ili strebadis por venki la malbonan penson, kiu estis formita kune kun ili, por ke ĝi ne konduku ilin de la vivo al la morto. [93] La dua ordo, ĉar ili vidas la perpleksecon, en kiu vagadas la animoj de la malpiaj, kaj kiu puno atendas ilin. [94] La tria ordo: ili vidos la ateston, kiun atestas pri ili ilia Kreinto, ke dumvive ili observis la leĝon, kiun en la fido ili ricevis. [95] La kvara ordo: ili komprenos la ripozon, kiun nun ili ĝuas, unuigite en siaj ĉambroj, gardate de anĝeloj en profunda kvieto, kaj la gloron, kiu atendas ilin en la lasta tempo. [96] La kvina ordo: ili ĝojegos, ke nun ili eskapis la pereemon, kaj ke ili posedos la estontan heredaĵon; krome ili vidos la stretecon kaj la pen-plenecon, el kiuj ili jam estas liberigitaj, kaj ili ricevos la vastan liberon, ĝuoplenaj kaj senmortaj. [97] La sesa ordo, kiam estos montrate al ili, kiel ilia vizaĝo komencos radii kiel la suno, kaj kiel ili estos similigitaj je la lumo de la steloj, neniam plu pereemaj. [98] La sepa ordo, kiu estas pli grava ol ĉiuj ĝis nun menciitaj, ĉar ili ĝojegos plenkuraĝe kaj konfidos sen konfuziĝo kaj jubilos senhezite; ĉar ili rapidos por vidi la vizaĝon de Tiu, al kiu dum sia vivo ili servadis kaj de kiu glorplenaj ili nun ricevos sian rekompencon. [99] Jen la ordo de la animoj de la justaj, kiel depost nun estos heroldate; kaj antaŭe menciigis la vojoj de la turmento, kiujn suferos tiuj, kiuj ne estas atentaj.

[100] Responde mi diris: Ĉu la animoj havos tempon por vidi, kion vi rakontis al mi, kiam ili estos disigitaj de siaj korpoj?

---

<sup>53</sup> Traduko surbaze de Siriaka kaj Etiopia tradukoj; la senco de la Latina ĉi tie ne estas klara.

[101] Li diris al mi: Sep tagojn ili havos la liberon por vidi en tiuj sep tagoj, kio estis rakontata al vi, kaj post tio ili kolektiĝos en siajn loĝejojn.

*La justuloj ne povas pledi por la maljustaj*

[102] Responde mi diris: Se mi trovis gracon en viaj okuloj, montru ankoraŭ al mi, via sklavo, ĉu en la tago de la juĝo la justuloj ankoraŭ povos interveni por la malpiaj aŭ preĝi por ili al la Plejaltulo [103] – patroj por filoj aŭ filoj por patroj, fratoj por fratoj, najbaroj por proksimuloj, fiduloj por siaj plej karaj ?

[104] Responde li diris al mi: Ĉar vi trovis gracon en miaj okuloj, ankaŭ tion mi montros al vi. La tago de la juĝo estas decidiga kaj montros al ĉiuj la sigelon de la vero. Same kiel nun neniuj patro sendas sian filon, aŭ filo la patron, aŭ mastro la sklavon, aŭ amiko la plej karan amikon, por ke la alia komprenu<sup>54</sup> aŭ dormu, manĝu aŭ estu kuracata anstataŭ li, [105] tiel same neniuj tiutage preĝos por iu alia; ĉar ĉiuj portos tiam unuope siajn proprajn maljustaĵojn aŭ justaĵojn<sup>55</sup>.

36\* [106] Responde mi diris: Kiel ni do trovas, ke<sup>56</sup> unue Abraham preĝis por la loĝantoj de Sodom, kaj Moseo por la patroj, kiuj pekis en la dezerto, 37 [107] kaj Josuo post li por Izrael en la tagoj de Aĥan, kaj Samuel en la tagoj de Saul, 38 [108] kaj David por la plago, kaj Salomono por tiuj ĉe la konsekrado, 39 [109] kaj Elija por tiuj, kiuj ricevis la pluvon, kaj por la mortinto, ke li vivu, 40 [110] kaj Jeĥezkel por la popolo

---

<sup>54</sup> La Etiopia teksto diras: estu malsana.

<sup>55</sup> Rdm 24:16 ; Jer 31:30 ; Jĥz 18:1-32.

<sup>56</sup> Ekzemploj de porpetadoj: Gen 18:23; Elr 32:11 ; Jos 7:6-7 ; 1 Sam 7:9 ; 12:23 ; 2 Sam 24:17 ; 1 Reĝ 8:22-23.30, 1 Reĝ 18:42.45 ; 17:20-21 ; 2 Reĝ 19:15-19.

en la tagoj de Sanĥerib, kaj multaj aliaj por multaj aliaj? 41 [111] Kaj se nun, kiam kreskis la pereemo kaj kiam multiĝis la maljusteco, la justuloj preĝis por la malpiaj, – kial do tiam ne estos same?

42 [112] Responde li diris al mi: La nuna mondo ne estas la fino; la gloro en ĝi ne estas daŭra; tial do tiuj, kiuj kapablis, preĝis por la malfortaj. 43 [113] Sed la tago de la juĝo estos la fino de ĉi tiu tempo kaj la komenco de la estonta senmorta tempo, en kiu estos malaperinta pereemo, 44 [114] finita pekemo, kaj senfido fortranĉita, kiam justeco estos kreskinta kaj plene naskita la vero. 45 [115] Tiam do neniu plu kapablos kompati pri iu, kiu kondamniĝis en la juĝo, nek damaĝi iun, kiu estas venka.

### *Denove resumo de la diritaĵo*

46 [116] Responde mi diris: Ĉi tio estas mia unua kaj lasta diro: Estus pli bone, se la tero ne estus produktinta Adamon, aŭ alie, produktinte lin, estus reteninta lin, tiel ke li ne pekus. 47 [117] Ĉar kiom utilas al ĉiuj, ke nun ili vivas en tristeco kaj postmorte atendas punon? 48 [118] Ho, kion vi faris, Adam? Ĉar vi ja pekis, sed ne vi sola falis, sed ankaŭ ni, kiuj devenas de vi. 49 [119] Ĉar kiom utilas al ni, ke estas promesita al ni senmorta tempo, sed ni faris agojn, kiuj alportas la morton<sup>57</sup>? 50 [120] Ke estas antaŭdirita al ni eterna espero, sed ni vere fariĝis malbonaj? 51 [121] Ke estas rezervitaj por ni sekuraj kaj sanaj loĝejoj, sed ni vivis pekeme? 52 [122] Ke la gloro de la Plejaltulo defendos tiujn, kiuj vivis pure, sed ni sekvis vojojn malbonegajn? 53 [123] Ke malkaŝiĝos paradizo, kies fruktoj restas senkoruptaj, kaj kie troviĝas abundo kaj kuracado, 54 [124] dum ni ne eniros, ĉar ni vivis malĝuste.<sup>58</sup> 55 [125] Ke

---

<sup>57</sup> Laŭlitere: faris mortigajn agojn.

<sup>58</sup> Laŭlitere: en malagrablaj / malĝustaj lokoj.

la vizaĝoj de tiuj, kiuj sinregadis, brilos pli ol la steloj, dum niaj vizaĝoj estos pli obskuraj ol tenebro? 56 [126] Ĉar kiam dumvive ni faris malbonon, ni ne pripensis, kion postmorte ni suferos.

57 [127] Responde li diris: Tio ĉi estas la senco de la batalo, kiun batalas ĉiu homo, kiu naskiĝas sur la tero: 58 [128] Se li estos venkita, li suferos, kion vi diris, sed se li venkos, li ricevos, kion mi diras. 59 [129] Ĉar tio estas la vojo, pri kiu dumvive parolis Moseo al la popolo: Elektu do por vi la vivon, por ke vi vivu<sup>59</sup>. 60 [130] Sed ili ne kredis lin, nek la profetojn post li, nek min, kiam mi parolis al ili. 61 [131] Tial ne estos<sup>60</sup> tristeco pro ilia perejo kiel estos ĝojo pro tiuj, por kiuj estas certigita la saviĝo.

### *Ezra apelas al la pardonemo de Dio*

62 [132] Responde mi diris: Mi scias, Sinjoro, ke la Plejaltulo nun nomiĝas pardonema, ĉar Li pardonemas al tiuj, kiuj ankoraŭ ne venis en ĉi mondon, 63 [133] kaj gracoplena, ĉar Li donas gracon al tiuj, kiuj konvertiĝas al Lia leĝo, 64 [134] kaj pacienca, ĉar paciencon Li montras al tiuj, kiuj pekis, ĉar ili estas Liaj kreaĵoj, 65 [135] kaj donacema, ĉar Li prefere volas doni ol forpreni, 66 [136] kaj tre kompatema, ĉar Sian kompaton Li multobligas por tiuj, kiuj ĉeestas, kaj por tiuj, kiuj pasis, kaj por tiuj, kiuj ankoraŭ estos. 67 [137] (Se Li ja ne multobligus ĝin, ne povus havi la vivon la mondo kun tiuj, kiuj loĝas sur ĝi.) 68 [138] Kaj Li ankaŭ nomiĝas donanto, ĉar se Li ne donus el Sia boneco, por ke senpeziĝu el sia malbono tiuj, kiuj faris malbonon, eĉ ne dekmilono de la homaro povus havi la vivon, 69 [139] kaj [ankaŭ] juĝisto, ĉar se Li ne pardonus

---

<sup>59</sup> Rdm 30:19.

<sup>60</sup> La Latina teksto ĉi tie diras: estis.



tiujn, kiuj estis kreitaj de Lia parolo, kaj ne neniigus la amason de iliaj pekoj, 70 [140] verŝajne nur ege malmultaj postrestus el sennombra amaso<sup>61</sup>.

8:1 Responde li diris al mi: Ĉi tiun mondon la Plejaltulo faris por multaj, sed la estontan por nur malmultaj. 2 Mi rakontos parabolon al vi, Ezra. Same kiel, se la teron vi pridemandos, ĝi diros al vi, ke ĝi liveras multe da argilo por fari argilaĵojn, sed nur malmulte da polvo el kiu estiĝas oro, same estas pri la nuna mondo. 3 Multaj estis kreitaj, sed nur malmultaj saviĝos<sup>62</sup>.

### *Ezra denove apelacias je l' Dia kompatado*

4 Responde mi diris: Pleniĝu, ho animo, je kompreno<sup>63</sup>, kaj trinku saĝecon. 5 Ĉar ne el propra volo vi venis en la mondon<sup>64</sup>, kaj kontraŭvole vi foriras, ĉar vi ricevis nur malgrandan spacon por vivi. 6 Ho Sinjoro super ni, permesu al via sklavo, ke ni preĝu al Vi, kaj donu al ni semon por la koro kaj kultivadon de l' kompreno, por ke fariĝu frukto, el kiu vivu ĉiu falinta homo, kiu portas homan similecon<sup>65</sup>. 7 Ĉar nur Vi ekzistas, kaj ni estas unu *muldaĵo de Viaj manoj*, kiel Vi mem diris<sup>66</sup>.

8 Kaj ĉar nun Vi vivigas la korpon, formitan en la utero, kaj havigas al ĝi la membrojn, konserviĝas Via kreaĵo en fajro kaj akvo, kaj naŭ monatojn la korpo, kiun Vi muldis, portas tion, kion Vi kreis en ĝi. 9 Sed kio tenas kaj kio estas tenata,

---

<sup>61</sup> Lingve tre ne klare.

<sup>62</sup> Komparu kun Mt 22:14.

<sup>63</sup> Laŭ la Siriaka versio.

<sup>64</sup> Laŭ la Siriaka versio. La Latina estas ne komprenebla.

<sup>65</sup> *The Cambridge Bible Commentary* tradukas: Metu semon en niajn korojn kaj mensojn, kaj kreskigu ĝin ĝis ĝi donos frukton, tiel ke falintaj homoj ricevu vivon.

<sup>66</sup> Jsa 64:8 (7).

ambaŭ estas tenataj de Via tenado. Kaj kiam la utero redonas, kio estis kreita en ĝi, 10 Vi ordonas, ke el la membroj mem – t.e. el la mamoj – estu liverata la lakto, la frukto de la mamoj. 11 Kaj tiel ĝis certa tempo estas nutrata tio, kio estis muldita. Kaj poste Vi ankoraŭ zorgas pri ĝi en Via indulgemo. 12 Vi nutris ĝin en Via justeco, kaj Vi instruas ĝin en Via leĝo, kaj Vi korektas ĝin en Via saĝeco. 13 Vi mortigas ĝin kiel Vian kreaĵon, kaj vivigas kiel Vian muldaĵon. 14 Se Vi do neniigos rapide kaj leĝer-ordone tion, kion kun tia penado estis muldita, – kiucele ĝi tiam estis farita?

15 Kaj nun mi diru jene: Pri ĉiu homo Vi scias pleje; sed mi ĉagrenas pri Via popolo, 16 mi lamentas pri Via heredaĵo, mi estas trista pro Izrael, mi konfuziĝas pro la idaro de Jakob. 17 Tial mi preĝos antaŭ Vi por mi mem kaj por ili, ĉar mi vidas la misagojn de ni, kiuj loĝas surtere. 18 Mi ankaŭ aŭdis pri la rapideco de la juĝo, kiu venos. 19 Aŭskultu do mian voĉon, komprenu miajn dirojn, kaj mi parolos antaŭ Vi.

20 Jen la komenco de la vortoj de Ezra antaŭ ol li estis suprenlevita\*:

Sinjoro\*, kiu loĝas en la eterneco, kies okuloj estas en la alto, kies ĉambroj en la aero<sup>67</sup>; 21 kies trono estas nemezurebla, kies gloro nekomprenebla; antaŭ kiu la armeo da anĝeloj staras en timtremo, 22 kaj je kies ordono ili ŝanĝiĝas je vento kaj fajro; kies parolo estas vera kaj kies diroj fidindaj; 23 kies ordono estas fortika, kies reguligoj timindaj; kies rigardo sekigas abismojn kaj kies kolero degeligas montojn; kies vero estas atestata. 24 Aŭskultu, Sinjoro, la preĝon de via sklavo, akceptu en Viajn orelojn la peton de Via muldaĵo, atentu miajn vortojn. 25 Ĉar dum mi vivos, mi parolos, kaj dum mi havos komprenon, mi respondos. 26 Ne rigardu la pekojn de Via popolo, sed tiujn, kiuj servas Vin en vero. 27 Ne atentu la strebadon de kiuj agas

---

<sup>67</sup> Teksto ne klara.

malpie, sed de tiuj, kiuj konservis Viajn atestaĵojn<sup>68</sup> meze de afliktiĝoj. 28 Ne pensu pri kiuj vivis false antaŭ Vi, sed memoru tiujn, kiuj libervole agnoskis timon antaŭ Vi. 29 Ne deziru pereigi kiuj havis la morojn de brutaro, sed rigardu tiujn, kiuj brile instruis Vian leĝon. 30 Ne ekkoleru kontraŭ kiuj estas juĝitaj pli aĉaj ol bestoj, sed amu tiujn, kiuj ĉiam fidis je Via gloro. 31 Ĉar ni kaj niaj gepatroj vivis en mortiga stilo; sed pro ni pekuloj Vi ja nomiĝas kompatema. 32 Ĉar se Vi deziris kompati pri ni, Vi nomiĝos kompatema: ni ja ne havas agojn de justeco. 33 Ĉar la justuloj, kies multaj agoj ripozas ĉe Vi, ricevos sian rekompencan el la propraj agoj. 34 Sed kio estas la homo, ke Vi koleru kontraŭ li; aŭ kio estas la neniugebla gento, ke Vi tiom amariĝu pri ĝi? 35 Envere ja, neniu estas inter la naskitoj, kiu ne agis malpie; inter kiuj ekzistis<sup>69</sup> <estas> neniu, kiu ne pekis. 36 Ĉar en tio, Sinjoro, klariĝos Via justeco kaj Via boneco, kiam Vi estos pardonema al tiuj, kiuj ne havas stokon da bonaj agoj.

37 Responde Li diris al mi: Kelkajn aferojn bone vi diris, kaj okazos laŭ viaj diroj. 38 Ĉar vere Mi ne pensos pri la muldado de tiuj, kiuj pekis, pri ilia morto, juĝiĝo aŭ perdiĝo, 39 sed Mi ĝojos pri la kreo de justuloj, ankaŭ pri iliaj pilgrimadoj, ilia saviĝo kaj iliaj rekompencoj. 40 Kiel Mi parolis, tiel do estos.

41 Ĉar same kiel la terlaboristo semas multan semon sur la agron kaj plantas multajn plantojn, sed ne ĉio semita siatempe vivos<sup>70</sup>, kaj ne ĉio plantita kreskigos radikojn, tiel same ne ĉiuj saviĝos, kiuj estis semitaj en ĉi tiun mondon.

---

<sup>68</sup> Alia traduko: Viajn interligojn. Atestaĵo povas indiki ion similan je *Testamento* en Biblia senco.

<sup>69</sup> Laŭ la Siriaka kaj Etiopia versioj.

<sup>70</sup> Laŭ la Siriaka kaj Etiopia versioj; Latine oni legas: saviĝos.

## *Lasta apelacio je graco de Ezra*

42 Responde mi diris: Se gracon mi trovis, mi parolu: 43 Se la semo de la terlaboristo ne ekleviĝos – ĉar ne ĝustatempe ĝi ricevis Vian pluvon – aŭ se ĝi putriĝos pro tro da pluvado, 44 ĝi pereas; sed la homo, kiu estis muldita de Viaj manoj kaj formiĝis laŭ Via bildo, kaj pro kiu ĉion Vi kreis, – ĉu lin Vi faris simila je semo de terlaboristo? 45 Certe ne! Sed indulgu Vian popolon kaj ŝparu Vian heredaĵon, ĉar Vi ja kompatas pri Via kreaĵo.

46 Responde Li diris al mi: Kio estas nun, estas por nunuloj, kaj kio estas estonta, estas por la estontaj homoj. 47 Ĉar vi delonge ne povas ami mian kreaĵon pli ol mi. Sed ofte vi komparis vin mem al la maljustaj. Neniam plu <faru tion>. 48 Sed ankaŭ en ĉi tio vi estos mirinda antaŭ la Plejaltulo, 49 ke vi humiligis vin mem, kiel decas al vi, kaj vi ne kalkulis vin mem inter la justuloj. Vi pleje gloriĝos, 50 ĉar multaj mizeroj trafos tiujn, kiuj loĝas en ĉi mondo en la lastaj <tagoj>, ĉar ili iris en granda fiero. 51 Sed vi, pripensu pri vi mem kaj pri la gloro de viaj similuloj. 52 Ĉar por vi<sup>71</sup> la paradizo estas malfermita, plantita estas la arbo de la vivo<sup>72</sup>, preparita la tempo estonta, preta estas abundo; konstruita estas la urbo, certigita la ripozo, perfektigitaj la bono kaj saĝo. 53 La radiko <de la malbono> estas sigelita for de vi, malsanoj malaperis de vi, kaj kaŝiĝis la morto; la infero kaj la pereco fuĝis en forgeson. 54 Forpasis ĉagrenoj, kaj manifestiĝis la trezoro de senmorteco. 55 Do ne plu demandu pri la granda nombro de l' pereantoj. 56 Ĉar kiam ili havis la eblon elekti, ili malŝatis la Plejaltulon, kaj rifuzis Lian leĝon, kaj forlasis Liajn vojojn. 57 Krom tio ili eĉ piedpremis Liajn justulojn, 58 kaj diris en sia koro: Ne estas

---

<sup>71</sup> Plurale.

<sup>72</sup> Ap 2:7 ; 22:2.

Dio<sup>73</sup> – kvankam ili bone sciis, ke ili mortos. 59 Ĉar same kiel ĉio, kion mi antaŭdiris, atendas vin, tiel same atendas ilin soifo kaj sufero, kiel preparite. Ĉar ne la Plejaltulo volis pereigi iun homon, 60 sed la kreitoj mem malpurigis la nomon de Tiu, kiu kreis ilin, kaj ili estis sendankaj al Li, kiu nun preparis por ili la vivon. 61 Tial Mia juĝo nun alproksimiĝas, 62 kion Mi ne montris al ĉiuj – nur al vi, kaj al kelkaj kiel vi.

### *Pli pri la signoj pri la fino*

Responde mi diris: 63 Jen do, Sinjoro, Vi montris al mi amason da signoj, kiujn Vi faros en la lastaj <tagoj>, sed Vi ne indikis, kiam.

9:1 Responde Li diris al mi: Atente mezuru en via menso, kaj kiam vi vidos, ke kelkaj el la antaŭdiritaj signoj jam okazis, 2 tiam vi komprenos, ke ĉi tiu estas la tempo, kiam la Plejaltulo komencas viziti la mondon, kiun Li faris. 3 Kiam do aperos en la mondo tertremoj, perturbiĝo de popoloj, intrigoj de nacioj, ŝanceliĝado de estroj, konfuziĝo de princoj, 4 tiam vi scios, ke pri ĉi tio parolis la Plejaltulo en tagoj de antaŭ longe, ekde la komenco. 5 Ĉar same kiel pri ĉio, kio okazas en ĉi mondo, la komenco estas evidenta kaj la fino manifesta, 6 tiel same pri la tempoj de la Plejaltulo: la komencoj estas manifestaj en mirakloj kaj grandaj faroj, kaj la finiĝo en potencaj signoj.

7 Ĉiu, kiu saviĝos kaj kiu povos eskapi pro siaj agoj, aŭ pro la fido en kiu li kredis, 8 transvivos la antaŭ-diritajn danĝerojn, kaj vidos Mian savon en Mia lando kaj inter Miaj limoj, kiujn Mi sanktigis por Mi mem de eterne. 9 Tiam miros tiuj, kiuj nun misuzis Miajn vojojn, kaj kiuj malŝate rifuzis ilin, tiuj vivos en turmentoj. 10 Ĉar kiuj ne agnoskis Min dumvive, kvankam ili ricevis Miajn bonfarojn, 11 kaj kiuj abomenis Mian leĝon,

---

<sup>73</sup> Psa 14:1 ; 53:2.

dum ili ankoraŭ havis liberecon, 12 kaj kiuj ne komprenis sed malŝatis ĝin, dum restis ankoraŭ la eblo je bedaŭro, – ĉiuj tiuj postmorte devos rekoni ĝin en sufero. 13 Sed vi do ne plu estu scivola kiel turmentigo<sup>74</sup> la malpiaj, sed informiĝu, kiel saviĝos la justuloj, tiuj, al kiuj apartenas la tempo kaj pro kiuj la tempo estis farita.

### *Resumo de la temo*

14 Responde mi diris. 15 Antaŭe mi diris, kaj refoje mi diras, kaj poste mi diros denove: Pereos pli, ol saviĝos, 16 same kiel ondoj estas pli grandaj ol guto.

Responde Li diris al mi: 17 Kia estas la agro, tia estas la semo; kiaj la floroj, tiaj ankaŭ la koloroj; kaj kia la laboro, tia la produkto; kia la terlaboristo, tia la tereno. Ĉar estis tempo en ĉi mondo, 18 kiam Mi preparadis ĝin por tiuj, kiuj nun estas, antaŭ ol por ili la mondo estis farita por loĝi en ĝi, kaj neniu kontraŭis al Mi 19 tiam, ĉar neniu ekzistis; sed nun tiuj, kiuj estis kreitaj en ĉi mondo, kiu estas provizita per tablo senmanka kaj per razeno neelĉerpebla<sup>75</sup>, <nun ili> estas vivstile koruptitaj. 20 Tial Mi rigardis Mian mondon, kaj jen ĝi estas perdita. Mi vidis, ke Mia terglobo estas en danĝero pro la fiaj pensoj de la homoj. 21 Kaj Mi vidis kaj indulgis kelkajn kun granda peno, kaj Mi savis unu beron el tuta grapolo, unu planton el tuta arbaro. 22 Do pereu la plimulto, kiu naskiĝis vane, kaj saviĝu Mia bero, Mia planto, ĉar kun multe da penado tiujn Mi perfektigis.

---

<sup>74</sup> Laŭlitere la Latina uzas la vorton: krucumiĝos.

<sup>75</sup> Teksto ne tute klara. Kelkaj tradukas: per senhalta rikolto kaj per leĝo nekomprenebla; aliaj: per manĝaĵo nelimigita kaj per leĝo mistera.

## *Fino de la tria dialogoj*

23 Sed se vi ankoraŭ lasas pasi sep tagojn – tamen, vi ne fastu en ili, 24 sed vi iru en florkampon, kie neniu domo estis konstruita, kaj manĝu nur el la floroj de la kampo, ne manĝu viandon, nek trinku vinon, sed nur florojn, 25 kaj preĝadu senintermite la Plejaltulon: tiam Mi venos kaj parolos al vi.

## **Vizioj pri la lastaj tagoj: 9:26 – 13:58**

### *La vizio pri la virino tristega 9:26-10:59*

#### *Demandoj de Ezra*

26 Do mi foriris, kiel Li diris al mi, al kampo nomata Ardat, kaj tie mi sidis inter floroj kaj manĝis el la herboj de la agro, kaj tiu manĝaĵo fariĝis mia nutraĵo ĝissate. 27 Kaj post sep tagoj, dum mi kuŝis sur la herbo, mia koro denove perturbiĝis kiel antaŭe.

28 Malfermiĝis mia buŝo kaj mi ekparolis antaŭ la Plejaltulo, kaj diris: 29 Ho Sinjoro, Vi montris Vin mem al ni, al niaj gepatroj en la dezerto, kiam ili eliris el Egiptujo kaj kiam ili venis en dezerton neniam tretitan kaj senfruktan; kaj tiam Vi diris: 30 Vi, Izrael, aŭskultu Min; semo de Jakob, atentu pri Miaj paroloj. 31 Ĉar Mian leĝon Mi semas en vin, kaj ĝi donos frukton en vi, kaj vi gloriĝos pro tio por eterne. 32 Kvankam niaj gepatroj ricevis la leĝon, ili ne tenis ĝin kaj la ordonojn ili ne observis. Sed la frukto de la leĝo ne pereis, ĉar ĝi ne povis – ĝi estis ja Via. 33 Kiu ĝin akceptis, pereis, ĉar ili ne retenis, kio estis semita en ili. 34 Jen la ĝenerala regulo: Kiam la tero ricevis semon, aŭ la maro ŝipon, aŭ iu vazo manĝaĵojn aŭ trinkaĵon, kaj kiam okazas, ke neniĝas 35 kio estis semita aŭ sendita aŭ metita en ĝin, tiam ja tio neniĝas, sed kio enhavis ĝin, tio plu ekzistas. Sed ĉe ni ne tiel estis. 36 Ĉar ni, kiuj ricevis la leĝon kaj

kiuj pekis, pereos, same kiel nia koro, kiu akceptis ĝin, 37 sed la leĝo ne pereas, sed plu estos en sia gloro.

### *La vizio*

38 Kiam ĉi tion mi diris en mia koro, mi ĉirkaŭrigardis, kaj je mia dekstra flanko mi ekvidis sinjorinon. Jen ŝi lamentis kaj ploris laŭtavoĉe, kaj anime ŝi ege ĉagreniĝis; ŝiaj vestaĵoj estis ŝiritaj, kaj cindron ŝi havis sur la kapo. 39 La pensojn, en kiuj mi enprofundiĝis, mi forsendis, mi min turnis al ŝi kaj diris: 40 Kial vi ploras? Pri kio vi afliktiĝas?

Kaj ŝi diris al mi: 41 Lasu min, mia sinjoro, ke mi ploru pri mi mem, ke mi plu lamentu, ĉar anime mi estas vere amara, kaj ege humiligita.

42 Kaj mi diris al ŝi: Kio okazis al vi? Rakontu do.

Kaj ŝi diris al mi: 43 Via servistino estis malfekunda, kaj tridek jarojn kun mia edzo mi ne naskis infanon. 44 Ĉiun horon kaj ĉiun tagon dum tiuj tridek jaroj mi preĝadis la Plejaltulon, nokte kaj tage. 45 Kaj post tridek jaroj aŭkultis min la Dio de via servistino; Li rigardis mian humilecon, atentis pri mia sufero, kaj donis al mi filon. Kaj mi grande ekĝojis pri li, same kiel mia edzo kaj ĉiuj miaj samurbanoj, kaj ni ege honoradis la Fortulon. 46 Mi nutris lin sub granda penado. 47 Kiam li kreskis, kaj mi akceptis por li edzinon, mi fiksas daton por la nuptofesto. **10:1** Sed kiam mia filo eniris la nuptoĉambron, li falis kaj mortis. 2 Ni do estingis ĉiujn lampojn, kaj ĉiuj samurbanoj leviĝis por konsoli min; mi restis kvieta ĝis la vespero de la sekva tago. 3 Kaj kiam ĉiuj ĉesis konsoli min, por ke mi ekripozu, nokte mi leviĝis kaj fuĝis, kaj kiel vi vidas, mi venis al ĉi tiu kampo. 4 Mi intencas ne plu reiri al mia urbo, sed resti ĉi tie; mi ne manĝos nek trinkos, sed senintermite mi lamentos kaj fastados, ĝis mi mortos.

5 Tiam mi interrompis la pensadojn, en kiuj mi troviĝis, kaj mi respondis al ŝi kun kolero: 6 Vi plej stulta el ĉiuj virinoj,



ĉu vi ne vidas mian ĉagrenon, nek kio trafis nin? 7 Ĉar la patrino de ni ĉiuj, Cion, estas en profunda tristeco, ege humiligita. Nun vi lamentu plej forte, 8 ĉar ni ĉiuj lamentas, kaj estu trista, ĉar ni ĉiuj estas tristegaj. Sed vi ja estas trista pro unu filo. 9 Demandu do la teron, kaj ĝi rakontos al vi, ke ĝi ja devas lamenti pro la sennombraj, kiuj naskiĝas sur ĝi. 10 El ĝi dekomence devenas ĉiuj, kiuj naskiĝis, kaj plu venos aliaj, kaj jen preskaŭ ĉiuj iras al pereco, kaj la plimulto el ili ekstermiĝos. 11 Kiu do lamentu pli: <la tero>, kiu perdis tiom multajn, aŭ vi, kiu ĉagreniĝas pro unuopulo? Sed se vi diros al mi: 12 Mia ĉagreno ne similas je tiu de la tero, ĉar la frukton de mia utero mi perdis, kiun mi naskis en veoj kaj doloro, 13 dum al la tero okazas nur laŭ la naturo de la tero – la amaso, kiu nun estas sur ĝi, iras, kiel ĝi venis –, tiam mi diras al vi: 14 Same kiel vi naskis kun doloro, tiel same la tero dekomence donis sian frukton, la homon, al Tiu, kiu ĝin kreis. 15 Nun do retenu vian ĉagrenon al vi mem, kaj kuraĝe portu la sorton, kiun vi ricevis. 16 Ĉar se la dekretoj de Dio vi rekonas justaj, vi ricevos vian filon siatempe, kaj vi estos laŭdata inter la virinoj. 17 Eniru do en la urbon al via edzo.

Kaj ŝi diris al mi: 18 Tion mi ne faros, mi ne eniros en la urbon, sed ĉi tie mi mortos.

19 Kaj denove mi parolis al ŝi: 20 Ne diru tion, sed lasu vin persvadi – kiom da missorto havis Cion! –; lasu vin konsoli pro la ĉagreno de Jerusalemo. 21 Vi ja vidas, ke nia sanktejo estas dezertigita, nia altaro neniigita, nia templo malkonstruita; 22 nia psalmokantado estas humiligita, nia himno silentigita, ĉesis nia ĝojkantado; estingiĝis la lumo de nia kandelingo, prirabita estas la arkeo de nia atesto<sup>76</sup>, niaj sanktaj objektoj estas prirabitaj, kaj la nomo, kiu estis alvokita super ni, estas preskaŭ profanita; niaj infanoj suferis perforton, niaj pastroj estas bruligitaj, niaj Levidoj foriris en kaptitecon, niaj virgulinoj estas senhonorigitaj,

---

<sup>76</sup> Aŭ: de nia interligo.

niaj edzinoj seksperfortitaj; niaj justuloj estas forkaptitaj, niaj etaj infanoj elĵetitaj, niaj junuloj sklavigitaj, kaj niaj fortikuloj senfortigitaj. 23 Kaj, plej grave, la sigelo de Cion<sup>77</sup> perdis sian gloron, kaj transiris en la manojn de tiuj, kiuj malamas nin. 24 Deskuu do vian grandan tristecon, flanken ŝovu do vian multan ĉagrenon, por ke la Fortikulo kompatu vin, ke la Plejaltulo donu al vi ripozon, kvietiĝon el via penado.

25 Dum mi parolis al ŝi, subite jen ŝia vizaĝo ekfulmis, ŝia vizaĝo fariĝis flagra, tiel ke mi ektimis ŝin multe, kaj mi pensis: Kio estas? 26 Kaj subite ŝi eligis voĉon timoplenan, tiel ke tremiĝis la tero pro la sono. Mi rigardis, 27 sed jen: la virino ne plu estis videbla por mi, sed urbo estis konstruata\*, kaj aperis loko kun grandegaj fundamentoj. Mi ektimis kaj kriis laŭte: 28 Kie estas la anĝelo Uriel, kiu unue venis al mi? Ĉar li igis min veni en ĉi tiun konfuziĝon; mia espero neniigis kaj mia preĝo fariĝis riproĉo.

### *La interpreto de l' vizio*

29 Dum tion ĉi mi diris, jen la anĝelo, kiu unue venis al mi, alvenis; li vidis min 30 kuŝi kvazaŭ mortinto<sup>78</sup>, senigita de mia konscio. Li prenis mian dekstran manon, rekuraĝigis min, igis min stari sur la piedoj, kaj diris al mi: 31 Kio okazis al vi? Kial konfuziĝis via kompreno kaj la pensoj de via animo?

Mi diris: 32 Vi ja forlasis min. Mi faris laŭ viaj diroj, iris en la kamparon, kaj jen mi rigardis. Kaj mi vidas, kion mi ne povas klarigi\*.

Kaj li diris al mi: 33 Stariĝu kiel viro, mi instruos vin.

Mi diris: 34 Parolu, mia sinjoro, sed ne forlasu min, por ke mi ne mortu senkiale. 35 Ĉar mi vidis, kion mi ne sciis, kaj mi aŭdas, kion mi ne komprenas. 36 Aŭ ĉu trompiĝas mia menso

---

<sup>77</sup> Aliaj tradukas: Cion, iam sigelita de l' sigelo de Dio mem.

<sup>78</sup> Dan 8:18 ; 10:9 ; Ap 1:17.

– ĉu sonĝas mia animo? 37 Mi nun petas vin, ke vi montru al via sklavo, kion signifas ĉi tiu konfuza vizio.

Responde li diris al mi: 38 Auskultu min, kaj mi instruos vin, kaj mi rakontos al vi pri tio, kion vi timas, ĉar la Plejaltulo malkaŝis al vi multajn misterojn. 39 Li vidis, ke via vojo estas ĝusta, ke senintermite vi ĉagreniĝas pro via popolo kaj ke vi multe lamentis pro Cion.

40 Tio estas la signifo de la vizio: La virino, kiu antaŭ nelonge aperis al vi, 41 kiun vi vidis lamenti kaj kiun vi komencis konsoli, 42 – nun vi ne plu vidas tiun aspekton de virino, sed nun vi vidas urbon konstruata. 43 Ŝi rakontis al vi pri la sorto de sia filo: tio estas la solvo: 44 La virino, kiun vi vidis, estas Cion\*, kiun nun vi vidas kiel urbon konstruatan. 45 Ŝi diris al vi, ke malfekunda ŝi estis dum tridek jaroj, ĉar en la mondo pasis tri mil jaroj antaŭ ol en ĝi<sup>79</sup> estis plenumita oferado. 46 Kaj post tri <mil> jaroj Salomono konstruis la urbon, kaj plenumis la oferojn. Tiam la malfekunda naskis sian filon\*. 47 Ŝi diris al vi: Mi nutris lin kun multa penado, tio estis la tempo de loĝado en Jerusalema. 48 Ŝi diris al vi: Mia filo venis en sian nuptoĉambron, kaj mortis, – kaj ke missorto ŝin trafis: tio estas la ruiniĝo de Jerusalema. 49 Jen vi do vidis similaĵon pri ĝi, kiel ŝi priploras la filon, kaj vi komencis konsoli ŝin pro tio, kio ŝin trafis. Tio estis, kion vi devis vidi.

50 Kaj la Plejaltulo, kiu vidis, ke vi sincere ĉagreniĝis, kaj ke tutkore vi kompatas pri ŝi, montris al vi la brilon de Sia gloro kaj la belecon de Sia majesto. 51 Tial mi do ordonis al vi, ke vi restu en la kamparo, kie neniu domo estis konstruita. 52 Ĉar mi sciis, ke la Plejaltulo komencos montri al vi ĉi tion. 53 Tial mi diris, ke vi venu al la agro, kie estis neniu fundamento de konstruaĵo. 54 Ĉar neniu homa laboraĵo povus elteni en la loko, kie la urbo de l' Plejaltulo komencos aperi.

---

<sup>79</sup> En la mondo.

## *Fino de la vizio*

55 Sed vi ne timu, ankaŭ via koro ne timiĝu; sed vi eniru kaj rigardu la brilon kaj la grandecon de la konstruaĵo, kiom vi kapablas perokule rigardi. 56 Poste vi aŭdos, kiom kapablas aŭdi viaj oreloj. 57 Ĉar vi estas pli benita ol multaj aliaj, kaj vi estas vokita esti ĉe la Plejaltulo, kiel nur malmultaj. 58 Ĝis morgaŭ vespere vi restu ĉi tie, 59 kaj la Plejaltulo montros en via sonĝo en vizioj, kion la Plejaltulo faros kun tiuj, kiuj loĝas sur la tero en la lastaj tagoj.

## *La vizio pri la aglo kaj la leono: 10:60 – 12:40a*

### *La aglo*

60 Kaj mi dormis tiun nokton kaj la sekvan, kiel li diris al mi. 11:1\* En la dua nokto mi vidis sonĝon: jen el la maro leviĝas aglo, kiu havas dek du flugilojn el plumoj kaj tri kapojn. 2 Mi rigardis: jen ĝi etendis siajn flugilojn super la tuta tero; ĉiuj ventoj de la mondo blovis kontraŭ ĝi, kaj ĉiuj nuboj ĉirkaŭ ĝi kolektiĝis. 3 Mi rigardis: jen el ĝiaj flugiloj elkreskis kontraŭaj flugiloj; sed tiuj fariĝis etaj, modestaj flugiloj. 4 Ĝiaj kapoj estis kvietaj, kaj la meza kapo estis pli granda ol la ceteraj kapoj, sed ankaŭ ĝi estis kvieta. 5 Mi rigardis: jen la aglo flugis per siaj flugiloj; ĝi regis super la tero kaj ĝiaj loĝantoj. 6 Mi vidis, kiel ĉio subĉiela estis submetita al ĝi; neniu kontraŭstaris al ĝi, eĉ ne unu kreaĵo surtere. 7 Mi rigardis: jen la aglo stariĝis sur siaj ungoj; ĝi bruis per la flugiloj kaj diris: 8 Ne ĉiuj vigildu samtempe, ĉiu dormu en sia propra loko kaj vigilu siavice; 9 sed la kapoj konserviĝu por la fino.

10 Mi rigardis: jen ĝia voĉo eliris ne el ĝiaj kapoj, sed el la mezo de ĝia korpo. 11 Mi nombris la kontraŭajn flugilojn; tio estis ok.

12 Mi rigardis: jen el ĝia dekstra flanko leviĝis unuflugilo; ĝi regis super la tuta tero. 13 Kiam ĝi regis, ĝi finiĝis, malaperis kaj ĝia loko ne plu estis videbla. Leviĝis la sekva <flugilo>, kaj ankaŭ ĝi regis kaj tenis sin iom da tempo. 14 Kiam ĝi regis, ĝi finiĝis, malaperis kaj ĝi ne plu estis videbla, same kiel la antaŭa. 15 Jen voĉo eksonis al ĝi: 16 Aŭskultu min, vi kiu tutan ĉi tempon regardis la mondon; ĉi tion mi anoncas antaŭ ol vi komencas malaperi. 17 Post vi neniu regos same longe <kiel vi>, eĉ ne duonon de tio.

18 Leviĝis tria <flugilo>, kaj ĝi tenis la imperion<sup>80</sup> same kiel la antaŭaj, kaj malaperis ankaŭ ĝi. 19 Kaj tiel okazis al ĉiujflugiloj unuope: ili tenis la imperion kaj denove malaperis. 20 Mi rigardis: jen poste sekvis ankaŭ la ceterajflugiloj; ankaŭ tiuj de la maldekstra<sup>81</sup> flanko leviĝis por teni la imperion. Kelkaj el ili regis, kaj tuj malaperis; 21 aliaj leviĝis, sed ne retenis la potencon<sup>82</sup>.

22 Poste mi rigardis: jen la dek duflugiloj kaj la du malgrandajflugiloj estis malaperintaj, 23 kaj nenio restis sur la korpo de la aglo krom la tri senmovaj kapoj kaj ses malgrandajflugiloj.

24 Mi rigardis: jen du el la malgrandajflugiloj disigis sin el la sesopo, kaj restis sub la kapo je la dekstra flanko; la kvar ceteraj restis je sia loko. 25 Mi rigardis: jen ĉi tiuj malgrandajflugiloj intencis leviĝi kaj ekkapti la imperion. 26 Mi rigardis: jen unu leviĝis, kaj tuj ĝi jam malaperis. 27 Kaj ankaŭ la dua, sed ĉi tiu malaperis eĉ pli rapide ol la antaŭa. 28 Mi rigardis: jen du, kiuj restis, intencis mem ekregi; 29 kaj dum ili intencis tiel, jen unu el la kapoj, la meza, vekigis el sia senmoveco. Estis ĝi pli granda ol la dua aliaj. 30 Mi vidis, kiel ĝi aligis la du kapojn al si,

---

<sup>80</sup> En la senco de *potenco de imperiestro*.

<sup>81</sup> La Latina diras: dekstra. Sed klare oni intencas la alian flankon.

<sup>82</sup> Aliaj tradukas: neniām atingis potencon.

31 kaj jen la kapo turnis sin kune kun tiuj, kiuj estis kun ĝi, kaj ĝi formangis la du malgrandajn flugilojn, kiuj intencis ekregi. 32 Sed ĉi tiu kapo ekregis super la tuta tero, kaj dominis kun multa subpremado ĉiujn ĝiajn loĝantojn; pli grandan potencon ĝi havis en la tuta mondo ol ĉiuj antaŭaj flugiloj.

33 Poste mi rigardis: jen la meza kapo subite malaperis, same kiel faris la flugiloj. 34 Sed restis la du kapoj, kiuj sammaniere regis super la tero kaj ĝiaj loĝantoj. 35 Mi rigardis: jen la dekstra kapo formangis la maldekstran.

### *La leono*

36 Tiam mi aŭdis voĉon diri al mi: Rigardu antaŭ vi, kaj prikonsideru, kion vi vidas. 37 Mi rigardis: jen ekscitiĝis el arbaro ia leono<sup>83</sup>, blekegante. Kaj mi aŭdis, kiel ĝi eligis homan voĉon, kaj diris al la aglo: 38 Vi aŭskultu, kaj mi parolos al vi: La Plejaltulo diras al vi: 39 Ĉu ne vi restas el la kvar bestoj, kiujn Mi igis regi en Mia mondo, tiel ke venu la fino de l' tempo pere de ili? 40 Kaj <vi>, la kvara kiu venis, venkis ĉiujn bestojn, kiuj pasis, kaj vi tenis potencon super tuta la mondo kun granda timigo kaj ega subpremado, kaj ruze vi vivis tiel longe sur la tero. 41 Vi ne juĝis la teron laŭ vereco. 42 Vi ja subpremis la mildajn, lezis la kvietajn, malamis tiujn, kiuj diris la veron, kaj amis la mensogulojn; vi malkonstruis la loĝejojn de tiuj, kiuj estis fekundaj, ruinigis la murojn de tiuj, kiuj ne malutilis al vi. 43 Via hontigo levigis antaŭ la Plejaltulo, kaj via fiero antaŭ la Fortulo. 44 La Plejaltulo rigardis Siajn tempojn: jen ili finiĝis, Liaj jarcentoj pleniĝis. 45 Tial, vi ho aglo, vi certe malaperos, vi kaj viaj timigaj flugiloj, viaj malbonegaj etaj flugiloj, viaj malicaj kapoj, viaj aĉaj ungoj, kaj tuta via senvalora korpo, 46 tiel ke la

---

<sup>83</sup> Aŭ: io kvazaŭ leono.

tuta tero, liberigite de via perforto, refreŝiĝu kaj releviĝu, kaj esperu la juĝon kaj indulgencon de Tiu, kiu ĝin kreis.

12:1 Dum tion ĉi diris la leono al la aglo, mi rigardis: 2 jen la restanta kapo estis malaperinta. La du flugiloj, kiuj pasis al ĝi, leviĝis kaj regis; kaj ilia regado estis mallonga kaj plena je ĥaoso. 3 Mi rigardis: jen ili jam estis malaperantaj, kaj la tuta korpo de la aglo ekbrulis, kaj la tero forte timiĝis.

### *La interpreto de la vizio*

Mi vekiĝis en granda mensa konfuzo kaj timo, kaj mi diris al mia animo: 4 Jen ĉi tion vi kaŭzis al mi, ĉar vi esploras la vojojn de la Plejaltulo. 5 Jen ankoraŭ mi estas laca kaj elĉerpita, mense kaj spirite, kaj eĉ ne malmulte da forto restas en mi, pro la granda timo, kiu min timigis ĉi-nokte. 6 Tial mi nun preĝos la Plejaltulon, ke Li fortigu min ĝisfine.

7 Mi diris: Ho Mastro, ho Sinjoro, se gracon mi trovis antaŭ Viaj okuloj, se mi estis justigita ĉe Vi pli ol multaj aliaj, se mia preĝado certe ascendis ĝis antaŭ Via vizaĝo, 8 tiam fortigu min, kaj montru al mi, Via servisto, interpreton kaj signifon de tiu ĉi timiga vizio, por ke mian animon Vi plene konsolu. 9 Vi ja opiniis min inda por montri al mi la finon de la tempoj kaj la lastajn okazojn de la tempo.

Li diris al mi: 10 Tio ĉi estas la interpreto de l' vizio, kiun vi vidis: 11 La aglo, kiun vi vidis leviĝi el la maro, estas la kvara regno, kiu en vizio aperis al via frato Daniel, 12 sed al li ne estis interpretite, kiel nun mi interpretas aŭ interpretis al vi. 13 Venos tagoj, kiam leviĝos regno sur la tero, kiu estos pli timiga ol ĉiuj regnoj, kiuj ekzistis antaŭ ĝi. 14 Regos en ĝi dek du reĝoj, unu post la alia. 15 Sed la dua, kiu regos, pli longe tenos la potencon ol la ceteraj el la dek du. 16 Tio estas la interpreto de la dek du flugiloj, kiujn vi vidis.

17 Ke vi aŭdis voĉon paroli, kiu eliris ne el ĝiaj kapoj, sed el la mezo de ĝia korpo, 18 jen la interpreto: Je la tempo

de ĝia regado estiĝos ne malgrandaj interbataloj, kaj ĝi riskos fali; sed ĝi ne tiam falos, sed denove reakiros sian originan <povon><sup>84</sup>. 19 Ke vi vidis ok malgrandajnflugilojn, kiuj ligiĝis al ĝiajflugiloj, 20 jen la interpreto: Ok reĝojleviĝos en ĝi, kies tempo estos mallonga kaj kies jaroj rapidaj; du el ili pereos 21 kiam alproksimiĝos la mezo de ĝia tempo, kvar estos gardataj por la tempo, kiam alproksimiĝos la fino de ĝia tempo; sed du konserviĝos ĝis la fino.

22 Ke vi vidis tri kapojn en ripozo, 23 jen la interpreto: En ĝiaj lastaj tagoj la Plejaltulo starigos tri reĝojn<sup>85</sup>, kaj <tiuj> renovigos multe en ĝi, kaj ili regos super la tero 24 kaj ĝiaj loĝantoj, kun pli da subpremo ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ ili. Tial ili nomiĝas kapoj de aglo. 25 Ili ja resumos ĝian malpiecon kaj plenumos ĝiajn lastajn agojn. 26 Ke vi vidis malaperi la plej grandan kapon: unu el ili mortos en sia lito, sed tamen sub turmentiĝoj. 27 La du, kiuj restos, estos manĝitaj de la glavo. 28 La glavo de unu manĝos lian kunulon, sed tamen ankaŭ tiu en la lastaj tagoj falos per la glavo.

29 Ke vi vidis du malgrandajnflugilojn, kiuj pasis al la kapo ĉe la dekstra flanko, 30 jen la interpreto: Tiuj estas, kiujn la Plejaltulo konservis por la fino <de la aglo>; estis regado mallonga kaj plena je ĥaoso, 31 kiel vi vidis.

La leono, kiun vi vidis aperi el la arbaro, kiu blekegis kaj parolis al la aglo, kaj kiu per multaj paroloj kulpigis ĝin pri ĝiaj maljustaĵoj, kiel vi aŭdis, 32 tio estas la Mesio<sup>86</sup>, kiun la Plejaltulo gardis ĝis la fino <de la tagoj>, kaj kiu leviĝos el la idaro de David, kaj kiu venos<sup>87</sup> por ili kaj ilia maljustaĵoj. Li kulpigos

---

<sup>84</sup> Aldonita laŭ pluraj malnovaj tradukoj.

<sup>85</sup> Aŭ: regojn.

<sup>86</sup> Laŭlitere: la sanktoleito.

<sup>87</sup> Aldonita laŭ Siriaka versio.



ilin pri iliaj maljustaĵoj kaj denuncos ilian malŝatan agadon. 33 Ĉar unue li metos ilin vivaj antaŭ la juĝon, kaj kiam li kulpigos ilin, li neniigos ilin. 34 Sed la reston de mia popolo li liberigos en kompatemo, tiujn, kiuj saviĝis trans miaj limoj, kaj li ĝojigos ilin ĝis venos la fino, la tago de l' juĝo, pri kiu mi parolis al vi de la komenco. 35 Ĉi tio estas la songo, kiun vi vidis, kaj ĉi tio estas ĝia interpreto.

36 Nur vi estis inda koni ĉi tiun sekreton de l' Plejaltulo. 37\* Skribu do en libro ĉion ĉi, kion vi vidis, kaj metu ĝin en kaŝitan lokon. 38 Vi instruos ĝin al saĝuloj el via popolo, pri kies koroj vi scias, ke ili povas kompreni kaj gardi ĉi tiujn sekretojn. 39 Sed vi mem, atendu ĉi tie ankoraŭ sep tagojn, kaj mi montros al vi, kion la Plejaltulo ankoraŭ decidis montri al vi. 40 Tiam li foriris de mi.

### *Ezra kuraĝigas la popolon: 12:40b-51*

Kiam la tuta popolo aŭdis, ke pasis la sep tagoj, kaj ke mi ankoraŭ ne revenis en la urbon, ili kolektiĝis ekde la plej malgranda ĝis la plej granda; ili venis al mi, kaj diris: 41 Kiel ni pekis kontraŭ vi, kiun malbonon ni faris al vi, ke vi forlasis nin kaj sidas ĉi tie? 42 Ĉar el ĉiuj profetoj nur vi restas al ni, kiel grapolo el vitejo, kiel lampo en malluma ejo, aŭ kiel haveno por ŝipo savita el ŝtormego. 43 Aŭ ĉu ne sufiĉas por ni la katastrofoj, kiuj nin trafis? 44 Se vi do forlasas nin, kiom pli bone estus al ni, se ankaŭ ni estus forbruligitaj en la brulego de Cion. 45 Ni ja ne estas pli bonaj ol tiuj, kiuj tie mortis. Kaj ili ploris laŭtege.

Kaj responde mi diris al ili: 46 Kuraĝon, ho Izrael, kaj ne malĝoju, vi, domo de Jakob, 47 ĉar la memoro pri vi estas ĉe la Plejaltulo, kaj la Fortulo ne forgesis vin en via baraktado. 48 Mi nek forlasis vin, nek foriris de vi; sed mi venis ĉi tien por preĝi por Cion en ĝia ĉagreno, kaj por peti indulgon pro la humiligo

de via<sup>88</sup> sanktejo. 49 Kaj nun ĉiu el vi iru hejmen, kaj post ĉi tiuj tagoj mi venos al vi. 50 Kaj la popolo, kiel li diris al ĝi, foriris al la urbo. 51 Sed mi sidis en tiu kampo sep tagojn, kiel li ordonis al mi, kaj mi manĝis nur el la floroj de la agro, kaj la herbo fariĝis mia manĝaĵo en tiuj tagoj.

### *La vizio pri iu kiel viro: 13:1-58*

**13:1** Post sep tagoj, nokte, mi sonĝis sonĝon. 2 Jen vento leviĝis el la maro, kaj perturbis ĉiujn ĝiajn ondojn. 3 Mi rigardis: jen <iaspecan viron\* la vento igis leviĝi el la profundo de la maro<sup>89</sup>.> Kaj mi vidis tiun viron flugi kun la nuboj de l' ĉielo<sup>90</sup>; kaj kiam li turnis la vizaĝon por rigardi, ĉio tremis sub lia rigardo, 4 kaj kiam eliris voĉo el lia buŝo, ekardiĝis ĉiuj, kiel fandiĝas vakso, kiam fajron ĝi sentas.

5 Post tio mi rigardis: jen kolektiĝis de la kvar direktoj de l' ĉielo amaso da homoj, kiujn ne eblis nombri, por militiri kontraŭ la viro, kiu leviĝis el la maro. 6 Mi rigardis: jen li skulptis por si mem grandan monton, kaj li flugis sur ĝin. 7 Kaj mi klopodis por vidi la regionon aŭ la lokon, de kie estis skulptita tiu monto, sed ne povis.

8 Post tio mi rigardis: jen ĉiuj, kiuj kolektiĝis kontraŭ li por batali lin, estis plenaj je timo, sed tamen ili kuraĝis batali. 9 Kaj kiam li vidis la amason alkuri al li, li nek levis la manon nek tenis lancon aŭ ian militan armilon; mi nur vidis, 10<sup>91</sup> ke el sia buŝo li elĵetis iaspecan fajran fluon, kaj el siaj lipoj flaman spiradon, kaj de sia lango li forsputis tempeston da fajreroj. Kaj ĉio ĉi miksiĝis, ĉi fajra fluo, la flama spirado kaj tempesta

---

<sup>88</sup> Aliaj: nia.

<sup>89</sup> Aldonita laŭ Siriaka versio.

<sup>90</sup> Jsa 19:1 ; Dan 7:13 ; Ap 1:7.

<sup>91</sup> Jsa 11:4b.

amaso, 11 kaj ĝi falis sur la atakantan amason, kiu estis preta batali, kaj forbruligis ĉiujn, tiel ke subite nenio plu videblis el la sennombra amaso, krom iom da polvo, cindro aŭ fum-odoro. Mi vidis ĝin kaj estis konsternita.

12 Poste mi vidis la saman viron descendi de la monto, kaj li alvokis al si alian amason paceman. 13 Kaj multege da homoj turnis sin al li, el kiuj kelkaj estis ĝojaj, aliaj tristaj; kelkaj estis ligitaj, kaj aliaj alportis kelkajn por oferbuĉi tiujn.

### *Ezra pripensas la signifon de la vizio*

Mi vekigis en granda timego, kaj preĝis la Plejaltulon: 14 Ekde la komenco Vi montris al Via sklavo ĉi tiujn miraklojn, kaj Vi opiniis min inda, ke mia preĝo estu aŭdita de Vi. 15 Nun montru ankaŭ la interpreton de ĉi tiu sonĝo. 16 Ĉar se mi rigardas ĝin mense, ve al tiuj, kiuj estos forlasitaj en tiuj tagoj, kaj multe pli ve al tiuj, kiuj ne estis forlasitaj. 17 Ĉar kiuj ne estas forlasitaj, estos tristaj, 18 ĉar ili komprenas, kio estis lasita por la lastaj tagoj, sed ne atingos ilin. Sed ve ankaŭ por tiuj, kiuj estis lasitaj, 19 ĉar ili ja vidis grandajn danĝerojn kaj multan mizeron, kiel montris ĉi tiuj sonĝoj. 20 Tamen estas pli bone trafi en ĉi tiun danĝeron ol foriri el la mondo kvazaŭ nubo, ne vidante kio okazos en la lastaj tagoj.

Responde Li diris al mi: 21 Mi rakontos al vi la interpreton de ĉi tiu vizio, kaj ankaŭ kion vi preparolis, Mi klarigos. 22 Ke vi parolis pri homoj, kiuj elsaviĝis, kaj pri homoj, kiuj ne elsaviĝis, – tio estas la interpreto: 23 La sama, kiu alportos la danĝeron\*, samtempe protektos tiujn, kiuj trafis en danĝeron, kiuj havis agojn kaj fidon je la Plejfortulo. 24 Do sciu, ke pli benataj estas la homoj, kiuj elsaviĝis, ol tiuj, kiuj mortis.

## *La interpreto de l' vizio*

25 Ĉar la interpreto de la vizio estas jena: Ke viron vi vidis leviĝi el la profundo de la maro: 26 estas li, kiun la Plejaltulo konservis dum longa tempo\*, kaj kiu mem savos sian kreaĵon; kaj li decidis pri tiuj, kiuj elsaviĝis. 27 Ke el lia buŝo vi vidis eliri iaspecan spiradon, fajron kaj tempeston, 28 kaj ke li ne tenis lancon aŭ ian militan armilon, sed tamen rompis la atakon de tiu amaso, kiu venis por venki lin, – tio estas la interpreto: 29 Jen tagoj venos, kiam la Plejaltulo komencos liberigi la homojn, kiuj estas sur la tero. 30 Kaj mensa konfuzo venos super tiujn, kiuj loĝas sur la tero. 31 Kaj ili planos militi unu kontraŭ la alia, urbo kontraŭ urbo, loko kontraŭ loko, popolo kontraŭ popolo kaj regno kontraŭ regno.

32 Kiam ĉi tio estiĝos kaj la signoj okazos, kiujn Mi montris al vi, tiam malkaŝiĝos Mia filo<sup>92</sup>, kiun vi vidis leviĝi kiel viron <el la maro>.

33 Kaj tiam, dum la nacioj aŭdos lian voĉon, ĉiu <nacio> forlasos sian propran regionon kaj la militadon, kiun ili faras reciproke, 34 kaj kolektiĝos sennombra amaso, kiel vi vidis kunveni kun la deziro ataki lin. 35 Sed li mem staros sur la supro de monto Cion. 36 Kaj Cion venos kaj manifestiĝos al ĉiuj, preta kaj fortikigita, kiel la monton vi vidis skulptiĝi, sen homaj manoj<sup>93</sup>. 37 Sed Mia filo pruvos ĉiujn kolektiĝintajn naciojn kulpaj pri malpieco, kion simbolis la tempestoj, kaj li mokos ilin pro iliaj faj planoj kaj pro la turmentoj, kiujn ili suferos, 38 kion simbolis la flamoj, kaj li neniigos ilin senpene per la leĝo<sup>94</sup>, kion simbolis la fajro.

---

<sup>92</sup> Vidu 7:28; Mt 24:30; Mk 13:26.

<sup>93</sup> Dan 2:34.45.

<sup>94</sup> Korektita laŭ Siriaka versio.

39 Kaj ke vi vidis lin alvoki al si alian amason, paceman, 40 tio estas la naŭ triboj<sup>95</sup>, kiuj el sia lando estis forkaptitaj en la tagoj de reĝo Hoŝea, kiu estis kaptita de Ŝalmaneser, reĝo de Asirio; ili estis metitaj trans la grandan riveron, kaj deportitaj al fremda lando. 41 Sed ili faris inter si ĉi tiun planon, ke ili forlasu la amason de la nacioj, migru al tre distanca regiono, kie neniam vivis iu ajn homa gento, 42 por almenaŭ tie obei siajn regulojn, kiujn en la propra regiono ili ne estis obeintaj. 43 Kaj ili eniris tra mallarĝajn irejojn de la rivero Eŭfrato. 44 Tiam la Plejaltulo donis signojn al ili, kaj Li haltigis la fluojn de l' granda rivero ĝis ili estis transirintaj. 45 Tra tiun regionon estis longa vojaĝo de jaro kaj duono; la regiono nomiĝas Arzaret<sup>96</sup>.

46 Tiam tie ili vivis ĝis en la lastaj tempoj; kaj nun ili estas reirantaj, 47 kaj la Plejaltulo denove haltigos la fluojn de l' granda rivero, por ke ili transiru. Tial vi vidis la pace kolektiĝintan amason. 48 Kun ili estas ankaŭ tiuj, kiuj restas el via popolo, ĉiuj, kiuj troviĝos en Miaj 49 sanktaj limoj. Kiam li do komencos neniigi la amason de l' nacioj, kiuj kolektiĝis kontraŭ li, li protektos la popolon, kiu restas. 50 Kaj poste li montros al ili tre multajn miraklojn.

51 Kaj mi diris: Ho Mastro, ho Sinjoro, montru al mi, kial mi vidis viron leviĝi el la profundo de la maro.

Kaj Li diris al mi: 52 Same kiel neniu povas esplori aŭ scii, kio estas en la profundo de l' maro, tiel same neniu sur la tero povos vidi Mian filon aŭ tiujn, kiuj estas kun li, krom en la tempo de lia tago. 53 Tio estas la interpreto de la sonĝo, kiun vi vidis.

---

<sup>95</sup> Aliaj Latinaj manuskriptoj: dek triboj; Siriaka, Etiopia k.a. versioj: naŭ kaj duona triboj.

<sup>96</sup> Devas esti misprononco de Hebrea esprimo *arets abaret* = alia lando.

## *La fino de la vizio*

Nur vi estis lumigita pri ĉi tio, 54 ĉar vi forlasis viajn proprajn aferojn, kaj vi dediĉis vin al la Miaj, por studi Mian leĝon. 55 Vian vivon vi ja direktis al la saĝeco, kaj komprenon vi nomis via patrino. 56 Tial Mi do montris ĉi tion al vi; ĉi tio estas la rekompenco de la Plejaltulo.

Post tri tagoj Mi rakontos al vi ankoraŭ aliajn aferojn, kaj klarigos al vi gravajn miraklojn.

57 Mi foriris en la kampon, laŭte glorante kaj laŭdante la Plejaltulon pro la mirakloj, kiujn de temp' al tempo Li faris, 58 kaj ĉar Li regas la tempojn kaj ĉion, kio okazas en ili. Kaj tie mi sidis tri tagojn.

## **La reskribado de la sanktaj Skriboj: 14:1-47**

### *Ezra devas prepariĝi por sia vivofino*

14 1 Kaj la trian tagon, dum mi sidis sub kverko, 2 voĉo eliris al mi el rubuso<sup>97</sup>, dirante: Ezra, Ezra.

Mi diris: Jen mi, Sinjoro. Kaj mi ekstaris.

Li diris: 3 Mi malkaŝis Min en rubuso, kaj parolis al Moseo, dum Mia popolo estis sklavo en Egiptujo. 4 Mi sendis lin, kaj elkondukis Mian popolon el Egiptujo. Mi kondukis lin sur la monton Sinaj, kaj tenis lin ĉe Mi multajn tagojn. 5 Mi rakontis al li multajn mirindaĵojn, kaj montris al li la sekretojn de la tempoj kaj la finon de la tempoj. Kaj Mi donis al li la ordonon: 6 Ĉi tion vi diskonigu senkaŝe, kaj tion ĉi vi tenu sekreta. 7 Nun Mi diras al vi: 8 La signojn, kiujn Mi montris, kaj la sonĝojn, kiujn vi vidis, kaj la interpretojn, kiujn vi aŭdis, tenu tiujn en via koro. 9 Ĉar vi estos forprenita de la homoj,

---

<sup>97</sup> Elr 3:4.

kaj estonte vi loĝos apud Mia filo kaj viaj similuloj, ĝis finiĝos la tempo\*, 10 ĉar ĉi mondo perdis sian junecon kaj la tempoj komencas maljuniĝi. 11 La tempo ja estas dividita en dek du erojn, kaj naŭ<sup>98</sup> el tiuj eroj jam pasis kaj duono de la deka; 12 do restas ankoraŭ du, krom duono de la deka. 13 Nun vi do ordigu vian domon, avertu vian popolon, konsolu tiujn, kiuj tion bezonas, kaj retiriĝu de l' homa vivo. 14 Demetu de vi la mortemajn pensojn, deskuu la homajn ŝarĝojn, senigu vin de l' malforta naturo; kuŝigu unuflanken la ideojn, kiuj vin ĝenas, kaj haste formigru el ĉi tiu mondo. 15 Ĉar katastrofoj, pli gravaj ol kiujn vi nun vidis okazi, estas okazontaj: 16 ĉar dum ĉi mondo fariĝas pli senforta pro sia aĝo, des pli kreskos la katastrofoj al ĝiaj loĝantoj. 17 La vero iros ĉiam pli foren, kaj la malvero pli alproksimiĝos. La aglo, kiun en la vizio vi vidis, jam estas alfluganta.

### *Ezra havas zorgojn pro la malapero de la Skriboj*

18 Mi diris: Lasu min paroli<sup>99</sup> antaŭ Vi, Sinjoro. 19 Mi ja foriros, kiel Vi ordonis al mi, kaj mi avertos mian popolon nun vivantan. Sed kiuj poste naskiĝos: kiu avertos ilin? 20 La mondo ja estas en obskuro, kaj kiuj loĝas en ĝi ne havas lumon, 21 ĉar Via leĝo estas forbruligita, kaj tiel neniu plu scias, kion Vi faris kaj kio okazos. 22 Se mi ja trovis gracon antaŭ Vi, metu do sanktan spiriton en min; tiam mi skribos ĉion, kio okazis en la mondo de la komenco, ĉion, kio estis skribita en Via leĝo, por ke la homoj povu trovi la padon, kaj ke tiuj, kiuj volas vivi en la lastaj tagoj, tion faru\*.

23 Responde Li diris al mi: Iru, kunvoku vian popolon, kaj diru al ili, ke kvardek tagojn ili ne serĉu vin. 24 Sed vi mem,

---

<sup>98</sup> Variaĵo: dek.

<sup>99</sup> La Latina diras: Mi parolis. Aliaj manuskriptoj: Lasu min paroli.

vi preparu al vi multajn tabelojn, kunvenigu kun vi Sarean, Dabrian, Selemian, Etanon kaj Asielon, kvin virojn kapablajn skribi rapide. 25 Tiam vi venu ĉi tien, kaj en via koro Mi briligos la lampon de l' kompreno, kiu ne estingiĝos antaŭ ol ĉio pretos, kion vi komencos skribi. 26 Kaj kiam vi estos preta, kelkajn <aferojn> vi faros publikaj, kaj kelkajn vi transdonos kaŝe al saĝuloj. Morgaŭ ĉi-hore vi komencu skribi.

### *La lastaj paroloj de Ezra al sia popolo*

27 Mi foriris, kiel Li ordonis, kaj mi kunvenigis la tutan popolon kaj diris: 28 Aŭdu, Izrael, ĉi tiujn parolojn: 29 Pilgrime migris niaj gepatroj dekomence en Egiptujo, kaj ili estas liberigitaj de tie. 30 Ili ricevis leĝon de la vivo, sed ili ne obeis ĝin; ankaŭ vi – post ili – malobeis ĝin. 31 Kaj lote vi ricevis landon en la tero de Cion, sed vi kaj viaj gepatroj faris maljuston kaj ne gardis la vojojn, kiujn al vi ordonis la Plejaltulo. 32 Kaj ĉar Li estas justa juĝisto, je la momento Li forprenis de vi, kion Li donis. 33 Kaj nun vi estas ĉi tie <en ekzilo>, kaj viaj gefratoj eĉ pli fore. 34 Sed se vi regos vian menson kaj instruos vian koron, vi restos vivaj, kaj post la morto vi ricevos indulgon. 35 Ĉar juĝo venos post la morto, kiam denove ni estos vivigitaj; tiam la nomoj de l' justuloj manifestiĝos kaj la agoj de la malpiaj estos montrataj. 36 Sed nun neniu venu al mi, kaj neniu serĉu min dum kvardek tagoj.

### *La reskribado de la sanktaj Skriboj*

37 Kaj mi kunvenigis la kvin virojn, kiel Li ordonis al mi, kaj ni foriris al la kampo, kaj tie ni restis. 38 La morgaŭan tagon jen voĉo min vokis dirante: Ezra, malfermu vian buŝon kaj trinku, kion Mi donas al vi trinki. 39 Mi malfermis la buŝon, kaj jen kaliko tute plena estis prezentata al mi. Ĝi estis plena je



io kvazaŭ akvo, sed ĝia koloro similis je fajro. 40 Mi akceptis kaj trinkis, kaj dum mi trinkis, mia koro elverŝiĝis je saĝeco kaj profunda scio kreskis en mia brusto. Ĉar mia spirito retenis sian memoron, 41 kaj mia buŝo estis malfermita kaj ne plu fermita.

42 La Plejaltulo donis saĝecon ankaŭ al la kvin viroj, kaj laŭvice ili skribis ĉion, kio estis dirita, per signoj, kiujn ili ne konis\*. Ili sidis tie kvardek tagojn. Dumtage ili skribadis, 43 sed nokte ili manĝis panon; mi parolis dumtage kaj ankaŭ nokte mi ne silentis. 44 Tiel en kvardek tagoj estis skribitaj naudek kvar libroj.

45 Kaj kiam pleniĝis la kvardek tagoj, la Plejaltulo parolis: Kion\*<sup>100</sup> ĝis nun vi skribis, faru tion publika: legu ĝin la homoj, kiuj estas indaj je ĝi, kaj kiuj ne. 46 Sed la sepdek laste skribitajn librojn\* vi konservu, por transdoni ilin al la saĝuloj inter via popolo. 47 Ĉar en ili estas fluo de kompreno, fonto de saĝeco kaj rivero de profunda scio. Kaj tiel mi do faris.

- - -

## 4 Ezra 15-16:

### Profetaĵoj pri damno

#### *Venĝo de Dio*

15:1 Diru al la oreloj de Mia popolo la profetajn parolojn, kiujn Mi metis en vian buŝon, diras la Sinjoro, 2 kaj igu ilin skribi sur foliojn, ĉar fidindaj kaj veraj estas ĉi tiuj paroloj. 3 Ne timu komplotojn kontraŭ vi, nek perturbu vin la nekredemo de la homoj; 4 ĉar ĉiuj nekredantoj mortos en sia nekredo.

5 Jen, diras la Sinjoro: Katastrofojn Mi estigos sur la tuta tero: glavon, malsaton, morton kaj pereon. 6 Ĉar maljusteco

---

<sup>100</sup> La Siriaka kaj la unua Araba versioj diras : la dudek kvar librojn.

disvastiĝis sur la tuta tero, kaj iliaj misagoj atingis la limojn. 7 Tial diras la Sinjoro: 8 Mi ne plu silentos pri ilia maljusteco, kiun ili malpie plenumas, kaj Mi ne plu toleros iliajn maljustaĵojn. Senkulpa kaj justa sango krias al Mi, kaj la animoj de l' justuloj daŭre kriadas. 9 Mi certe venĝos ilin, diras la Sinjoro, kaj Mi ricevos ĉe Mi ĉiun senkulpan sangon de inter ili. 10 Jen Mia popolo kvazaŭ grego kondukiĝas al la perejo; Mi ne plu toleros, ke ĝi vivu en Egiptujo, 11 sed Mi elkondukos ĝin kun forta mano kaj brako levita, kaj Mi batos Egiptujon per plagoj kiel antaŭe\*, kaj tutan ĝian teron Mi neniigos.

12 Lamentu do Egiptujo kaj ĝiaj fundamentoj, pro la plagoj de punbatado kaj tradraŝado, kiujn venigas sur ĝin la Sinjoro. 13 Lamentu la terkulturistoj, kiuj laboras la teron, ĉar ilia semo ne kreskos kaj iliaj arboj ruiniĝos pro smuto, hajlo aŭ terura tempesto. 14 Ve al la tero kaj al ĉiuj, kiuj loĝas sur ĝi! 15 Ĉar alproksimiĝas al ili glavo kaj mizero: nacio leviĝos kontraŭ nacio por batali, la lancon en la mano. 16 Ja estos malstabileco inter la homoj; fortigante sin unuj kontraŭ la aliaj, ili en sia potenco ne montros respekton por reĝo aŭ ĉefo de potenculoj. 17 Ĉar iu eble deziras viziti urbon, kaj li ne povos. 18 En sia fiero ja ĥaosigis la urboj, detruigis la domoj, timos la homoj. 19 La homoj ne kompatos pri siaj najbaroj, sed kun la glavo ili atakos ties domojn, por rabi la havaĵojn, pro malsato je pano kaj pro multa mizero.

20 Sed jen, diras Dio: Mi kunvokas ĉiujn reĝojn de la tero antaŭ Mi: de la norda vento kaj de la suda, de oriento kaj de okcidento<sup>101</sup>, por reveni kaj repagi, kion oni donis al ili. 21 Same kiel ili faris ĝis nun al Miaj elektitoj, tiel Mi faros al ili, kaj Mi repagos al ili ĝis en ilian koron.

Tiel diras la Sinjoro Dio: 22 Mia dekstra mano ne indulgos la pekulojn; Mia glavo ne cedos de tiuj, kiuj disverŝas

---

<sup>101</sup> Supozebla senco; la Latina teksto diras: de Lebanono.

sangon senkulpan sur la tero. 23 Kaj fajro ekiris el Lia kolero, kaj forglutis la fundamentojn de la tero kaj la pekulojn, kvazaŭ pajlon bruligitan. 24 Ve al la pekuloj, kiuj ne obeas Miajn ordonojn, diras la Sinjoro. 25 Mi ne indulgos ilin. Foriru vi, malfidelaj filoj! Ne malpurigu Mian sanktecon. 26 Dio ja scias, kiuj pekas kontraŭ Li, kaj tial Li transdonos ilin al morto kaj pere. 27 Ĉar jam venis sur la teron katastrofoj, kaj tiujn vi ne eskapos; vin Dio ne liberigos, ĉar vi pekis kontraŭ Li.

### *Timtremiga vizio*

28\* Jen tremiga vizio, aperanta el la oriento! 29 Nacioj de drakoj el Arabio eliros sur multaj ĉaroj; kaj depost ilia ekiro, ilia siblado disvastiĝos sur la teron, tiel ke ĉiuj, kiuj aŭdos ilin, timtremos kaj konsterniĝos. 30 Kaj la Karmanianoj\*, furiozaj pro kolero, <kvazaŭ aproj<sup>102</sup>> kure aperos el siaj arbaroj, kaj kun granda perforto ili venos batali kun ili; per siaj dentegoj ili ruinigos parton de la lando de l' Asirianoj. 31 Sed tiam, memorante sian originon, la drakoj fariĝos pli fortaj. Kun granda forto ili unuiĝos por persekuti ilin, 32 ĝis ili konfuziĝos kaj ilia potenco eksilentos; tiam ili turniĝos kaj fuĝos. 33 Kaj el la teritorio de l' Asirianoj malamiko el embusko atakos ilin, kaj li neniigos unu el ili. Sur ilian armeon venos timo kaj tremado, kaj malstabileco en ilia regno<sup>103</sup>.

---

<sup>102</sup> Mankas en pluraj manuskriptoj.

<sup>103</sup> Aliaj tradukas: hezitemo inter iliaj reĝoj.

## *Juĝo pri Babel*

34 Jen nuboj etendiĝantaj de oriento kaj nordo ĝis sudo! Ilia aspekto estas tre timiga, plena je kolero kaj ŝtormo. 35 Ili interfrapiĝos kaj verŝos tempestojn<sup>104</sup> amase sur la teron; kaj de la glavo fluos sango, <alta> ĝis la ventro de ĉevalo, 36 ĝis homa femuro aŭ kamela artikoj. Kaj estos multe da timo kaj tremado surtere, 37 kaj ĉiuj, kiuj vidos tiun koleron, hororos: regos ilin paniko. Tiam amaso da ŝtormo-nuboj albloviĝos, 38 de la sudo kaj de la nordo, kaj alia parto el okcidento. 39 Sed plej fortaj estos la ventoj el oriento: tiuj regos la koleran nubon kaj ĝian estron<sup>105</sup>; kaj la tempesto, kiu per la orienta vento devus detrui, perforte estos pelita suden kaj okcidenten. 40 Leviĝos grandaj kaj imponaj nuboj, plenaj je kolero kaj tempesto, por neniigi la teron kaj ĝiajn loĝantojn, kaj sur ĉiun altan kaj gravan lokon<sup>106</sup> ili verŝos teruran tempeston, 41 fajron, hajlon, flugantajn glavojn kaj multe da akvo, tiel ke pleniĝos ĉiuj kampoj kaj riveroj per tiom multe da akvo. 42 Kaj ili detruos urbojn kaj murojn, montojn kaj montetojn, la lignon de l' arbaroj, la herbon de l' herbejoj kaj la grenon de l' kamparo. 43 Ili plu iros senhalte al Babel\* kaj ekstermos ĝin. 44 Ili venos al ĝi kaj ĉirkaŭos ĝin; la tempeston kaj tutan ties koleron ili disverŝos sur ĝin. Tiam polvo kaj fumo leviĝos ĝisĉiele, kaj ĉiuj, kiuj estas ĉirkaŭ ĝi, lamentos pri ĝi. 45 Kaj tiuj, kiuj postvivos, estos sklavoj al tiuj, kiuj neniigis ĝin.

---

<sup>104</sup> Supozata senco; la Latina diras: stelon. Same en vs 39, 40 kaj 43.

<sup>105</sup> Laŭ *The Cambridge Bible Commentary*; la Latina teksto, sufiĉe enigme, diras pli malpli: lin kaj la nubon, kiun li vekis (aŭ: estigis) en kolero. La tuta versiklo 39 estas ne tre klara. Eventuale eĉ eblus traduki: kaj la tempesto, kiu emas detrui, perforte estos pelita suden kaj okcidenten de la orienta vento.

<sup>106</sup> Aŭ: personon.

## *Juĝo pri Azio*

46 Kaj vi, ho Azio, kiu partoprenis la belecon kaj la brilon de Babel, 47 ve pri vi, kompatinda! Ĉar kiel ŝi vi similigis kaj vestigis viajn filinojn kiel putinoj, por plaĉi kaj por vanti je viaj amantoj, kiuj daŭre sopiras malĉasti kun vi. 48 La malamatan vi imitadis en ĉiuj ŝiaj agoj kaj eltrovaĵoj. Tial diras Dio: 49 Sur vin Mi ĵetos ĉiajn katastrofojn: vidvinecon, malriĉon, malsaton, glavon kaj peston – por ruinigi viajn loĝejojn, por doni violenton kaj morton. Kaj la gloro de via brilo 50 forvelkos kiel floro, kiam leviĝos la varmeco, kiu estis sendita al vi. 51 Tiam vi malfortiĝos kiel povra virino, batata, vundita, ne plu kapabla akcepti viajn potencajn amantojn. 52 Ĉu Mi tiel ĵaluzu je vi, diras la Sinjoro, 53 se vi ne daŭre mortigadis Miajn elektitojn, jubilante pri la batoj, kiujn vi donis per viaj manoj, kaj ebrie kriante super iliaj kadavroj?

54 Pentru do vian vizaĝon, beligu vin! 55 La pago por prostituitino kuŝas sur viaj genuoj; vian rekompencan vi do ricevus. 56 Kiel vi faras al Miaj elektitoj, diras la Sinjoro: tiel Dio faros al vi: Li transdonos vin al la malamikoj. 57 Viaj filoj pereos pro malsato, vi falos per la glavo, viaj urboj ruiniĝos, kaj ĉiuj la viaj falos en la kamparo per la glavo. 58 Kiuj estas en la montaro, tiuj pereos pro malsato; ili manĝos la propran karnon en sia malsato je pano, kaj trinkos la propran sangon pro soifo je akvo. 59 Pli malfeliĉa ol kiu ajn, vi suferos pli da mizero. 60 Pasante, ili batos la malamatan urbon, neniigos parton de via lando, abolos parton de via gloro, dum ili revenos el Babel. 61 Malkonstruita vi estos de ili, kvazaŭ stoploj; ili estos por vi kvazaŭ fajro. 62 Ili forglutos vin kaj viajn urbojn, vian teron kaj viajn montojn, kaj ĉiujn viajn arbarojn kaj la arbojn, kiuj portas fruktojn, ili forbruligos. 63 Viajn filojn ili forkondukos kaptitaj, ili disrabos vian riĉon, kaj la gloron de via vizaĝo ili aĉigos.

## *La juĝo neŝanĝebla*

16:1 Ve al vi, Babel kaj Azio! Ve al vi, Egiptujo kaj Sirio!  
2 Vestu vin en sakoj kaj kapra haŭto, prilamentu viajn infanojn kaj ploru pri ili, ĉar alvenas via neniigo. 3 Sendita estas al vi la glavo, kaj kiu kapablus repuŝi ĝin? 4 Sendita estas al vi la fajro, kaj kiu kapablus estingi ĝin? 5 Senditaj estas al vi katastrofoj, kaj kiu kapablus repeli ilin? 6 Ĉu iu kapablus repeli malsatan leonon ree en la arbaron, aŭ estingi fajron en la fojno, post kiam ĝi vere ekflagris? 7 Ĉu iu kapablas resendi sagon, kiun forpafis fortika pafisto? 8 La Sinjoro Dio sendas katastrofojn: kiu do kapablus repeli ilin? 9 Eliros fajro el Lia kolero: kiu do kapablus estingi ĝin? 10 Li svingos fulmojn: kiu do ne timos? Li tondros: kiu ne hororos? 11 La Sinjoro minacos: kiun ne ĝisfunde teruros Lia vizaĝo? 12 Antaŭ la vizaĝo de l' Sinjoro kaj antaŭ la gloro de Lia forto tremas la tero kun siaj fundamentoj, de la profundo la maro elkirliĝas kun ĉiuj ĝiaj fiŝoj, 13 ĉar fortika estas Lia dekstra mano, kiu streĉas la pafarkon, akraj estas Liaj sagoj, kiujn Li sendas; ili ne maltrafos, depost kiam ili estos senditaj al la ekstremaj limoj de l' tero. 14 Katastrofoj estis senditaj kaj ne revenos, ĝis ili trafos la teron. 15 Fajro estas bruligata kaj ne estingiĝos, ĝis ĝi konsumos la fundamentojn de la tero. 16 Same kiel sago pafita de fortika pafisto ne retroiras, tiel same ne reiros la katastrofoj, kiuj estos sendataj al la tero.

## *La teruro de la lastaj tagoj*

17 Ve al mi! Ve al mi: kiu liberigos min en tiuj tagoj?  
18 La komenco de ĉagrenoj: multa ĝemado; la komenco de malsato: multaj pereos; la komenco de militado: la potenco ĝektimos; la komenco de katastroj: ĉiuj timtremos. 19 Kion ili faros, kiam venos la katastrofoj? 20 Malsato kaj plagoj, mizero kaj angoro estas senditaj por skurĝi, por korekti la homojn.

21 Sed eĉ pro ĉi ĉio ili ne konvertiĝos de sia malbono, kaj ili ne daŭre memortenos la skurĝojn. 22 La prezo de l' greno-provizado estos tiel malalta surtere, ke ili pensos vivi en sekura paco – sed tiam ĝermos katastrofoj surtere: la glavo, malsato kaj grandaj konfuzoj. 23 Ĉar multege el la homoj, kiuj vivas sur la tero, pereos pro malsato, kaj la glavo pereigos la ceterajn, kiuj restos post la malsato. 24 Kaj kadavrojn oni ĵetos kvazaŭ sterkon, kaj ne estos iu por konsoli. Ĉar la tero postrestos dezerta, kaj ĝiaj urboj estos disbatitaj. 25 Ne postrestos iu por kultivi kaj prisemi la teron. 26 La arboj portos fruktojn, sed kiu rikoltos ilin? 27 La uvoj maturiĝos, sed kiu tretos ilin? Ĉar ĉie estos granda soleco. 28 La homoj sopiros vidi homon aŭ aŭdi ties voĉon. 29 Ĉar el tuta urbo postrestos dek, kaj du el agro, – kiuj kaŝis sin en densaj arbaroj aŭ en fendoj de rokoj. 30 Same kiel ĉe oliva rikolto ĉe unuopaj arboj postrestas tri aŭ kvar olivoj, 31 aŭ kiel ĉe viteja rikolto ie tie grapolo estas preterlasata de tiuj, kiuj diligente priserĉas la vitojn, 32 tiel same en tiuj tagoj tri aŭ kvar estos postlasataj de tiuj, kiuj kun glavo traserĉos iliajn domojn. 33 La teron oni postlasos dezerta kaj ĝiaj agroj maljuniĝos<sup>107</sup>; ĝiaj vojoj kaj padoj kreskigos dornojn, ĉar ŝafoj tie ne pasos. 34 Virgulinaj lamentos, ĉar ili ne havas novelzon, virinoj lamentos, ĉar ili ne havas edzon, iliaj filinoj lamentos, ĉar neniu aŭskultos ilin. 35 Iliaj novelzoj falos en militoj, kaj iliaj edzoj pereos pro malsato.

*Konsilo al la sklavoj de Dio por la alproksimiĝanta fino:  
peko ne restas kaŝita antaŭ Dio*

36 Aŭskultu ĉi tion, kaj komprenu ĝin, sklavoj de l' Sinjoro. 37 Jen la parolo de la Sinjoro: akceptu ĝin, kaj kreu, kion diras la Sinjoro: 38 Jen alproksimiĝas katastrofoj; ili ne

---

<sup>107</sup> Teksto ne klara.

atendos. 39 Same kiel gravedulino en la naŭa monato, kiam venas la tempo de la nasko, forte doloras ĉirkaŭ la utero du aŭ tri horojn antaŭe, sed kiam la infano aperas el la utero, ne estos eĉ momenton prokrasto, 40 tiel same ne prokrastiĝos la katastrofoj, kiuj venos super la teron: la mondo ĝemos kaj naskospasmoj ĝin ĉirkaŭos.

41 Aŭskultu Miajn parolojn, ho Mia popolo, kaj prepariĝu por batali, meze de l' malbono. Tiel vi ja estu kvazaŭ fremduloj surtere: 42 Kiu vendas, <estu> kvazaŭ li devos fuĝi; kaj kiu aĉetas, <estu> kvazaŭ perdonto; 43 kiu komercas, <estu> kvazaŭ li ne havos profiton; kiu konstruas, kvazaŭ li ne loĝos tie; 44 kiu semas, kvazaŭ li ne faros la rikolton; kaj kiu pritondas la vitojn, kvazaŭ neniam li havos vinberrikolton; 45 kiuj edziniĝas, <tiuj estu> kvazaŭ neniam naskontaj filojn; kaj kiuj ne edziniĝas, <estu> kvazaŭ vidvinoj. 46 Kiuj penadas, tiuj do penadas vane, 47 ĉar fremduloj rikoltos iliajn fruktojn, prirabos iliajn posedaĵojn, detruos iliajn domojn kaj prenos kaptitaj iliajn filojn. En kaptiteco kaj malsato ili naskos siajn idojn, 48 kaj kiuj negocas, negocas nur por prirabado. Ju pli ili ornamas siajn urbojn, siajn domojn, posedaĵojn kaj sin mem, 49 des pli Mi envie koleros kontraŭ iliaj pekoj, diras la Sinjoro. 50 Same kiel respektinda virtulino abomenas putinon, 51 tiel koleros la justeco kontraŭ maljusto, kiam ĝi ornamas sin; kaj ĝi akuzos ĝin rekte en la vizagon, kiam venos la defendanto de tiu, kiu elserĉos ĉiun pekon sur la tero.

52 Tial vi do ne imitu ĝin, nek ĝiajn agojn, 53 ĉar tre baldaŭ ĉiu maljusto estos forigita de la tero, kaj tiam regos super ni la justeco. 54 La pekulo ne diru, ke li ne pekis, ĉar <Dio<sup>108</sup>> bruligos ardantajn karbojn sur la kapo de ĉiu, kiu diras: Mi ne pekis antaŭ Dio kaj Lia gloro.

---

<sup>108</sup> La Latina diras: Li.



55 La Sinjoro nepre ja konas ĉiujn agojn de la homo; Li konas iliajn imagojn, iliajn pensojn kaj ilian koron. 56 Kiu diris: Estu la tero, kaj ĝi estiĝis – Estu la ĉielo, kaj ĝi estiĝis; 57 Li, per kies parolo la steloj estis starigitaj (Li ja konas la nombron de la steloj), 58 Li, kiu traspuras la profundon kaj ĝiajn trezorojn, Li, kiu mezuris la maron kaj ĝian enhavon, 59 Li, kiu limigis la maron meze de la akvoj, kaj per Sia parolo Li pendigis la teron super la akvo, 60 Li, kiu elstreĉis la ĉielon kvazaŭ volbon, kaj sekurigis ĝin super la akvoj, 61 Li, kiu metis en la dezerton akvofontojn, kaj lagojn sur montosuproj, tiel ke ili eligu riverojn de la alto, por ke trinku la tero, 62 Li, kiu muldis la homon, kaj metis koron meze en lian korpon, Li, kiu sendis en lin spiriton, vivon, intelekton, 63 kaj spiron de l' Dio Plejpotenca, kiu faris ĉion kaj traspuras ĉion kaŝitan en kaŝitejoj, – certe 64 Tiu ja konas viajn imagojn, kaj ĉion, kion vi pensas en viaj koroj.

Ve al la pekuloj, kiuj deziras teni sekretaj siajn pekojn! 65 La Sinjoro traspuros ĉiujn viajn agojn, kaj Li respondigos vin ĉiujn. 66 Kaj vi konfuziĝos, kiam viaj pekoj estos ĝenerale konataj antaŭ ĉiuj homoj; kaj tiun tagon viaj pekoj staros antaŭ vi kiel viaj akuzantoj. 67 Kion tiam vi faros? Kiel vi kaŝos viajn pekojn antaŭ la Sinjoro kaj Lia gloro?

### *Kuraĝigo dum persekutado*

68 Jen Dio estas la Juĝisto! Timu Lin! Forlasu viajn pekojn, forgesu viajn maljustaĵojn, ne plu faru ilin por eterne. Tiam Dio elkondukos vin kaj liberigos vin de ĉiu mizero.

69 Ardanta fajro estas flamigata super vi; granda amaso descendos sur vin, kaj ili rabos kelkajn el inter vi por manĝigi al ili ion, kio estis oferita al idoloj. 70 Kaj kiuj konsentos manĝi, tiuj estos por ili objekto de rido kaj riproĉo, kaj ili estos

piedpremataj. 71 En multaj lokoj<sup>109</sup> kaj en najbaraj urboj estos granda insurekcio kontraŭ tiuj, kiuj timas antaŭ la Sinjoro. 72 Ili estos kvazaŭ frenezuloj, indulgantaj neniun, sed prirabantaj kaj neniigantaj ĉiujn, kiuj daŭre timos antaŭ la Sinjoro. 73 Ĉar ili detruos kaj disrabbos iliajn posedaĵojn kaj forpelos ilin mem el iliaj hejmoj.

74 Tiam manifestiĝos, ke Miaj elektitoj eltenis la <elproviĝon>, kvazaŭ oro testata en fajro. 75 Aŭskultu do, Miaj elektitoj, diras la Sinjoro: Jen ĉeestas la tagoj de l' elproviĝo, kaj Mi liberigos vin de tio. 76 Ne timu nek hezitu, ĉar Dio estas via gvidisto. 77 Ho vi, kiuj observas Miajn ordonojn kaj instruojn, diras la Sinjoro Dio: ne lasu viajn pekojn esti tro pezaj por vi, nek venku vin viaj maljustaĵoj. 78 Ve al tiuj, kiuj estas sufokataj de siaj pekoj, aŭ kiuj estas tegataj de siaj maljustaĵoj; ili similas je agro sufokata de arbustaro aŭ pado trans ĝin, tegata de dornaĵoj, tra kiun neniu homo plu povas iri. Ĝi estas forigata kaj forĵetata por konsumiĝi en la fajro.

---

<sup>109</sup> Eble celata signifo; la teksto mem ĉi tie estas tre necerta.

## Notoj al 4 Ezra

### *La eklezio kiel nova Izrael*

- 1:1 La tuto de 4 *Ezra* 1-2 estis verkita de Juda Kristano, kaj la verkaĵo temas pri la problemo de l' rilato inter la Eklezio kaj la popolo Izrael. Laŭforme, li imitas la stilon de la profetado en Olda Testamento, kaj, samkiel en ĉapitroj 15-16, Ezra estas pentrita kiel profeto. En la Hebrea O.T. Ezra ne nomiĝas profeto, sed en pli posta interpretado, pluraj gravuloj el O.T. estis komprenataj kiel parolantaj *profetece*, ekzemple Moseo (Rdm 18:15; 34:10-11), David (2 Sam 23:2; Ag 2:30). En la Korano, pli poste, oni sufiĉe malavare uzas la titolon *profeto* por bibliaj gravuloj. Kelkfoje oni vidas paralelecon inter 4 *Ezra* 2:43 kaj la *Paŝtisto de Hermas*, kristana verko el la 2a jc.
- 1:4 Venis la parolo de la Sinjoro al mi – estas esprimo karakteriza por vokiĝo de profeto; la esprimo mankas en la Hebrea libro *Ezra*.

- 1:10 Eraro de l' aŭtoro: Tiro kaj Cidon estas urboj.
- 1:12 Estas menciataj amaso da bonfaroj de Dio: Elr 14:29; 13:21; 16:13; Psa 105:40; Nom 14:3; 20:11; Elr 15:22-25.
- 1:39 La tri patriarĥoj kaj la 12 t.n. malgrandaj profetoj en la sinsekvo de l' Septuaginto.
- 2:15 Probable la eklezio.

### *La Apokalipso de Ezra*

- 3:1 La datindiko intencas la 13an jaron post la detruo de Jerusalemo fare de Nebukadnecar en 586 a.Kr., sed povus esti samtempe kaŝa indiko pri la efektiva dato de verkiĝo : la 13a jaro post la falo de Jerusalemo en 70 p.Kr. Vidu 3:2 ; 6:19 ; 10:48 k.a.
- Ĉar estas neverŝajne, ke Juda verko estus akceptita en kristana medio post la insurekcio de Bar-Koĥba, kiam eklezio kaj sinagogo neripareble disiĝis, la originalo devus esti preta plej laste ĉirkaŭ 120 p.Kr. Tio

- lasus tempon por verki Grekan tradukon, uzotan en kristana medio.
- 3:2 Babel = Romo en la kaŝa vortigado de l' apokalipso.
- 4:1 La nomo Uriel signifas *Fajro de Dio*. Laŭ *Henoh* 20:2, Uriel estas la gardisto pri la mondo kaj pri Tartaro, la plej suba parto de l' mortintejo. Vidu 2 *Petro* 2:4.
- 4:35 Laŭ rabena instruo, la animoj de l' mortintaj justuloj estas sub la trono de Dio ; komparu kun Ap 6:9s.
- 4:36 Jeremiel – devas ja esti la sama kiel Remiel, la sepa el la ĉefanĝeloj, kiujn mencias *Henoh* 20:8.
- 5:1 La Romia Imperio.
- 5:7 La Morta Maro – la maro de Sodom – fakte estas multe tro plena je salo por nutri fiŝojn.
- 5:23 Multaj bildoj por Izrael : vito, Psa 80:8-16, lilio, Kan 2:1 ; Hoŝ 14:6, la urbo Cion, Psa 132:13, kolombo, Psa 74:19 (turto), ŝafo, Psa 79.13, radiko, *Henoh* 93.8.
- 5:40 La anĝelo parolas nome de Dio ; ankaŭ tuj poste.
- 5:41 Dio estas ekster la tempo ; tial Li « estras » super la homoj, kiuj vivos dum la finiĝo de la mondo. Ezra demandas do, koncerne la promesitan amon de Dio, kion ĝi efektive signifos por ĉiuj antaŭuloj, kiuj jam estos mortintaj ĉe la mondomfino.
- 5:42 La analogio de la cirklo indiku, ke la juĝo de Dio tuŝos ĉiujn generaciojn ; kvankam ne eksplicite menciante, subkompreniĝas, ke ĉiuj homoj resurektos ĉe la fino de la tempo. Vidu vs 45; 7:32.37.
- 5:56 Ĉi tie, ŝajne, la figuro de la anĝelo tute ne plu gravas. Ezra starigas demandojn al Dio mem. La verbo *viziti* en la Biblio ofte implicas *juĝi*.
- 6:19 T.e. ke ĝi finiĝos.
- 7:11 La ideo ke la mondo estis kreita pro Izrael ne aliloke renkontiĝas en la biblio.
- 7:18 Nerekte Ezra iel pledas por la maljustuloj, kiuj ja suferis la mallarĝaĵojn sed ne atingos ion bonan : kiel tio eblas se la juĝo de Dio estas justa? En versikloj 19-25 la simpatio de Ezra por la malpiaj estas akre malakceptata.
- 7:36 [106] Ĉi tie plu daŭriĝas la kutima Vulgata teksto.

- 8:20 Temas pri la kredo, ke ankaŭ Ezra, same kiel Henoĥ kaj Elija, estis suprenlevita al la ĉielo sen morti.
- 8:20b Bele strukturita liturgia preĝo : alvoko de Dio, kies atributoj estas menciataj, vss 20-23 ; petoj miksitaj kun konfesoj, vss 24-35 ; fina laŭdo, vs 36. En kelkaj manuskriptoj de la Vulgato tiu ĉi teksto konserviĝas ankaŭ kiel memstara teksto – pro tio ankaŭ la surskribo en vs 20a.
- 10:27 La virino ŝanĝiĝas en urbon konstruatan : la nova Jerusalemo. Vidu en Zeh 2:1-5 (5-9); Hb 11.10 ; Ap 21:9-21.
- 10:32 La vizio restas ankoraŭ antaŭ la okuloj.
- 10:44 Cion – la nova, transformiĝinta, Jerusalemo.
- 10:47 La konkreta, historia Jerusalemo.
- 11:1 k.s. Aglo estis simbolo por la Romiaj armeoj. La vizio pri la aglo : ĝiaj flugiloj kaj kapoj regas la mondon kaj postgrade malaperas, ĝis, dum restas ankoraŭ nur unu kapo kaj du rivalantaj flugiloj, la aglon defias leono kiu akuzas ĝin pri tirana regado super la tero. La leono diras ke laŭ la plano de Dio nun estas tempo, ke malaperu la aglo mem, kaj efektive ĝi forbrulas. Poste ni aŭdas ke la aglo simbolas la kvaran regnon el la vizio de *Daniel* 7, sed interpretite kiel indikanta la Romian Imperion kaj ne – kiel ĉe *Daniel* mem – la Grekan Imperion fonditan de Aleksandro la Granda. La leono estas la Mesio. La flugiloj kaj la kapoj de la aglo estas Romiaj imperiestroj, kaj interbatalantaj flugiloj estas militistoj-komandantoj aŭ guberniestroj kiuj provis ekregi. La unuaj flugiloj devas esti Cezaro kaj Aŭgusto ; la tri kapoj estas Vespaziano, Tito kaj Domiciano ; sed ne eblas klare identigi ĉiujn ceterajn.
- Laŭ la aŭtoro, la fino de la Romia Imperio ŝajne estis baldaŭa.
- 12:32 La kaŝita Mesio. Vidu en Henoĥ 48:6 ; 62:7.
- 12:37-38 Ezra verku apokrifan aŭ esoteran libron.
- 13:3 Iu kiel viro, iaspeca viro – vidu Dan 7:13. komparu

kun « Mia filo », t.e. filo de Dio, en vs 32.

**13:23** La Mesio.

**13:26** La kaŝita Mesio.

**14:9** Ankaŭ Ezra do loĝos apud la kaŝita Mesio.

**14:22** k.s. Ezra ree skribas ĉiujn sanktajn librojn, la kano-najn same kiel la kaŝitajn (pseŭdepigrafajn / apokri-fajn). Tiu ĉi legendo eble devenas de la ideo, ke Ezra post la tempo de l' Ekzilo establis la Leĝon (Toraon) kiel bazon de la vivo de la komunumo (Neh<sup>ĉ</sup> 8), sed la malsimilecoj estas okul-frape klaraj.

**14:42** La « moderna » Hebrea kvadrata skribo.

**14:45** La dudek kvar librojn – t.e. la Torao (Gen, Elr, Lev, Nom, Rdm), ok libroj da profetoj (fruaj profetoj : Joŝ, Juĝ, 1 kaj 2 Sam [kiel unu libro], 1 kaj 2 Reĝ [kiel unu libro], la plipostaj pro-fetoj, Jsa, Jer, Jh<sup>z</sup> kaj la 12 profetoj [kiel unu libro], kaj dek unu libroj da Skribaĵoj,

Psa, Pro, Ijb, Kan, Rut, Plo, Pre, Est, Dan, Ezr-Neh<sup>ĉ</sup> [kiel unu libro] kaj 1 kaj 2 Kro [kiel unu libro].

**14:46** La apokrifaj aŭ esoteraj li-broj de 12.37-38.

### *Profetaĵoj pri damno*

**15:11** Tio ĉi povus esti aludo al la terura malsatego dum impe-riestro Galieno (260-268) en Egiptujo, kiun sekvis pestepidemia, kio mortigis du trionojn de la loĝantaro de Aleksandrio.

**15:28** Laŭsupoze tiu ĉi sceno (vss 28-63) redonas la okazaĵojn de la 3a jc, inkluzive la atakon de reĝo Ŝapur la 1-a de la Persoj (240-273) kontraŭ la Romia provinco Sirio.

**15:30** Karmanio – *Kirman* – estis la suda provinco de la Parta Imperio.

**15:43** Babel – Romo.

## 3 Makabeoj

### Enkonduko al 3 Makabeoj

La 3a libro Makabeoj – iom mirige – tute ne temas pri la Makabeoj. Ĝi ja traktas la sorton de la Judoj en Aleksandrio de Egiptujo. Kiel sciante, post Aleksandro la Granda tie estiĝis la Ptolema dinastio, kiu plenumis fortan kulturpolitikon. I.a. estiĝis surloke la plej fama biblioteko kaj kulturcentro de la klasika mondo.

Judismon la Ptolemeoj, ŝajne, opiniis eksmoda. Ili almenaŭ forte kontraŭstaris ĝin, kiel montras ĉi tiu libro.

La historio disvolviĝas dum Ptolemeo la 4a Filopator (221-203), duonan jarcenton antaŭ la Makabea periodo. La verko transdoniĝis en la Septuaginto, en la Siriaka Peŝito kaj en la Armenia Biblio. Sed ne en la Vulgato.

Post mallonga enkonduko, *3 Makabeoj* priskribas provon de Ptololeo eniri la sanktejon de Jerusalemo. Reage al preĝado de ĉefpastro Simon, tio malebliĝas. Reveninte en Egiptujon, la reĝo decidas venĝi sin je la Judoj pro tiu humiligo. Li ŝanĝas ilian civilan statuson, devigas la kulton pri Dionizo, promesas samrangecon je la ceteraj civitanoj de Aleksandrio al tiuj Judoj, kiuj obeas. La plimulto de la Judoj rezistas. Ili kruele estas

kunpelitaj, torturataj, kaj pluraj eĉ mortas. Dua miraklo ĥaosigas la reĝan administracion. Tria miraklo, responde al preĝo de Eleazer, savas la Judojn de sub la piedoj elefantaj.

La reĝo pentofaras kaj ekprotektas la Judojn. Li sendas protektajn leterojn al provincestroj kaj la Judoj ĝoje reiras hejmen.

La libro klare estis verkita por kuraĝigi Egiptajn Judojn. Sed ne estas klare, en kiu periodo ekzakte. Oni proponis plurajn historiajn teoriojn – neniuj estas vere konvinka. La rakonto pri la elefantoj supozeble cirkulis jam kiel legendo dum la lastaj jarcentoj a.Kr. pri tiu ĉi Ptolemeo.

Ekde 24 a.Kr. Egiptujo estis provinco de l' Romia Imperio ; la nova registaro endanĝerigis la statuson de la Judoj. Eble la « registriĝo implicanta imposto-pagon kaj la statuson de sklavoj » de 2:28 fakte aludas al tiaj agadoj de la Romianoj. Sed, kiel ofte okazis, verkante kvazaŭ historian romaneton pri fora periodo, oni evitus do inciti la nunajn funkciulojn.

La verko origine estis verkita en la Greka de iu nekonata Aleksandria Judo, inter la batalo de Rafia en 217 a.Kr. kaj la falo de la Jerusalema templo en 70 p.Kr.

Plej probabla datiĝo eble estas la komenco de la 1a jc a.Kr.

La libron eblas jene dividi :

1:1-29 Ptolemeo la 4a Filopator minacas la Jerusaleman templon

2:1-24 Preĝo de la ĉefpastro Simon kaj Dia interveno

2:25-4:13 Kruela traktado fare de Ptolemeo

4:14-21 Dia interveno ĉe la registriĝo

5:1-51 Kruela traktado fare de Ptolemeo

6:1-29 La preĝo de Eleazar kaj Dia interveno

6:30-7:23 Ptolemeo liberigas kaj defendas la Judojn



## 3 Makabeoj

### *Ptolemeo la 4a Filopator venkas ĉe Rafia*

1:1\* Kaj<sup>110</sup> kiam Filopator sciigis de l' revenintoj, ke la regionoj, kiujn li regadis, estis kaptitaj de Antioĥo, li donis ordonojn al ĉiuj siaj trupoj, infanterio kaj kavalerio, kunvenigis sian fratinon Arsinoa, kaj ekiris al la regiono apud Rafia, kie tendumis la armeo de Antioĥo. 2 Sed certa Teodoto, decidiĝinte ke li plenumos, kion li planis, kunigis al si la plej bonajn armilojn de Ptolomeo<sup>111</sup>, kiuj estis sub lia komando, kaj dumnokte transiris al la tendo de Ptolemeo, intencante propramane mortigi lin kaj tiel fini la militon. 3 Sed Dositeo, konata kiel filo de Drimilo, Judo laŭnaske, kiu poste ŝanĝis religion kaj apostatiĝis de la gepatraj tradicioj, estis foriginta la reĝon kaj iginta, ke certa negravulo dormu en la tendo; tiel do <tiu viro> ricevis la venĝon <intencitan por la reĝo>. 4 Sed rezultis akra batalado, kaj kiam la aferoj turniĝis sufiĉe favore por Antioĥo, Arsinoa iris al la trupoj, lamentante kaj plorante, la

---

<sup>110</sup> La teksto komenciĝas kun δὲ en la unua frazo, kio povus – ne nepre devas – implici, ke iel la enkonduko perdiĝis.

<sup>111</sup> La termino povus temi pri armiloj aŭ pri soldatoj.

hararon senordigita, kaj ŝi admonis ilin kuraĝe defendi sin mem, siajn idojn kaj edzinojn, promesante doni al ĉiu unuope, se ili venkos, du min'ojn el oro. 5 Kaj tiel rezultis, ke la malamikojn ili neniigis, kaj multajn kaptitojn ili prenis.

*Ptolemeo vizitas Jerusalemon kaj volas eniri la templon:  
Reago de la Judoj*

6 Ĉar li nun superis la komploton, Ptolemeo decidis viziti la najbarajn urbojn kaj admoni tiujn. 7 Tion farinte, kaj riĉiginte iliajn sanktejojn per donacoj, li kuraĝigis siajn subulojn.

8 Ĉar la Judoj sendis kelkajn el sia konsilio kaj pliaĝuloj por saluti lin, por doni bonvenigajn donacojn, kaj por gratuli lin pri la okazaĵoj, li des pli deziris viziti ilin kiel eble plej baldaŭ. 9 Post kiam li alvenis en Jerusalemon, li alportis oferaĵon al la Plejalta Dio kaj dank-oferojn, kaj faris, kio decas por la sankta loko\*. Tiam, dum li eniris la lokon kaj estis impresita de ĝia grandiozo kaj belo, 10 li miris pri la bona ordo en la templo, kaj ekdeziris eniri la sanktejon. 11 Sed kiam oni diris al li, ke tio ne estas permesita, ĉar eĉ la anoj de ilia propra nacio ne rajtas eniri, nek ĉiuj pastroj, sed nur la ĉefpastro, kiu estas la plej alta super ĉiuj – kaj tiu nur unufoje jare –, la reĝo tute ne estis konvinkita. 12 Eĉ post kiam tiun leĝon oni legis al li, li ne ĉesis aserti, ke nepre li devas eniri, dirante: Eĉ se tiuj homoj estas senigataj de tiu ĉi honoro, mi ne devas resti sen ĝi. 13 Kaj li demandis, kial do neniu lin retenis, dum ĉiun alian templon li eniris. 14 Kaj senpripense iu respondis, ke estas malĝuste preni tion kiel omenon. 15 Sed, diris la reĝo: Ĉar tio ĉi ja okazis, kial do ne minimume mi eniru, – ĉu ili volas aŭ ne?

16 La pastroj en ĉiuj siaj vestaĵoj metis sin planken kaj petegis la Plejaltan Dion helpi ilin en tiu situacio kaj forigi la perforton de lia terura intenco, kaj ili plenigis la templon per krioj kaj ploroj; 17 kiuj postrestis en la urbo, estis konfuzitaj kaj forrapidis, supozante, ke okazas io neklara. 18 Junaj virinoj,

enfermitaj en siaj ĉambroj, subite eksteren svarmis kun siaj patrinoj, priverŝis siajn harojn per polvo, kaj plenigis per singultoj kaj lamentoj la stratojn. 19 Junulinoj, kiuj ĵus estis edziniĝontaj, forlasis siajn nuptoĉambrojn, kiuj estis pretaj por la geedziĝo, kaj, forgesante la propran hontemon, en senorda paniko forfuĝis tra la urbo. 20 Patrinoj kaj nutristinoj forlasis ie tie ĵusnaskitajn bebojn, kelkaj endome kaj kelkaj surstrate, kaj sen retrorigardo ili kunamasiĝis ĉe la plej alta loko de la templo.

21 Buntaj estis la preĝoj de ĉiuj, kiuj tie kuniĝis, koncerne kion profane intencis la reĝo. 22 Krome, la plej kuraĝaj el la civitanoj ne volis toleri la realigon de liaj planoj aŭ la plenumon de lia intenco. 23 Sed ili kriis, ke armilojn oni kaptu kaj kuraĝe pretu morti pro la prapatra leĝo, kaj ili estigis sufiĉe grandan haoson en la <sankta> loko; apenaŭ retenataj de la maljunuloj kaj la pliaĝuloj, ili aliĝis al la sama petado kiel la ceteraj. 24 Intertempe, la amaso kiel antaŭe daŭre preĝadis, 25 dum la pliaĝuloj, ĉirkaŭ la reĝo, plurmaniere klopodis por deirigi la arogantan menson de l' reĝo de la plano, kiun li havis. 26 Sed, en sia aroganteco, li atentis pri neniu, kaj nun alproksimiĝis, decidiĝinte plenumi sian menciitan intencon. 27 Kiam la homoj ĉirkaŭ li tion vidis, ili kune kun la popolo turnis sin por petegi Tiun, kiu havas ĉiun potencon, ke Li defendu ilin en ĉi tiu katastrofo kaj ne pardonu liajn senleĝajn kaj troaŭdacajn agojn. 28 La daŭra, emfaza kaj komuna kriado de l' amasoj estigis gigantan bruon; 29 ŝajnis ja, ke ne nur la homoj, sed ankaŭ la muregoj kaj tuta la grundo ĉirkaŭe eĥadas, ĉar vere tiun momenton ĉiuj preferis morti ol lasi profani tiun lokon.

### *Preĝo de la ĉefpastro Simon*

2 1 La ĉefpastro Simon, antaŭ la sanktejo, surgenuiĝante kaj elstreĉante la manojn en kvieta indeco, preĝis jene: 2 Ho Sinjoro, Sinjoro, reĝo de l' ĉielo, mastro de la tuta kreitaro,

sankta inter la sanktaj, solreganto, ĉiopova, atentu pri ni, kiuj grave suferas pro la vanto, potenco kaj troaŭdaco de ĉi malpia kaj profana viro. 3 Ĉar Vi, ĉies kreinto, ĉies reganto, estas justa, kaj Vi juĝas tiujn, kiuj faris ion maljuste aŭ arogante. 4 Vi neniigis tiujn, kiuj en la pasinteco agis maljuste, inter kiuj estis eĉ gigantoj, konfidaj pri sia forto kaj sentimeco; Vi neniigis ilin per inundo de senlima akvaro. 5 Vi ekstermis per fajro kaj sulfuro la loĝantojn de Sodom, kiuj agis aroge, kiuj estis fifamaj pro siaj malvirtoj; kaj Vi faris ilin ekzemplo por kiuj venos poste. 6 La troaŭdacan Faraonon, kiu sklavigis Vian sanktan popolon Izrael, Vi elprovis per multaj kaj buntaj punoj, konigante al li Vian fortan potencon. 7 Kaj kiam li persekutis ilin per siaj ĉaroj kaj amaso da trupoj, Vi dronigis lin en la profundo de la maro, sed sekure Vi trairigis tiujn, kiuj metis sian konfidon je Vi, la reganto de l' tuta kreitaro. 8 Kaj kiam ili vidis agojn de Viaj manoj, ili laŭdis Vin, la Plejaltulon. 9 Vi, ho reĝo, kiam Vi kreis la senliman kaj nemezureblan teron, elektis ĉi tiun urbon kaj sanktigis ĉi lokon por Via nomo, kvankam nenion Vi bezonas; kaj kiam Vi gloris ĝin per Via mirinda manisfestiĝo, Vi faris ĝin firma fundamento por la gloro de Via granda kaj honorplena nomo. 10 Kaj ĉar Vi amis la domon Izrael, Vi promesis, ke, se okazos malprospero kaj se katastrofoj trafos nin, Vi aŭskultos je nia petagado, kiam ni venos al ĉi loko por preĝi. 11 Kaj vere, fidela Vi estas kaj fidinda. 12 Kaj ĉar ofte, kiam niaj gepatroj estis subpremataj, Vi helpis ilin en ilia humiligo, kaj savis ilin el granda teruro, 13 nun Vi do vidu, ho sankta reĝo, ke pro niaj multaj kaj grandaj pekoj ni estas frakasataj, submetitaj al niaj malamiko, venkitaj de senhelpo. 14 Ĉe nia falo ĉi troaŭdaca kaj profana viro intencas perforti la sanktejon, surtere dediĉitan al Via glora nomo. 15 Ĉar Via loĝejo estas en la ĉielo de l' ĉielo, nealirebla por la homoj. 16 Sed ĉar tiel bonvoleme Vi verŝis Vian gloron sur Vian popolon Izrael, kaj sanktigis ĉi lokon, 17 do ne punu nin pro la malpurigo <kaŭzita> de ĉi tiuj, nek respondecigu nin pri ĉi profanado, ĉar alie la krimuloj fanfaronos

en sia venĝemo kaj jubilos en la aroganto de siaj diroj: 18 Ni distretis la domon de la sanktejo, same kiel la domoj de l' abomenaĵoj estis distretitaj. 19 Forviŝu niajn pekojn kaj forpelu niajn erarojn, kaj malkaŝu Vian kompatemon en ĉi horo. 20 Faru, ke Via kompatemo haste akceptu nin, kaj metu preĝojn en la buŝo de tiuj, kiuj estas deprimitaj kaj spirite rompigitaj, kaj donu al ni pacon.

### *La Dia puno kaj la reago de la reĝo*

21 Tiam Dio, kiu superrigardas ĉion, ĉies unua patro, sankta inter la sanktaj, aŭdinte la justajn preĝojn, skurĝis lin, kiu en senhonteco kaj troaŭdaco altigis sin. 22 Li skuis lin tien kaj reen, kvazaŭ kanon vente movatan, tiel ke li kuŝis senhelpa surplanke kaj, krom paralizo de la membroj<sup>112</sup>, li eĉ ne povis paroli, ĉar trafis lin justa verdikto. 23 Tial, vidante la severan punon, kiun li ricevis, kaj timante, ke li ankaŭ perdos la vivon, liaj amikoj kaj korpogardistoj haste lin trenis eksteren, panikplenaj en sia grandega timo. 24 Post iom li rekonsciigis, kaj kvankam punita, li absolute neniel pentis, sed daŭrigis siajn amarajn minacojn.

25 Kiam li alvenis en Egiptujon, li ekfaris pli da malbonagoj, instigite de l' antaŭe menciitaj\* drink-amikoj kaj kamaradoj, kiuj estis komplete fremdaj al io ajn justa; 26 li ne estis kontenta pri siaj sennombraj mismoraj agoj, sed li eĉ tiel aŭdace daŭrigis, ke li kunmetis aĉajn raportaĵojn en la diversaj lokoj; kaj multaj el liaj amikoj, atente observante, kion celas la reĝo, ankaŭ sekvis lian deziron. 27 Li proponis publike senhonorigi la Judan komunumon<sup>113</sup>, kaj li starigis steleon sur la turo en la korto kun la epigrafo: 28 Neniu el la

---

<sup>112</sup> 2 Mak 3:22-30; 2 Mak 9:4-7.

<sup>113</sup> Laŭlitere anstataŭ *Juda komunumo* la Greka diras nur *la gento*.

neoferintoj eniru la sanktejojn, kaj ĉiuj Judoj estu submetataj al registriĝo implicanta imposto-pagon kaj la statuson de sklavoj. Kiuj kontraŭas ĉi tion, tiuj estu porforte kaptitaj kaj kondukataj al la morto; 29 kaj kiuj estas registritaj, tiujn oni ankaŭ fahre brulmarku sur la korpo per la vinbersimbolo de Dionizo<sup>114</sup>, kaj ili estu rekondukitaj al sia antaŭa limigita pozicio.

30 Sed por ke li entute ne ŝajnu malamika al ĉiuj, li sube aldonis: Sed se kelkaj el ili prefere aliĝas al tiuj, kiuj iniciĝis en la misterojn, ili havos samajn civitajn rajtojn kiel la Aleksandrianoj.

31 Kelkaj do, tamen, klare abomenante la prezon pagotan por reteni la religion de sia urbo<sup>115</sup>, sen tro da hezitemo transdonis sin, ĉar ili atendis plibonigi sian reputacion dank' al estonta asociiĝo kun la reĝo. 32 Sed la plimulto agis firme, kun spirito kuraĝa, kaj ne delasis de sia religio; kaj pagante monon interŝanĝe por la vivo, ili kuraĝe provis savi sin mem de la registriĝo. 33 Ili restis plenaj je espero ricevi helpon, kaj ili hororis pro tiuj, kiuj disiĝis de ili, konsiderante ilin malamikoj de l' Juda popolo, kaj senigante ilin de kamaradeco kaj reciproka helpo.

### *La pozicio de la Judoj*

3 1 Kiam la malpia reĝo ekkomprenis ĉi tion, li fariĝis tiel kolera, ke li ne nur furiozis kontraŭ la Judoj, kiuj loĝis en Aleksandrio, sed li estis ankoraŭ pli malamika kontraŭ tiuj, kiuj loĝis en la kamparo; li ordonis, ke ilin ĉiujn oni tuj amasigu en unu lokon kaj senigu ilin kiel eble plej kruele je la vivo. 2 Dum tio estis aranĝata, ekcirkulis malamika onidiro kontraŭ la Juda popolo flanke de homoj, kiuj konspiris kontraŭ ili por

---

<sup>114</sup> 2 Mak 6:7.

<sup>115</sup> Teksto ne tute klara.

malutili al ili, preteksto subtenata de aserto, ke ili malebligis al aliaj plenumi ties kutimojn. 3 Sed la Judoj daŭre tenis la saman neŝanceblan bonvolemon rilate al la dinastio. 4 Tamen, ĉar ili adoris Dion kaj tenis sin je Lia leĝo, ili gardis certan distancon koncerne manĝaĵojn. Tial ili aspektis al kelkaj kiel malamikaj; 5 sed ĉar ili beligis sian vivstilon per la bonaj agoj de honestuloj, ili establiĝis ĉe ĉiuj en bona reputacio. 6 Sed la anoj de l' fremdaj popoloj ne prikonsideris ilian bonfaradon al ilia nacio, pri kio oni ofte babilis; 7 anstataŭe ili prefere babilis pri la malsameco en la adorado kaj en la manĝaĵoj, ŝajnigante, ke ĉi homoj estas lojalaj nek al la reĝo nek al liaj funkciuloj, sed malamikaj kaj ege kontraŭaj al liaj aferoj. Tiel ili prituŝis ilin<sup>116</sup> per ne ĉiutaga riproĉo.

8 La Grekoj en la urbo, kvankam neniel damaĝitaj, kiam ili vidis neatenditan konfuziĝon ĉirkaŭ ĉi tiuj homoj kaj subite formiĝantajn amasojn, ne estis sufiĉe fortaj por helpi ilin, ĉar ili vivis sub tiraneco. Sed ili provis konsoli ilin, ĉagrene ekscitiĝis, kaj supozis, ke la afero ŝanĝiĝos; 9 ĉar tiel granda komunumo ne povas esti malzorgata, se nenion malbonan ili faris<sup>117</sup>. 10 Kaj jam kelkaj el la najbaroj, amikoj kaj komercaj kolegoj kaŝe flanken prenis kelkajn el ili kaj promesis protekti kaj plej serioze subteni ilin.

### *Dekreto de Ptolemeo, ke oni arestu ĉiujn Judojn en lia regno*

11 Kaj tiam, fanfarona pri sia estanta bonsorto, ne atentante la potencon de l' Plejalta Dio, sed supozante ke Li daŭre restos ĉe la sama intenco, la reĝo skribis kontraŭ ili ĉi tiun leteron:

---

<sup>116</sup> La Judojn.

<sup>117</sup> Traduko ne certa.

12 Reĝo Ptolemeo Filopator al siaj generaloj kaj soldatoj en Egiptujo kaj en ĉiuj distriktoj: saluton kaj bonfarton:

13 Mi mem kaj nia registaro fartas bone. 14 Nia ekspedicio en Azio, kiel vi scias, laŭplane finiĝis, dank' al la klara batala alianco de la Dioj kun ni, 15 kaj tial ni konsideris, ke ni ne regu la popolojn loĝantajn en Celesirio kaj Fenicio per la potenco de la lanco, sed ke per mildo kaj multe da homamo ni dorlotu ilin. 16 Post kiam multajn enspezojn ni donis al la temploj en la urboj, ni ankaŭ venis al Jerusalemo, kaj ekiris por honori la sanktejojn de tiu stultuloj<sup>118</sup>, kiuj neniam ĉesas pri sia malsaĝeco. 17 Ili pervorte akceptis nian ĉeston, sed fakte nesincere, ĉar kiam ni proponis eniri ilian plej internan sanktejon kaj honori ĝin per elstaraj kaj plej belaj oferaĵoj, 18 ili estis kuntrenataj de sia tradicia aroganteco kaj malhelpis, ke ni eniru; sed la bonvolemo, kiun ni sentas por ĉiuj homoj, malhelpis, ke ni sentigu nian potencon kontraŭ ili. 19 Konservante sian klaran malbonvolon kontraŭ ni, ili fariĝas la tutsolaj el inter ĉiuj nacioj, kiuj levas la kapon por defii la reĝojn kaj la proprajn bonfarantojn: nenion ili pretas konsideri sincera.

20 Sed, kiam venkaj ni alvenis en Egiptujon, ni adaptiĝis al ilia malsaĝeco, kaj agis, kiel estas dece, ĉar ĉiujn popolojn ni traktas bonvoleme. 21 Inter alie nian amnestion je iliaj ĉitiejaj samnacionoj ni sciigis al ĉiuj, same pro ilia alianco kun ni, kiel ankaŭ pro la sennombraj aferoj, kiujn ekde la komenco ni senhezite konfidis al ili\*; kaj ni kuraĝis fari ŝanĝon, decidante, ke ili indas je civitaneco de Aleksandrio kaj ke ili partoprenu en niaj kutimaj religiaj ritoj. 22 Sed en sia ennaskita malico, ili prenis tion en kontraŭa maniero, kaj malŝatis, kio estas bona. Ĉar daŭre ili emas al malbono, 23 ili ne nur malŝatis la valoregan civitancon, sed pervorte kaj silente ili abomenas la malmultajn inter si, kiuj rilatas sincere al ni; en ĉiu situacio, laŭ

---

<sup>118</sup> La vorto ankaŭ povas signifi: krimuloj.



sia misfama vivstilo, ili sekrete suspektas, ke baldaŭ ni ŝanĝos nian konduton. 24 Tial, plene konvinkitaj de ĉi indikoj, ke ili estas malfavoraj je ni en ĉiu maniero, ni prenis antaŭrimedojn, por ke, se poste estiĝos subita ribelo kontraŭ ni, ni ne havu ĉi malpiulojn malantaŭ nia dorso kiel perfidulojn kaj barbarajn malamikojn. 25 Tial ni ordonis, ke, tuj kiam alvenos ĉi letero, vi sendu al ni tiujn, kiuj vivas inter vi, kune kun iliaj edzinoj kaj infanoj, insulte kaj krude traktante ilin, en feraj katenoj, por suferi la neeviteblan kaj malhonoran morton, kiu decas al malamikoj. 26 Ĉar kiam ĉiuj ĉi estos punitaj, ni estos certaj, ke por la cetera tempo nia regado estos firme establita, bonorde kaj bonmaniere. 27 Sed se iu protektos iun ajn el la Judoj, ĉu maljunulon, infanon aŭ eĉ bebon, tiu sub la plej teruraj suferoj estos mortskurĝita, kune kun la tuta paren caro. 28 Se iu pretas informi nin, tiu ricevos la posedaĵojn de kiuj estos punitaj, kaj krome du mil draĥmojn el la reĝa trezoro, kaj li estos honorita per libereco. 29 Ĉiu loko, kie montriĝos, ke kaŝiĝas tie iu Judo, estu farita nepaŝebla kaj elbruligita, kaj fariĝos senutila por eterne por kiu ajn vivanta estaĵo.

30 La letero estis verkita en ĉi tiu stilo.

### *La deportado de la Judoj: ili ĉiuj estu registritaj*

4 1 Ĉie, do, kie alvenis ĉi tiu dekreto, je publikaj kostoj oni aranĝis feston por la paganoj, kun kriadado kaj gajeco, ĉar la tradiciuĝinta malamikeco en iliaj mensoj nun fariĝis evidenta kaj senkaŝa. 2 Sed inter la Judoj estis daŭra funebrado, lamentado kaj ploradaj ĉagrenoj; ĉie iliaj koroj ardadis, kaj ili veis pro la neatendita neniigo, kiu tiel subite estis dekretita pri ili. 3 Kiu distrikto aŭ urbo, ja kiu loĝebla loko, kiuj stratoj ne estis plenigitaj de funebrado kaj lamentado pri ili? 4 Ĉar tiel krude kaj tiel senkompate ili estis forsenditaj, ĉiuj kune, de la generaloj en la diversaj urboj, ke pro iliaj nekutimaj punoj eĉ kelkaj el iliaj malamikoj, ricevante ĉi komunan objekton de kompatemo

antaŭ siaj okuloj, ekmeditis la nestabilecon de la homa vivo, priplorante ĉi plej mizeran elpeligon. 5 Ĉar oni forkondukis amason da maljunaj grizharuloj, aĉe vestitaj, kurbaĵoj pro la aĝo, perforte devigante ilin piediri hastapaŝe, tute senhonte. 6 Kaj junulinoj, kiuj ĵus eniris la nuptoĉambron por partopreni geedzan vivadon, ŝanĝis ĝojon por ĉagreno, la mirhokovritan hararon priverŝita per cindro; oni forkondukis ilin senvualaj, dum lamentadon ili aŭdigis anstataŭ nuptokanton, krude fortrenate de la paganoj. 7 En katenoj kaj tute publike, ili estis perforte fortrenataj ĝis la enŝipiĝejo. 8 Iliaj edzoj, en plej freŝa junuĝo, la kolojn ligitaj de ŝnuroj anstataŭ girlandoj, pasigis la ceterajn tagojn de l' nuptofesto lamentante anstataŭ en gajeco kaj junula diboĉado, jam vidante la Hadeson tuj antaŭ siaj piedoj. 9 Oni enŝipigis ilin kvazaŭ sovaĝajn bestojn, pelante sub devigo de feraj katenoj; kelkaj estis per la kolo ligitaj al la ŝipobenkoj, aliaj piede estis sekurigitaj per nerompeblaj piedingoj, 10 kaj krome oni enŝlosis ilin sub solida ferdeko, tiel ke, kun la okuloj en kompleta mallumo, dum la tuta vojaĝo ili suferu traktadon taŭgan por perfiduloj.

11 Kiam ili estis transportitaj al la loko nomata Ŝedio\*, kaj la vojaĝo finiĝis kiel dekretis la reĝo, li ordonis, ke oni enŝlosu ilin en la hipodromon, kiun antaŭ la urbo oni konstruis kun grandega ĉirkaŭmuro, kaj kiu bone taŭgis por fari ilin vidaĵo por ĉiuj, kiuj reiras al la urbo, kaj por ĉiuj, kiuj eliras el la urbo kamparen, tiel ke ili nek havu kontakton kun liaj trupoj nek asertu, ke ili estas interne <de la urbo>. 12 Post ĉio ĉi tio, aŭdante, ke samnacionoj <de la Judoj> ofte kaŝe eliras el la urbo por lamenti amare pri la malinda sorto de iliaj parencoj, 13 <la reĝo> kolerege ordonis, ke tiujn homojn oni traktu same kiel la ceterajn, ne forgesante eĉ detalon de ilia puno. 14 La tuta nacio estu registrita, ĉiuj laŭnome, ne por la ĵus menciita peza laboro, sed por – torturate en la ordonita mistraktado – en unu tago esti neniigitaj. 15 La registradon de ĉi homoj oni do plenumis kun

amara rapido kaj ĵaluza detalemo, ekde sunleviĝo ĝis sunsubiro, kaj post kvardek tagoj oni ĉesigis ĝin, nekompletan.

16 Forte kaj daŭre la reĝo estis gaja, organizante festenojn honore al ĉiuj siaj idoloj, kun menso fremdigita de la realo, kun buŝo profana, laŭdante la senvoĉajn objektojn, kiuj eĉ ne povas komunikiĝi aŭ helpi iun ajn, sed dume li eligis maldecajn esprimojn kontraŭ la Plejalta Dio. 17 Kaj post la menciita tempo la skribistoj deklaris al la reĝo, ke ili ne plu kapablas registradi la Judojn pro ilia sennombra multeco\*, 18 kvankam la plimulto ankoraŭ estis en la lando, kelkaj en siaj domoj, kaj kelkaj survoje<sup>119</sup>; la tasko estis do ne plenumebla por ĉiuj generaloj de Egiptujo. 19 Post kiam li minacis ilin tre severe, akuzante, ke ili estis subaĉetitaj por liveri la eblon eskapi, li ja estis konvinkita pri la afero, 20 kiam ili diris kaj pruvis, ke eĉ la papiruso<sup>120</sup> kaj la skribo-plumoj, kiujn ili uzis, jam estis elĉerpitaj. 21 Sed tio ĉi estis ago de la nevenkebla providenco de Tiu, kiu el la ĉielo subtenis la Judojn.

### *La plano de la reĝo por mortigi ĉiujn Judojn malsukcesas*

5 1 La reĝo, tute nefleksebla, tiam estis plena je kolero kaj venĝemo; li do venigis Hermonon, la gardiston de l' elefantoj, 2 kaj ordonis al li, ke la sekvan tagon li ebrigu ĉiujn elefantojn – entute kvincent\* – per malavaraj manplenoj da incenso kaj multege da nemiksita vino, kaj frenezigitajn de la abundega drinkaĵo, li enpelu ilin internen, por ke la Judoj pereu. 3 Kiam ĉi ordonojn li donis, li reiris al la festenado, kune kun tiuj elinter liaj amikoj kaj el la armeo, kiuj estis plej malamikaj je la Judoj. 4 Kaj elefantestro Hermon fidele plenumis laŭ liaj ordonoj. 5 La servistoj okupitaj pri ĉi tasko foriris en la vespero, kaj do

---

<sup>119</sup> Aliaj manuskriptoj diras: en sia loko.

<sup>120</sup> Aŭ: butiko de papirusoj.

ligis la manojn de la kompatinduloj\*, aranĝante por ilia daŭra gardateco dum la nokto, konvinkitaj, ke la tuta <Juda> nacio aliros sian neniigon. 6 Al la paganoj ja ŝajnis, ke la Judoj restis sen iu ajn helpo, ĉar en siaj katenoj ili estis ĉiuflanke forte ligitaj. 7 Sed sub larmoj kaj kun voĉo apenaŭ silentigebla ili alvokis la ĉiopovan Sinjoron, la reganton pri ĉiuj potencoj, sian kompateman Dion kaj Patron, preĝante, 8 ke Li forturnu de ili la malican planon, kaj ke en glora manifestiĝo Li savu ilin el la fatalo preparita por ili. 9 Ilia petegado fervore ascendis ĉielen.

10 Sed post kiam la senkompatajn elefantojn Hermon ebriigis, ĝis ili estis plenaj je multe da vino kaj satigitaj de incenso, frumatene li ĉeestis ĉe la korto, por raporti al la reĝo pri ĉi preparoj. 11 Sed la Sinjoro sendis sur la reĝon porcion da dormado, ĉi bonfaraĵon, kiun de la komenco, tage kaj nokte, Li disdonas al kiuj Li volas. 12 Kaj per ĉi ago de la Sinjoro li estis venkita de tiel agrabla kaj profunda dormo, ke li komplete fiaskis en sia maljusta intenco kaj komplete frustriĝis en sia neskuebla plano. 13 Kaj la Judoj, ĉar la fiksitan horon ili eskapis, laŭdis sian sanktan Dion kaj refoje alvokis Lin, kiu facile repaciĝas, por montri al la arogantaj paganoj la potencon de Sia ĉiopova mano.

14 Sed ĉar nun jam estis preskaŭ la mezo de la deka horo, la viro, kiu okupiĝis pri la invitoj, vidante ke jam kunvenis ĉiuj gastoj, aliris al la reĝo kaj skuetis lin. 15 Kiam pene li estis vekinta lin, li indikis, ke la horo de l' bankedo estas foriranta, kaj raportis pri la situacio. 16 La reĝo, tion konsiderinte, reiris al sia drinkado, kaj ordonis la homojn, kiuj venis por la bankedo, ke ili ekkuŝu kontraŭ li. 17 Post kiam tio okazis, li invitis ilin fordoni sin al gajeco kaj des pli ĝui la malfruigitan bankedon.

18 Kiam la festo jam iom daŭris, la reĝo venigis Hermonon, kaj sub akraj minacoj petis informon, kial tiun tagon oni lasis vivi la Judojn. 19 Sed kiam, kun apogo de la <reĝaj> amikoj, li montris, ke ankoraŭ dum la nokto li komplete plenumis la ricevitan ordonon, 20 la reĝo, kiu havis sovaĝecon pli grandan

ol tiu de Falariso\*, diris, ke la Judoj profitis de lia tiutaga dormo: Sed morgaŭ – li aldonis –: senprokraste vi sammaniere preparu la elefantojn por neniigi la senleĝajn Judojn! 21 Post ĉi vortoj de la reĝo, ĉiuj ĉeestantoj tuj kaj ĝoje donis sian aprobon, kaj ĉiuj iris hejmen. 22 Sed la nokton ili ne tiom konsumis en dormado, sed ili planadis ĉiajn humiligojn por la kompatinduloj.

23 Tuj je kokokrio frumatene, preparinte la bestojn, Hermon ekpelis ilin laŭ la granda kolonaro. 24 La amasoj el la urbo estis kunvenigitaj por ĉi plej mizera spektaklo, kaj avide atendis la tagiĝon. 25 Sed en siaj lastaj sopiroj la Judoj elstreĉis la manojn al la ĉielo, kaj sub la plej ĉagrena implorado kaj lamenta ĉantado ili alvokis la Plejaltan Dion denove helpi al ili. 26 La sunradioj ankoraŭ ne brilis, kaj dum la reĝo bonvenigis siajn amikojn, Hermon jam alvenis kaj petis lin iri eksteren, dirante ke, kion la reĝo deziris, estas preta. 27 Sed, ricevante ĉi raportaĵon kaj frapite de la nekutima invito iri eksteren – ĉar li estis komplete venkita de nekompreneo –, li demandis, kio do estas, kial ĉi tio estis tiel haste pretigita por li.

28 Ankaŭ tio estis ago de l' Sinjoro, kiu regas ĉion, ĉar en la menso de la reĝo Li metis forgeson pri kion antaŭe li estis ordoninta. 29 Tiam Hermon kaj ĉiuj amikoj de la reĝo indikis, ke pretas la bestoj kaj la armitaj trupoj: Jen ho reĝo, laŭ via insista deziro. 30 Sed ĉe tiuj vortoj lin kaptis profunda kolero, ĉar per la providenco de Dio lia menso estis tute perturbita koncerne tiujn aferojn; kaj kun minaca rigardo li diris:

31 Se viaj nun gepatroj aŭ idar' ĉeestus\*,

mi preparus tiujn por esti riĉa bankedo por la sovaĝaj bestoj anstataŭ la Judoj, kiuj tute ne igas min plendi kaj kiuj ĝisekstreme montris plenan kaj firman lojalecon al miaj gepatroj. 32 Fakte vi estus senigitaj je la vivo anstataŭ ili, se ne estus pro certa amsento, ĉar ni kune ekkreskis kaj ĉar vi estas utilaj.

33 Tiel do Hermon suferis neatenditan kaj danĝeran minacon, kaj liaj okuloj kaj lia vizaĝo malsereniĝis. 34 La amikoj de la reĝo, unuj post aliaj, malgaje forŝteliĝis, kaj ili forsendis la

amasigintajn homojn al iliaj propraj okupoj. 35 Kaj tiam, aŭdante kion diris la reĝo, la Judoj laŭdis la manifestan Sinjoron Dio, la reĝon de la reĝoj, ĉar ankaŭ ĉi tie Lian helpon ili ricevis.

36 La reĝo tamen rekunvokis la festenantojn je la sama maniero, kaj igis ilin reiri al sia festado. 37 Sed veniginte Hermonon, li diris minace: Kiom da fojoj, ho mizerulo, mi devas ordoni al vi pri ĉi tio? 38 La elefantojn tuj nun vi pretigu por morgaŭ neniigi la Judojn! 39 Sed la gravuloj, kiuj estis ĉetable kun li, mirante pri lia mensa nestabileco, jene protestis: 40 Ho reĝo, kiel longe vi elprovos nin, kvazaŭ ni estus idiotaj, nun triafoje ordonante ke ili estu neniigitaj, sed ĉiam vi revokas vian dekreton! 41 Rezulte de tio la urbo nun en streĉa atendado estas en ĥaoso; ĝi estas plena je homamasoj, kaj daŭre riskas esti prirabita.

42 Ĉe tio la reĝo, jam ĉiel kvazaŭ iu Falariso kaj plena je frenezo, neniom atentis pri la mensaj ŝanĝiĝoj, kiuj okazis al li koncerne la kontroladon de la Judoj, kaj li firme ĵuris nerevokeblan ĵuron, ke li senprokraste sendos ilin en Hadeson, distretitajn de genuoj kaj piedoj de la bestoj, 43 kaj ke li atakos Judujon por baldaŭ perfajre kaj lance egaligi ĝin al la grundo, kaj ke, ĝistere bruligante tiun « por ni ne alireblan » templon, li rapide senigos ĝin poreterne de homoj, kiuj tie prezentas oferaĵojn. 44 Tiam la amikoj kaj la gravuloj foriris kun granda ĝojo, kaj plenkonfide ili starigis armitajn soldatojn en tiuj lokoj de la urbo, kie estis plej konvene gardostari.

45 Kiam la bestoj efektive estis, se tiel diri, ĝisfreneze ebriiĝitaj de la vere bonodora drinkaĵo el vino miksitaj kun incenso kaj provizitaj de timigaj iloj, la elefantestro 46 ĉirkaŭ tagiĝo venis en la korton – la urbo nun estis plenigita je sennombraj amasoj irantaj al la hipodromo –, kaj li instigis la reĝon al la plenumota afero. 47 Do pleniginte sian malpian menson per profunda kolero, plenforte li eksturmis kun la bestoj, esperante, ke kore nevundeble li proprokule estos atestanto de la terura kaj kompatinda neniigo de l' menciitoj.

48 Kiam la Judoj ĉe la pordego la suprenflugantan polvon de la elefantoj vidis, kaj de la armitaj trupoj post ili, kaj de la piedfrapanta amaso, kaj aŭdis la laŭte ĉantan bruegon, 49 ili pensis, ke tio estas ilia lasta momento de vivado, la fino de ilia plej mizera timo, kaj cedante al lamentado kaj plendado, ili kisis unu l' alian, brakumante parencojn kaj al la aliaj falante en la brakojn – gepatroj al infanoj, patrinoj al filinoj, kaj aliaj kun ĉebruste beboj, kiuj trinkis sian lastan lakton. 50 Ne nur ĉi tio, sed kiam ili konsideris kian helpon antaŭe ili ricevis el la ĉielo, ili adorkliniĝis unumove surplanken, forigante la bebojn de la brusto, 51 kaj ili forte ekkriis laŭtavoĉe, petegante la reganton pri ĉiu potenco, ke Li manifestiĝu kaj indulgu pri ili, ĉar ili jam staras ĉe la pordoj de Hadeso.

### *La preĝo de Eleazar*

**6:1** Certa Eleazar\*, fama inter la pastroj de la lando, kiu atingis jam maturan grandaĝon kaj kiu tra la tuta vivo estis honorata de ĉiu virto, tiumomente ordonis la pliaĝulojn ĉirkaŭ li, ke ili ĉesu alvoki la sanktan Dion, kaj li jene preĝis:

2 Reĝo grandpotenca, Plejalta ĉiopova Dio, kiu regas la tutan kreaĵon kun kompatemo, 3 rigardu do la posteulojn de Abraham, ho Patro: rigardu la infanojn de la benata Jakob, popolon de Via sanktigita porcio, kiu estas pereanta kiel fremduloj fremdlande.

4 Vi Faraonon<sup>121,122</sup> kun ties abundo da ĉaroj, la siatempan reganton de ĉi tiu Egiptujo, kiu gloris sin per senhonta kaj troaŭdaca lango, – Vi neniigis lin kune kun lia aroganta armeo, dronigante ilin en la maro, montrante la lumon de Via kompato

---

<sup>121</sup> Elr 14:28.

<sup>122</sup> Simila intenca apudmeto de subjekto kaj objekto en la Greka.

al Izrael. 5 Vi Senaĥeribon<sup>123</sup>, kiu jubilis pri siaj sennombraj trupoj, ĉi subpremantan reĝon de l' Asirianoj, kiu per la lanco jam akiris regadon super la tuta tero kaj kiu altigis sin kontraŭ Via sankta urbo, fanfarone kaj troaŭdace eligante blasfemiaĵojn, – Vi, ho Sinjoro, dispecigis lin, montrante Vian potencon al multe da nacioj. 6 La tri amikojn en Babel<sup>124</sup>, kiuj libervole transdonis sian vivon al la flamoj por ne servi al vanaj objektoj, – tiujn, ho Sinjoro, Vi savis (sendamaĝaj eĉ ĝis la hararo), humidigante la brulan fornon per roso kaj direktante la flamojn al iliaj malamikoj. 7 Danielon<sup>125</sup>, kiu pro envia kalumnio estis ĵetita en la kavon de leonoj kiel nutraĵo por la sovaĝaj bestoj, – lin sendamaĝa Vi rekondukis al la lumo. 8 Kaj Jonan, kiu pereadis en la ventro de grandega mar-monstro, – lin, Patro, Vi prigaradis kaj sendamaĝa redonis al lia paren caro. 9 Kaj nun, Vi, malamanto de senhonto, plej kompatema, ĉies protektanto, rapide malkaŝu Vin al tiuj el la Izraelidoj, kiuj estas perforte mistraktataj de la teruraj kaj senleĝaj paganoj.

10 Eĉ se niaj vivoj dum ĉi ekzilo implikiĝis en malpiaĵoj, Vi tamen savu nin el la manoj de l' malamiko, ho Sinjoro, kaj neniigu nin per kiun ajn fatalon Vi deziras. 11 Sed la vanamensuloj ne laŭdu siajn vanaĵojn ĉe la neniigo de Viaj amatoj, dirante: Eĉ ilia Dio ne savis ilin. 12 Sed Vi, ho Eternulo, kiu havas ĉiun potencon kaj povon, Vi nun gardu pri ni. Kompatu nin, kiuj kvazaŭ perfiduloj estas senigataj de l' vivo per la troaŭdaco de l' senleĝuloj. 13 Kaj hodiaŭ forkaŭriĝu la paganoj pro timo je Via nevenkebla potenco, ho Honorato, kiu havas la povon savi la genton de Jakob. 14 La tuta amaso de l' infanoj kune kun iliaj gepatroj plorante petegas Vin. 15 Estu montrite al ĉiuj paganoj, ke Vi flankas ĉe ni, ho Sinjoro, kaj ke Vi ne

---

<sup>123</sup> 2 Reĝ 18:13; 19:35-37.

<sup>124</sup> Dan 3:20-93 (26).

<sup>125</sup> Dan 6:20-24.



forturnis Vian vizaĝon de ni; sed kiel Vi diris: Eĉ en la lando de iliaj malamikoj Mi ne neglektis ilin<sup>126</sup> – tiel Vi do plenumu, ho Sinjoro.

### *Ŝanĝiĝo en la sinteno de la reĝo*

16 Ĝuste kiam Eleazar estis finanta sian preĝon, alvenis en la hipodromon la reĝo kun la bestoj kaj la tuta blekegado de liaj trupoj. 17 Kaj kiam tion vidis la Judoj, ili levis laŭtajn kriojn ĉielen, tiel ke la ĉirkaŭaj valoj reeĥis tion kaj estigis neregeblan teruron en la tuta armeo. 18 Tiam la plej glora, la ĉiopova kaj vera Dio malkaŝis Sian sanktan vizaĝon kaj malfermis la ĉielajn pordojn, el kiuj descendis du anĝeloj de timiga aspekto, videblaj por ĉiuj krom por la Judoj. 19 Ili kontraŭis la forton de l' malamiko kaj plenigis ilin per konfuziĝo kaj teruro, ligante ilin per neforigeblaj katenoj. 20 La reĝo ekskuiĝis tutkorpe, kaj li forgesis sian malafablan senhonton. 21 Kaj la bestoj returniĝis kontraŭ la armitaj trupoj, postsekvis tiujn kaj komencis distreti kaj neniiĝi ilin.

22 Tiam la kolero de la reĝo ŝanĝiĝis en ĉagrenon kaj larmojn pro tio, kion antaŭe li estis planinta. 23 Ĉar kiam li aŭdis la kriadon kaj vidis ilin ĉiujn fali rekte en pereon, li ekploris kaj kolere minacis siajn amikojn, dirante: 24 Vi kulpas perfidon kaj en kruelo vi superas tiranojn; kaj eĉ min, vian bonfaranton, vi nun provas senigi de la regado kaj de la vivo, kaŝe planante agojn neniel utilajn por la reĝlando.

25 Kiu do forpelis el iliaj hejmoj tiujn, kiuj fidele gardis la fortikaĵojn de la lando, kaj stulte kunigis ilin ĉi tien? 26 Kaj kiu tiel senleĝe per terura traktado ĉirkaŭpremis tiujn, kiuj jam dekomence malsimilis je ĉiuj ceteraj nacioj en sia bonvolemo al ni, kaj kiuj tiel ofte volonte eltenis la plejajn danĝerojn? 27

---

<sup>126</sup> Rdm 26:44.

Malligu, forigu do iliajn maljustajn katenojn! Resendu ilin en paco al iliaj hejmoj, pardonpetante pro viaj antaŭaj agoj. 28 Liberigu la infanojn de l' plejalta vivanta Dio de la ĉielo, kiu ekde la epoko de niaj gepatroj ĝis nun donis senkontestan kaj firman stabilecon al nia regado.

29 Ĉi tion li diris; kaj <la Judoj>, tuj liberigitaj, laŭdis sian sanktan Dion kaj Savanton, ĉar nun ili eskapis la morton.

### *La Judoj festas sian saviĝon*

30 Tiam do la reĝo, reveninte al la urbo, venigis la funkciulon taskitan pri la enspezoj kaj ordonis al li, liveri al la Judoj vinojn kaj ĉion ceteran, kion ili bezonis, por festeno de sep tagoj, decidante, ke ili festu sian saviĝon plengoje samloke, kie antaŭe ili atendis perei. 31 Sekve la homoj malhonore traktitaj, kiuj jam estis apude al Hadeso, aŭ prefere: kiuj estis jam starantaj ĉe ties pordegoj, anstataŭ la amara kaj lamentinda morto nun aranĝis al si saviĝo-bankedon, kaj plengoje ili disdividis inter celebrontoj la lokon, kiu estis destinita por ilia falo kaj tombo. 32 Ili ĉesis pri siaj ĉagrenaj plendokantoj, kaj reprenis la kantadon de siaj gepatroj, laŭdante Dion, la savanton kaj miraklo-faranton. Fininte ĉiujn lamentojn kaj ploradon, ili formis ĥorojn<sup>127</sup> kiel signo de pacplena gajeco. 33 Same ankaŭ la reĝo, aranĝinte grandan bankedon por festi ĉi tion, senĉese kaj malavare dankadis la ĉielon pro la neatendata savo, kiun li spertis. 34 Kiuj antaŭe estis kredintaj, ke la Judoj estos neniigataj kaj fariĝos nutraĵo por la birdoj, kaj kiuj plengoje registradis ilin, suspiris kiam ili mem estis venkitaj de la malhonoro, kiu trafis ilin, kaj ilia fajrospira troaŭdaco estis hontige estingita.

35 La Judoj, kiel dirite, aranĝis la menciitan ĥoron kaj pasigis la tempon en festado kun ĝojplena dankado kaj psalmoj.

---

<sup>127</sup> Same kiel tuj poste, ĉi vorto ankaŭ povas indiki dancogrupon.

36 Kaj kiam ili ordonis publikan riton por ĉi aferoj en sia tuta komunumo kaj por siaj posteuloj, ili ordonis la celebradon de ĉi menciitaj tagoj kiel festotagoj, ne por drinkado kaj por frandadi, sed ĉar dank' al Dio ili estis liberigitaj. 37 Tiam ili petis la reĝon, ke ili povu foriri hejmen.

38 Ilia registriĝo do estis farata de la dudekkvina tago de *paĥon* ĝis la kvara de *epejff*<sup>128</sup>, kvardek tagojn; kaj ilia neniigo estis fiksita de la kvina ĝis la sepa de *epejff*, la tri tagojn, 39 dum kiuj ĉies Sinjoro plej glorie malkaŝis Sian kompaton kaj savis ilin ĉiujn sendamaĝe. 40 Tiam ili festis, provizite de la reĝo pri ĉio, ĝis la dekkvara tago, en kiu ili ankaŭ petis ke ili povu foriri. 41 La reĝo tuj permesis tion, kaj skribis por ili la sekvan leteron al la generaloj en la diversaj urboj, kun fervora grandanimeco:

### *Letero de la reĝo favore al la Judoj*

7 1 Reĝo Ptolemeo Filopator al la generaloj de Egiptujo kaj al ĉiuj aŭtoritatuloj en la registaro: Saluton kaj bonfarton:

2 Ni kaj niaj infanoj fartas bone, ĉar la granda Dio gvidas niajn aferojn, kiel ni tion deziras. 3 Kelkaj el niaj amikoj, ofte urĝante nin kun malica intenco, persvadis nin kunigi ĉiujn Judojn de nia regno en unu tutajon kaj trafi ilin per barbaraj punoj kvazaŭ perfidulojn; 4 ĉar ili asertis, ke nia regado neniam estos firme establita, ĝis ĉi tio plenumiĝos, pro la malbonvolo, kiun ĉi tiuj montris al ĉiuj nacioj. 5 Ili ankaŭ elkondukis ilin, malmole traktante ilin kiel sklavojn aŭ pli ĝuste: kiel perfidulojn, kaj sen enketado aŭ pridemandado ili provis mortigi ilin, montrante kruelon pli sovaĝan ol tiu de l' Skitaj kutimoj. 6 Sed tre severe ni minacis ilin pro ĉi agoj, kaj kun la kompatemo, kiun ni havas

---

<sup>128</sup> Nomoj de monatoj; laŭ *The New Oxford Annotated Bible* temas pri la periodo de la 7a de julio ĝis la 15a de aŭgusto. Laŭ *The Old Testament Pseudepigrapha*, vol. 2, ĉi Egiptaj monatoj indikas respective la 26an de aprilo ĝis la 25a de majo, kaj la 25an de junio ĝis la 24a de Julio.

por ĉiuj homoj, apenaŭ ni indulgis ilian vivon. Ni ekkonsciis, ke la Dio de l' ĉielo certe defendas la Judojn, ĉiam flankante ĉe ili kiel Patro ĉe siaj infanoj, 7 kaj ĉar ni atentis la amikecan kaj firman bonvolemon, kiun ili montris al ni kaj al niaj gepatroj, ni juste senŝarĝis ilin de kiu ajn kulpigo. 8 Ni ankaŭ ordonis al ĉiuj reiri al la propraj hejmoj, ĉar neniu ie ajn ĉagrenos aŭ riproĉos ilin pri la neraciaj aferoj kiuj okazis. 9 Ĉar vi sciu, ke se iun ajn malbonon ni planus aŭ iun ajn ĉagrenon ni kaŭzus kontraŭ ili, ni ĉiam havos por venĝi tion ne iun mortemulon, sed la Reganton super ĉiuj potencoj, la Plejaltan Dion, kiel ĉiel neeskapeblan kontraŭulon. Fartu bone.

10 Ricevinte ĉi tiun leteron, la Judoj ne tuj rapidis por foriri, sed de la reĝo ili petis, ke tiuj el la Juda nacio, kiuj libervole transpaŝis kontraŭ la sankta Dio kaj la leĝo de Dio, el iliaj propraj manoj ricevu la merititan punon. 11 Ili deklaris ke, kiuj pro frandado transpaŝis la Diajn ordonojn, neniam estos favoraj al la aferoj de l' reĝo. 12 La reĝo do, akceptante kaj jesante la veron de iliaj diroj, donis al ili tute vastan permeson, ke sen reĝa aprobo aŭ kontrolo ili rajtu neniigi ĉiun en lia reĝlando, kiu transpaŝis la Dian leĝon.

### *Ĝoja foriro hejmen de la Judoj*

13 Kiam ili aplaŭdis lin, kiel decis, iliaj pastroj kaj la tuta amaso kriadis haleluja, kaj ili disiris plenĝojaj. 14 Kaj tiel ili punadis survoje, kaj publike kaj hontige ili mortigis ĉiun renkontitan samnacionon, kiu estis malpurigita. 15 Tiutage ili mortigis pli ol tri cent virojn; kaj ili tenis tiun tagon kiel ĝojan feston, ĉar la profanulojn ili neniigis. 16 Sed kiuj retenis Dion eĉ ĝismorte kaj kiuj ricevis plenan kontentigon de l' saviĝo, komencis foriri el la urbo, ornamitaj de ĉiaj floroj bonodoraj, ĝoje kaj laŭte kun vortoj de laŭdo kaj ĉiuspecaj belsonaj himnoj dankante al la Dio de l' gepatroj, la eterna Savanto de Izrael.

17 Kiam ili alvenis al Ptolemaido, kiu pro la karaktero de la loko nomigās rozoporta, la floto atendis ilin, laŭ ĝenerala deziro jam sep tagojn. 18 Tie ili festis sian saviĝon, ĉar la reĝo larĝanime provizis ĉion al ili por ilia vojaĝo ĝis ili ĉiuj atingos la hejmon. 19 Kaj kiam ili en paco alvenis kun konvena dankado ankaŭ tie, ili decidis same festi ĉi tagojn kiel gajan feston dum ilia tiea loĝado. 20 Tiam, enskribinte ilin kiel sanktajn tagojn en steleon kaj dediĉinte preĝlokon por la festado, ili foriris sendamaĝaj, liberaj, kaj plej ĝojaj, ĉar laŭ ordono de la reĝo, trans teron, maron kaj riveron, ili ĉiuj estis sekure transportitaj al siaj hejmoj. 21 Ili ankaŭ ekhavis pli da estimo inter siaj malamikoj ol antaŭe kun honoro kaj respekto. Kaj neniu eldevis al ili la posedaĵojn. 22 Male, ili ĉiuj rericevis siajn posedaĵojn, laŭ la registriĝo, tiel ke kiuj tenis ion el ĝi, tre timeme rehavigis ĝin al ili. Tiel la Plejalta Dio perfekte plenumis grandajn farojn por ilia saviĝo. 23 Benata estu la Savanto de Izrael por eterne! Amen.

## Notoj al 3 Makabeoj

1:1 La komploton de Teodoto kontraŭ reĝo Ptolemeo la 4a Filopator malebligas la Juda renegato Dositeo; poste la Egiptaj armeoj venkas la trupojn de Antioĥo. Vidu la decidigan rolon de l' fratino de la reĝo, Arsinoa.

Rafia estas en la sudo de Palestino. La tiea batalo estas konata ankaŭ el Polibio – *Historio*, 5:79-86.

La bildo, kiun donas la teksto pri Ptolemeo, akordas kun la konataj faktoj: lia ŝato de bankedoj, lia preteco je kapricoj de l' korteganoj, lia espero unuigi Judojn kaj Grekojn en adorado de Dionizo, kiun sub la nomo Sabazio eble oni identigis je la Hebrea Sebaot.

1:9 Sankta loko – templo.

2:25 Antaŭe menciitaj – aŭ signo, ke la originan enkondukon oni mallongigis aŭ ke perdiĝis iu parto.

3.21 Judoj plurfoje troviĝis en altaj postenoj. Tio jam konstateblas el papirusaj tekstoj el Elefantino en la 5a jc a.Kr., ĉar nome de la Persoj tie kaj en Assuan jam

postenis Juda garnizono por ŝirmi la sudajn limojn. La Ptolemeoj transprenis tiun politikon.

4:11 Ŝhedio – regionoj de doko, pli malpli tri mejlojn de la urbo.

4:17 Neebleco kalkuli la Judojn – ĉiuj kvantoj estas klare simbolaj. Tempe de Filono de Alesandrio, la Juda loĝantaro grande kreskis – laŭ lia takso (*Flako* 6) estis unu miliono.

5:2 Ĉe la batalo de Rafia la reĝo havis sepdek tri elefantojn, kiu estis konsiderata granda kvanto. Ĉi tiu nombro kvincent do klare estas troigo.

5:5 Ligi la manojn. Tio jam okazis laŭ 3:25 ; 4:9.

5:20 Falariso – tirano de Agrigento, 6a jc a.Kr. Li ŝatis rosti homojn vivaj interne de bronza virbovo, ĝuante ilian kriadon.

5:31 Verso jamba – eble cito el nekonata teatraĵo.

6:1 Eleazar renkontiĝas, kiel « tipo » de saĝeco surbaze de longa vivdaŭro, ankaŭ en 2 Mak 6:18 ; 4 Mak 6:5 ; 7:1.

## 4 Makabeoj

### Enkonduko al 4 Makabeoj

La libro *4 Makabeoj* je certa momento estis atribuata al Flavio Jozefo sub la titolo *La supereco de la racio*. La literatura formo estas, kion oni nomas diatribo aŭ prelego, eble panegiro, pri la supereco de la racio super la pasioj, ĉe kio la historion de la martiriĝo de Eleazar kaj la sep fratoj Makabeaj oni prenas kiel ekzemplojn. Ĉar temas pri pli ampleksa traktado de 2 Mak 6:12-7:42, oni venis al la nun ĝenerala indiko 4 Mak.

La verko estas klasika ekzemplo de interpretado de Judismo en nocioj el la Greka filozofio. Precipe Stoikaj ideoj formas la terminologian kadron. La multaj bibliaj citoj venas nur el la Septuaginto.

La libro origine estis verkita en la Greka, en bona t.n. Azia stilo. Eble unuafoje oni aŭdigis ĝin kiel diatribon okaze de memorada celebrado pri la Makabeaj martiroj aŭ ĉe la Festo de Konsekro<sup>129</sup>.

---

<sup>129</sup> 1:10; 3:19; 14:9; komparu kun Jh 10:22.

La teologio de l' aŭtoro, emfazante la suverenecon de la Torao, estas pure Juda, sed kun du specifaj trajtoj : martireco estas ia anstataŭa punsufero liberiga por la popolo kaj la lando<sup>130</sup> kaj la martiroj tuj fariĝas senmortaj, bonvenigataj de la patriaĥoj kaj vivantaj ĉe Dio<sup>131</sup>.

Fakuloj konstatis diferencojn inter 2 Mak, kiu reflektus Persan influon emfazante la korpan resurekton, kaj 4 Mak, kiu montrus ĉojn de la Greka nocio de l' senmorteco de la animo.

Tempo de verkado povus esti inter 20-54 p.Kr., kiam Kilikio estis kunigita al Sirio kaj Fenicio en unu provincon (4:2), kaj estas alloga ideo ke temas pri la regado de imperiestro Kaligulo (37-41), kiu proponis profani la templon de Jerusalemo (vidu 4:5-14). Sed ĉar primare temas pri filozofia diskuto, tio restas neklara. Certe la verko devas datiĝi de tempo inter la fino de la Hasmonea dinastio en 63 a.Kr. kaj la neniigo de la templo en 70 p.Kr.

Kiel lokon de verkiĝo oni proponis Aleksandrion, sed ankaŭ Jerusalemo estas serioza kandidato ; tamen Antioĥio havas eble la preferon, ĉar povas esti ke la martirojn oni kondukis al la reĝa palaco (5:1) kaj en Antioĥio oni uzis la nomon Hebreoj por la Judoj, kiel ĉi-libre.

Oni povas dividi la verkon jene :

1:1-12 La filozofia temo: ĉu la emocioj pli fortas aŭ la racio?

1:13-35 Tezo: la racio estas pli forta

2:1-23 La Leĝo estas en akordo kun la racio

---

<sup>130</sup> 1:11; 17:21; 18:4.

<sup>131</sup> 7:19; 16:25.



- 2:24-3:18** La racio regas la emociojn; vidu reĝon David
- 3:19-4:14** La Dia puno al Apolonio en la templo
- 4:15-26** La sovaĝa reago de Antioĥo kontraŭ la Judoj
- 5:1-38** Konfrontiĝo de Antioĥo kun Eleazar
- 6:1-35** La mirinda kuraĝo de Eleazar
- 7:1-23** Laŭdo pri Eleazar
- 8:1-9:9** La reĝo petas la sep fratojn forlasi sian gepatran religion
- 9:10-32** Torturiĝo kaj defio de l' unuaj du fratoj
- 10:1-21** Torturiĝo kaj defio de l' sekvaj du fratoj
- 11:1-12:19** Torturiĝo kaj defio de la lastaj fratoj
- 13:1-14:10** Laŭdo pri ili: la racio venkis
- 14:11-17:6** La patrino kiel la plej mirinda ekzemplo pri la venko de la racio
- 17:7-18:5** La efiko de la martiriĝoj
- 18:6-24** La paroloj de l' patrino al siaj infanoj

## 4 Makabeoj

*La filozofia temo: ĉu la emocioj pli fortas aŭ la racio?*

1:1 Plej filozofia estas la temo, kiun mi traktos, tio estas, ĉu pia racio absolute regas super emocioj. Mi do prave admonus vin serioze atenti pri la filozofio. 2 Ĉar la temo estas deviga por ĉiu, kiu serĉas scion, kaj ĝi ankaŭ entenas laŭdon pri la plej alta virto\* – mi kompreneble volas diri: pri prudento. 3 Se do estas klare, ke la racio regas super tiuj emocioj, kiuj malhelpas sinregadon, nome super frandemo kaj avido, 4 same estas klare, ke ĝi venkas super la emocioj, kiuj detenas onin de justeco, nome super malico, kaj super tiuj, kiuj detenas de kuraĝo, nome kolero, timo kaj doloro. 5 Kelkaj eble eĉ emus demandi: Se do la racio regas super la emocioj, kial ĝi ne regas super forgesemo kaj senscio? Sed tio estas ridinda. 6 Ĉar la racio ne regas siajn proprajn emociojn, sed tiujn <emociojn>, kiuj kontraŭas al justeco, kuraĝo kaj sinregado; kaj ne kun la celo neniigi ilin, sed por ke oni ne cedu al ili.

7 Mi povus pruvi al vi el multaj kaj plej diversaj ekzemploj, ke la racio regas super la emocioj, 8 sed plej bone mi povus montri tion el la nobla kuraĝo de tiuj, kiuj mortis

pro la virto: Eleazar<sup>132</sup> kaj la sep fratoj kaj ilia patrino. 9 Ĉar ili ĉiuj, malŝatante la mortigajn suferojn, montris, ke la racio regas super la emocioj. 10 Ĉe la nuna dato<sup>133</sup> decas al mi laŭdi pro iliaj virtoj tiujn, kiuj, kun la patrino, mortis pro nobleco kaj bono<sup>134</sup>, sed mi ankaŭ nomus ilin benataj pro ilia honoro. 11 Admirate ja, ne nur de ĉiuj homoj, pro siaj kuraĝo kaj eltenkapablo, sed eĉ de siaj torturistoj, ili fariĝis la kialo por la disfalo de la tiraneco super ilia nacio. Ili venkis la tiranon per sia eltenemo, tiel ke dank' al ili ilia patrujo estis purigita. 12 Sed baldaŭ mi havos eblon por paroli pri tio; sed, kiel estas mia kutimo, mi unue konigos mian bazan tezon, kaj tiam mi reiros al ilia historio, glorante la ĉio-saĝan Dion.

*Tezo: la racio estas pli forta*

13 Ni serĉas, do, ĉu la racio regas super la emocioj. 14 Ni decidus, ĝuste kio estas la racio kaj kio estas la emocio, kaj kiom estas da specoj de emocio, kaj ĉu la racio regas ilin ĉiujn. 15 La racio do estas la menso, kiu kun sana logiko preferas la vivon en saĝeco. 16 Kaj saĝeco nun estas scii pri l' Diaj kaj homaj aferoj kaj pri iliaj kaŭzoj. 17 Ĉi tio, siavice, estas la edukigo en la Leĝo, per kiu respektive ni lernas la Diajn aferojn kaj avantaĝe la homajn aferojn. 18 La specoj de saĝeco estas: racia juĝo, justeco, kuraĝo kaj sinregado<sup>135</sup>. 19 Racia juĝado superas ĉiujn el ili, ĉar per ĝi la racio regas la emociojn. 20 La du plej ampleksaj tipoj de emocioj estas plezuro kaj sufero; kaj ambaŭ

---

<sup>132</sup> 2 Mak 6:18; 3 Mak 6:1.

<sup>133</sup> Laŭ kelkaj oni supozeble celebre memoris la datrevenon de ilia morto aŭ alian memorigan feston.

<sup>134</sup> La termino por *nobleco kaj bono*, καλοκάγαθία, estas tipa por la klasika Greka kulturo.

<sup>135</sup> Saĝ 8:7.

ili laŭnature koncernas la korpon kaj la animon. 21 La emocioj de plezuro kaj sufero ambaŭ havas multajn konsekvencojn. 22 Deziro antaŭas plezuron kaj ĝuo ĝin sekvas. 23 Timo antaŭas suferon kaj bedaŭro venas poste. 24 Kolerio, kiel la homo vidos pripensante siajn spertojn, estas emocio, kiu ampleksas plezuron kaj suferon. 25 Eĉ en plezuro ekzistas malica tendenco, kiu estas la plej kompleksa de ĉiuj emocioj. 26 En la animo estas fanfaronado, monhavemo, honoro-soifo, rivalemo, kaj kalumnio; 27 en la korpo estas sendistinga manĝado, glutemo, kaj soleca frandemo.

28 Same kiel plezuro kaj sufero estas du plantoj, kiuj kreskas el korpo kaj animo, tiel same ekzistas multaj plantidoj el ili. 29 Kaj la ĉefkultivisto, la racio, prisarkas, pritondas, ligas kaj akvumas kaj funde irigacias ilin ĉiujn, kaj tiel li dresas la ĝangalon de kutimoj kaj emocioj. 30 Ĉar la racio estas la gvidanto de la virtoj, sed ĝi regas la emociojn.

Nun vi atentu do, unue, ke la racio regas super la emocioj dank' al la limiga potenco de sinregado. 31 Kaj sinregado estas regado super la deziroj. 32 Kelkaj deziroj estas mensaj, aliaj fizikaj, sed la racio regas ŝajne pri ambaŭ. 33 Ĉar alie, kiel eblus, se ni estas altirataj al aferoj malpermesitaj, ke ni rezignas pri la plezuro, kiun ni povus ricevi el ili? Ĉu ne pro tio, ke la racio kapablas regi la dezirojn? Almenaŭ mi tiel opinias.

34 Tiel, se ni deziras maraĵojn, birdaĵon, kvarpiedaĵon aŭ ĉiaspecajn manĝaĵojn, kiujn la Leĝo malpermesas al ni, ni rezignas, ĉar nin regas la racio. 35 Ĉar la emocioj de l'emoj estas bremsataj, retenataj de la moderiga menso, kaj ĉiujn impulsojn de la korpo buŝumas la racio.

## *La Leĝo estas en akordo kun la racio*

**2:** 1 Kial <estus> mirige, ke senfortiĝas la mensaj deziroj pri ĝuo de la belo<sup>136</sup>? 2 Certe pro tio la sinreganta Jozefo<sup>137</sup> estas laŭdata, ĉar per mensa klopodo li venkis la seksan deziron. 3 Ĉar estante juna kaj en sia pleja emo je sekskuniĝo, li neniigis la frenezon de la pasioj per sia racio. 4 Ne nur montriĝis la racio reganta super la freneza seksa deziro, sed ankaŭ pri ĉia deziro. 5 Tiel diras la Leĝo: *Vi ne deziros la edziĝon de via najbaro nek ion, kio apartenas al via najbaro*<sup>138</sup>. 6 Fakte, ĉar la Leĝo diris al ni, ke ni ne deziru, mi povus pruvi al vi des pli forte, ke la racio povas regi la dezirojn.

Tute same statas pri la emocioj, kiuj detenas onin de justeco. 7 Ĉar alie, kiel eblus ke kiu kutime estas soleca frandemulo, glutemulo aŭ eĉ drinkemulo, povas reedukiĝi, krom se klare la racio regas super la emocioj? 8 Do, tuj kiam iu akceptas vivstilon laŭ la Leĝo, eĉ se estante mon-amanto, li devige agas kontraŭ sia natura emo, kaj pruntedonas al la bezonuloj sen rentumo, kaj nuligas la ŝuldon, kiam alvenas la sepa jaro<sup>139</sup>. 9 Kiu estas avidema, tiun regas la Leĝo pere de la racio, tiel ke li nek spikumas post la rikolto, nek kolektas la lastajn vinberojn el la vitejo.

En ĉiuj ceteraj aferoj ni povas konstati, ke la racio regas super la emocioj. 10 Ĉar la Leĝo eĉ venkas la amon al la gepatroj, tiel ke oni ne neglektas la virton pro ili. 11 Ĝi ankaŭ venkas la amon al la propra edzino, tiel ke oni forsendas ŝin, se ŝi transpaŝas la Leĝon. 12 Ĝi pli gravas ol amo al la infanoj, tiel ke oni punas ilin pro iliaj misfaroj. 13 Ĝi estas mastro super la

---

<sup>136</sup> Komparu kun la koncepto de “eroso” en Platono – *Simpozio*.

<sup>137</sup> Gen 39:7-12.

<sup>138</sup> Elr 20:17

<sup>139</sup> Elr 22:25 (24); Rdm 15:1-3.

rilatoj al amikoj, tiel ke ilin oni skoldas, kiam ili agas maldece. 14 Ne konsideru do paradoksa, se la racio – pere de la Leĝo – eĉ povas venki malamikecon: oni ne forhakas la fruktarbojn de la malamiko, sed oni eĉ ŝirmas posedaĵojn de malamikoj <kontraŭ rabistoj>, kaj helpas starigi kio falis<sup>140</sup>.

15 Estas klare, ke la racio regas eĉ pri la pli fortaj emocioj: potencavido, vanoblufado kaj fanfaronado, aroganteco kaj malico. 16 Ĉar la modera menso repuŝas ĉiujn ĉi malicajn emociojn, same kiel <ĝi repuŝas> koleron – ĉar ĝi regas eĉ pri ili. 17 Kiam Moseo estis kolera kontraŭ Datan kaj Abiram, li ne kolera ion faris kontraŭ ili, sed li regis sian koleron per la racio. 18 Ĉar, kiel dirite, la modera menso kapablas venki la emociojn, korekti kelkajn kaj senfortigi aliajn. 19 Ĉar alie Jakob, nia plej saĝa patro, kial li skoldis la familiojn de Simeon kaj Levi pro ilia neracia buĉado de l' kompleta tribo de l' Ŝehemidoj, dirante: *Malbenita estu ilia kolero*<sup>141</sup>? 20 Ĉar se la racio ne povas venki koleron, li ne estus parolinta tiel. 21 Kiam Dio formis la homon, Li enmetis en lin emociojn kaj emojn\*, 22 sed samtempe Li surtronigis la menson inter la sensoj kiel sanktan reganton pri ili. 23 Al la menso Li donis la Leĝon; kaj kiu vivas submetita al ĝi, tiu regas regnon moderan, justan, bonan kaj kuragan.

### *La racio regas la emociojn; vidu reĝon David*

24 Sed kiel do, oni eble dirus: se la racio regas la emociojn, kial ĝi ne regas ankaŭ forgesemon kaj sencion? **3:** 1 Sed tio ĉi estas komplete ridinda; estas ja evidente, ke la racio ne regas super siaj propraj emocioj, sed super tiuj de la korpo. 2 Neniu el ni ja povas elradikigi la deziron mem, sed la racio povas

---

<sup>140</sup> Aŭ: bestojn kiuj falis.

<sup>141</sup> Gen 49:7.

havigi al ni la eblon ne sklaviĝi al la deziro. 3 Neniu el ni povas elradikigi la koleron el sia menso, sed la racio povas helpi por mastri la koleron. 4 Neniu el ni povas elradikigi malicon, sed la racio povas batali niaflanke, tiel ke nin ne venkos la malico. 5 Ĉar la racio ne elŝiras la emociojn, sed estas ilia antagonisto.

6 Tio ĉi povas esti klarigita plej hele en la historio de l' soifo de reĝo David. 7 David foje tuttage estis atakinta la Filiŝtojn, kaj li mortigis multajn el ili kune kun soldatoj el la propra popolo; 8 kaj tiam, ĉe vesperigo, ŝvitante kaj sufiĉe elĉerpita, li venis al la reĝa tendo, ĉirkaŭ kiu kampadis la tuta armeo de niaj prauloj. 9 Ĉiuj ceteraj estis ĉe la mangŝo, 10 sed la reĝo estis ekstreme soifa, kaj kvankam tie li havis amason da fontoj, li ne povis satigi sian soifon el ili. 11 Sed certa neracia deziro pri la akvo en la malamika tendaro turmentis lin kaj flamigis lin, neniigis kaj konsumis lin. 12 Kiam la lancportantoj amare plendis pri ĉi deziro de la reĝo, du fortikaj junaj soldatoj, respektante la deziron de la reĝo, metis al si la plenan armaĵon, kaj kunprenante poton, grimpis trans la palisaron de l' malamikoj. 13 Kaŝante sin je la gardistoj ĉe la pordegoj, ili serĉante vagis tra la malamika kampadejo, 14 kaj trovis la fonton, kaj el ĝi al la reĝo ili kuraĝe portis trinki. 15 Sed <David>, kvankam brule soifa, konsideris trinki, kio estis vidata kiel ekvivalento je sango, tro timiga danĝero por sia animo. 16 Tial, kontraŭmetante la racion je la deziro, li elverŝis tiun trinkon kiel oferon al Dio. 17 Ĉar la modera menso povas venki la emojn kaj la emociojn kaj estingi la flamojn de l' furiozaj deziroj; 18 ĝi ankaŭ povas superi la korpajn suferojn, eĉ se tiuj estas ekstremaj, kaj per la bona nobleco de la racio malŝati ĉian regadon de emocioj.

### *La Dia puno al Apolonio en la templo*

19 Sed jen la okazo invitas nin dismeti la historion pri la modera racio.

20<sup>142</sup> Ĉar je la momento, kiam niaj prauloj ĝuadis kompletan pacon pro ilia obeado al la Leĝo, kaj kiam ili estis tiel prosperaj, ke eĉ Seleŭko Nikanor\*, la reĝo de Azio, destinis monon al ili por la servo en la templo kaj rekonis ilian regnon, – 21 ĝuste en tiu momento certaj personoj faris perturbajn aranĝojn kontraŭ la publika harmonio kaj kaŭzis diversajn katastrofojn.

**4:** 1 Certa Simon<sup>143</sup> estis politika kontraŭulo de Onias, nobla kaj bona viro, kiu tiam estis ĉefpastro dumviva. Kiam malgraŭ ĉiaj kalumnioj li ne kapablis noci Oniason en la okuloj de la popolo, li fuĝis eksterlanden kun la intenco perfidi lin. 2 Tiel li venis ĉe Apolonion, reganton de Sirio, Fenicio kaj Kilikio, kaj diris: 3 Mi venis ĉi tien, ĉar mi estas lojala al la regado de la reĝo, por raporti, ke en la Jerusalemaj trezorejoj estas dekoj da miloj privataj deponitaĵoj\*, kiuj ne estas proprietaĵo de la templo, sed apartenas al reĝo Seleŭko. 4 Kiam Apolonio eksciis ĉion tion, li laŭdis Simonon pro lia servo al la reĝo, kaj iris al Seleŭko por informi lin pri la riĉa trezoro. 5 Ricevinte la permeson trakti ĉi aferon, li iris rapide al nia lando, akompanata de la malbenita Simon kaj de tre forta militistaro. 6 Li diris, ke li venis kun la aŭtoritato de l' reĝo por ekkapti la privatajn deponitaĵojn en la trezorejo. 7 La popolo indigne protestis al liaj diroj, opiniante skandala, ke tiuj, kiuj konfidis deponitaĵojn al la sankta trezorejo, estu senigitaj de ili, kaj ili faris, kion eblis, por preventi tion. 8 Sed, laŭtigante minacojn, Apolonio plu iris al la templo. 9 Dum la pastroj kune kun virinoj kaj infanoj en la templo alvokadis Dion por ŝirmi la sanktejon, kiu tiel malŝate estis minacata, 10<sup>144</sup> kaj dum Apolonio pluiris kun armitaj trupoj por rabi la monon, el la ĉielo sur ĉevalo-dorsoj aperis anĝeloj,

---

<sup>142</sup> Vidu 2 Mak 3:1-40.

<sup>143</sup> Simon – 2 Mak 3:4; Onias la 3a – 2 Mak 3:1.

<sup>144</sup> 3 Mak 2:21-24; 6:18.



fulm-brilantaj el siaj armiloj kaj inter ili egan timtremadon estigantaj. 11 Tiam Apolonio kolapsis duonmorta en tiu parto de l' templo, kiu estis malferma por ĉiuj, elstreĉis la manojn ĉielen, kaj kun larmoj en la okuloj li petegis la Hebreojn, ke ili preĝu la ĉielan armeon mildigi la venĝemon. 12 Ĉar li diris, ke li faris pekon, kiu meritas la morton, kaj ke se li estos indulgata, li laŭdos la benatecon de la sankta loko antaŭ ĉiuj homoj. 13 Tuŝate de ĉi vortoj, la ĉefpastro Onias, malgraŭ sia hezitemo, tamen preĝis por li, por ke la reĝo Seleŭko ne supozu, ke Apolonio estis venkita de homa perfido sed ne de Dia justeco. 14 <Apolonio> do, neatendite savita, foriris por raporti al la reĝo, kio okazis al li.

### *La sovaĝa reago de Antioĥo kontraŭ la Judoj*

15\*<sup>145</sup> Kiam la reĝo Seleŭko mortis, lia filo Antioĥo Epifanes transprenis la regadon, aroganta kaj perfortema viro, 16 kiu forpelis Oniason de la pastreco kaj faris Jasonon, lian fraton, ĉefpastro anstataŭ li. 17 <Jason> promesis ke, se la funkcio estos transdonita al li, li pagos al la reĝo po tri mil sescent sesdek talantoj jare. 18 Tial la reĝo enoficigis lin kiel ĉefpastron kaj kiel reganton pri la popolo. 19 <Jason> ŝanĝis la vivstilon de l' popolo kaj ĝian politikan sistemon tute kontraŭe al la Leĝo, 20 tiel ke ne nur gimnazio estis konstruita en la citadelo mem de nia patrujo, sed eĉ estis ĉesigita la templo-servado. 21 Tiuj agoj kolerigis la Dian justecon kaj kaŭzis Antioĥon mem ataki ilin. 22 Ĉar dum li estis militanta kontraŭ Ptolemeo en Egiptujo\*, li aŭdis, ke disvastiĝis onidiro pri lia morto kaj ke la loĝantaro de Jerusalemo ege ĝojis. Rapide li ekmarŝis kontraŭ ilin, 23 kaj post kiam li prirabis ilin, li faris dekreton ke, se oni trovos iun ajn elinter ili observanta la gepatran Leĝon, tiu do

---

<sup>145</sup> 1 Mak 1:20-64; 2 Mak 5:11-6:11. Jason – 2 Mak 4:7.

mortu. 24 Kiam, per siaj dekretoj, li ne estis kapabla iel ajn ĉesigi la popolan observadon pri la Leĝo, sed vidis, ke ĉiujn liajn minacojn kaj punojn oni nur neglektas – 25 eĉ tiagrade, ke virinoj, ĉar siajn infanojn ili cirkumcidis, kune kun siaj beboj estis ĵetataj de altege, kvankam anticipe ili estis sciintaj, ke tion ili suferos; – 26 kiam, do, liajn dekretojn la popolo malŝatis, li mem pere de torturado provis devigi ĉiun unuope el la popolo, ke ili manĝu malpurigantajn manĝaĵojn kaj malkonfesu la Judismon.

### *Konfrontiĝo de Antioĥo kun Eleazar*<sup>146</sup>

**5:** 1 La tirano Antioĥo, sidante kun siaj konsilistoj en certa alta loko, kaj kun siaj armitaj soldatoj ĉirkaŭ si, 2 ordonis al la gardistoj, kapti ĉiun unuopan Hebreon, kaj devigi ilin manĝi de porkaĵo kaj aĵoj oferitaj al la idoloj. 3 Se kelkaj ne bonvolis manĝi la malpurigaĵon, ili estu torture mortigitaj. 4 Post kiam multaj estis forrabitaj, unu viro, gvidanto de la grego, Eleazar laŭnome, estis kondukita antaŭ <la reĝon>. Li estis viro el pastra familio, instruita pri la Leĝo, grandaĝa, pro sia filozofio<sup>147</sup> fama ĉe multaj en la kortego de la tirano.

5 Kiam Antioĥo lin ekvidis, li diris: 6 Antaŭ ol mi ektorturos vin, maljuna sinjoro, mi sugestus al vi savi vin mem manĝante porkaĵon, 7 ĉar mi respektas vian aĝon kaj viajn grizajn harojn. Kvankam tiujn vi havas jam tiel longe, al mi ŝajnas, ke vi ne estas filozofo, ĉar vi sekvas la religion de la Judoj. 8 Se la naturo provizis ĝin al ni, kial vi hezitu manĝi la bonegan viandon de ĉi besto? 9 Estas ja malsaĝe ne ĝui la bongustaĵojn, kiuj ne estas hontigaj, kaj estas erare rifuzi la donojn de l' naturo. 10 Ŝajnas al mi, ke vi faros ion eĉ pli malsaĝan se, havante vanan

---

<sup>146</sup> 2 Mak 6:18-31.

<sup>147</sup> Variaĵo: pro sia aĝo.

opinion pri la vero, vi daŭre malŝatos min je via propra damaĝo. 11 Ĉu vi ne vekigōs el via stulta filozofio, <ĉu vi ne> forpelos viajn sencelajn rezonadojn, kaj akceptos menson taŭgan je via aĝo, kaj filozofios laŭ la vero de kio bonfaras, 12 kaj kompatos pri via grandaĝo, honorante mian humanan konsilon? 13 Ĉar konsideru jene: se iu Forto gardas tiun vian religion, ĝi senkulpigos vin de kiu ajn transpaŝo rezultanta el devigo.

14 Kiam la tirano tiamaniere instigis lin manĝi kontraŭ la Leĝo tiun viandon, Eleazar petis la parolon. 15 Kiam permeson paroli li ricevis, li jene komencis alparoli la popolon: 16 Ni, ho Antioĥo, kiuj konvinkiĝis direkti nian vivon laŭ la Dia Leĝo, – ni opinias, ke neniuj devigo estas pli potenca ol nia obeo al la Leĝo. 17 Tial ni kredas, ke neniel ni transpaŝu ĝin. 18 Kaj eĉ, kiel vi supozas, se nia Leĝo ne vere estus Dia, kaj se erare ni ĝin opinius Dia, eĉ tiam ne estus prave por ni senvalorigi nian reputacion pri pieco. 19 Tial ne kredu, ke estus nur eta peko, se ni manĝus malpurigaĵon; 20 ĉar transpaŝi la Leĝon, ĉu en grandaj ĉu en malgrandaj aferoj, estas same serioze, 21 ĉar en ambaŭ kazoj la Leĝo estas same malŝatata. 22 Vi skoldas nian filozofion, kvazaŭ vivi laŭ ĝi estus neracie, 23 sed ĝi instruas al ni sinregadon, tiel ke ĉiujn plezurojn kaj dezirojn ni regas, kaj ĝi ankaŭ trejnas nin pri kuraĝo, tiel ke libervole kiun ajn suferon ni eltenas; 24 ĝi instruas al ni justecon, tiel ke en ĉiuj niaj agoj ni estas senpartiaj, kaj ĝi instruas al ni piecon, tiel ke kun ĝusta respekto ni adoras la sole vivantan Dion\*.

25 Tial ni ne manĝas malpurigaĵon. Ĉar kredante, ke la Leĝon faris Dio, ni scias, ke en la naturo la Kreinto de la mondo montris simpatian al ni. 26 Li permesis al ni manĝi, kio estas plej taŭga por nia vivo, sed Li malpermesis al ni manĝi viandon, kiu estas kontraŭa al tio. 27 Estus tiranece de vi devigi nin ne nur transpaŝi la Leĝon, sed ankaŭ manĝi tiamaniere, ke vi primokos nin pro manĝado de abomena malpurigaĵo. 28 Sed vi ne havos tian okazon primoki min, 29 kaj mi ne transpaŝos la sanktajn

ĵurojn de miaj gepatroj koncerne la obeon al la Leĝo, 30 eĉ ne se vi elpikus miajn okulojn aŭ bruligos miajn intestojn. 31 Mi ne estas tiel aĝa kaj malkuraĝa, ke mi ne estu juna en la racio koncerne la piecon. 32 Tial vi do pretigu viajn tortur-radojn kaj blovigu la fajron pli forte! 33 Mi ne tiom kompatas mian grandaĝon por proprafare rompi la prapatran Leĝon. 34 Mi ne false agos al vi, ho Leĝo kiu edukis min, kaj mi ne malkonfesos vin, ho amata sinregado. 35 Mi ne hontigos vin, ho filozofia racio, kaj mi ne malakceptos vin, ho honorata pastreco kaj scio pri la Leĝo. 36 Vi, ho reĝo, ne malpurigos la honorplenan buŝon de mia grandaĝo nek mian vivon laŭ la Leĝo. 37 Pura akceptos min miaj prapatroj kiel homon, kiu ne timas vian perforton ĝis en la morto. 38 Vi malpie do tiranu! Sed vi ne regos miajn religiajn principojn, nek parole nek agade!

### *La mirinda kuraĝo de Eleazar*

**6:** 1 Kiam tiumaniere Eleazar klare respondis al la instigoj de la tirano, la ĉeestantaj gardistoj perforte fortrenis lin al la iloj de torturado. 2 Unue ili senvestigis la maljunulon, kvankam li restis ornamita de la gracio de sia pieco. 3 Poste liajn brakojn ambaŭflanke ili ligis, kaj tiam ili skurĝis lin, 4 dum heroldo, kiu staris kontraŭ li, ekkriis: Obeu la ordonojn de la reĝo! 5 Sed la kuraĝa kaj nobla viro, kiel vera Eleazar, restis senskua, kvazaŭ turmentata en sonĝe; 6 tamen, dum la okuloj de l' maljunulo ĉielen leviĝis, lia karno estis disŝirata de la skurĝoj, lia sango fluis, kaj liaj flankoj estis dispecigitaj. 7 Kvankam li falis planken, ĉar lia korpo ne povis elteni la agonion, li tenis sian menson klara kaj senskua. 8 Unu el la kruelaj gardistoj kuris al li kaj piedbatis al li la flankon, por restarigi lin post lia falo. 9 Sed la doloron li toleris, li malŝatis la punadon kaj eltenis la torturojn. 10 Kvazaŭ nobla atleto, forte batata, la torturistojn venkis la

maljunulo; 11 efektive, la vizaĝon ŝvitkovrita, ege anhelante, eĉ siajn torturistojn li mirigis per sia kuraĝa spirito.

12 Kaj tiam, parte pro kompato je lia grandaĝo, 13 parte en simpatio pro ilia konateco, parte en admiro pro lia eltenemo, kelkaj el la <sekvantaro> de l' reĝo iris al li kaj diris: 14 Eleazar, kial tiel malracie vi neniigas vin mem per ĉi mizero? 15 Ni metos antaŭ vin iom da kuirita viando; savu vin mem, ŝajnigante vin manĝi el la porkaĵo.

16 Sed Eleazar, kvazaŭ pli akre torturita de ĉi konsilo, ekkriis: 17 Neniam ni, Abrahamidoj, pensu tiel malforte, ke pro malkuraĝo ni ŝajnigu rolon, kiu ne decas al ni! 18 Ĉar estus neracie se, vivinte ĝis alta aĝo laŭ la vero kaj reteninte akorde al la Leĝo la reputacion de tia vivo, ni nun ŝanĝus nian vojon 19 kaj fariĝus modelo de malpieco por la junuloj, provizante al ili ekzemplon pri manĝado de malpurigaĵo. 20 Estus hontige, se ni plu vivus por iom da tempo kaj dum tiu tempo pro nia malkuraĝo estus rindindaĵo por ĉiuj, 21 kaj se ni estus malŝatataj de l' tirano kvazaŭ neviraj, ĉar mi ne batalus ĝismorte por nia Dia Leĝo. 22 Kaj tial, ho Abrahamidoj: vi mortu noble por via religio! 23 Kaj vi, gardistoj de l' tirano: kial vi hezitas?

24 Kiam ili vidis, ke li estas tiel kuraĝa antaŭ la torturoj kaj ke lin ne ŝanĝis ilia kompato, <la gardistoj> alproksimigis lin al la fajro. 25 Ili bruligis lin per mallice elpensitaj iloj, ĵetis lin planken, kaj verŝis stinkantajn likvaĵojn en liajn naztruojn. 26 Kiam li estis bruligita ĝisoste kaj jam mortonta, li levis la okulojn al Dio kaj diris: 27 Vi scias, ho Dio, ke kvankam mi povus savi min, mi mortas en brulaj torturoj pro la Leĝo. 28 Kompatu Vian popolon, kaj lasu mia puno sufiĉi por ili. 29 Faru mian sangon ilia purigo, kaj prenu mian vivon anstataŭ la ilian. 30 Post kiam tion li diris, la sanktulo noble mortis sub la torturoj; eĉ en la mortigaj torturoj li eltenis, pro la virto de sia racio, pro la Leĝo.

31 Pruvite la pia racio do regas super la emocioj. 32 Ĉar se la emocioj estus regantaj super la racio, ni atestus ilian superregadon. 33 Sed ĉar nun la racio venkis la emociojn, ni prave atribuas al ĝi la regokapablon. 34 Estas prave, ke ni rekonu la superregadon de l' racio, ĉar ĝi eĉ venkas la eksterajn dolorojn. Estus ridinde negi tion. 35 Mi pruvis ne nur, ke la racio venkis super doloroj, sed ankaŭ, ke ĝi venkas plezurojn kaj neniel cedas antaŭ ili.

### *Laŭdo pri Eleazar*

7: 1 Ĉar kvazaŭ plej lerta stiristo, la racio de nia patro Eleazar stiris la ŝipon de la religio trans la maron de la emocioj, 2 kaj kvankam bategata de l' ŝtormoj de la tirano, kaj superversĉata de la potencaj ondoj de l' torturoj, 3 li neniel turnis la direktilon de la religio ĝis li velis en la havenon de senmorta venko. 4 Neniu urbo sieĝata per multaj inĝeniaj milit-maŝinoj iam ajn eltenis, kiel tion faris tiu plej sankta viro. Kvankam lian sanktan vivon konsumis torturoj kaj mistraktado, li venkis la sieĝantojn per la ŝildo de sia pia racio. 5 Ĉar farante sian menson forta kiel elstara klifo, nia patro Eleazar rompis la frenezigajn ondojn de l' emocioj.

6 Ho pastro, inda je la pastreco, neniam – manĝante malpurigaĵon – vi malpurigis viajn sanktajn dentojn nek profanis vian stomakon, kiu havis lokon nur por respekto kaj pureco. 7 Ho homo en harmonio kun la Leĝo, ho filozofo de Dia vivo! 8 Tiaj ja estu la homoj instruitaj pri la Leĝo, ŝildantaj ĝin per siaj propraj sango kaj ŝvito, eĉ ĝis la morto. 9 Vi, patro, fortikigis nian lojalecon al la Leĝo per via glora persisto, kaj vi ne perfidis la sanktecon, kiun vi laŭdis, sed en viaj agoj vi kredindigis viajn parolojn de Dia filozofio. 10 Ho maljunulo, pli fortika ol la torturoj; ho pliaĝulo, pli flama ol fajro; ho plejsupera reĝo super la pasioj, Eleazar! 11 Ĉar same kiel nia patro Aaron, armita per la incensilo, kuris tra la homamason

kaj venkis la fajran anĝelon, 12 tiel same la Aaronido Eleazar, kvankam konsumita de la fajro, restis senskua en sia racio. 13 Plej mirige ja, kvankam estante maljunulo, la korpon ne plu tensia kaj firma, la muskolojn malviglaj, la tendenojn senfortaj, li ree juniĝis 14 spirite dank' al la racio; kaj dank' al racio kiel tiu de Izaak, li faris la multkapan torturilon senefika. 15 Ho viro de benata grandaĝo, de honorinda griza hararo, de vivo laŭ la Leĝo, kiun perfektigis la fidoplena sigelo de la morto!

16 Se do, pro pieco, maljunulo povis malŝati eĉ ĝismortajn torturojn, certege la pia racio regas super la emocioj. 17 Eble kelkaj dirus: Ne ĉiuj tute regas siajn emociojn, ĉar ne ĉiuj havas saĝan racion. 18 Nur kiuj plenkore konsideras la religion, nur tiuj kapablas regi la pasiojn de la karno, 19 ĉar ili kredas, ke same kiel niaj patriarkoj Abraham, Izaak kaj Jakob, ankaŭ ili ne mortas al Dio, sed vivas al Dio. 20 Do ne malfortigas nian tezon, ke kelkaj ŝajne estas regataj de siaj emocioj pro la malforto de ilia racio. 21 Ĉar kiu povas esti filozofo tute laŭ la linio<sup>148</sup> de l' filozofio, fidi je Dio 22 kaj scii, ke estas bone elteni ĉiun doloron pro la virto, kaj ne samtempe sukcesus regi la pasiojn pro la pieco? 23 Nur la saĝa kaj kuraĝa viro regas la pasiojn.

*La reĝo petas la sep fratojn forlasi sian gepatran religion<sup>149</sup>*

**8:** 1 Ĉar tiel, sekvante filozofion laŭ la pia racio, eĉ tre junaj knaboj foje venkis la plej dolorigajn torturilojn. 2 Ĉar kiam la tirano klare estis venkita en la unua provo, estante nekapabla devigi maljunulon manĝi malpurigaĵon, en rabia kolero li ordonis, ke aliajn el la Hebreaj kaptitoj oni alvenigu, kaj ke, kiu manĝos malpurigaĵon, estu liberigita postmanĝade, sed se iu rifuzos, tiu estos des pli kruele torturata.

---

<sup>148</sup> La teksto uzas la vorton "kanono", gvidlinio.

<sup>149</sup> 2 Mak 7:1-40.

3 Kiam la tirano tion estis ordoninta, estis alkondukitaj antaŭ li sep fratoj – belaj, modestaj, noblaj kaj ĉiurilate perfektaj –, kune kun ilia maljuna patrino. 4 Kiam ilin vidis la tirano, grupigintajn ĉirkaŭ la patrino kvazaŭ ĥore, ili plaĉis al li. Kaj trafite de ilia aspekto kaj nobleco, li ridetis al ili, kaj venigis ilin pli apuden, kaj diris: 5 Junuloj, kun favora sento ĉiun el vi mi admiras, kaj grande mi respektas la belon kaj la nombron de tiaj fratoj. Mi ne nur konsilas al vi, ke vi ne montru la saman malsaĝon kiel tiu de l' maljunulo, kiu ĵus estis torturita, sed mi ankaŭ alvokas vin, cedi al mi kaj ĝui mian amikecon. 6 Same ja kiel mi kapablas puni tiujn, kiuj malobeas miajn ordonojn, tiel same mi estas bonfaranto al tiuj, kiuj obeas al mi. 7 Konfidu min, kaj vi havos aŭtoritatajn poziciojn en mia registaro, se vi pretas rezigni pri la gepatra tradicio de via nacia vivo. 8 Transprenu la Grekan vivstilon kaj ĝuu vian junon. 9 Sed se malobeante vi vekos mian koleron, vi devigos min, neniigi vin ĉiujn unuope per teruraj punoj sub torturado. 10 Tial kompatu pri vi mem. Eĉ mi, via malamiko, kompatas pri via junco kaj pri via bela aspekto. 11 Ĉu vi ne konsideras, ke se vi malobeos, restos al vi nenio krom morti sur la rado?

12 Tion dirinte, li ordonis alvenigi la torturilojn por konvinki ilin, ke pro timo ili manĝu la malpurigaĵon. 13 Kiam la gardistoj antaŭ ilin metis la radojn, elartikigilojn, tordilojn, hokojn<sup>150</sup>, katapultojn, kaldronojn, braĝujojn, fingroŝtraŭbojn, ferajn ungegojn, kojnojn kaj fajrilojn, la tirano ree ekparolis: 14 Timu do, knaboj; sed kiun ajn justecon vi adoras, ĝi kompatos pri vi, se vi transpaŝas sub perforo.

15 Sed kiam ili aŭdis liajn minacojn, kaj vidis la timigilojn, ne nur ili ne timis, sed ili kontraŭfilozofis al la tirano, kaj ĝuste rezonante ili neniigis lian tiranecon.

---

<sup>150</sup> Neklare.



16 Aliflanke ni do konsideru, kiujn argumentojn eblus uzi, se iuj el ili estus malkuraĝaj aŭ nevirecaj. Ĉu ne la jenajn: 17 Ho kompatindaj ni! Tiel sensciaj! Se la reĝo ordonis kaj admonis nin, ke obeante lin ni akceptu afablan traktadon, 18 kial do ni ĝoju pri vanaj decidoj, kaj kial ni risku malobeon, kiu povas doni la morton? 19 Ho viroj kaj fratoj, ĉu ni ne timu la torturilojn, kaj ĉu ni ne atentu la dolorigilojn, kaj ĉesu pri nia vana sinteno kaj pri ĉi aroganteco, kiu minacas neniiĝi nin? 20 Ni indulgu pri nia junco, kaj ni kompatu la aĝon de nia patrino; 21 kaj serioze ni konsideru ke, se ni malobeos, ni estos mortaj! 22 La Dia Justeco senkulpigos nin, se ni timos la reĝon, kiam li perforte devigas nin. 23 Kial ni forbaras nin de ĉi plej agrabla vivo, kaj kial ni senigas nin de ĉi ĝuinda mondo? 24 Ni ne batalu kontraŭ devigo, kaj ni ne senfunde fieru, ke oni metas nin sur la radon. 25 Eĉ la leĝo mem ne arbitre mortigus nin, se torturilojn ni timas. 26 Kial tia kverelemo stimulas nin, kial tia necedemo plaĉas al ni, se ni povas vivi en paco, obeante al la reĝo?

27 Sed la junuloj, kvankam torturotaj, nek diris nek eĉ serioze prikonsideris tiajn aferojn. 28 Ĉar ili malŝatis la emociojn kaj regis la agoniojn, 29 tiel ke tuj, kiam la tirano ĉesis konsili al ili manĝi la malpurigaĵon, ili ĉiuj unuvoĉe ekkriis, kvazaŭ unumense:

**9:** 1 Kial vi prokrastas, ho tirano? Ĉar ni pretas por morti prefere ol transpaŝi niajn gepatrajn ordonojn; 2 ni ja klare hontigas niajn prapatrojn, se ni ne praktikas obeemon al la Leĝo kaj al Moseo nia konsilanto. 3 Tirano kaj konsilanto de senleĝeco, en via malamo je ni vi ne kompatu nin pli ol ni <kompatas> pri ni mem. 4 Ĉar ni konsideras ĉi vian kompaton, kiu certigas nian sekurecon pere de malobeo al la Leĝo, kiel pli dolorigan ol la morto mem. 5 Vi provas timigi nin minacante nin per ĝismorta torturo, kvazaŭ antaŭ nelonge nenion vi lernis de Eleazar. 6 Se do la maljunuloj de l' Hebreoj vivis pro sia religio kaj eltenas suferojn, estas des pli dece, se ni junuloj mortus, malŝatante viajn perfortajn torturojn, kiuj ankaŭ trafis

nian aĝan instruinton. 7 Tial do, tirano: testu nin, kaj se pro nia religio nian vivon vi prenas, vi ne supozu, ke vi povas vundi nin, torturante nin. 8 Ĉar, per ĉi severa suferado kaj nia persisto, ni gajnos la premion de l' virto, kaj ni estos kun Dio, en kies afero ni suferas; 9 sed vi, pro via sangavido je ni, per la Dia justeco vi prave spertos eternan suferon per fajro.

### *Torturiĝo kaj defio de l' unuaj du fratoj*

10 Kiam ĉi tion ili diris, la tirano ne nur estis kolera, kvazaŭ al homoj, kiuj malobeas, sed ankaŭ kolerega, kvazaŭ al sendankuloj. 11 Tiam laŭ lia ordono la gardistoj alvenigis la pli aĝan, kaj forŝirinte lian tunikon, ili rimene ligis al li la manojn ambaŭflanke. 12 Kiam ili elĉerpiĝis, skurgante lin nenion atingante, ili metis lin sur la radon. 13 Kiam la nobla junulo estis elstreĉita ĉirkaŭ ĝin, liaj membroj estis elartikigitaj 14 kaj kun ĉiu membro disŝirita, li akuzis <la tiranon> dirante: 15 Plej abomena tirano, malamiko de l' ĉiela justeco, mense sovaĝa, vi mistraktas min ĉimaniere, ne ĉar mi estus murdisto aŭ agus malpie, sed ĉar mi protektas la Dian Leĝon. 16 Kaj kiam diris la gardistoj: Konsentu manĝi, por ke vi estu liberigita el la torturoj, 17 li respondis: Vi abomenaj servantoj, via rado ne estas tiel potenca, ke ĝi strangolu mian racion. Tranĉu miajn membrojn, bruligu mian karnon, tordu miajn artikojn; 18 ĉar per ĉiuj ĉi torturoj mi konvinkos vin, ke nur la Hebreidoj estas nevenkeblaj koncerne la virton. 19 Dum tion ĉi li diris, ili dismetis fajron sub li, kaj akcelante la flamojn ili plistreĉis la radon. 20 La rado komplete sangoŝmiriĝis, kaj la karbamaso trempiĝis de gutetanta sango, kaj karnopecoj degutadis de l' aksoj de la aparato. 21 Kvankam la tendenoj, kiuj kunigis la ostojn, jam estis tranĉitaj, la kuraĝa junulo, inda je Abraham, ne suspiris, 22 sed kvazaŭ transformita de la fajro en senmortecon, li noble eltenis la turmenton. 23 Imitu min, fratoj, li diris. Ne delasu de via posteno en mia batalo, nek malkonfesu niajn kuraĝajn

fratajn ligojn. 24 Batalu la sanktan kaj noblan batalon por la religio. Tiel la justa Providenco de niaj prapatroj kompatos nian popolon kaj venĝos sin je la malbenata tirano. 25 Tion ĉi dirinte, la sankta junulo delasis la vivon.

26 Post kiam ĉiuj miris pri lia kuraĝa spirito, la gardistoj enirigis la sekvan laŭ aĝo, kaj provizinte sin per feraj gantoj kun akraj hokoj, ili ligis lin al la maŝino kaj la katapulto. 27 Antaŭ ol ektorturi lin, ili demandis, ĉu li pretas manĝi, kaj ili aŭdis lian noblan decidon. 28 Ĉi tiuj leopardo-similaj bestoj ektiris liajn tendenojn per siaj feraj manoj, forŝiris la tutan karnon eĉ de la vangoj kaj la haŭton de la kapo. Sed li firme eltenis ĉi agonion kaj diris: 29 Kiel agrable estas morti por la religio de niaj gepatroj<sup>151</sup>. Kaj al la tirano li diris: 30 Ĉu vi, plej kruela tirano, ĉu vi ne pensas, ke pli ol mi vi estos torturata, ĉar vi ja vidas, ke la arogan planon de via tiraneco venkas nia eltenemo pro la religio? 31 Mi senpezigas mian doloron per la ĝojo venanta de la virto, 32 sed vi suferos torturon de la minacoj venantaj de malpieco. Vi ne eskapos, vi plej abomena tirano, la juĝon de l' Dia venĝo!

### *Torturiĝo kaj defio de l' sekvaj du fratoj*

**10:** 1 Kiam ankaŭ li suferis gloran morton, oni alvenigis la trian, kaj multaj multfoje instigis lin savi sin, manĝante <la viandon>. 2 Sed li kriis: Ĉu vi ne scias, ke la sama patro generis min kiel la mortintojn, kaj naskis min la sama patrino, kaj mi estis edukata en la samaj instruoj! 3 Mi ne malkonfesas la noblan parencecon, kiu ligas min al miaj fratoj<sup>152</sup>. 5 Kolerigite de l' senhonto de la viro, ili distiris liajn manojn kaj piedojn per

---

<sup>151</sup> Horacio – *Odoj* III:2:13: 'Stas inde, dolĉe, morti por patroland'.

<sup>152</sup> Kelkaj manuskriptoj aldonas: 4 Ĉe tio, se vi havas torturilon, apliku ĝin al mia korpo; ĉar mian animon vi ne povos kapti.

siaj instrumentoj, elartikigis liajn membrojn, 6 kaj rompis al li la fingrojn, brakojn, krurojn kaj kubutojn. 7 Ĉar ili ne kapablis eĉ iamaniere rompi lian spiriton, ili lasis la instrumentojn, kaj Skitece senhaŭtigis lian kranion per la ungoj de l' fingroj. 8 Ili tuj metis lin sur la radon, kaj dum lia vertebro estis tordata, sian karnon li mem vidis ĉie ĉirkaŭe deŝiriĝi kaj sangogutojn <li vidis> fali el siaj intestoj. 9 Kiam li estis mortonta, li diris: 10 Ni, plej abomena tirano, suferas ĉi tion pro nia Dia trejniĝo kaj virto, 11 sed vi, pro viaj malpieco kaj sangavido, vi suferos senĉesajn torturojn.

12 Kiam ankaŭ li mortis fratostile, ili enen trenegis la kvaran, dirante: 13 Kaj vi: ne estu same freneza kiel viaj fratoj, sed obeu al la reĝo kaj savu vin mem. 14 Sed li diris al ili: Vi ne havas fajron sufiĉe varman por igi min roli la malkuraĝulon. 15 Ne – je la benata morto de miaj fratoj, je la eterna pereco de la tirano, kaj je la eterna vivo de la piuloj: mi ne malkonfesos nian noblan fratecon. 16 Elpensu torturojn, tirano, por ke vi eksciuj el ili, ke mi estas frato de tiuj, kiuj ĵus torturiĝis. 17 Kiam ĉi tion aŭdis la sangavida, murdema kaj ege abomena Antioĥo, li ordonis fortranĉi al li la langon. 18 Sed li diris: Eĉ se mian voĉorganon vi forigas, Dio aŭdas ankaŭ la mutulojn. 19 Jen, ĉi tie estas mia lango; fortranĉu ĝin, ĉar malgraŭ tio vi ne senvoĉigas nian racion. 20 Volonte, pro la afero de Dio, ni lasas mutili la membrojn de nia korpo. 21 Dio baldaŭ vizitos vin, ĉar vi fortranĉas langon, kiu estis melodia en Diaj himnoj.

### *Torturiĝo kaj defio de la lastaj fratoj*

**11:** 1 Kiam ankaŭ ĉi tiu mortis, post kruela torturado, la kvina salte stariĝis dirante: 2 Tirano, mi ne rifuzos esti torturata pro la virto. 3 Libervole mi ja venis, por ke murdante min vi ricevu la punon de la ĉiela justeco pro pli da krimoj. 4 Malamanto de la virto, malamanto de la homaro, pro kiu nia ago vi estas ĉi tiel neniiganta nin? 5 Ĉu pro tio, ke la Kreinton de ĉio ni

adoras kaj vivas laŭ Lia virta Leĝo? 6 Sed tio meritas honoron, ne torturon. 9<sup>153</sup> Dum ĉi tion li diris, la gardistoj ligis lin kaj trenis lin al la katapulto; 10 ili ligis lin al ĝi sur la genuojn, kaj fiksante al tio ferajn piedingojn, ili tordis lian dorson ĉirkaŭ la kojnon sur la rado, tiel ke li estis komplete retrokurbigita kvazaŭ skorpio, kaj li tute elartikiĝis. 11 En tiu pozicio, anhelante je spiro kaj en korpa angoro, 12 li diris: Tirano, kion vi atribuas al ni kontraŭvole, estas brilaj favoroj, ĉar per ĉi noblaj suferoj vi donas al ni la eblon, montri nian persistemon pri la Leĝo.

13 Kiam ankaŭ li mortis, la sesa, nura knabo, estis envenigita. Kiam la tirano informiĝis, ĉu li pretas manĝi kaj esti liberigita, li diris: 14 Mi estas pli juna ol miaj fratoj, sed mense mi estas egala al ili. 15 Ĉar por tio ni estis naskitaj kaj edukitaj, ni devas morti pro la samaj principoj. 16 Tial do, se vi intencas torturi min, se mi ne manĝas malpurigaĵon, do torturu plu! 17 Kiam tion ĉi li diris, oni kondukis lin al la rado. 18 Tre zorge senmovigita sur ĝin, vertebro-rompita, li estis rostita desube. 19 Al lia dorso oni aplikis akrajn rostostangojn, kiuj estis hejtigitaj en la fajro, kaj liajn ripojn oni traboris tiel, ke liaj intestoj estis trabruligitaj. 20 Dum la torturiĝo li diris: Ho konkurso inda je sanktuloj, en kiu tiom el la fratoj estis venigitaj al areno da suferoj pro la religio, kaj en kiu ni ne estis venkitaj! 21 Ĉar religia scio, tirano, ne estas venkebla. 22 Ankaŭ mi, provizita je bona nobleco, mortos kun miaj fratoj 23 kaj mi mem venigos al vi grandan venganton, ho inventinto de torturoj kaj malamiko de la vere piaj! 24 Ni ses knaboj paralizis vian tiranecon. 25 Ĉar vi ne kapablas ŝanĝi nian racion, nek devigi nin manĝi malpurigaĵon:

---

<sup>153</sup> Kelkaj manuskriptoj havas tie ĉi: 7 Se vi komprenus homajn sentojn kaj havus esperon je saviĝo fare de Dio – 8 sed, kiel nun estas, vi ja estas fremdulo al Dio kaj persekutas tiujn, kiuj servas al Li.

ĉu ĉi tio ne estas via pereco? 26 Via fajro tro malvarmas por ni, kaj la katapultoj estas sendoloraj, senfortas via perforto. 27 Ĉar ne la gardistoj de l' tirano, sed tiuj de l' Dia Leĝo regas nin; tial, nevenkite, ni restas ĉe la racio.

**12:** 1 Kiam ankaŭ li, metite en kaldronon, mortis benatan morton, venis antaŭen la sepa, la plej juna el ĉiuj. 2 Lin kompatis la tirano, kvankam liaj fratoj forte riproĉis lin, kaj kiam li vidis, ke li jam havas piedingojn, li ordonis lin veni pli apuden kaj provis konvinki lin, dirante: 3 La rezulton vi vidas de l' stulteco de viaj fratoj, ĉar ili mortis en turmentoj, pro sia malobeo. 4 Se vi ne obeos, ankaŭ vi estos mizere torturata, kaj mortos antaŭtempe, 5 sed se vi obeos, vi estos mia amiko kaj grava en la regado de l' lando. 6 Kiam tiel li apelis lin, li venigis la patrinon de l' knabo, por ke li montru kompaton al ŝi, kiu estis senigita de tiom da filoj, kaj por influu ŝin, ke la ankoraŭ restantan filon ŝi persvadu obei kaj saviĝi. 7 Sed kiam lia patrino instigis lin en la Hebrea lingvo, kiel baldaŭ ni rakontos, li diris: 8 Liberigu min, ke mi parolu al la reĝo kaj al ĉiuj amikoj liaj ĉi tie ĉeestantaj. 9 Ege ĝojaj pro la deklaro de la knabo, ili tuj liberigis lin. 10 Kurinte al la plej apuda forno, li diris: 11 Profana tirano, plej malpia el ĉiuj aĉuloj! Ĉar ĉiujn bonojn kaj vian reĝecon vi ricevis de Dio: ĉu vi ne hontas murdi Liajn servistojn kaj torturi sur la rado tiujn, kiujn praktikas la religion? 12 Pro tio ĉi la justeco preparis por vi intensajn kaj eternajn fajron kaj torturojn, kiuj poreterne ne delasos de vi. 13 Ĉu vi kiel homo ne hontis, ho plej sovaĝa besto, fortranĉi la langon al homoj, kiuj havas sentojn kiel vi, kaj kiuj estas faritaj el la samaj elementoj kiel vi, kaj mistrakti kaj torturi ilin tiamaniere? 14 Noble mortante, ili certe plenumis sian servadon al Dio, sed vi amare lamentos, ĉar vi mortigis senkiale la defendantojn de l' virto. 15 Kaj tiam, ja mortonta, li diris: 16 Mi ne malkonfesos la brilan ekzemplon de miaj fratoj, 17 kaj mi alvokas la Dion de niaj prapatroj kompati pri nia popolo. 18 Sed je vi Li sin venĝos, kaj en ĉi tiu vivo kaj post la

morto. 19 Dirinte ĉi tiujn minacojn, li ĵetis sin en la fajron, kaj tiel finis la vivon.

*Laŭdo pri ili: la racio venkis*

**13:** 1 Se do la sep fratoj malŝatis suferon eĉ ĝismortan, ĉiu devas koncedi, ke pia racio regas super la emocioj. 2 Ĉar se ili estus sklavoj al siaj emocioj kaj estus manĝintaj la malpurigaĵon, ni povus diri, ke venkis ilin la emocioj. 3 Sed fakte ne estis tiel. Male, per la racio, kiu estas laŭdata antaŭ Dio, ili venkis siajn emociojn. 4 La regado de la menso super tiuj ne estas pretervidebla, ĉar <la fratoj> regis la emociojn same kiel la dolorojn. 5 Kiel do eblus negi la regadon de ĝusta racio pri la emocioj ĉe tiuj <homoj>, kiujn ne fortimigis gravaj doloroj? 6 Ĉar same kiel turoj ĉe la eniro de l' haveno retenas la minacajn ondojn kaj faras ĝin kvieta por kiuj velveturas en la internan basenon, 7 tiel la sep-tura ĝusta racio de l' junuloj, fortikigante la havenon de religio, venkis la tempeston de la emocioj. 8 Ĉar ili formis sanktan religian ĥoron kaj kuraĝigis unu l' alian dirante: 9 Fratoj, ni mortu fratece por la Leĝo; ni do imitu la tri junulojn en Asirio, kiuj malŝatis similan fajron de l' forno. 10 Ni ne estu malkuraĝaj ĉe la montrado de nia pieco. 11 Dum unu diris: Kuraĝon, frato, la alia diris: Noble eltenu, 12 kaj la tria memorigis al ili: Memortenu de kie vi venis, kaj <memoru> pri la patro, je kies mano Izaak submetiĝus por esti buĉita pro la religio. 13 Ĉiu el ili unuope kaj ĉiuj kune, ili diris, rigardante la aliajn, ĝojaj kaj sentimaj: Tutanime ni dediĉu nin al <Dio>, kiu donis al ni la vivon, kaj ni uzu niajn korpojn kiel defendilon por la Leĝo. 14 Tial ni ne timu lin, kiu kredas mortigi nin, 15 ĉar granda estas la batalo de l' animo kaj la danĝero de eterna torturiĝo, kiu kuŝas antaŭ tiuj, kiuj transpaŝas la ordonojn de Dio. 16 Tial ni plene nin armu per la armaĵo de sinregado, kiu estas la Dia racio. 17 Ĉar se tiel ni mortos, Abraham, Izaak

kaj Jakob bonvenigos nin, kaj ĉiuj patroj laŭdos nin. 18 Kiuj postrestis, diris al ĉiu el la fratoj, kiu estis fortrenata: Ne hontigu nin, frato, nek malkonfesu la fratojn, kiuj mortis antaŭ ol ni.

19 Vi ne estas sensciaj pri la ĉarmo de la frateco, kiun la Dia kaj ĉiosaĝa providenco heredigis per la patroj al la idaro, kaj kiu enradikiĝis en la patrino utero. 20 Ĉiu el la fratoj tie pasigis same multe da tempo, kaj tie li formiĝis dum la sama periodo; kaj kreskante el la sama sango kaj per la sama vivo, ili maturiĝis. 21 Kiam ili estis naskitaj post simila tempo <de gravedeco>, ili trinkis lakton el la samaj fontoj. Brakumite ĉe la samaj mamoj, nutriĝis fratecaj animoj; 22 kaj ili plifirmiĝis per ĉi tiu komuna nutriĝo kaj per ĉiutaga kunvivado, – kaj per ĝenerala edukiĝo kaj per nia disciplino pri la Dia Leĝo.

23 Tial do, ĉar simpatio kaj frateca amo tiel estiĝis inter la fratoj, ili des pli fariĝis simpatiaj unu al la alia. 24 Edukate laŭ la sama Leĝo, trejniĝite en la samaj virtoj, kaj instruite en la ĝusta vivmaniero, ili des pli amis unu la alian. 25 Komuna celado al nobleco kaj bono firmigis ilian reciprokan bonvolemon kaj unuanimecon, 26 ĉar ili povis plifervorigi sian fratecan amon per sia religio. 27 Sed tamen, kvankam la naturo kaj la ĉiutaga kunvivado kaj la virtaj kutimoj kreskigis la ĉarmon de la frateco, dank' al sia religio tiuj, kiuj postrestis, povis elteni, kiam ili vidis, ke la fratoj estas mistraktataj kaj ĝismorte torturataj. **14:** 1 Ili eĉ kuraĝigis ilin, elteni la torturon, tiel ke ne nur la suferon ili malŝatis, sed eĉ regis la emociojn de l' frateca amo.

2 Ho racio, pli reĝa ol reĝoj kaj pli libera ol la liberaj! 3 Ho sankta kaj harmonia religia konkordo de l' sep fratoj! 4 Neniu el la sep knaboj montriĝis esti malkuraĝa nek fortimiĝis de la morto, 5 sed ĉiu el ili, kvazaŭ en konkurso al la senmorteco, rapidis morten per la torturiĝo. 6 Same kiel la manoj kaj la piedoj moviĝas en harmonio kun la gvidado de la menso, same tiel, kvazaŭ sub senmorta spirito de pieco, ĉi sanktaj junuloj konkorde pro ĝi morten iris. 7 Ho plej sankta, harmonia, frata



sepopo! Ĉar same kiel la sep tagoj de la kreado <hordancas> ĉirkaŭ la religio, 8 same tiel, formante ĥoron, ĉi junuloj ĉirkaŭis la sepforman timon pri torturiĝo, kaj neniigis ĝin. 9 Eĉ ni mem timtremiĝas, aŭdante pri la suferoj de ĉi junuloj; sed ili ne nur vidis, ne nur rekte aŭdis la vortojn mem de l' minacoj, sed ankaŭ pacience eltenis – kaj tio eĉ ĉe doloroj en la fajro! 10 Kio povus esti pli doloriga? Ĉar la forto de fajro estas intensa kaj rapida, kaj haste ĝi konsumis iliajn korpojn.

*La patrino kiel la plej mirinda ekzemplo pri la venko de la racio<sup>154</sup>*

11 Ne konsideru mirinda, ke la racio plene regis super ĉi tiuj viroj en ilia torturiĝo, se eĉ virina spirito malŝatis ankoraŭ pli da agonioj: 12 la patrino de la sep junuloj ja eltenis la torturojn de ĉiu el ŝiaj infanoj.

13 Rigardu kiel kompleksa estas la patrino amo al la infanoj, kiu faras el ĉio emociion sentatan en ŝia plejinterno. 14 Eĉ senraciaj bestoj havas, same kiel la homaj estaĵoj, simpatio kaj amon por sia idaro. 15 Ekzemple inter la birdoj la malsovaĝaj ŝirmas siajn idetojn, ennestiĝante sub la kantegmentoj, 16 kaj la ceteraj <birdoj>, kiuj nestiĝas sur montpintoj, ĉe krutaj abismoj, en arbotruoj aŭ arbosuproj, kovas tie siajn idojn kaj forpelas la entrudiĝintojn. 17 Se ili ne kapablas peli <la entrudiĝintojn>, ili faras sian eblon por helpi al la idetoj, cirkle flugante ĉirkaŭ ili en ama angoro, avertante ilin per sia kriĉado. 18 Kaj kial necesas montri la simpatio por la idaro per ĉi tiu ekzemplo de senraciaj bestoj, 19 ĉar eĉ la abeloj en la tempo de l' konstruado de mielĉelaroj, defendas sin kontraŭ entrudiĝintoj, kvazaŭ perglave pikas tiujn, kiuj aliras al iliaj idoj, kaj defendas ilin eĉ ĝismorte! 20 Sed eĉ ŝia simpatio por siaj filoj ne iĝis la patrinon de l' junuloj heziti; ŝi ja havis la saman menson kiel Abraham.

---

<sup>154</sup> 2 Mak 7:41.

**15:** 1 Ho racio de la infanoj, tirano super la emocioj! Ho religio, por la patrino pli kara ol ŝiaj infanoj! 2 Du vojoj estis malfermaj por la patrino: tiu de l' religio kaj tiu por dumtempe savi siajn sep filojn, laŭ promeso de la tirano. 3 Sed ŝi pli amis la religion, kiu savas ilin por eterna vivo, laŭ <la promesoj de> Dio. 4 Kiamaniere mi esprimu la emociojn de gepatroj, kiuj amas siajn infanojn? Mense kaj forme ni premas sur la karakteron de l' eta infano mirindan sigelon, kaj precipe la patrinoj, kiuj pro siaj naskodoloroj havas pli profundan simpatian por la idaro ol la patroj. 5 La patrinoj estas malpli fortaj <ol la patroj> kaj ju pli ili naskas, des pli ili amas siajn infanojn. 6 La patrino de la sep knaboj amis siajn infanojn pli ol ĉiuj aliaj patrinoj, ĉar dum sep gravedecoj ŝi plantis en sin la teneran amon al ili, 7 kaj pro la multaj naskodoloroj, kiujn pro ĉiu unuope ŝi suferis, ŝi havis simpatian al ili; 8 sed pro la timo antaŭ Dio ŝi malŝatis la ĉi-tempan savon de l' infanoj. 9 Kaj ne nur tio, sed ankaŭ pro la nobleco kaj bono de la filoj, kaj pro ilia senkondiĉa obeemo al la Leĝo, ŝi sentis pli grandan tenerecon al ili. 10 Ĉar ili estis justaj, kaj sinregantaj, kuraĝaj kaj grandanimaj, kaj ili amis la fratojn kaj la patrinon tiel, ke ili obeis al ŝi eĉ ĝismorte, gardante la ordonojn.

11 Sed tamen, kvankam tiom da aferoj igis la patrinon kunsuferi kun siaj infanoj pro sia amo al ili, ĉe neniu el ili la unuopaj torturoj estis sufiĉe fortaj por devojigi ŝian racion. 12 Sed ĉiun infanon unuope kaj ĉiujn kune la patrino pro la religio kuraĝigis ĝismorte. 13 Ho sankta naturo, gepatra amo, idara amo, vartado kaj neregeblaj sentoj de patrinoj! 14 Ĉiun la patrino vidis torturata kaj bruligata, sed ŝi ne ŝanĝis la religion. 15 La karnon de siaj infanoj ŝi vidis konsumiĝi de la fajro, la fingrojn de piedoj kaj manoj <ŝi vidis> konvulsii sur la planko, kaj la karnon de kapo ĝis makzelo elstari kvazaŭ maskoj.

16 Ho patrino elprovita ĉi tie per pli da amara doloro ol la naskodoloroj, kiujn vi suferis por ili! 17 Ho virino kiu sola naskis

tiel plenan piecon! 18 Kiam la unue naskita spiris la lastan spiron, tio ne cedigis vin, nek kiam la dua sub torturiĝo mizere rigardis al vi, nek kiam mortis la tria; 19 kaj eĉ rigardante al ĉiu en la okulojn, dum malmilde<sup>155</sup> ili rigardis la saman mistraktadon, aŭ en iliajn nazotruojn, kiuj jam ekanoncis la morton, <eĉ tiam> vi ne ploris. 20 Kiam vi vidis la karnon de viaj infanoj bruli sur la karno de aliaj infanoj, fortranĉitajn manojn sur manoj, senhaŭtigatajn kapojn sur kapoj, kaj kadavrojn sur kadavroj, kaj kiam vi vidis la ejon de l' infanoj plena je spektantoj de l' torturado, vi ne ploris. 21 La melodio de sirenoj kaj la kanto de cigoj ne tiom allogas la atenton de l' aŭskultantoj kiel la voĉoj de la infanoj, kiuj dumtorture vokas la patrinon. 22 Kiel grandajn kaj kiel multajn turmentojn suferis la patrino, kiam ŝiaj filoj torturiĝis sur la rado kaj per brula fero! 23 Sed pia racio, kiu donis al ŝia koro la kuraĝon de viro meze de la suferoj, fortigis ŝin por portempe pretervidi la patrinan amon.

24 Kvankam ŝi ĉeestis la neniigon de sep infanoj, kaj la inĝeniajn kaj variajn torturojn, ĉi tiu nobla patrino pretervidis ĉion ĉi pro sia fido je Dio. 25 Ĉar dum en la konsilejo de sia animo ŝi vidis potencajn advokatojn – naturon, parencon, patrinan amon, kaj la suferojn de l' infanoj –, 26 ĉi tiu patrino tenis por siaj infanoj du lotojn: unu mort-anonca, la alian sava. 27 Ŝi ne aprobis la savan, kiu por mallonga tempo savos la sep filojn, 28 sed kiel filino de l' Diotima Abraham ŝi memoris pri lia forteco.

29 Ho patrino de via popolo, defendanto de la Leĝo, probatalanto de l' religio, kiu gajnas la premion de la konkurso en via koro! 30 Ho vi, pli nobla en firmeco ol viroj, pli kuraĝa en eltenemo ol viroj! 31 Ĉar ĝuste kiel, portante la mondon en la universala kataklismo, la arkeo de Noa sentime eltenis la ondojn, 32 tiel same vi, ho gardanto de la Leĝo, ĉiufanke

---

<sup>155</sup> Laŭlitere: kiel taŭro.

superŝutata de l' kataklismo de emocioj kaj fortegaj ventoj, la torturado de viaj filoj, <same vi> eltenis noble kaj rezistis la vintroŝtormojn, kiuj atakas la religion.

**16:** 1 Se do virino, maljuna, patrino de sep filoj, eltenis rigardi, ke ŝiaj infanoj estas torturataj ĝismorte, necese estas koncedi, ke la pia racio regas super la emocioj. 2 Tiel mi do pruvis ne nur, ke la viroj regis super la emocioj, sed ankaŭ, ke virino malŝatis la plej akrajn torturojn. 3 La leonoj ĉirkaŭ Daniel ne estis tiel sovaĝaj, nek tiel brule varma estis la forno de Miŝael, kiel flamis ŝia ennaskita patrino amo, kiam siajn sep filojn ŝi vidis torturiĝi en tiom da manieroj. 4 Sed pro pia rezonado la patrino sufokis tiom da tiaj emocioj.

5 Ankaŭ ĉi tion vi konsideru: Se ĉi tiu virino, estante patrino, estus molkora, ŝi veadus pri ili, kaj eble estus parolinta jene: 6 Ho kiel kompatinda kaj multoble malfeliĉa mi estas! Naskinte sep infanojn, nun mi estas nenies patrino! 7 Ho sep naskoj tute vanaj, sep gravedecoj senrezultaj, senfrukta mamnutrado kaj mizera nutrado! 8 Vane, miaj filoj, mi eltenis multajn naskodolorojn pro vi, kaj la pli dolorajn zorgojn pri via edukado. 9 Ve al miaj infanoj: kelkaj senedzinaj, aliaj edziĝintaj kaj sen infanoj. Mi ne vidis viajn infanojn nek havos la feliĉon nomiĝi avino. 10 Ve, mi kiu havis tiom da infanoj kaj tiel belajn! Mi nun estas vidvino kaj sola, multĉagrena. 11 Kaj kiam mi mortos, mi havos neniun filon por entombigi min.

12 Tamen tiu sankta kaj Diotima patrino ne ploris kun tiaj lamentoj pri kiu ajn el ili, kaj neniun el ili ŝi malkonsilis de la morto, kaj ŝi ankaŭ ne ĉagreniĝis, kiam ili mortis. 13 Male, kvazaŭ kun menso el ŝtalo, kaj renaskante la tuton da siaj filoj por senmorteco, ŝi prefere petegante instigis ilin al la morto pro la religio. 14 Ho patrino, soldato de Dio pro la religio, pliaĝulo kaj virino! Per via neskuebleco vi venkis eĉ tiranon, kaj vorte kaj fare vi pruviĝis pli mirinda ol viro. 15 Ĉar kiam oni arestis vin kune kun viaj filoj, vi staris kaj rigardis, ke Eleazaron oni torturas, kaj al viaj filoj vi diris en la Hebrea lingvo: 16 Miaj filoj,

nobla estas la konkurso, al kiu vi estas vokitaj por atesti antaŭ la popolo. Batalu entuziasme pro nia gepatra Leĝo. 17 Ĉar estus ja hontige se, dum ĉi tiu maljunulo eltenas tiajn torturojn pro la religio, vi junuloj estus teruritaj de la torturado. 18 Memoru, ke dank' al Dio vi partoprenas en la mondo kaj ĝuis la vivon, 19 kaj tial vi devus elteni kiun ajn suferon pro Dio. 20 Pro tio ankaŭ nia patro Abraham fervore deziris oferi sian filon Izaak, la praulon de nia popolo; kaj kiam <Izaak> vidis la manon de sia patro manipuli la tranĉilon suben al li, li ne time formoviĝis. 21 Kaj la justulon Daniel oni ĵetis al la leonoj, kaj Ĥananja, Azarja kaj Miŝael estis ĵetegataj en ardantan fornon, kaj ili eltenis tion pro Dio. 22 Ankaŭ vi same fidu je Dio, kaj ne ĉagreniĝu. 23 Estas neracie por homoj kun religia scio ne rezisti kontraŭ doloro.

24 Per ĉi tiuj paroloj la patrino de la sep kuraĝigis kaj persvadis ĉiun el la filoj unuope, prefere morti ol transpaŝi la ordonojn de Dio. 25 Ili ankaŭ sciis, ke kiuj mortas pro Dio vivas al Dio, same kiel Abraham, Izaak kaj Jakob kaj ĉiuj patriarkoj.

**17:** 1 Kelkaj el la gardistoj diris ke, kiam oni volis kapti ankaŭ ŝin por mortigi ŝin, ŝi mem sin ĵetis en la flamojn, por ke neniu tuŝu ŝian korpon.

2 Ho patrino, kiu kun viaj sep filoj neniigis la perforton de l' tirano, frustris liajn aĉajn planojn, kaj montris la kuraĝon de via fido! 3 Starigita kvazaŭ nobla tegmento super la kolonoj de viaj filoj, vi firme kaj neskueble eltenis la tertremon de l' torturoj. 4 Estu do kuraĝa, sanktmensa patrino, konservu firme kaj daŭre vian esperon je Dio. 5 La luno en la ĉielo kun la steloj ne staras tie same majeste kiel vi, kiu antaŭluminte la filan sepstelaron al la pieco staras honore antaŭ Dio, firme starigita kun ili en la ĉielo. 6 Ĉar viaj filoj estis veraj posteuloj de patro Abraham.

## *La efiko de la martiriĝoj*

7 Se estus eble<sup>156</sup> por ni kvazaŭ artisto pentri la historion de via religio, ĉu ne la rigardantoj time retiriĝus, vidante, ke patrino de sep infanoj pro religio eltenas variajn torturiĝojn ĝismorte? 8 Efektive estus inde skribi sur ilian tombon ĉi tiujn vortojn por memori la homojn de <nia> popolo:

9 Kuŝas ĉi tie maljuna pastro  
kaj maljuna virino kaj sep filoj  
pro la perforto de tirano,  
kiu deziris neniigi la vivmanieron de la Hebreoj.

10 Ili defendis sian popolon,  
rigardante al Dio  
kaj eltenante la torturojn  
eĉ ĝismorte.

11 Vere la konkurso, en kiu ili engaĝiĝis, estis Dia, 12 ĉar en tiu tago la virto donis la premiojn kaj testis ilin pri persistemo. La premio estis senmorteco en vivo eterna. 13 Eleazar estis la unua konkursanto, la patrino de la sep filoj ankaŭ konkursis, kaj same la fratoj konkursis. 14 La tirano estis la kontraŭa partio, kaj la mondo kaj la tuta homaro estis la publiko. 15 Respekto antaŭ Dio venkis, kaj donis la kronon al siaj propraj atletoj. 16 Kiuj ne admiris la atletojn de l' Dia Leĝo? Kiuj ne estis mirigitaj?

17 La tirano mem kaj lia tuta konsilio miris pri ilia persistemo, 18 pro kiu nun ili staras antaŭ la Dia trono kaj vivas la vivon de eterna beateco. 19 Ĉar diras Moseo: *Ĉiuj konsekritoj estas sub viaj manoj*<sup>157</sup>. 20 Kiuj estas konsekritaj pro Dio, estas honorataj, ne nur per ĉi tiu honoro, sed ankaŭ per la fakto, ke pro ili niaj malamikoj ne regas super nia popolo, 21 la tirano estas punita kaj la patrujo purigita – ĉar ili, tieldire, fariĝis

---

<sup>156</sup> Aŭ: Se estus permesite.

<sup>157</sup> Rdm 33:3.

elaĉeta pago por la peko de nia popolo. 22 Kaj per la sango de tiuj piuloj, kaj per ilia morto kiel kulpopaga ofero, la Dia providenco savis Izraelon, kiu antaŭe estis mistraktata.

23 Ĉar, vidante la kuraĝon de ilia virto kaj ilian persistemon sub la torturoj, la tirano Antioĥo proklamis ilin al siaj soldatoj kiel ekzemplon por ilia propra persistemo, 24 kaj tio faris ilin fortaj kaj kuraĝaj por infanteria batalo kaj por sieĝo, kaj li neniigis kaj venkis ĉiujn siajn malamikojn.

18:1 Ho Izraelidoj, idaro el la semo de Abraham, obeu ĉi tiun Leĝon, kaj plenumu piecon en ĉiu maniero, 2 sciante, ke la pia racio regas super ĉiuj emocioj, ne nur pri interna suferado, sed ankaŭ pri suferoj de ekstere.

3 Tial kiuj pro la religio transdonis siajn korpojn dum torturoj, tiuj ne nur estis admirataj de la homoj, sed ankaŭ konsiderataj indaj por partopreni en Dia heredaĵo.

4 Pro ili la popolo ricevis pacon, kaj reviviginte la observadon de la Leĝo en la patrujo, ili neniigis la malamikojn. 5 La tirano Antioĥo estas kaj punita surtere kaj punbatata postmorte. Ĉar neniamaniere li kapablis devigi la Izraelidojn, fariĝi paganoj kaj forlasi la prapatrajn kutimojn, tial li forlasis Jerusalemon kaj ekmarŝis kontraŭ la Persojn.

### *La paroloj de l' patrino al siaj infanoj*

6 Ankaŭ la patrino de la sep filoj eldiris ĉi tiujn ordonojn al siaj infanoj: 7 Mi estis pura virgulino, kaj ne iradis ekster la domon de la patro; sed mi gardis la ripon, el kiu estis farita la virino. 8<sup>158</sup> Min ne koruptis deloganto en dezerta ebenaĵo, kaj ankaŭ la neniiganto, la trompema serpento, ne malpurigis la purecon de mia virgeco. 9 En la tempo de mia vivoforto mi

---

<sup>158</sup> En versikloj 8-12 sekvas aludoj al Gen 2:22; 3:1-7; 4:8; 22; 39:7-23, Num 25:7-13 kaj Dan 3, 6 kaj 14.

restis kun mia edzo, kaj kiam ĉi tiuj <filoj> estis kreskintaj, mortis ilia patro. Feliĉa viro li estis, kiu vivis sian vivon kun bonaj infanoj, kaj ne spertis la ĉagrenon de morto de karuloj. 10 Ankoraŭ estante ĉe vi, li instruis al vi la Leĝon kaj la profetojn. 11 Li legis por vi pri Habel, kiun mortigis Kain, pri Izaak, kiu fariĝis brulofero, kaj pri Jozef en la malliberejo. 12 Li rakontis al vi pri la fervoro de Pineĥas, kaj li instruis pri Ĥananja, Azarja kaj Miĝael en la fajro. 13 Li laŭdis Danielon en la leona puto, kaj benis lin. 14 Li memorigis vin pri la skriboj de Jesaja, kiu diras: *Eĉ se vi iros tra fajron, la flamo vin ne bruligos*<sup>159</sup>. 15 Li kantis por vi la kantojn de la psalmisto David, kiu diras: *Multaj estas la suferoj de la justuloj*<sup>160</sup>. 16 Li rediris al vi la sentencon de Salomono: *Estas arbo de vivo por tiuj, kiuj plenumas Lian volon*<sup>161</sup>. 17 Li konfirmis la demandon de Jeĥezkel: *Ĉu reviviĝos ĉi tiuj sekaj ostoj?*<sup>162</sup> 18 Ĉar la kanton, kiun instruis Moseo, li ne forgesis instrui al vi – la kanton, kiu diras: 19 *Mi mortigos kaj Mi vivigos*<sup>163</sup>: tio estas via vivo kaj la longatempeco de viaj tagoj.

20 Ho amara estis tiu tago – kaj tamen ne amara –, kiam tiu amara tirano de la Grekoj estingis fajron per fajro en siaj kruelaj kaldronoj, kaj en sia arda kolero kondukis tiujn sep filojn de l' filino de Abraham al la katapulto kaj ree al aliaj torturoj, 21 elpikis la pupilojn de iliaj okuloj, fortranĉis la langojn, kaj mortigis ilin en plej variaj torturoj. 22 Pro ĉi tiuj krimoj, la Dia justeco persekutis kaj persekutos la malbenatan tiranon. 23 Sed la filoj de Abraham kune kun sia venkoplana patrino unuiĝis en la ĥoron de la patroj, kaj ricevis purajn kaj senmortajn animojn de Dio, 24 al Kiu estu gloro por ĉiam eterne. Amen.

---

<sup>159</sup> Jes 43:2.

<sup>160</sup> Laŭ Psa 34:18.

<sup>161</sup> Snt 3:18.

<sup>162</sup> Jĥz 37:3.

<sup>163</sup> Rdm 32:39.



## Notoj al 4 Makabeoj

- 1:2-4 La kvar ĉefaj virtoj laŭ Platonismo kaj Stoiko estas prudento, sinregado, justeco kaj kuraĝo.
- 2:21 Laŭ Judismo, Dio plantis en la homon bonajn kaj malbonajn emociojn kaj emojn – la homo devas regi la malbonajn emojn, kiuj ne esence estas profunde malbonaj.
- 3:20 La aŭtoro eraras. Temas ne pri Seleŭko la 1a Nikator (305/4-281/280) sed pri Seleŭko la 4a Filopator (187-175).
- 4:3 Templo-trezorejoj ofte rolis kvazaŭ bankoj; oni povis tie deponi sian monon.
- 4:22 Ptolemeo la 6a Filometor (180-145) – 1 Mak 1:16-19.
- 5:23-24 Jen la kvar ĉefaj virtoj denove (vidu 1:2-4), sed nun kun pieco kiel kvara. Same ĉe Ksenofono – *Memorabilia*.

# Psalmoj 151

## Enkonduko

La libro de Ĵ Psalmoj en la Hebrea Biblio estas tre ŝatata tra la jarcentoj. Ofte la homoj prenas versiklojn el ĝi kiel iaspecan moton. Ofte tiajn versiklojn oni pendigas sur la muro de sia ĉambro.

Historie la nuna Hebrea libro estas la rezulto de longa estiĝo. Se legi atente, oni konstatas, ke pluraj aŭtoroj estas menciataj, kvankam en la ĝenerala konscio postrestas ĉefe David kiel *la* aŭtoro de psalmoj, eĉ tiel ke en la Korano, la *profeto* David estas konata pro sia speciala *libro*, la Psalmaro. La Hebrea teksto mencias pri David (Psalmoj 3-9; 11-32; 34-41; 51-65; 68-70; 86; 101; 103; 108-110; 122; 124; 131; 133; 138-145), la Korahidoj (44-49; 84-85; 87-88), Asaf (50; 73-83), Salomono (72; 127), Etan (89) kaj eĉ Moseo (90), dum precipe en la lasta parto estas pluraj sen aŭtorindiko. Fakuloj multe diskutadas pri ĉi aŭtor-indikoj.

Alia afero estas la nombrado de Ĵ kutimaj 150 psalmoj – kaj, lige al tio, la demando pri la amplekso de Ĵ unuopaj psalmoj. Granda diferenco inter la tradicia nombrado de Ĵ

Hebrea Psalmaro kaj la traduko de l' Septuaginto rezultas el kelkfoje kunigo de du psalmoj en unu psalmon, kun aliloke denove dissplitiĝo de unu psalmo en du psalmojn. La Latina Vulgato tion sekvis.

Alia afero estas, ke foje la libron oni subdividas en kvin librojn: Unua libro estas psalmoj 1-41; dua libro 42-72; tria libro 73-89; kvara libro 90-106; kvina libro 107-150. Tiuj ĉi libroj de psalmoj finiĝas per speciala doksologio.

Enhave oni distingas plurajn ĝenrojn. Oni ekzemple povas paroli pri individuaj pet-psalmoj, la plej granda grupo, ĉe kiu precipe la Sumera-Akada literaturo montras multe da paralelaĵoj, kaj laŭdo-psalmoj, kiuj apartenas al la liturgio de la tri ĉiujaraj pilgrimado-festoj, sed kiuj ankaŭ povas esti estintaj fiksita elemento ĉe la ĉiutaga liturgio, precipe tempe de la dua templo (do ĝis ties neniigo en 70 p.Kr.). Sed oni vidu la enkondukojn al la psalmoj, da kiuj en multege da lingvoj ekzistas grandaj nombroj.

Dato de verkiĝo de la diversaj psalmoj ege varias. Eĉ se difinita teksto portas indikon pri sia aŭtoro, por fakuloj tio ne aŭtomate signifas eblecon datumi la tekston. En la Biblio ja relative oftas la fenomeno de "pruntita" aŭtoreco. Nur en la unua jc p.Kr. la libro estis kanonigita.

Kiel ajn, la Septuaginto havas unu ekstran psalmon, n-ron 151. Ĝi ne apartenas al la pinto de l' Hebrea poezio, sed ĉar ankaŭ ĝi fariĝis kanona almenaŭ en la Orientaj Ortodoksiaj Eklezioj, ĝi devas trovi ĉi tie sian lokon.

## Psalmo 151

1 Tio ĉi estas psalmo memverkita de David, ekster la <kutima> nombro. Post lia sol-batalo kontraŭ Goljat.

- Malgranda mi estis inter miaj fratoj,  
la plej juna en la domo de mia patro;  
mi paŝtis la ŝafojn de mia patro.
- 2 Miaj manoj faris muzikinstrumenton,  
miaj fingroj agordis kord-instrumenton.
- 3 Kiu mesaĝos al mia Sinjoro?  
La Sinjoro mem: Li mem aŭskultas.
- 4 Li sendis Sian mesaĝiston  
kaj forprenis min de ĉe miaj ŝafoj;  
Li sanktoleis min per Sia sankta oleo.
- 5 Miaj fratoj estis belaj kaj grandaj,  
sed ili ne plaĉis al la Sinjoro.
- 6 Mi eliris por rezisti la aligentulon<sup>164</sup>,  
kaj li malbenis min je liaj idoloj.
- 7 Mi elingigis lian propran glavon,  
mi senkapigis lin kaj forprenis la honton de la  
Izraelidoj.

---

<sup>164</sup> Temas pri Goljat.

# Odoj

## Enkonduko al Odoj

En la manuskripta tradicio de la Septuaginto troviĝas iaspeca Krestomatio de Bibliaj kantoj, kiu nomiĝas *Odoj*.

La plimulto estas tre konataj tekstoj. Nur du Odoj estas tradukitaj ĉi tie, ĉar la ceterajn oni mem povas facile serĉi aliloke en la Biblio.

Kaj *Preĝo de Manase* kaj *Matena himno* estas originale verkitaj en la Greka. Pri la dato nenio estas certa.

La *Odoj* estas:

1. Eliro 15:1-19
2. Readmono 32:1-43
3. 1 Reĝoj 2:1-10
4. Ĥabakuk 3:2-19
5. Jesaja 26:9-20
6. Jona 2:3-10
7. Daniel 3:26-45
8. Daniel 3:52-88
9. Luko 1.46-55.68-79

10. Jesaja 5:1-9
11. Jesaja 38:10-20
12. Preĝo de Manase
13. Luko 2:29-32
14. Matena himno.

## Preĝo de Manase

- 1 Sinjoro ĉiopova,  
Dio de niaj patroj,  
de Abraham, Izaak kaj Jakob,  
kaj de ilia justa idaro,  
2 Vi, kiu faris ĉielon kaj teron kun tuta ĝia ornamo,  
3 kiu ligis la maron per la parolo de Via ordono,  
Vi kiu ŝlisis la profundegon kaj sigelis ĝin per Via  
timinda glora nomo;  
4 Vi, antaŭ kiu timas kaj tremas ĉio, pro Via potenca vizaĝo,  
5 ĉar ne eblas elteni la majeston de Via gloro  
nek eblas toleri Vian minacan koleron kontraŭ la pekuloj;  
6 sed tamen: senlima kaj ne traspurebla estas la  
kompatemo de Viaj promesoj,  
7 ĉar Vi estas la Sinjoro, la plej alta:  
pardonema, kompatema kaj gracoplena,  
kaj Vi pentas pri homa sufero.
- 8 Vi do, Sinjoro, Dio de la justuloj,  
Vi ne devigis pentemon por la justuloj,  
por Abraham, Izaak kaj Jakob, kiuj ne pekis antaŭ Vi,  
sed min – pekulon – Vi devigis al pentemo.
- 9 Ĉar miaj pekoj estas pli nombraj ol la mara sablo:

abundas miaj malbonagoj, Sinjoro: ili abundas!  
Mi ne meritas levi la rigardon kaj spekti la altan ĉielon,  
pro la amaso de miaj maljustaĵoj.  
10 Kurbigite sub multaj feraj katenoj,  
tiel ke mian kapon mi ne povas levi pro miaj pekoj,  
mi ne havas malstreĉiĝon,  
ĉar Vian koleron mi vekis  
kaj malbonon mi faris antaŭ Vi,  
starigante abomenindaĵojn kaj multigante indignaĵojn.

11 Kaj nun mi kurbigas la genuojn de mia koro,  
petegante pri Via boneco.  
12 Mi pekis, Sinjoro: mi pekis,  
kaj mi rekonas miajn malbonagojn.  
13 Petege mi alvokas Vin:  
Pardonu min, Sinjoro: pardonu min!  
Ne neniigu min kun miaj malbonagoj!  
Ne atentu miajn fiagojn kun eterna vengemo,  
nek pune kondamnu min en la plejprofundon de la tero,  
ĉar Vi, Sinjoro, estas la Dio de la pentemuloj.  
14 Sed montru en mi Vian bonecon  
kaj savu min – senmerite – laŭ Via granda kompatemo.  
15 Tiam mi laŭdos Vin ĉiujn tagojn de mia vivo,  
ĉar la tuta forto de la ĉieloĵ himnas pri Vi  
kaj Via estas la gloro, eterne.  
Amen.



## Matena himno

1 Gloron en la altoj al Dio  
kaj surtere pacon,  
en la homoj bonecon.  
Ni laŭdu Vin,  
5 ni gloru Vin,  
ni adoru Vin,  
ni sanktigu Vin,  
ni danku Vin,  
pro Via granda gloro,  
10 Sinjoro Reĝo,  
ĉielulo,  
Dio Patro ĉioreganta,  
Sinjoro Filo ununaskita,  
Jesuo Kristo,  
15 kaj sankta Spirito.  
Sinjoro Dio,  
Ŝafido de Dio,  
Filo de la Patro.  
Kiu forigas la pekojn de la mondo,  
20 kompatu nin.  
Kiu forigas la pekojn de la mondo,  
akceptu nian preĝon.

Kiu sidas dekstre de la Patro,  
kompatu nin.

25 Ĉar Vi sola estas sankta,

Vi sola estas Sinjoro,

Jesuo Kristo,

je laŭdo de Dio Patro. Amen.

Ĉiutage mi gloros Vin,

30 kaj Vian nomon mi laŭdos por eterne

kaj ĝis la eterno de l' eterno.

Bonvolu, Sinjoro, ankaŭ ĉi tiun tagon

gardi nin sen pekoj.

Glorata Vi estas, Sinjoro Dio de niaj gepatroj,

35 kaj laŭdata kaj honorata Via nomo ĝis la eterno de l' eterno.

Amen.

Glorata Vi estas, Sinjoro, instruu al mi Viajn justajn verdiktojn,

glorata Vi estas, Sinjoro, instruu al mi Viajn justajn verdiktojn,

glorata Vi estas, Sinjoro, instruu al mi Viajn justajn verdiktojn.

Sinjoro, rifuĝejo Vi fariĝis por ni de generacio al generacio.

40 Mi diris, Sinjoro : kompatu min,

sanigu mian animon, ĉar mi pekis al Vi.

Sinjoro, ĉe Vi mi serĉas rifuĝon ;

instruu al mi plenumi Vian volon, ĉar Vi estas mia Dio ;

ĉar ĉe Vi estas la fonto de la vivo,

45 en Via lumo ni vidos la lumon.

Elstreĉu Vian kompatemon al kiuj ekkonos Vin.

## Apendico

Per la nuna eldono en Esperanto ni havas je nia dispono ĉiujn librojn, kiuj estas kanonaj en iu ajn eklezio krom la libron *Henoh* de la Etiopia Eklezio.

Eĉ enestas kelkaj pliaj verkaĵoj, kiuj iamaniere rande de Septuaginto aŭ Vulgato estis transdonataj tra la jarcentoj: *Odoj*, *Psalmoj de Salomono* kaj *Letero al la Laodiceanoj*.

\* \* \*

Kiom koncernas la libron *Henoh*: en la Etiopia Eklezio oni konas ankoraŭ apokalipsan libron, kiun la ceteraj eklezioj ne rekonas.

Je la nomo de *Henoh* ligiĝas pluraj libroj : 1 *Henoh*, ankaŭ nomata Etiopia *Henoh*, estas la pli aĝa : 2a jc a.Kr.-1a jc p.Kr.

La verko 2 *Henoh*, la Slavona apokalipso, devenas el la fino de l' 1a jc p.Kr. La tria verko, 3 *Henoh*, la Hebrea apokalipso, datiĝas el 5a aŭ 6a jc p.Kr.

\* \* \*

La unua parto de 1 *Henoh* (1 *Hen*), ĉapitroj 1-5, estas enkonduko kiu pentras la eŝatologian eraon kaj la Lastan Juĝon ; sekvas ĉapitroj 6-36 pri la falintaj anĝeloj, iliaj seksaj rilatoj kun virinoj (Gen 6:1-4), ilia koruptado de la homaro, la

sensukcesa interveno de Henoĥ por la homoj, antaŭdiro pri ilia kondamniĝo, pluraj vizioj de Henoĥ dum vojaĝo tra tero, ŝeolo kaj ĉielo.

La dua ĉefparto de la libro, la t.n. similaĵoj aŭ paraboloj, ĉapitroj 37-71, temas pri la venonta Juĝo pri justaj kaj maljustaj, pri la Mesio, la Filo de Homo, la Justulo, la Elektito ; estas klarigo pri ĉielaj sekretoj ; mezurado de l' Paradizo ; la resurekto de l' justuloj, la puno de la falintaj anĝeloj.

La tria parto, astrologia traktato, ĉapitroj 72-82, temas pri tempokalkulado pere de la suna jaro, kaj la kosmaj malordoj de la fina tempo.

La kvara parto, la Vizioj de Songoj, ĉapitroj 83-90, formas du viziojn pri la estonta historio (se rigardi el la perspektivo antaŭdiluva de Henoĥ) de mondo kaj Izraelo : la puno pere de la Diluvo, la historio de Izrael ekde Adam ĝis Makabeoj – kun multe da simboloj. Oksoj simbolas patriarĥojn ; ŝafoj – fidelajn Izraelidojn ; bestoj kaj rabobirdoj – paganajn subpremantojn ; grandkorna virŝafo – leviĝantan Judan gvidanton ; blanka taŭro kun egaj kornoj – la Mesion. Sekvas tekstoj pri falintaj anĝeloj kaj la Trono de la Juĝisto kaj la nova Jerusalemo.

La kvina parto, ĉapitroj 91-104, la testamento de Henoĥ, resumas la temon de la spirita benateco de la justuloj kaj la sufero de la pekuloj. Tiu ĉi sekcio traktas malvolviĝon de l' historio en la t.n. Apokalipso de la Semajnoj : sep t.n. mondosemajnoj kun tri aldonaj semajnoj.

La Apendico, ĉapitroj 105-8, enhavas fragmentojn de sendependaj verkaĵoj, speciale de la Libro de Noa, kaj fino fare de editoro<sup>165</sup>.

1 Henoĥ havas ampleksan anĝelologion : en 1 Hen 20 ni vidas la sep ĉefanĝelojn : Uriel, Rafael, Ragaël, Miĥael,

---

<sup>165</sup> Ni sekvis ĉi tie la resumon de E. Isaac en James H. Charlesworth (ed.) – *The Old Testament Pseudepigrapha, vol. 1: Apocalyptic Literature & Testaments*, Doubleday, New York e.a. 1983. Paĝo 5.

Sarakael, Gabriel kaj Remiel. Krom tio ni renkontiĝas falintajn anĝelojn kiel Kokabel, Barakel, Zikiel k.a. Oni ankaŭ mencias pri du ĉielaj loĝejoj, unu interne de la alia, kun la trono de Dio en la interna. En pli postaj mistikaj tekstoj, kiuj larĝe influis je la kabalo, tio kondukis al la nocio pri sep samcentraj ĉieloĵ. En 1 Henoĥ, la figuro Henoĥ estas suprenlevita al la ĉielo de l' ĉieloĵ kaj finfine dank' al certaj misteroj li fariĝas la Filo de Homo el antaŭaj profetaĵoj (1 Hen 71:14). En 3 Henoĥ, male, Henoĥ metamorfoziĝas en la ĉefanĝelon Metatron.

La verko laŭ multaj fakuloj estis verkita en la Hebreaj, laŭ aliaj en la Aramea – ree aliaj supozas, ke same kiel ĉe Daniel, origine ĝi estis parte verkita en ambaŭ lingvoj. La originalo ne plu ekzistas.

En la frua eklezio 1 Henoĥ estis uzata de la aŭtoroj de l' Letero de Barnabas, Apokalipso de Petro, de pluraj apologiaj verkoj. Multaj ekleziaj patroj, Justino la Martiro, Ireneo, Origeno, Klemento Aleksandria ktp ĉu konis ĉu uzis ĝin. Ankaŭ Tertuliano ĝin alte estimis. Sed ekde la 4a jc ĝi perdis la favoran akceptiĝon. Negative rilatis al ĝi Aŭgustino, Hilario kaj Hieronimo. Post tio, escepte de ege maloftaj okazoj, 1 Henoĥ malaperis el la intereso, krom en la Etiopia eklezio.

En frua 17a jc kelkaj Eŭropaj scienculoj supozis, ke versio de 1 Henoĥ simila je tiu citata de la NT-a letero de Judas kaj konata al fruaj ekleziaj patroj, ekzistas ie en Etiopio.

Nur en 1773 certa J. Bruce, Skota vojaĝisto al Afriko, venigis ekzempleron de 1 Henoĥ al Eŭropo. Kaj nur en 1800 unuafoje aperis tre malgranda, parta Latina traduko fare de Silvestre de Sacy.

La unua vere fama traduko en Eŭropo estas de R.H. Charles – *The Book of Enoch*, 1917.

# Psalmoj de Salomono

## Enkonduko al Psalmoj de Salomono

La 18 Psalmoj de Salomono vortigas la reagon de grupo da piaj Judoj al la ekokupo de Jerusalem fare de la Romiaj trupoj en la lasta jarcento a.Kr.

Psalmoj 1, 2, 8 kaj 17 rakontas kiel nacia kadro neleĝe misuzas siajn prerogativojn; ili tamen estas venkitaj de fremdaj invadintoj, ekzekutitaj aŭ deportitaj. La pagana okupo, kiu sekvas la nacian reĝimon malamatan, estas pli aĉa, kun enkonduko de paganaj kultoj kaj sociaj kutimoj fremdaj al Juda tradicio. Kelkaj civitanoj tamen transprenas ilin.

La piuloj de ĉi tiuj psalmoj esperas, ke aperos legitima reĝo – en la linio de David – por gvidi ribelon kontraŭ la okupantaj fortoj kaj por establi sendependan Judan ŝtaton.

Psalmoj 17 enhavas Mesian himnon kiu priskribas tian regadon de la « enoficigita » filo de David. En aliaj psalmoj oni renkontas parencecon kun kanonaj psalmoj el la Biblio kaj kun psalmodotekstoj el Kumrano.

La origina lingvo laŭ la plimulto de la fakuloj estas la Hebrea, baldaŭ tradukitaj en la Grekan kaj la Siriakan. Hebreaj manuskriptoj ne plu ekzistas.

Rilatoj kun la Greka versio de 1 Baruh<sup>ĉ</sup> montras, ke la Psalmoj de Salomono ekzistis en la Greka jam antaŭ la fino de 1<sup>a</sup> jc p.Kr.

La priskriboj pri la fremda okupanto estas tiel konkretaj en detaloj, ke tio iom helpas datumi la verkon. Sed ĝuste tio samtempe donas problemojn de interpretado : subtenantoj ne mankas por Antioĥo Epifano kiel subpremanto aŭ pri Herodo la Granda, aŭ Pompejo, aŭ (la pliposta imperiestro) Tito. Sed eble la plimulto de 1<sup>a</sup> detaloj akordiĝas kun Pompejo, kiu en 63 a.Kr. kaptis la sanktan urbon : li venis el okcidento (17:12), bonvenigita de almenaŭ parto de 1<sup>a</sup> regantoj kaj de la popolo (8:16-18), sed rezisto ĉe la templo kaŭzis lin alvoki trupojn inkluzive sieĝon (2:1). Kiam falis la urbo, li kaj la trupoj profanis la templon (2:2). Forirante el Jerusalemo li iris al Egiptujo, kie li estis murdita : lia kadavro sur la strando, sen ceremonio (2:26s).

Ke Jerusalemo estas profanita sed ne estis neniigita, metas 70 p.Kr. kiel lastan limdaton por la verkiĝo.

Ĉi psalmoj supozeble estis verkitaj en Jerusalemo.

## Psalmoj de Salomono

### 1

1\* Mi vokis al la Sinjoro, kiam mi estis grave minacata,  
al Dio, kiam pekuloj maltrankviligis min.

2 Neatendite milit-bruego estis aŭdata antaŭ mi ;

« Li aŭskultos min, ĉar mi estas plena je justeco ».

3 Mi konsideris en mia koro, ke mi estas plena je justeco,  
ĉar mi estis prospera kaj havis multajn infanojn.

4 Ilia riĉo estis disvastigita en la tuta mondo,  
kaj ilia gloro ĝis la ekstremo de la tero.

5 Ili levis sin mem ĝis la steloj,  
ili diris, ke neniam ili falos.

6 Ili estis arogaj en siaj posedaĵoj,  
kaj ili ne rekonis <Dion>.

7 Iliaj pekoj estis en sekreto,  
kaj eĉ mi ne sciis.

8 Iliaj senleĝaj agoj superis la paganojn antaŭ ili ;  
ili komplete profanis la sanktejon de l' Sinjoro.



## 2 Psalmo de Salomono. Pri Jerusalemo.

1\* En sia trokuraĝo la pekulo neniigis fortajn muregojn per sia  
ramo,

kaj Vi ne malhelpis lin.

2 Fremdaj paganoj grimpis sur Vian altaron,

trokuraĝe ili surtretis ĝin per siaj ŝuoj,

3 ĉar la filoj de Jerusalemo profanis la sanktejon de l' Sinjoro,  
malpie malhonoris la oferojn de Dio.

4 Tial Li diris : Forigu ilin longe de Mi :

ili ne plaĉas al Mi !

5 Ŝia brila belo estis nenio antaŭ Dio,

ĝisfine ŝi estis malhonorita.

6 Ŝiaj filoj kaj filinoj estis malhonorige kaptitaj,

iliaj nukoj en katenoj, sensirmaj kontraŭ la paganoj.

7 Laŭ iliaj pekoj Li traktis ilin,

ĉar Li transdonis ilin en la manojn de l' venkintoj.

8 Ĉar senkompate Li turnis Sian vizaĝon for de ili,

junaj kaj maljunaj kaj infanoj unuope,

ĉar ili ĉiuj unuope agis malbone kaj ne volis obei.

9 Kaj tiel la ĉielo fariĝis peza, kaj la tero elvomis ilin ;

ĉar neniu homo sur ĝi faris, kion faris ili.

10 Kaj la tero rekonos Viajn justajn juĝojn, ho Dio !

11 Ili faris la filojn de Jerusalemo objekto de moko pro

la malĉasteco en ĝi ;

ĉiu pasanto je hela taglumo povis enveni.

12 Ili priŝercis ilian malpiecon kompare kun kion ili mem faris ;

je hela taglumo ili metis ilian maljustecon ĉe pilorio.

13 Kaj la filinoj de Jerusalemo estis profanaj laŭ Via juĝista

verdikto,

pro tio, ke ili malpurigis sin mem en fia malĉasteco –

14 tio doloras al mi en la fundo de mia koro !

15 Kun koro sincera mi pravigas Vin, ho Dio,  
ĉar en Viaj juĝoj montriĝas Via justeco, ho Dio !  
16 Ĉar al la pekuloj Vi repagis laŭ iliaj faroj,  
kaj konforme al iliaj tre pezaj pekoj ;  
17 iliajn pekojn Vi malkaŝis, por ke Via juĝo fariĝu publika ;  
ilian memoron Vi forigis de la tero.  
18 Dio estas justa juĝanto kaj ne serĉas plaĉi al iu.

19 Ĉar paganoj insultis kaj distretis Jerusalemon ;  
ŝia belo estis forpuŝita de ŝia fiera trono.  
20 Anstataŭ honora vesto ŝi devis surmeti sakaĵon,  
anstataŭ krono <ŝi devis meti> mezur-rubandon ĉirkaŭ la kapon.  
21 Demeti ŝi devis la belan diademon, kiun Dio metis sur ŝian  
kapon :  
ŝia ornamaĵo senhonore kuŝis planke, forĵetita sur la teron.

22 Sed mi ĝin vidis kaj persiste mi preĝis al la Sinjoro, dirante :  
Estu sufiĉe, Sinjoro, ke Via mano pezas sur Jerusalemon  
per la alfluo de l' paganoj !

23 Ĉar ili ludis sian ludon kaj en kolero kaj flamiĝemo  
nenion ili indulgis,  
kaj ili neniigos ĝin, se Vi, Sinjoro, ne riproĉos ilin en Via kolero.

24 Ĉar ili ne agis en sankta fervoro, sed laŭplaĉe,  
por disverŝi sur nin sian malmildecon per prirabadoj.

25 Ne hezitu, Dio, sendi vengon sur ilian kapon  
por ŝanĝi la trokuraĝon de la drako\* en malhonoron !

26\* Ne daŭris longe ĝis Dio montris al mi lian trokuraĝon  
trapikitan sur la montoj de Egiptujo,

pli senvalorigitan ol la plej eta afero, surtere kaj mare ;

27 flosis lia kadavro sur la ondoj en multa honto,  
kaj neniu lin enterigis,

ĉar Li lasis lin al malhonoro.

28 Li ne atentis, ke homo li estas,  
kaj li ne pensis pri la fino,

29 Li pensis : Sinjoro mi estas de tero kaj maro,  
kaj li ne rekonis, ke Dio estas granda,  
forta en Sia grandega potenco.

30 Li estas reĝo supre en la ĉielo  
kaj juĝas la reĝojn kaj la regnojn.

31 Li levas min al gloro  
kaj senglore Li kondukas la fierajn al la eterna pereco,  
ĉar Lin ili ne rekonis.

32 Nu do, vi granduloj de la tero : atentu pri la juĝo de l' Sinjoro<sup>166</sup>,  
ĉar granda Reĝo kaj Justulo estas, kiu juĝas la tutan teron !

33 Laŭdu Dion, vi kiuj kun scio timas antaŭ la Sinjoro,  
ĉar la kompatemo de l' Sinjoro dum la juĝo koncernas Liajn  
adorantojn,

34 por ke distingon Li faru inter la piaj kaj la malpiaj  
kaj ke Li repagu al la malpiaj laŭ iliaj faroj

35 kaj ke Li kompatu pri la piaj kontraŭ la premo de l' malpiaj  
kaj ke Li repagu al la malpia, kion tiu faris al la piulo.

36 Ĉar la Sinjoro estas plena je graco por kiuj paciencie alvokas Lin,  
kaj montras Sian kompaton al kiuj submetiĝas al Li,  
tiel ke ĉiam ili staru antaŭ Li en forto.

37 Laŭdata estu la Sinjoro por eterne antaŭ ĉiuj Liaj sklavoĵ !

### 3 Psalmo de Salomono. Pri la justuloj

1 Kial vi dormas, mia animo, kaj ne laŭdas la Sinjoron ?

Kantu novan kanton por Dio, la laŭdinda !

2 Kantu kaj vekigu al Lia servo,  
ĉar al Dio plaĉas psalmo el gaja koro.

---

<sup>166</sup> Psa 2:10.

3 Justuloj pensas pri la Sinjoro la tutan tempon;  
en iliaj okuloj Liaj juĝoj estas justaj.

4 Justulo ne disdegnas, se la Sinjoro punas lin ;  
ĉar estas lia plezuro esti ĉiam antaŭ la Sinjoro.

5 Se stumblas la justulo, li rekonas la justecon de l' Sinjoro ;  
li falas kaj vidas, kion faros pri li Dio ;  
li elrigardas, de kie venos helpo al li.

6 La vero de la justuloj venas de Dio, ilia savanto;  
en la domo de justulo ne sekvas peko post peko.

7 Daŭre la justulo traserĉas sian domon  
por, se li faris ion misan, elpagi la kulpon.

8 Senintencajn pekojn li riparas per fastado kaj li grave sin  
punbatas ;  
kaj la Sinjoro deklaras puraj ĉiun piulon kaj ties domon.

9 Se stumblas ja malpiulo, li malbenas sian vivon,  
la tagon, kiam li estis naskita, kaj la naskodolorojn de l' patrino.

10 Li amasigas pekon sur peko dum tuta la vivo ;  
li falas – granda ja estas lia falo ! – kaj ne plu stariĝas.

11 Eterna estas la pereco de l' pekulo,  
kaj pri li ne plu estos pensate, se Li memoras la piulojn.

12 Tio por eterne estas la parto de l' pekuloj ;  
sed kiuj timas antaŭ la Sinjoro, tiuj leviĝos al vivo eterna,  
kaj ilia vivo estas en la lumo de l' Sinjoro kaj neniam finiĝos.

#### 4 Dialogo de Salomono. Kontraŭ tiuj, kiuj provas plaĉi al la homoj

1 Kial, ho profanulo, vi sidas en la konsilio de l' piaj,  
dum via koro estas longe for de l' Sinjoro,  
kaj per viaj transpaŝoj vi incitas la Dion de Izrael ?

2 Ekscesa en paroloj, ekscesa en gestoj super ĉiuj,  
li estas akra en esprimoj por kondamni la kulpulojn en la juĝo.

3 Li estas la unua por en ŝajna pasio frapi lin,  
dum mem li ja estas implikita en multspecaj pekoj kaj senbrideco.

4 Liaj okuloj direktiĝas sendistinge al ĉiu virino,  
lia lango mensogas, se ĵuron li diras.

5 Nokte kaj kaŝe li pekadas, ĉar li sin kredas nevidata ;  
per la okuloj li peke parolas kun ĉiu virino pri malnoblaĵo ;  
rapide li penetriĝas en ĉiun domon, gaja kvazaŭ senkulpulo.

6 Elradikigu tiujn, ho Dio, kiuj vivas hipokrite inter la piuloj,  
neniigu lian<sup>167</sup> vivon per malsano kaj povreco !

7 La farojn de tiuj, kiuj provas plaĉi al la homoj, ho Dio, Vi malkaŝu,  
ridindigu kaj hontigu liajn farojn.

8 La piuloj konsideru la juĝon de sia Dio kiel justan,  
kiam la pekuloj estas forigataj el la okuloj de l' justulo,  
tiu, kiu provas plaĉi al la homoj, kiu trompe citas la Leĝon.

9 Liaj okuloj direktiĝas al la domo de la homo ankoraŭ senŝancela,  
kiel serpento neniigas la saĝecon de l' aliaj per krimaj diroj.

10 Liaj paroloj estas sofismoj por lasi liberan kuron al siaj  
malpiaj pasioj ;

li ne ĉesas, ĝis al li prosperis forpeli la homojn kiel orfojn.

11 Tiel li malplenigis la domon pro siaj fiaj pasioj,  
parolis trompeme, kvazaŭ neniu ĝin aŭdus aŭ vidus.

12 Kiam li satiĝas pri malpieco en unu loko,  
liaj okuloj direktiĝas al la sekva domo,

por neniigi ĝin per konfuzigaj vortoj.

13 Ĉe ĉio ĉi tio lia deziro estas nesatigebla kiel Hadeso.

---

<sup>167</sup> Same kiel tuj poste, subita transiro al singularo.

14 Lia parto ĉe Vi, ho Sinjoro, estu hontigo,  
lia eliro estu suspirado, lia eniro blasfemo !  
15 Lia vivo, Sinjoro, <estu> en malĝojo, danĝero kaj malsufiĉo,  
ĉagrena lia dormado, senespera lia vekigo !  
16 Nokte liaj palpebroj restu senigitaj de dormo,  
ĉiu laboro de liaj manoj mizere malsukcesu !  
17 Kun manoj malplenaj li eniru sian domon,  
lia domo suferu mankon pri ĉio, kio satigas la malsaton.  
18 Lia maljuno estu soleca kaj seninfana, ĝis li forpreniĝos !

19 La korpo de tiuj, kiuj provas plaĉi al la homoj, estu disŝiritaj  
de bestoj,  
kaj la ostoj de l' malpiuloj kuŝu malhonore en la suno !  
20 La korakoj elpiku la okulojn al la hipokrituloj,  
ĉar multajn domojn ili neniigis malhonore  
kaj disŝiris tiujn per siaj pasioj,  
21 kaj pri Dio ili ne memoris,  
nek timis antaŭ Dio ĉe ĉio ĉi tio,  
sed iritis kaj kolerigis Dion.  
22 Tiu do elradikigu ilin de la tero,  
ĉar trompeme ili erarigis senmalicajn animojn.

23 Feliĉaj, kiuj timas antaŭ la Sinjoro en senmalico !  
La Sinjoro savos ilin de homoj ruzaj kaj pekemaj ;  
kaj Li savos nin de ĉiuj insidoj de l' malpiuloj.  
24 Dio neniigu tiujn, kiuj en sia trokurajo faras maljuston,  
ĉar granda kaj potenca juĝisto estas la Sinjoro, nia Dio, en justeco.  
25 Via graco, ho Sinjoro, estu super ĉiuj, kiuj Vin amas !

## 5 Psalmo de Salomono

1 Sinjoro Dio, jubile mi laŭdas Vian nomon,  
meze de tiuj, kiuj konas Viajn justajn juĝojn.

2 Ĉar bona kaj kompatema Vi estas, rifuĝo por la malriĉulo ;  
se mi vokas al Vi, do Vi ne silentu al mi !

3 Ĉar de fortulo oni nenion rabas,  
kaj kiu povas rabi el ĉio, kion Vi kreis, se Vi ĝin ne donas ?

4 Ĉar la homo kaj lia parto ĉe Vi estas sur pesiloj antaŭ Vi ;  
al kion Vi ordonis, Dio, li ne povas aldoni ion.

5 En nia premateco ni alvokas Vian helpon,  
kaj nian peton Vi ne negos,  
ĉar Vi estas nia Dio.

6 Vian manon ne pezigu sur ni,  
por ke per nia mizero ni ne peku !

7 Ankaŭ se Vi ne elaŭskultas nin, ni tamen ne delasas,  
sed ni venadas al Vi.

8 Ĉar se mi malsatas, mi vokas al Vi, ho Dio,  
kaj Vi donas al mi.

9 La birdojn kaj la fiŝojn Vi nutras,  
al la stepo pluvon Vi donas, por ke ekkresku la herbo.

10 Al ĉiuj bestoj sur la stepo nutraĵon Vi donas,  
se ili malsatas, ili supren rigardas al Vi.

11 La reĝojn, la princojn kaj la popolojn Vi nutras, ho Dio,  
kaj kiu estas la espero de l' malriĉulo kaj de la soifanto, se ne  
estas Vi, Sinjoro ?

12 Vi <ilin> elaŭskultos, ĉar kiu estas bona kaj afabla krom Vi ?  
Kiu ĝojigas la animon de l' povrulo, kaj malfermas Vian manon  
kun kompato ?

13 La boneco de la homo estas malabunda kaj venos morgaŭ,  
kaj se sen murmurado li ripetas ĝin, tio estas io mirinda.

14 Sed Via dono estas abunde bona kaj riĉa,  
kaj kiu esperas je Vi, al tiu donoj ne mankos.

15 Sur la tuta tero etendiĝas, Sinjoro, Via kompatemo en bono.

16 Feliĉa tiu, al kiu Dio donas sufiĉe da atento ;  
se la homo havas abundon, li ekpekas.

17 Bona estas kio estas adekvata<sup>168</sup>, en justeco,  
kaj je tio venas la beno de l' Sinjoro,  
ke oni estu satigata, en justeco.

18 Kiuj timas antaŭ la Sinjoro, tiuj ĝojas pri la bono,  
kaj Via boneco estas super Izrael en Via Regno.

19 Laŭdata estu la gloro de l' Sinjoro, ĉar Li estas nia Reĝo !

## 6 En espero. De Salomono

1 Feliĉa la homo, kies koro pretas alvoki la nomon de l' Sinjoro ;  
se la nomon de l' Sinjoro li memoras, li saviĝos.

2 Liaj padoj estas ebenigataj de la Sinjoro,  
kaj la laboro de liaj manoj estas gardata de l' Sinjoro, lia Dio.

3 Lian animon ne timigas la vidado de sufokaj songoj ;  
se riveron li travadas, lin ne timigas la turbula akvo.

4 El sia dormo li leviĝas, kaj li laŭdas la nomon de l' Sinjoro ;  
pri la bonaj aferoj de sia koro li kantas antaŭ la nomo de sia Dio.

5 Li preĝas al la Sinjoro por tuta sia domo,  
kaj la Sinjoro elaŭskultas la preĝon de ĉiu, kiu timas antaŭ Dio.

6 Kaj ĉiun deziron de animo, kiu esperas je Li, la Sinjoro  
plenumas.

Laŭdata estu la Sinjoro, kiu faras gracon al tiuj, kiuj vere Lin amas !

## 7 De Salomono. Pri restarigo.

1 Ne forigu Vian tendon de ni, ho Dio,  
por ke tiuj, kiuj nin malamas, ne senkiale ataku nin !

---

<sup>168</sup> Traduko ne tute certa.



2 Vi ja forpuŝis ilin, ho Dio ;  
ilia piedo ne distretu la heredaĵon de Via sanktejo !  
3 Vi nin punbatu laŭ Via volo,  
sed ne transdonu nin al la paganoj !  
4 Ĉar se la morton Vi sendas,  
ja Vi ĝin sendas al ni!  
5 Vi estas kompata,  
kaj Vi ne koleras al ni tiel, ke Vi neniigos nin.  
6 Dum Via nomo tendumas inter ni, ni trovos kompaton,  
kaj la paganoj ne venkos nin.  
7 Ĉar Vi estas nia defendanto,  
ni alvokos Vin, kaj Vi nin elaŭskultos.  
8 Ĉar ĝis eterne Vi kompatos pri la popolo Izrael,  
kaj Vi ne forpuŝos ilin.  
9 Ĉar ĝis eterne ni estas sub Via jugo,  
kaj sub Via punbastono.  
10 Tempe de Via helpo  
Vi nin restarigos,  
Vi kompatos pri la domo de Jakob en la tago,  
en kiu Vi ĝin promesis.

## 8 De Salomono. Pri batalo<sup>169</sup>.

1 Danĝeron kaj militbruadon perceptis mia orelo,  
trumpetadon, kiu anoncis morton kaj pereon,  
2 bruegon de homamaso, kiel vento impona,  
kvazaŭ timiga fajroŝtormo, kiu furiozas tra la dezerton.  
3 Tiam mi pensis ĉe mi mem :  
Kie Dio verdiktos pri ili ?

---

<sup>169</sup> Aŭ: Pri venko.

4 Mi perceptis susuron en Jerusalemo, la sankta urbo ;  
5 miaj koksoj kuntiriĝis de timo,  
miaj genuoj malfortiĝis, mia koro ektimis,  
miaj ostoj tremetis kiel lino.  
6 Mi pensis: Tamen siajn vojojn ili ja faris justaj!

7 Mi pripensis la juĝojn de Dio ekde la kreo de ĉielo kaj tero,  
kaj mi devis pravigi Dion en Liaj juĝoj de la pleja komenco :  
8 Dio malkaŝis iliajn pekojn antaŭ la suno,  
la tuta tero devis rekoni la juĝon de Dio kiel justan.  
9 En la subteraj kaŝejoj estis iliaj malpiaĵoj, provokante Lin :  
malĉastis filo kun sia patrino aŭ patro kun la filino.  
10 Ili adultis, ĉiu kun la edzino de sia proksimulo,  
kaj ili ligis sin reciproke al tio per ĵuro.

11 La sanktejon de Dio ili disrabis,  
kvazaŭ ne estus savanta heredanto.  
12 La altaron de l' Sinjoro ili suriris post ĉiu malpura agado,  
kaj en sango ili malpurigis la oferon, kvazaŭ estus profana viando.  
13 Ne plu restis pekoj, kiujn ili ne plenumis pli ol la paganoj.

14 Tial Dio verŝis por ili <trinkaĵon de> spirito erariga<sup>170</sup>,  
donis al ili pokalon kun nemiksita vino por ebriiĝi.  
15\* Li alproksimigis iun de la finoj de l' tero, kiu batas fortege ;  
militon li deklaris kontraŭ Jerusalemo kaj ĝia teritorio.  
16 La gvidantoj de la lando ĝoje aliris al li,  
diris al li : Dezirata estas via veno, estu bonvena, eniru en paco !  
17 Ili ebenigis la malglatajn vojojn por lia eniro,  
malfermis la pordegojn de Jerusalemo, prikronis ĝiajn muregojn.

---

<sup>170</sup> Traduko ne tute certa.

18 Li eniris en paco, kvazaŭ patro en la domon de siaj infanoj,  
akiris por si firman sidejon kun granda certeco.

19 Li konkeris la fortikigitajn turojn kaj la muregon de  
Jerusalemo ;

ĉar Dio lin gvidis sekure, dum ili estis blindumitaj.

20 Li mortigis iliajn gvidantojn kaj ĉiujn saĝajn konsilistojn,  
verŝis la sangon de l' loĝantoj de Jerusalemo kvazaŭ akvon

malpuran,

21 forkondukis iliajn filojn kaj filinojn, kiujn ili generis en

malĉasto.

22 En sia malpureco ili agis kiel siaj gepatroj,

profanigis Jerusalemon kaj ĉion, kio estas sankta al la nomo

de Dio.

23 Sed Dio Sin montris justa en Siaj juĝoj pri la popoloj de la

tero,

kaj la piuloj de Dio estas inter ili kiel senkulpaj ŝafidoj.

24 Laŭdata estu la Sinjoro, kiu juĝas la tutan teron en Sia justeco !

25 Vidu do, Dio, en Via justeco Vi montris al ni Vian juĝon ;

niaj okuloj vidis Viajn juĝojn, ho Dio.

26 Ni justigis Vian por eterne sanktan nomon ;

ĉar Vi estas justa Dio, Vi kiu juĝas Izraelon por eduki ĝin.

27 Denove Vin turnu al ni, ho Dio, en kompatemo,

kaj indulgu nin!

28 Kunvenigu la disbatitan Izraelon kun kompatemo kaj bono,

ĉar Via fidelo estas kun ni !

29 Ni ja montriĝis obstinaj,

sed Vi estas nia edukanto.

30 Ne turnu Vin for de ni, nia Dio,

por ke la paganoj ne manĝu nin kvazaŭ ne estus savanto !

31 Vi ja estas nia Dio de la komenco,

kaj je Vi estas nia espero, ho Sinjoro.

32 Ni ne delasos de Vi,

ĉar Viaj juĝoj estas bonaj super ni.

33 Via bonvolemo estu super ni kaj niaj idoj, por eterne.

Sinjoro, nia Savanto, en eterne ni ne konfuziĝos.

34 Laŭdata estu la Sinjoro pro Siaj juĝoj, en la buŝo de l' piuloj, kaj por eterne Izrael estu benata de la Sinjoro !

## 9 De Salomono. Ĉe riproĉo.

1 Kiam Izrael en ekzilon estis forkondukita al fremda lando, kiam ili malfideliĝis de la Sinjoro, ilia Savinto, ili estis forigitaj el sia heredaĵo, kiun donis al ili la Sinjoro.

2 Inter ĉiuj popoloj estis la diasporo de Izrael, laŭ la parolo de Dio,

por ke ĉe niaj pekoj Vi, ho Dio, montriĝu justa en Via justeco, ĉar justa juĝisto Vi estas, pri ĉiuj popoloj de la mondo.

3 Ĉar de Via scio restas kaŝita neniŭ, kiu faras maljustaĵon, kaj la justaj agoj de l' piuloj estas konataj al Vi, Sinjoro ; kaj kien kaŝu sin la homo antaŭ Via scio, ho Dio ?

4 Niaj agoj okazas laŭ elekto kaj deziro de nia koro : agi juste aŭ maljuste troviĝas en niaj manoj, sed en Via justeco Vi atentis pri la idoj de l' homoj.

5 Kiu agas juste, tiu trezorigas al si mem vivon ĉe la Sinjoro, kaj kiu agas maljuste, tiu mem estas kulpa pri perejo de sia animo ; la juĝoj de la Sinjoro estas justaj al ĉiu homo kaj al ĉiu domo.

6 Ĉar al kiu Vi dezirus esti bonvola, ho Dio, se ne al tiuj, kiuj alvokas la Sinjoron ? Vi absolvas la animon de pekoj, se <ni> konfesas kaj eldiras <la kulpon> ,

ĉar honto kovras nin kaj niajn vizaĝojn, pro ĉio ĉi.

7 Kaj al kiuj Vi dezirus pardoni la pekojn, se ne al la pekuloj ?

Justulojn Vi ja benas kaj tiujn Vi ne punas pro iliaj pekoj,  
ĉar Via boneco estas super pekuloj, kiuj konvertiĝas.

8 Kaj nun Vi estas nia Dio, kaj ni la popolo, kiun Vi amas ;  
rigardu al ni kaj kompatu, ho Dio de Izrael, ĉar ni estas la viaj,  
kaj ne forturnu Vian kompatemon de ni, por ke ili ne ataku nin.

9 Ĉar la semon<sup>171</sup> de Abraham Vi elektis inter ĉiuj popoloj,  
kaj Vian nomon Vi metis sur nin, Sinjoro,  
kaj por eterne Vi ne forpuŝos nin.

10 Interligon Vi faris pro ni kun niaj gepatroj,  
kaj ni esperas je Vi, kiam niajn animojn ni turnas al Vi.

11 La kompatemo de l' Sinjoro estu kun la domo de Izrael por  
eterne kaj plu.

## 10 Himno. De Salomono.

1 Feliĉa la viro, kiun la Sinjoro memoras per riproĉo,  
kaj kiun per la vergo Li forturnas de lia malbona vojo,  
por ke li puriĝu el pekoj, ke tiuj ne plinombriĝu.

2 Kiu al la vergo turnas sian dorson\*, tiu puriĝos :  
bona ja estas la Sinjoro por tiuj, kiuj akceptas edukiĝon.

3 Ĉar Li ebenigas la vojojn de l' justuloj,  
kaj Li ne kurbigas ilin per edukado,  
kaj la graco de l' Sinjoro estas super tiuj, kiuj sincere Lin amas.

4 La Sinjoro kompateme memoras pri Siaj servantoj :  
Li ja atestas tion en la leĝo de l' eterna interligo,  
la Sinjoro atestas tion en la vojoj de la homoj, en Sia atento.

5 Justa kaj bona estas nia Sinjoro en Siaj juĝoj, ĝis eterne,  
kaj Izrael laŭdu la nomon de l' Sinjoro kun ĝojo !

---

<sup>171</sup> Idaron.

6 La piuloj laŭdu Lin en la eklezio de l' popolo<sup>172</sup>,  
ĉar, je la ĝojo de Izrael, Dio kompatas pri la malriĉuloj :  
7 bona ja kaj kompatema estas Dio, por eterne,  
kaj la kunvenoj de Izrael laŭdos la nomon de l' Sinjoro.  
8 De la Sinjoro venas la savo al la domo de Izrael,  
je ĝojo eterna !

## 11 De Salomono. <Psalmoj> de espero.

1 Trumpetu en Cion per laŭta trumpeto por la sanktuloj,  
heroldu en Jerusalemo la voĉon de la venko ;  
ĉar Dio kompatis pri Izrael, Li rigardis al ili !  
2 Jerusalemo, ekstaru sur altaĵon, kaj vidu viajn idojn :  
kunigitaj en unu de la Sinjoro – de oriento kaj de okcidento !  
3 El la nordo ili venas, jubilante pri sia Dio ;  
de la malproksimaj insuloj ilin Dio kunigis.  
4 Altajn montojn pro ili Li malaltigis en ebenaĵon ;  
la montetoj forfuĝis antaŭ ilia reveno.  
5 La arbaroj ombrumis al ili dum ilia pasado ;  
ĉiaspecajn bonodorajn arbojn por ili Dio kreskigis,  
6 por ke Izrael iru sub ŝirmado de l' gloro de ilia Dio.  
7 Ho Jerusalemo, vestu vin per honoro-vestaĵoj,  
pretigu viajn sanktajn vestojn ;  
ĉar Dio eldiris bonon por Izrael, por eterne kaj plu !

8 La Sinjoro faru, kion Li promesis por Izrael kaj Jerusalemo ;  
la Sinjoro starigu Izraelon per Sia glora nomo !  
9 La kompatemo de la Sinjoro super Izrael estas por eterne  
kaj plu.

---

<sup>172</sup> La vorto *eklezio* fakte signifas *popolkunveno*.

## 12 De Salomono. <Kontraŭ> la lango de l' senleĝuloj.

1 Sinjoro, savu mian animon de viro malica kaj senleĝa, de la lango senleĝa kaj kalumnia, kiu parolas mensogon kaj trompon.

2 Multdirekten torditaj estas la paroloj de la lango de viro malica, <ili estas> kiel fajro inter popolo, kiu ne tuŝas ties belon<sup>173</sup>.

3 Lia vizito bruligas domojn per lango mensogema, forhakas arbojn de ĝojo, bruligante senleĝulojn, ĥaosigas domojn je batalado per sia lipoj kalumniaj.

4 Dio distancigu la lipojn de senkulpuloj longe de senleĝuloj  
en konfuziĝo,  
kaj la ostoj de kalumniantoj estu ĵetitaj longe for de la timantoj  
antaŭ Dio ;

la lango kalumnia pereu en la flamanta fajro, longe for de la  
piuloj !

5 La Sinjoro ŝirmu la animon paceman, kiu malamas la  
maljustajn,  
kaj la viron, kiu faras pacon en sia domo, la Sinjoro starigu !

6 De la Sinjoro estas la savo sur Lia servanto Izrael, por eterne :  
pereu de antaŭ la vizaĝo de l' Sinjoro ĉiuj pekuloj,  
kaj la piuloj de la Sinjoro heredu la promesojn de la Sinjoro !

## 13 De Salomono. Psalmo : konsolo por la justuloj.

1 La dekstra mano de l' Sinjoro ŝirmis min ;  
la dekstra mano de l' Sinjoro indulgis min.

2 La brako de l' Sinjoro nin savis de la glavo, kiu ĉirkaŭiras,

---

<sup>173</sup> Traduko nek teksto certa. Kelkaj forigas ĉion post “fajro”; aliaj tradukas: kiel fajro inter popolo, kiu konsumas ĝian belon; alia manuskripto diras: kiel fajro sur draŝejo, kiu forbruligas la pajlon.

de malsato kaj de la morto de l' pekuloj.  
3 Sovaĝaj bestoj atakis ilin ;  
per la dentoj ili disŝiris ilian karnon,  
kaj per la makzeloj ili muelis iliajn ostojn.  
4 Sed el ĉio ĉi savis nin la Sinjoro.

5 La piulo ekpanikis pro siaj transpaŝoj<sup>174</sup>,  
ĉu eble li estos kuntrenita kun la senpiuloj.  
6 Ĉar la falo de la pekulo estis terura ;  
sed nenio el tio trafas la justulon.  
7 Ĉar la puno de l' justuloj pro <aferoj faritaj> en scio ne  
estas komparebla

je la falo de la pekuloj.

8 La justulo estas punata en kaŝiteco,  
por ke la pekulo ne ĝoju pri la justulo.  
9 Ĉar la justulon Li avertas kiel filon amatan,  
kaj Li punas lin kiel la unuenaskitan filon.  
10 Ĉar la Sinjoro indulgos Siajn piulojn,  
kaj iliajn transpaŝojn Li neniigos per punado.  
11 Ĉar la vivo de l' justuloj estas por eterne,  
sed la pekuloj estas prenitaj en pereon,  
kaj ilia memoro ne estos plu trovebla.  
12 Super la justuloj tamen restas la graco de l' Sinjoro,  
kaj Lia kompatemo super tiuj, kiuj timas antaŭ Li.

## 14 Himno de Salomono.

1 La Sinjoro estas fidela al tiuj, kiuj amas Lin en vero,  
kiuj akceptas Lian punbatadon,

---

<sup>174</sup> Tiu ĉi frazo ŝajne ne estas ĝuste konservita; en la kunteksto ne estas logike, ke pri *piulo* oni diras ke li panikas pro siaj pekoj. Kelkaj tial tradukas: La malpiulo estis terurita pro siaj pekoj, aŭ simile.



2 kiuj iradas laŭ Liaj justaj ordonoj,  
laŭ la leĝo, kiun Li donis al ni por vivi.  
3 La piuloj de l' Sinjoro per tio havos eternan vivon :  
la paradizo de l' Sinjoro, la arboj de la vivo estas Liaj piuloj.  
4 Ilia plantiĝo estas enradikiĝinta por eterne,  
ili ne estos ekstermitaj ĉiujn tagojn de la ĉielo,  
5 ĉar la parto kaj la heredaĵo de Dio estas Izrael.

6 Sed ne tiel pri la pekuloj kaj la senleĝuloj,  
kiuj unu tagon ĝojas pri la ĝuo de siaj pekoj<sup>175</sup> :  
7 ili ĝojas je sendaŭra plezuro,  
kaj pri Dio ili ne pensas.  
8 Sed la vojoj de la homoj al Li ĉiam estas konataj,  
kaj la internon de la koro Li jam konas antaŭ ol io okazas.  
9 Tial ilia heredaĵo estas Hadeso, obskuro kaj perejo,  
kaj ili ne estos trovitaj je la tago de l' graco por la justuloj.  
10 Sed la piuloj de l' Sinjoro heredos la vivon en ĝojo.

## 15 Psalmo de Salomono kun kanto.

1 En mia premateco mi alvokis la nomon de l' Sinjoro,  
je la helpo de la Dio de Jakob mi esperis, kaj mi saviĝis ;  
ĉar la espero kaj la rifuĝo de la malriĉuloj estas Vi, ho Dio !  
2 Kiu ja povus fari alie, ho Dio, ol sincere laŭdi Vin ?  
Kaj je kio kapablas la homo, se ne laŭdi Vian nomon ?  
3 Novan psalmon kun kanto el koro ĝoja,  
la frukton de lipoj sur bone agordita instrumento de la lango,  
la unuaaĵon de la lipoj el pia kaj sincera koro —,  
4 kiu tion prezentas, tiu por eterne ne estos skuita de malfeliĉo :

---

<sup>175</sup> Alia traduko: kiuj ĝojas la tagon, partoprenante la pekojn  
<unuj de l' aliaj>.

la flagra fajro kaj la kolero pri malpiuloj neniam atingos lin,  
5 kiam de la vizaĝo de l' Sinjoro tiuj eliras super la pekulojn  
por neniigi la pekulojn komplete.

6 Ĉar la signon de Dio portas la piuloj, kio savas ilin.

7 Malsato, glavo kaj morto restos longe for de la justuloj,  
ĉar kvazaŭ persekutatoj dum batalo ili fuĝos de la piuloj ;  
8 sed mem ili persekutos la pekulojn kaj kaptos ilin,  
kaj kiuj faras maljuston, tiuj ne eskapos la juĝon de l' Sinjoro :  
9 kvazaŭ de spertaj malamikoj ili estos kaptitaj,  
ĉar la signo de l' pereco estas sur ilia frunto.

10 Kaj la heredaĵo de la pekuloj estas pereco kaj obskuro,  
kaj la maljusto persekutos ilin suben ĝis en Hadeson.

11 Ilia heredaĵo ne estos trovita de iliaj infanoj,  
ĉar la pekoj dezertigos la domojn de la pekuloj ;

12 la pekuloj por eterne pereos je la tago de la juĝo de l' Sinjoro,  
kiam Dio vizitas la teron per Sia juĝado ;

13 sed kiuj timas antaŭ la Sinjoro, tiuj tiam trovos kompatemon,  
kaj vivos en la kompatemo de ilia Dio,  
sed la pekuloj pereos por eterne.

## 16 Himno de Salomono.

1 Dum dormetis mia animo, ne memora pri la Sinjoro, mi  
preskaŭ falis,

profunde mi endormiĝis, granddistance de Dio,

2 preskaŭ elverŝiĝis mia animo ĝis la morto ;

<mi estis> apud la pordegoj de Hadeso kune kun la pekulo.

3 Tiel mia animo distancigis sin de la Sinjoro, la Dio de Izrael,  
se en Sia eterna graco la Sinjoro ne indulgus pri mi por eterne.

4 Li pikis min, kiel ĉevalon oni instigas, por teni ĝin maldorma,  
mia savanto kaj mia apoganto ĉiam min savis.

5 Vin mi laŭdas, ho Dio, ĉar Vi akceptis min al saviĝo,  
kaj ĉar min Vi ne je mia pereco alkalkulis al la pekuloj.  
6 Ho Dio, ne lasu Vian gracon cedi de mi,  
nek Vian memoron el mia koro – ĝis mia morto !  
7 Retenu min, Dio, de peko grandega,  
kaj de ĉiu malbona virino, kiu stumbligas la malsaĝulon.  
8 Ne ensorcĉu min la beleco de virino malpia,  
nek iu ajn submetita al peko senseca.

9 Konduku la laboron de miaj manoj antaŭ Vi,  
kaj gardu mian iradon tiel, ke mi memoru pri Vi.  
10 Ŝirmu mian langon kaj miajn lipojn per paroloj de vero ;  
forigu longe de mi koleron kaj sensencan koleriĝemon.  
11 Murmuradon kaj malkuraĝon ĉe elproviĝo Vi tenu for de mi,  
kaj se mi pekas, punu min, por ke mi korektiĝu.

12 Fortikigu mian koron en honorata kontento:  
se Vi fortikigas mian animon, sufiĉas al mi, kion Vi donis.  
13 Ĉar se ne Vi donas la forton,  
kiu do eltenus, se li estas punata en malriĉo ?  
14 Se iu estas punata pro propra kulpo,  
Vi elprovas lin en lia karno kaj en la mizero de l' malriĉo.  
15 Se en tio la justulo tenas sin stara,  
li ricevas indulgon de la Sinjoro.

## 17 Psalmo de Salomono kun kanto. Pri la reĝo.

1 Sinjoro, Vi mem estas nia reĝo por eterne kaj plu ;  
en Vi, ho Dio, fieras nia animo.  
2 Kio do estas la daŭro de la homa vivo sur la tero ?  
Same kiel lia tempo, estas lia espero en li.  
3 Sed ni esperas je Dio, nia savanto ;  
ĉar la potenco de nia Dio estas eterne kun kompatemo,

kaj la reĝeco de nia Dio staras eterne  
super la popoloj per juĝado.

4 Vi, Sinjoro, elektis Davidon reĝo super Izrael,  
kaj Vi ĵuris al li pri lia semaĵo<sup>176</sup> por ĉiam,  
ke lia reĝeco ne ĉesos antaŭ Vi.

5 Sed pro niaj pekoj la pekuloj leviĝis kontraŭ ni ;  
ili atakis nin kaj pelis nin for.

Homoj, al kiuj Vi ne donis promeson,  
rabis perforte, kaj ne gloris Vian honoran nomon.

6 Parademe ili starigis al si reĝecon pro sia aroganteco,  
neniigis la tronon de David en fanfaronata trofiero.

7\* Sed Vi, ho Dio, terenĵetis ilin kaj forprenis ilian semaĵon el  
la lando :

eksterlandano, fremda al nia popolo, leviĝis kontraŭ ili.

8 Laŭ iliaj pekoj, ho Dio, Vi repagis al ili,  
tiel ke ili ricevis, kion ili meritis.

9 Dio ne kompatis pri ili ;

Li priserĉis ilian semaĵon kaj Li lasis foriri neniun el ili.

10 Fidela estas la Sinjoro en ĉiuj Siaj juĝoj, kiujn Li faras sur la  
tero.

11 La senleĝulo senigis nian teron de ĝiaj loĝantoj ;  
junajn kaj maljunajn ili murdis kune kun iliaj infanoj ;

12 En sia brila kolero<sup>177</sup> li sendis ilin for al la okcidento,  
kaj la gvidantojn de la lando li ne indulgis kontraŭ insultado.

13 En sia fremdeco la malamiko plenumis agojn trokuraĝajn,  
kaj lia koro estis tre fremda je nia Dio.

14 Ĉio, kion li faris en Jerusalemo,  
estis tute kiel agadas la paganoj en urboj konkeritaj.

---

<sup>176</sup> Idaro.

<sup>177</sup> Nekutima esprimo; ankaŭ eblas: kolero de brilo. Eble temas pri la  
“prava kolero” de Dio.

15 La infanoj de l' interligo ekkaptis tion<sup>178</sup> meze de homoj de  
miksita deveno ;  
estis neniŭ inter ili, kiu gardis kompatemon kaj fidelon en  
Jerusalemo.

16 Tiuj, kiuj amis la piajn kunvenojn, fuĝis for de ili,  
ili dispeliĝis kvazaŭ paseroj el siaj nestoj.

17 Ili vagadis tra la dezerto por savi sian animon de pereo,  
la vivo de eĉ nur unu, kiu estis savita de ili, estis valora en la  
okuloj de l' ekzilitoj.

18 Tra la tutan mondon dispelis ilin la senleĝuloj,  
ĉar la ĉielo sin retenis de pluvado sur la teron.

19 Fontoj, kiuj de jarcentoj fluas el la profundo de altaj montoj,  
estis haltigitaj,

ĉar inter ili estis neniŭ, kiu faris justecon kaj juston.

20 Ekde la plej altaj ĝis la plej humilaj

<ili vivis> en ĉiaspecaj pekoj :

la reĝo en kontraŭleĝeco,

la juĝisto en nefidindo,

la popolo en pekoj.

21 Vidu tion, ho Sinjoro, kaj igu leviĝi ilian reĝon,  
la filon de David, por regi super Via servanto Izrael,  
en la tempo, kiun Vi, Dio, fiksas.

22 Kaj zonu lin per forto por neniigi maljustajn regantojn,  
por purigi Jerusalemon de paganoj,  
kiuj distretas ĝin al la pereo.

23 Saĝa kaj justa li forpelu  
la pekulojn el sia heredaĵo,  
li frakasu la trokuraĝon de l' pekulo  
kiel vazojn de potfaristo,

24 per fera stango li frakasu ilin komplete,

---

<sup>178</sup> Ĉu tiujn praktikojn?

pereigu la senleĝajn paganojn per parolo de sia buŝo ;  
25 antaŭ liaj minacoj fuĝos la paganoj,  
kaj li punbatu la pekulojn pro la pensoj de ilia koro.

26 Tiam li kunigos sanktan popolon,  
kiun li regos en justeco,  
kaj li juĝos la tribojn de l' popolo,  
kiun sanktigis la Sinjoro lia Dio.

27 Li ne plu toleros, ke estos plu maljusto en ilia mezo,  
kaj ĉe ili neniu plu loĝu, kiu scias pri malbono ;  
ĉar li konos ilin, ĉar ili ĉiuj estas filoj de sia Dio.  
28 Kaj li dividos ilin sur la lando laŭ iliaj triboj,  
kaj nek eksterulo nek fremdulo estonte plu loĝos inter ili.  
29 Popolojn kaj tribojn li juĝas laŭ sia justa saĝeco. Sela.

30 La paganaj popoloj servos al li sub lia jugo  
kaj la Sinjoron li ĝloros malkaŝe antaŭ la tuta mondo  
kaj Jerusalemon li purigos kaj sanktigos, kiel de la komenco.

31 Popoloj venos de finoj de la tero vidi lian gloron,  
alportante siajn elĉerpitajn filojn kiel donacon,  
kaj por vidi la gloron de l' Sinjoro,  
per kiu Dio gloris ĝin.

32 Kaj li estos reĝo justa, instruita de Dio,  
kaj en tiuj tagoj ne okazos maljusto inter ili,  
ĉar ili ĉiuj estos sanktaj,  
kaj ilia reĝo estos la Mesio de l' Sinjoro<sup>179</sup>.

33 Ĉar li ne konfidos je ĉevalo, rajdisto aŭ pafarko ;  
li ankaŭ ne kunigos oron aŭ arĝenton por la milito.  
Kaj sian esperon li ne metos je la amasoj, en la tago de l'  
militado.

---

<sup>179</sup> Aŭ: la Sinjoro Mesio.

34 La Sinjoro mem estas lia reĝo,  
la espero de tiu, kiu fortas pro espero je Dio.

Li kompatos ĉiujn paganojn,  
Kiuj staros timplene antaŭ li.

35 Ĉar por ĉiam li frapos la teron per la parolo de sia buŝo,  
li benas la popolon de l' Sinjoro per saĝeco en ĝojo.

36 Kaj pura de pekoj <li estos> por regi super popolo granda.  
Li bridos la gvidantojn kaj forpelos pekulojn per sia forta parolo.

37 Li ankaŭ neniam en sia vivo malfortiĝos antaŭ Dio ;  
ĉar Dio fortikigis lin per sankta Spirito

kaj faris lin saĝa en la konsilio, agema kaj justa.

38 Tiel la beno de l' Sinjoro estos kun li plenforte,  
kaj li ne malfortiĝos.

39 Lia espero estas je la Sinjoro :  
kiu do entreprenos ion kontraŭ li ?

40 Potenca en agoj kaj forta en la timo antaŭ la Sinjoro,  
li paŝtas la gregon de la Sinjoro, fidele kaj juste,  
kaj nenium el inter ili li lasos malfortiĝi sur ilia herbejo.

41 Ilin ĉiujn li kondukas en justeco,  
kaj inter ili ne estos trokuraĝo,  
ke plenumiĝus inter ili perforto.

42 Tio estas la fiero de la reĝo de Izrael, kiun elektis Dio,  
por starigi lin super la domon de Izrael,  
por ke li korektu ĝin.

43 Liaj paroloj estas pli puraj ol la plej pura oro,  
en la kunvenoj li juĝos la tribojn de la sanktigita popolo,  
liaj paroloj estas kiel la paroloj de l' sanktuloj,  
meze de sanktigataj popoloj.

44 Feliĉaj, kiuj vivos en tiu tempo,  
por vidi la bonan fortunon de Izrael,  
kiun realigos Dio en la kunveno de l' triboj.

45 Dio baldaŭ venigu Sian kompatemon super Izraelon ;  
Li savu nin de la malpuriĝo de profanaj malamikoj !  
46 La Sinjoro mem estas nia reĝo por eterne kaj plu.

**18** Psalmoj de Salomono.  
Denove pri la Mesio de l' Sinjoro<sup>180</sup>.

1 Sinjoro, Via kompato estas super la kreitaĵoj de Viaj manoj,  
por eterne,  
Vi montras Vian bonecon kun riĉa donaco al Izrael;  
2 Viaj okuloj ripozas sur ili, ke ili ne suferu mankon ;  
Viaj okuloj aŭskultas la espero-plenan petadon de la malriĉulo.  
3 Viaj juĝoj estas plenkompatemaj super la tuta tero,  
kaj Via amo direktiĝas al la semajo de Abraham, la Izraelidoj.  
4 Via punado al ni estas kvazaŭ al solfilo, al unuenaskito,  
por forturni la obeeman animon de senkonscia erarado.  
5 Ho Dio, purigu Izraelon por la tago de saniga kompato,  
por la tago de elektiĝo, kiam Lia Mesio ekregos.

6 Feliĉaj, kiuj vivos en tiuj tagoj,  
por vidi la bonon de l' Sinjoro, kiun Li faros por generacio  
estonta :

7 sub la edukanta vergo de l' Mesio de la Sinjoro<sup>181</sup>,  
en timo antaŭ lia Dio,  
en saĝeco per la Spirito,  
kaj en justeco kaj forto,  
8 por gvidi ĉiujn en agoj de justeco, en timo antaŭ Dio,  
por starigi ilin antaŭ la vizaĝo de l' Sinjoro :  
9 bonan generacion plenan je timo antaŭ Dio,  
en la tagoj de graco. Sela.

---

<sup>180</sup> Aŭ: la Sinjoro Mesio.

<sup>181</sup> Vidu la antaŭan noton.



10 Granda estas nia Dio kaj glora,  
Kiu loĝas en la alto,  
Kiu ordigis la lumojn en iliaj irejoj,  
por fiksi la tempojn, tago post tago.  
Ili ne forlasis la vojon,  
kiun Li ordonis al ili,  
11 En la timo antaŭ Dio ili iradas tago post tago,  
depost kiam Dio ilin kreis por eterne.  
12 Kaj ili ne ŝanĝiĝis de irejo  
depost kiam ilin kreis Dio,  
depost tempoj praaj.  
Ili ne devojigis de siaj padoj,  
krom se Dio tion devigis al ili  
per ordono de Siaj servistoj.

## Notoj al **Psalmoj de Salomono**

- 1:1** La psalmisto parolas kiel la personigita urbo Jerusalemo.
- 2:1** Laŭdire en psalmo 2, same kiel en 8 kaj 17, troviĝas pluraj detaloj kiuj klare akordiĝas kun la konkero fare de Pompejo en 63 a.Kr. Vidu la enkondukon. «La pekulo» estas kvazaŭ kodigita indiko – kiel kutime en apokalipsa literaturo. La ramon, laŭ Flavio Jozefo, Pompejo alvenigis el Tiro.
- 2:25** Drako – eble bildo por Egiptujo.
- 2:26** k.s. Detaloj pri la morto de Pompejo en Egiptujo.
- 8:15-19** Pompejo – de la fino de la tero – estis ĝoje bonvenigita de la gvidantoj de l' urbo. Laŭ Flavio Jozefo la kontraŭuloj de Aristobulo (de la Hasmoneaj) permesis al Pompejo okupi la urbon kaj la reĝan palacon, sed partiuloj de Aristobulo enfermis sin en la templo-komplekson kaj nur post tri monatoj da bataloj estis forigitaj.
- 10:2** Por pune ricevi bat-korektaĵon.
- 17:7** Pompejo forkondukis Aristobulon kaj ties filojn al Romo.

# Letero al la Laodiceanoj

## Enkonduko al la Letero al la Laodiceanoj

Paŭlo jam frue fariĝis ege influa en la formiĝanta kristanismo<sup>182</sup>. Tial plurfoje oni enŝovis aliajn leterojn sub lian (ŝajnan) aŭtorecon. Kelkfoje, laŭ pluraj fakuloj, temas pri leteroj kiuj tiel klare portas lian influon, ke oni parolas pri liaj lernintoj, sed aliffoje la pseŭdopaŭlaj leteroj apenaŭ havas rilaton al la vera Paŭlo<sup>183</sup>. En mia traduko mi do parolas pri « Paŭlo kaj lia skolo ».

Sed la ĉi tie prezentata letero ne estas de la apostolo mem. Aliflanke ĝi ŝajne havas sufiĉe da tuŝpunktoj kun veraj leteroj de Paŭlo kaj lia skolo : temas iasence pri t.n. *ĉentono* en prozo.

La teksto estas en la Latina, eĉ ne vere brila Latina, kaj la verkodato estas neniel difinebla. Iamaniere ĝi trafis en la manuskriptan tradicion de l' granda Vulgato.

Tial apendice ĝi devas esti ĉi tie.

---

<sup>182</sup> Vidu ekzemple *Martirakto el Skilio* 12 en Tertuliano – *Apologio*, p. 106.

<sup>183</sup> Ekzemple oni vidu la “korespondadon” inter ps-Paŭlo kaj ps-Seneko en *Antologio Latina* 3.

## Al la Laodiceanoj

1:1 Paŭlo, apostolo, ne <vokita> de homoj nek pere de homo, sed per Jesuo Mesio, al la fratoj kiuj estas en<sup>184</sup> Laodiceo : 2 gracon al vi kaj pacon de Dio la Patro kaj de la Sinjoro Jesuo Mesio<sup>185</sup>.

3 Mi dankas Mesion ĉe ĉiuj miaj preĝoj<sup>186</sup>, ĉar vi restas en Li, kaj ĉar vi persistas en lia<sup>187</sup> agado, atendante la promeson je la tago de la juĝo. 4 Ne devojigu vin la malplenaj rezonadoj<sup>188</sup> de certaj homoj, kiuj enŝteliĝis por forturni vin de la vero de l' bona mesaĝo<sup>189</sup>, kiun mi heroldas. 5 Dio nun faros, ke kiuj venas de mi, servas al la progreso de la vero de l' bona mesaĝo<sup>190</sup>, kaj agas bonvoleme <en kio kontribuas al> la feliĉo de la eterna vivo<sup>191</sup>.

---

<sup>184</sup> Ga 1:1.

<sup>185</sup> Ga 1:3.

<sup>186</sup> Fp 1:3-4.

<sup>187</sup> Rm 2:7.

<sup>188</sup> Ks 2:4.

<sup>189</sup> Ga 2:14.

<sup>190</sup> Fp 1:12.

<sup>191</sup> Traduko ne tute certa.

6 *Estas nun klare por ĉiuj, ke miajn katenojn mi portas pro Mesio*<sup>192</sup>; pro ili mi gaje ĝojas. 7 *Tio rezultigos mian eternan savigon; kaj tio okazas pro via preĝado kaj la helpo de la Sankta Spirito*<sup>193</sup>, – ĉu mi vivos ĉu mortos. 8 *Ĉar por mi vivo estas <esti> en Mesio, kaj morto estas ĝojo*<sup>194</sup>. 9 *En li Dio montras Sian kompatemon, por ke vi same estu plenaj je amo kaj unuanimaj*<sup>195</sup>.

10 *Tial, miaj tre amataj, ĉar vi aŭskultis min kiam mi ĉeestis*<sup>196</sup>, memortenu do tion, kaj plenumu ĝin respektive antaŭ Dio, kaj vi vivos eterne; 11 *ĉar ja estas Dio kiu agas en vi*<sup>197</sup>. 12 *Kion ajn vi faros, faru ĝin sen protesto*<sup>198</sup>.

13 *Fine, miaj tre amataj: ĝoju en Mesio*<sup>199</sup>. *Atentu pri la malpuruloj gajnavidaj*<sup>200</sup>. 14 *Ĉiuj viaj deziroj estu apertaj antaŭ Dio*<sup>201</sup>. *Restu staraj*<sup>202</sup>, en la menso de Mesio<sup>203</sup>! 15 *Kaj faru, kio estas nobla kaj vera, ĉasta kaj justa, kaj aminda*<sup>204</sup>. 16 *Kaj kion vi aŭdis kaj akceptis, tion ankore vi retenu: tiam vi havos pacon*<sup>205</sup>.

---

<sup>192</sup> Fp 1:13.

<sup>193</sup> Fp 1:19-20.

<sup>194</sup> Fp 1:21.

<sup>195</sup> Fp 2:2.

<sup>196</sup> Fp 2:12.

<sup>197</sup> Fp 2:13.

<sup>198</sup> Fp 2:14.

<sup>199</sup> Fp 3:1.

<sup>200</sup> 1 Tm 3:8.

<sup>201</sup> Fp 4:6.

<sup>202</sup> Ga 5:1.

<sup>203</sup> 1 Kt 2:14.

<sup>204</sup> Fp 4:8.

<sup>205</sup> Fp 4:9.

[17 *Brakumu ĉiujn fratojn kun sankta kiso.*<sup>206</sup>] 18 *Salutas vin la sanktuloj*<sup>207</sup>. 19 *La graco de la Sinjoro Jesuo estu kun via spirito*<sup>208</sup>. 20 Legigu al vi ankaŭ <mian leteron> al la Kolosanoj.

\* \* \*

---

<sup>206</sup> Mankas en la plimultaj manuskriptoj. 2 Kt 13:12.

<sup>207</sup> Fp 4:21-22.

<sup>208</sup> Fp 4:23.

## Aperas ĉe VoKo du serietoj:

### Serieto “Voĉoj Kristanaj”

- 1 Evangelio laŭ Petro & La Morto de Jesuo kaj kio poste? (apokrifa el la Greka; kun akompana eseo)
- 2 Tertuliano – Apologio (el la Latina, 197 p.Kr.)
- 3 Sin-konservo (pri kristanismo kaj nukleaj armiloj; el la Nederlanda)
- 4 Al Diogneto (el la Greka; fru-kristana apologieto)
- 5 Kenneth Twinn – Unitariismo (originale en Esperanto)
- 6 (ne aperis)
- 7 Gerrit Berveling – Dio, Kristanismo, Aliaj Religioj (el la Nederlanda)
- 8 Evangelio laŭ Maria Magdalena (apokrifa; kun eseo)
- 9 Jam Temp’ Estál; la “Kairos-dokumento” de sud-afrikaj kristanoj (pri ras-apartigo; el la Nederlanda)
- 10 Beatrijs (mezepoka Maria-legendo; el la Nederlanda)
- 11 Isai Sumber – Kie oni trovas tion en la Korano? (eta konkordanco)
- 12 Tertuliano – Kuraĝigo por la Martiroj (el la Latina)
- 13 Kantu al la Eternulo (ĉefe el-ĉefaj kristanaj himnoj)
- 14 De Goeij – La virino en la Judismo (el la Nederlanda)
- 15 SeKELIpoetas (poezio originala el la rondo de K.E.L.I.)
- 16 Francisko de Asizo – Kantiko de l’ Kreitaĵoj (dulingva)
- 17 Ekumena Jardeko de Eklezioj en Solidareco kun Virinoj
- 18 Jan Hus – Defendo de la libro pri la Triunuo (el la Latina)
- 19 La Remonstranta Frataro (informilo pri liberala eklezio)
- 20 De Wert – Interveno ĉe la generado (etika studaĵo pri artefarita gravedigo kaj rilataj temoj; el la Nederlanda)
- 21 La Praevangelio laŭ Jakobo (apokrifa; el la Greka)
- 22 La Evangelio Kopta laŭ Tomaso (apokrifa)
- 23 Hadewijch – Per Amo al Amo (trad. Wouter F. Pilger el la Nederlanda)
- 24 La Pasiono de Perpetua kaj Feliĉita (el la Latina)
- 25 Cipriano – La Unueco de la Katolika Eklezio (el la Latina)

26 La Duakanonaj Libroj, volumo 3: libroj de la Ortodoksiaj Eklezioj (el la Latina kaj el la Greka).

## Serieto “VoKo-numeroj”

- 1 Gerrit Berveling – Vi kion legus tie ĉi? (poemareto)
- 2 Gerrit Berveling – Tri ‘stas tro (poemciklo); dua eldono ĉe FONTO.
- 3 (ne aperis)
- 4 Lukiano – Lukio aŭ Azeno (el la Greka); dua eldono ĉe FONTO.
- 5 Gerrit Berveling – Trifolio (poemetoj trilingve)
- 6 La Fragmentoj de Heraklito (el la Greka)
- 7 Seneko – Apokolokintozo de l’ Dia Klaŭdio (el la Latina)
- 8 Seneko – Konsolo al sia patrino Helvia (el la Latina)
- 9 Horacio – Romaj Odoj (el la Latina); nun en *Antologio Latina*, ĉe FONTO.
- 10 Katulo – Amo malamo (el la Latina); nun en *Antologio Latina*, ĉe FONTO.
- 11 Seneko – Pri feliĉa vivado (trad. István Ertl el la Latina)
- 12 Zofia Banet-Fornalowa – Antoni Grabowski (originala eseo)
- 13 Lu Jixin – Invit’ al Ĉinesko (originala poezio)
- 14 Marcialo – Da mav’ estos neniam sat! (el la Latina)
- 15 Freya Berveling – Poemoj / Gedichten (dulingve)
- 16 El tiom da Jarcentoj (poemoj el la Latina)
- 17 Marko Tulio Cicerono – La Songo de Skipiono (trad. Hjalmar Johannes Runeberg kaj trad. Gerrit Berveling el la Latina) ; nun en *Antologio Latina*, ĉe FONTO.
- 18 Tibulo – Elegioj (el la Latina)
- 19 Gerrit Berveling – La unuaj 25 jaroj en mia memoro
- 20 Gerrit Berveling – De duopo al kvaropo
- 21 Gerrit Berveling – Streĉitaj koroj
- 22 Lukiano – Veraj Rakontoj (el la Greka)
- 23 Gerrit Berveling – Odoj & aliaj poemoj

Pluraj titoloj estas elĉerpitaj; novaj en preparo



## Bibliografio

### a) tradukoj en Esperanto

*Al Diogneto*, VoKo, Vlaardingen, 1986.

*Antologio Latina* Volumoj 1 kaj 2, Fonto, Chapecó 1998; Vol. 3 kaj 4 aperontaj.

*Biblio*; trad. L.L. Zamenhof, G. Berveling, J.C. Rust, B. J. Beveridge kaj C.G. Wilkinson; editoris IKUE kaj KELI; eldonis KAVA-PECH, Dobřichovice (Praha) 2006.

*La Bona Mesaĝo de Jesuo; laŭ Marko*, Fonto, Chapecó 1992.

- *laŭ Mateo*, Fonto, Chapecó 1992.

- *laŭ Luko*, Fonto, Chapecó 1992.

- *laŭ Johano* (kun sinopso), Fonto, Chapecó 1992.

Cipriano – *La Unneco de la Katolika Eklezio*, VoKo, Zwolle 2006.

*La Didakĉeo*, IABO, Ravenna 1979.

*La Duakanonaj Libro*j; vol. 1 kaj vol. 2; Fonto, Chapecó 2001.

*La Evangelio kopta laŭ Tomaso*, VoKo, Breda 1994.

*La Evangelio laŭ Maria Magdalena*, VoKo, Vlaardingen 1985.

*La Evangelio laŭ Petro ĉu La Morto de Jesuo kaj kio poste?*, VoKo, Vlaardingen 1986.

Hermiaso – *Satiro pri la profanaj filozofoj*, en la revuo Simpozio n-ro 17, 1991.

Herodoto – *Historio*, trad. Spiros Sarafian, Ateno 2006.

Klemento de Romo – *Letero al la Korintanoj*, trad. Armando Zecchin, UECI, Torino 2003.

*Nombroj*, Fonto, Chapecó 1999.

*La Pasiono de Perpetua kaj Felicità*, VoKo, Breda 1996.

*La Praevangelio laŭ Jakobo*, VoKo, Breda 1990.

Tertuliano – *Apologio*, VoKo, Vlaardingen 1982.

Tertuliano – *Kuraĝigo por la Martiroj*, VoKo, Vlaardingen 1986.

## b) teologiaj kaj aliaj konsultitaj verkoj

*De Apocriefe Boeken*, Den Hertog B.V., Houten 2001.

*The Book of Enoch*, trad. R.H. Charles; eld. S.P.C.K., London 1917;  
ofte reeldonita.

James H. Charlesworth (ed.) – *The Old Testament Pseudepigrapha, vol. 1: Apocalyptic Literature & Testaments*, Doubleday, New York e.a. 1983.

James H. Charlesworth (ed.) – *The Old Testament Pseudepigrapha, vol. 2: Expansions of the “Old Testament” and Legends, Wisdom and Philosophical Literature, Prayers, Psalms and Odes, Fragments of lost Judeo-Hellenistic Works*, Doubleday, New York e.a. 1985.

R.J. Coggins & M.A. Knibb – *The First & Second Books of Esdras; The Cambridge Bible Commentary on the New English Bible*, Cambridge University Press, Cambridge e.a. 1979.

M. de Goeij – *De Pseudepigraphen; Psalmen van Salomo, IV Ezra, Martyrium van Jesaja*, J.H. Kok, Kampen s.j. (ĉ 1980)

*The New Oxford Annotated Bible with the Apocrypha; an Ecumenical Study Bible; with the Apocryphal / Deuterocanonical Books*, Oxford University Press, New York 1991.

Pauly k.a. – *Der Kleine Pauly. Lexikon der Antike*, München 1979.

H. Paruzel, E. Wojtakowski, J. Lanzoni & R. di Prinzio – *Biblia Vortaro*, IABO, Roma 1984.

Bo Reicke & Leonhard Rost – *Bijbels-historisch woordenboek*, Spectrum, Utrecht/Antwerpen 1969.

G. Rust & D. Broadribb – *Terminaro por Bibliaj Studoj*, IABO, Ravenna 1973.

Elisabeth Schüssler Fiorenza (ed) – *Searching the Scriptures; vol. 2: A Feminist Commentary*, Crossroad, New York 1994.

*Septuaginta*, eld. Alfred Rahlfs, Deutsche Bibelstiftung Stuttgart, editio nona, du volumoj s.j.

*Biblia Sacra Vulgata*, adiuvantibus B. Fischer, I. Gribomont, H.F.D. Sparks, W. Thiele recensuit et brevi apparatu critico instruxit Robertus Weber [...], Deutsche Bibelgesellschaft, 4e verbesserte Auflage, Stuttgart 1994.

# Enhavtabelo

Antaŭparolo .....	5
Enkonduko .....	7
1 Ezra .....	13
4 Ezra .....	50
3 Makabeoj .....	125
4 Makabeoj .....	149
Psalmo 151 .....	184
Odoj .....	187
Preĝo de Manase .....	189
Matena himno .....	191
Apendico .....	193
Psalmoj de Salomono .....	196
Letero al la Laodiceanoj .....	225
Aperas ĉe VoKo du serietoj .....	229
Bibliografio .....	231





## La Duakanonaj Libroj de la Biblio

En la unua jarcento p.K. Hebreaj rabenoj fiksas kanonon por la Sanktaj Skriboj: *TeNaĤ*. Kristanismo iom pli ol 100 jarojn poste difinis la limojn de la Nova Testamento. En reformacia epoko, dum estiĝis nacilingvaj tradukoj, kalvinismo decidis, ke por la Olda Testamento ĝi prenos nur la judan kanonon. La romkatolika eklezio reage konfirmis la kanonecon de pluraj libroj el la Biblia tradicio, kiuj minacus iel malaperi el la atento: *Tobit, Judit, 1 kaj 2 Makabeoj* ktp.

Tiuj verkoj en 2001 aperis en Esperanto ĉe Fonto.

### Septuaginto kaj Vulgato

Antaŭ longe en la Egipta Aleksandrio, fondita de Aleksandro la Granda, estiĝis unu el la plej influaj institucioj de la Antikva Epoko: la fama *Biblioteko*. Tie fakuloj kolektis, pristudis kaj komentariis fakte ĉion, kion ili sukcesis trovi el ĉiuj regionoj de la konata mondo. Ankaŭ formiĝis iom post iom tie la unua traduko de la Sanktaj Skriboj de la Biblio: *Septuaginto*. La Hebreaj fiduloj, tamen, verkis ankaŭ librojn rekte en la Greka, kiujn oni transdonis plu en la manuskripta tradicio de *Septuaginto*.

En la okcidenta eklezio, kiu centriĝis ĉirkaŭ la patriarĥo de Romo – vidu i.a. *La Unueco de la Katolika Eklezio* de Cipriano – oni daŭre uzadis plurajn el tiuj libroj. Ilin ni konas kiel *La Duakanonaj Libroj*.

La orientaj eklezioj, tamen, plu uzadis kelkajn librojn, kiuj forfadis iom post iom el la atento de l' Roma tradicio. Kaj ĝuste tiujn librojn de la Ortodoksiaj Eklezioj unuafoje nialingve kunigas ĉi volumo: *1 Ezra, 4 (3) Ezra, 3 kaj 4 Makabeoj, Psalmo 151*.

Sed en la manuskripta tradicio de ambaŭ grandaj tradukoj de la Klasika Epoko, *Septuaginto* kaj *Vulgato*, transdoniĝis ankaŭ kelkaj verkaĵoj, kiujn nuntempe en neniuj eklezioj oni konsideras kanonaj, sed kiuj ja iel influis Kristanisman. Tial en la *Apendico* la legantoj trovos ankaŭ tiujn: *Psalmoj de Salomono, Letero al la Laodiceanoj*.

Krom la Etiopia *Henoĥ*, per la nuna volumo la Biblio kompletas en Esperanto.

